Attila Salga

# ESPERIGANTO

Romano



Eldonejo Libera

Attila Salga

# Esperiganto

Attila Salga

# Esperiganto

romano

Eldonejo Libera
2020

Originala titolo: Reménygyújtogató
Tradukis el la hungara: Jozefo Horvath

@Salga Attila, 2020
@József Horváth, 2020

# Enhavo

1. Heredo kaj renaskiĝo ........ 7

2. Riĉiĝo ........ 29

3. Rio-de-Ĵanejro ........ 48

4. La sentalenta aktorino ........ 77

5. Nafto estas kaj malestas ........ 87

6. Simio, mono, virinoj ........ 105

7. Aresto kaj sanatorio ........ 137

8. Postlasaĵo de la infantino ........ 159

9. Kompano de la alumetfabrikisto ........ 176

10. La flamo de espero flirtas ........ 207

# 1. Heredo kaj renaskiĝo

Mia sesdek-kvinjara onklino notis al si malĝoje, ke mi kondolencis ŝin aliflanke de la tombo de Patro. Ŝi reciprokis ĝin, kvankam de mia infanaĝo mi nutris malsimpation al ŝi. Onklino Eleonoro estis por mi enkorpiĝo de ĉio malbona. Malgraŭ la repaciga intenco de miaj gepatroj mi ne povis teni min senĝene en ŝia ĉeesto. Ŝi pafis malicajn rigardojn al mi, siblis la vortojn kaj faris abruptajn movojn, kvazaŭ ŝi volus bati min.

Ŝi nur akceptis mian saluton, ni ne provis iniciati konversacion. Mi ne miras, ke dum sia tuta vivo ŝi restis *Fräulein*[1]. Eĉ unu viro ne eltenus pli longe en ŝia apudeco. Ŝi instruis en supera gimnazio. Danke al unu el la plej grandaj bonŝancoj de mia vivo mi sukcesis eviti ŝiajn lecionojn de aritmetiko kaj matematiko. (Min plisaĝigis prie s-ro instruisto Scheppser.) La lernantoj nomis ŝin inter si Fernaza, kion motivis ne nur ŝia longa, kurba nazo sed ankaŭ ŝia demoneca personeco. Ŝi estis plena de sekretoj, surprizoj, malicaĵoj kaj aristokrata orgojlo. Ŝi trovis ĉiufoje en ĉio ion riproĉindan.

– Mi volus paroli kun vi, nevo. Pri multo! – ŝi anoncis kun emfaza ĝentilo. Ŝi esprimis sian intencon, kvazaŭ ŝi farus al mi komplezon. El la komisuroj, kurbiĝintaj ridete, de ŝia buŝo mi tuj deĉifris: pri la heredaĵo de Patro ŝi volas trakti kun mi.

– *Natürlich, Tante Eleonora!*[2] – mi diris kun soldateca kapklineto, poste mi jene daŭrigis:

– Mi restos dum unu semajno. Bonvolu mesaĝi por mi!

---

1 fraŭlino (germane)
2 Kompreneble, onklino Eleonoro! (germane)

Ŝi etendis al mi sian velkan maneton; per mimata mankiso mi adiaŭis ŝin.

La sepulton ni partoprenis eble dek- ĝis dek-kvinope kun la rabeno kaj liaj asistantoj. Tio unue surprizis min, sed informite pri la senfina ĉeno de ŝuldoj de Patro, mi komprenis tion. Kvin-ses homoj observis la adiaŭigon el deca distanco. Surbaze de iliaj kostumoj kaj konduto ne estis malfacile diveni, kun kiuj mi havos aferojn aranĝendajn. Ili alpaŝis min, esprimis sian kunsenton, sed sur iliaj vizaĝoj mi vidis, ke tio estas esprimo de espero. Ili sentis sin honoritaj, ke mi, la heredinto, t.e. nun jam plie ŝuldanto, aranĝos iliajn financojn.

Post mia alveno hieraŭ, iama infanaĝa amiko mia, Teodoro Reichmann klarigis al mi: per tratoj sen kovro kaj alimaniere Patro defraŭdis grandegajn sumojn de facilkredaj grandburĝoj de la urbo. Post la kondolenco trinkaĵkomercisto Antal Schillinger kaj advokato Péter Grossmann ĝentile sciigis al mi, ke nia oficiala revido fariĝos neevitebla en unu-du tagoj, ĉar mi devas kontribui al la aranĝo de la neklarigitaj financaĵoj de la forpasinto.

– Sinjoroj! Postmorgaŭ, ĵaŭde je la dek-unua horo antaŭtagmeze aperu en la loĝejo de mia forpasinta patro. Bonvenige mi atendos vin. – Mi kunfrapis la kalkanojn kiel husaroficiro. Eble mi ne devus permesi al mi tian troigon. Subite mi havis la impreson, kvazaŭ mi superece provokus ilin al duelo. „Nomu viajn asistantojn!" – feliĉe ĉi tiu frazo ne eldiriĝis, sed mi mordis la langopinton, por ke ĝi ne elglitu tra mia buŝo.

Mia promeso egalis vere en sia speco honorofendon kun ĉiuj ekscitoj kaj sekvoj de ĝi. Sed ili ne konjektis tion. Per la forkapto de la heredaĵo de Patro ili volas paralizi min korpe, psike kaj ankaŭ morale!

Post mia kapoklineto la kreditoroj adiaŭis kun kontentaj mie-

noj, profundaj riverencoj. Ĉirkaŭ kvindek paŝojn for ili komencis pli vigle paroli pri la okazintaĵoj.

Mi sidas ĉe la skulptita skribotablo el kverko de Patro. Ĝiajn angulojn antaŭajn ornamas pugnograndaj anĝeloj. Sur ĝiaj masivaj piedoj ĉirkaŭe kaj tutlonge ĉizis ĝia nekonata farinto malgrandajn hederbranĉojn kaj foliojn. Ĝia helgriza koloro aŭ ŝajnanta plie nigra en la krepusko, elvokas eĉ pli mornan impreson ol dum mia infanaĝo. Tiam ofte okazis, ke mi sidiĝis en la brakseĝo kun ornamita dorsapogilo. En la aĝo de kvar ĝis kvin jaroj mi ankoraŭ ne ĝisaltis la tabloplaton, poste mi tamen imagis min en la rolo de Patro, advokato Francisko Hoffner. Por mi li estis la unusola, vera potenco. Urba advokato kapablas ĉion atingi ĉe la respektinda tribunalo – mi rezonis en mi. La juĝistoj ĉiufoje lin pravigis, ja li estas, kiu defendas senkulpajn homojn, kiujn oni volas enprizonigi. Mia naiveco ne konis limojn. Sur blankaj folioj aŭ ĉifaĵoj, elfiŝitaj el la paperkorbo mi skribis hazarde nomon, stampis ĝin kaj alskribis apude mian verdikton: „La *hommo* estas senkulpa!" Mi subskribis la nomon de patro. Ĉiufoje mi skribis du *m* anstataŭ unu. Mi povis fari tion, kiam la kabineto de Patro senhomis; mia guvernistino, *Tante* Josephina ne restadis proksime, kaj patro pasigis plezure sian abundan libertempon aŭ ĉe sia amikino, aŭ eble kuracis sian oftan migrenon per dormado. Josephina perfekte parolis la francan kaj ankaŭ la anglan, do jam tiutempe mi eksciis, kion signifas *cherchez la femme!*, serĉu la virinon!. Kompreneble, ne en ties vera senco, do ke virino estas la direktanto de ĉiuj aferoj, ke ĉiufoje virino kernas en la aferoj. Tiutempe konkrete mi interpretis ties sencon. Josephina, la *gouvernante,* daŭre apudis min kiel mia edukistino, krompatrino, hejma instruistino de la germana, franca, pli malfrue de la angla lingvoj. Mi ne bezonis serĉi ŝin, ŝi retrovadis min ankaŭ, se mi ne volis.

Kvankam mi ne estis virino.

Sidante ĉe la tablo de Patro en mia infanaĝo, mi povus esti decidanto pri vivo kaj morto, sed mia bona koro benita indulgis ĉiujn. Kontraŭ la skribotablo staris triporda vitrino el ebono, en kiu viciĝis relikvoj de nia familio, valoraj oraj kaj arĝentaj teleroj, manĝiloj, kristalglasoj. Estante pedantulo, patro certe sukcesis anstataŭigi tiujn du vinglasojn, kiujn dum Kristnasko de 1901 mi puŝis de sur la manĝeja tablo, kurpetolante kun la filo de la instruisto, loĝanta najbare. Dum la puntempo kun enĉambra malliberigo mi devis legi germanajn klasikulojn en originalo, kaj dufoje ĉiutage reciti ties enhavon kaj parkeraĵojn el ili. Tamen multe pli malplaĉis al mi la tage unufoja manĝado, ĉar ĝi pruviĝis malmulta; cetere mi vivis per pano kaj akvo. Baldaŭ evidentiĝis por mi, ke Patro ne memoras detale la enhavon kaj rolantojn de ĉi tiuj libroj, tial li ne rimarkis, ke mi kompletigis ilin per mia fantazio. Lin pli interesis la germanaj parolturnoj kaj la ekzakta uzo de la gramatiko.

Ŝajnas, kvazaŭ mi sentus nostalgion. La vivon de Patro donis la Eternulo, kaj nun Li reprenis ĝin. Dum lia enterigo mia animo estis malplena, ŝvito kovris ĉiujn miajn membrojn. Krom mia vizaĝo, de kiu oni povus ja multe legi, se la estimantoj kaj akompanantoj de Patro esplore alrigardus min. Sed ili estis okupataj de la konsterna sento de la funebro kaj fina horo. Mi ne sciis, ĉu al dudek-kvinjara junulo senheredigita „jam" decas aŭ „ankoraŭ" konvenas faligi videblajn larmojn.

Mi estis studento de la teknika universitato de Budapeŝto... Kun miaj amikoj Ferdinando Dóka, Henriko Fried kaj aliaj. Fariĝis nia pasio misuzi la kredemon, scimankojn de aliaj homoj. Kaj ĉe saĝaj, kleraj homoj ni disŝutis la semojn de bona fido kaj klopodis ŝajnigi, ke ili faras negocon kun la plej honestaj homoj de la

mondo.

Mian unuan aŭdacan friponaĵon mi faris en 1912 en Budapeŝto kun miaj amikoj. Iun aŭgustan frumatenon, kiam la suno ankoraŭ ne bruligis, sed la proksime postenanta policano jam staris en deĵoro, haltis tri gumradaj veturiloj en la strato Rottenbiller. Ses muskolŝvelaj junuloj, speco de laboristoj desaltis kun pioĉoj en la manoj, kaj senplie komencis rompi la kave ĝiban pavimon. La policano, postenanta ĉe la angulo de la strato Rákóczi kontente notis al si, ke la konsilantaro de la ĉefurbo fine decidiĝis ĉesigi la misajn cirkonstancojn en la strato Rottenbiller. Oni do renovigos la ĝibe kavan pavimon. Tiel ankaŭ al li estos pli facile, la malbone pavimita strato ja povas kaŭzi multajn trafikajn perturbojn, akcidentojn. Li eĉ ŝercis kun la ses laboristoj, kiuj diligente ĵetis la trivitajn-breĉitajn pavimerojn sur la veturilojn.

– Atentu, amiketo, rompi estas pli facile ol konstrui!

– Ni ankaŭ konstruos ĝin, s'joro konstablo, allasu ĝin al ni – respondis Luĉjo, la longe magra, sunbronzita laboristo.

La blonda dikulo Emĉjo kromfortigis la efikon:

– Mi petas vin, s'joro konstablo, aranĝi tiel, ke la aŭtomobiloj ne venu proksimen, ili ja povus surveturi nin!

Ĉiuj ridis, poste la laboro bonritme plu daŭris. Mi observis ĉion ĉi el pruntita aŭtomobilo, staranta en la najbara strato, kun mia kompano, kunstudento Ludoviko Bégy.

La policano deturnis sin, ĉar li devis direkti la trafikon. Ĉirkaŭ la dek-unua horo kontente li konstatis, ke la laboristoj plenumis sian farendon. La tri pezaj veturiloj kun la alte amasigitaj pavimŝtonoj ĝuste tiam elrampis pene sur la placon Baross. La veturigistoj plengorĝe instigis la ĉevalojn, baraktantajn kun la enormaj ŝarĝoj.

Nur post tagoj evidentiĝis, ke oni ne ordonis malmeti la pa-

vimŝtonojn. La rilataj peticioj, raportoj, interoficejaj korespondaĵoj ankoraŭ ŝimis nearanĝitaj sur la tabloj de la distrikta magistrato.

Akĥilo Mátray, Eŭgeno Spitz, Izidoro Mogán, Vilhelmo Sugár kaj la aliaj ofte klopodis trovi kun mi la fundon de la glasoj. Kelkfoje ni implikiĝis en skandaloj. Jen pro noktaj interbatiĝetoj, jen pro kunvivo kaj disputoj kun inaj personoj de dubinda reputacio oni akompanis nin en la policejon. Miaj aferaĉoj venis en la orelon de  Patro. Indigne li veturis el Kolozsvár[3] al Budapeŝto. Li vizitis min en mia nestaĉo kaj respondecigis min en tono ne inda al defenda advokato, postulante, ke mi tuj ĉesigu miajn skandalajn, neleĝajn agadojn. Bedaŭrinde nia diskuto misvojis tiom, ke Eŭgeno Spitz kaj Izidoro Mogán kaptis lin kaj per la metodo „cikonio portas sian idon", elmetis lin antaŭ la pordon en la froston de minus dek gradoj. Ili postĵetis liajn vojpakon kaj vestaĵojn. Tiam li diskriis al la tuta mondo, ke mi estas senheredigita je ĉiuj liaj havaĵoj. Mi ne plu aŭdacu meti la piedon en Kolozsvár!

Kaj nun mi estas tamen ĉi tie. Unuafoje post tiam.

La nomo Hoffner sonis fremde en tiu rondo, kiun mi vizitadis en Budapeŝto, por ne esti celpunkto de mokoj. Sed se miaj elpaŝoj postulis, mi reprenis ĉi tiun nomon. Sed ĉiuj konis min kiel Melĥioron Horváth aŭ prefere kiel Meĉjon.

Mi sidas ĉe la skribotablo de Patro kaj klopodas imiti lian specifan, kaligrafan skribmanieron. Se li vivus kaj la emocio tiom bolus en li kiel pli frue, vidante mian nunan agadon, certe trafus lin apopleksio.

Kiel li propre skribis sian nomon? La enormaj arkoj kaj ĉiroj de la majusklaj H kaj M bone sukcesis, kaj la aliaj estas longtiritaj, skizaj ondlinioj... El la tirkesto mi elprenas aktojn. Li skribis uni-

[3] nun Cluj-Napoca en Rumanio

kajn inicialojn komence de la alineoj. Danke al mia elstara desegnokapablo, post kelkaj provoj mi improvizas similajn. Unu estas tia kiel la alia, ili ĉiufoje pli similas unu la alian.

Sur la dekstra tabloangulo mi malkaŝas malnovan gazeteltondon, sur kies titolpaĝo estas presite, ke grafo Tasilo Festetich ricevis la 12an de januaro 1911 princan rangon. Sur la dua paĝo oni povas detale legi pri la prauloj de la fama familio el Keszthely, interalie pri lia patro, grafo Georgo Festetich, fondinto de Georgicon. Kial devis esti ĉi tiu novaĵo tiel grava por Patro? Mi neniam plu ekscios. Mi aŭdis, legis prefere pri grafo Andor Festetich, dramaturgo kaj aktoro, laŭ artista nomo Andor Tolnai. En 1900 li fariĝis korifeo de la provinca aktoraro. Ĵurnalisto kaj poeto Endre Ady ironiis pri li en pluraj artikoloj.

Mi legas jenon pri li en la artikolo: „Princo Tasilo Festetich, filo de la eksministro kaj krongardisto Georgo Festetich. En siaj junaj jaroj li pasigis longan tempon eksterlande, ĉefe en Anglio. Pere de sia edziĝo – lia edzino estas princino Hamilton, nepino de la adena grandprinco Karolo – venis en parencan rilaton kun plej altaj rondoj eksterlandaj, kiujn li invitis al oftaj vizitoj en Hungario. En la centro de siaj vastaj latifundoj, en Keszthely li konstruigis brilan palacon, kiu estas unu el la plej belaj ĉefnobelaj rezidejoj en la lando, kaj ĉi tie li gastigis la karmemoran anglan reĝon Eduardo, la saksan reĝon Albreĥto, la tronheredan ĉefprincon Francisko Ferdinando. En 1895 li fariĝis ĉefmajstro de la reĝaj vinkeloj, en 1904 jam reĝa ĉefkortegestro. En 1896 la reĝo distingis lin per la ordeno Ora Ŝaffelo; en 1911 li promociis lin al princa rango kun alteminenta titolo. Membro de la supera ĉambro de la parlamento, ĉefprotektanto de la Societo por Balatono, fondinto de la Balatona Asocio. Li kreis landfaman brut- kaj ĉevalbredejon, liaj pursangaj ĉevaloj estas ankaŭ eksterlande konataj.

Por mildigi la enorman elmigradon en Amerikon en 1908 li parceligis sian bienon kun areo de 20 mil katastraj akreoj kaj setligis en ĝi 4 mil familiojn. En 1910 li farmigis 4 mil akreojn al etbienuloj tra la Industria kaj Bienmastra Kooperativo. Li multe kontribuis al la evoluigo de Balatono kaj ties ĉirkaŭaĵo. Li patronis la sciencojn, kulturon kaj artojn. Por la depono de la valora materialo de la Balatona Muzeo li donacis konstrumaterialon en valoro de 300 mil pengoj[4], apogis la terkulturistan akademion per 10 mil kronoj[5]."

Tasilo Festetich – jen nababo, kiu havas tre bone sonantan nomon. Liaj prauloj enskribis sian nomon en la hungaran historion. Al liaj familianoj ĉiuj pordoj vaste malfermiĝas, ili estas ĉirkaŭataj kun respekto, eĉ admiro.

Kial mi ne havis, ne povis havi tian patron? Ĉar oni ne povas elekti siajn praulojn, kiel ni elektas al ni rajdbotojn. Precipe tiel postokaze... Kio malhelpus min eniri ĉi tiun faman familion?

Perfekte mi ja kapablas imiti la skribmanieron de Patro, sigelilon mi trovos, eĉ la nomojn kaj indikojn de la atestantoj mi povas surpaperigi, por ke la akto estu nerefutebla.

Mi prenis el la skribotabla tirkesto kelkajn pli freŝajn aktojn, unu paperfolion, poste mi retroiris en la tempo. Mi metis antaŭ min la kontraktojn, notojn el la dosiero, por ke ili helpu, se necesas, ĉe la skribado de la literoj de Patro.

„Plej kara Filo, Melĥioro!" – mi komencis, retrempinte la plumon en la inkujon. – „Mi estas jam tre malforta, kvankam en la aĝo de 67 jaroj ne ĉiu sentas sin ŝrumpinta kadukulo kiel mi. Mi scias, ke al mi restis nur kelkaj tagoj, eble semajnoj laŭ la volo de

4 valuto de Hungario en 1927-1946
5 valuto de Hungario en 1892-1926

la Eternulo.

Spite al tio, kiel indignige mi kondutis kun vi antaŭ tri jaroj kaj malgraŭ tio, kiel ĝenan malagrablaĵon mi kaŭzis al vi, pardonu vian patron, kiu antaŭ sia morto ne plu povas revidi vin.

Vi estis ĉiam fidela, obeema al mi, respektis kaj amis min. Ĉiu via gesto malkaŝis, ke aristokrata sango fluas en viaj vejnoj. Sed ĉi tiun sekreton mi ne kuraĝis sciigi al Vi. Mi scias, ke mi pekis, sed en la tombon mi ne volas kunpreni mian kulpon. Kion nun mi skribos, grave influos vian estontecon, tial mi esperas, ke vi pardonos min.

Mia karega edzino forpasis en 1908 – paco estu al ŝiaj cindroj! – Ŝi ne plu povas rakonti al vi pri via pasinteco."

Mi enpensiĝis. Letero de mortonta malsanulo, eble liaj lastaj vortoj, kies aŭtentecon pruvas du atestantoj fine de la letero, ne povos lasi indiferenta eĉ unu leganton de ĉi tiu konfeso.

Sed kio estu tiu granda sekreto? Kaj kiel vortigi ĝin? Mi faris kelkajn skizojn, poste mi definitivigis ĝin: „Vi plenumis vian 25an vivojaron. Vi povas libere decidi pri ĉio. Nur pri tio ne, kio estas jam okazinta kaj ne tiel disvolviĝis, kiel mi intencis.

Eksciu, karega filo, kiel ajn malfacile mi surpaperigas ĉi tiujn liniojn: la vero estas, ke vi ne estas filo de mia karmemora edzino Maria Palkovits kaj de mi. Via vera patro estas lia grafa moŝto Tasilo Festetich, kaj via patrino la filino de la iama ĉefjuĝisto de Kolozsvár, János Rosenfeld, alinome Amália Rosenfeld, kiu du tagojn post via naskiĝo transdonis sian animon al la Kreinto. Lia grafa moŝto Tasilo Festetich posedas de 1911 princan titolon. Li venis en 1889 por ĉasado al nia regiono, kaj tiam li konatiĝis kun f-ino Amália. La ĉefjuĝisto esperis rapidan karieron, rangon kaj riĉon. Li trudis sian filinon malfermi, krom sia koro, ankaŭ ion alian por grafo Tasilo. Naŭ monatojn poste vi naskiĝis, sed antici-

pe, en sekreta kontrakto la grafo jam agnoskis vin sia filo, sed tio ne povis veni en la taglumon. Ni alprenis la taskon eduki vin, kaj ni konkludis kontrakton kun la ĉefjuĝista moŝto, ke ni adoptos vin. En ĝi estis fiksite, ke la infano – spite al sia ŝanĝita nomo – estas natura infano de grafo Tasilo Festetich, sed tio restu por eterne sekreto. Kompense la ĉefjuĝista kaj la grafa moŝtoj zorgis pri via instruigo kaj sumo por via edukado. Ĉar mia advokata praktiko tiutempe ne progresis, mi tre bezonis ĉi tiun subvencion. Miaj fidindeco kaj honesto estis metitaj sur karto, tial mi ne povis malkaŝi al vi la veron. Mi kaj via patrino estis feliĉaj, ĉar ofte ni vidis ĝojon sur via vizaĝo, kiun ni klopodis pentri sur ĝi ĉiutage.

Karega filo! Vi ja ŝanĝis la nomon Hoffner al Horváth, sed tion mi jam delonge pardonis. Vi restis egale mia filo, kvazaŭ vi estus efektive mia natura ido.

Kvankam mi estis nur formale via patro, tamen mi rekomendas min en tiu sobra konscio en la favoron de la Eternulo, ke la malkaŝon de mia sekreto Li kaj ankaŭ vi komprenos, pardonos. Mi deziras, ke dum via vivo vi povu vivi kiel natura filo de grafo Tasilo Festetich, vi ne bezonu kaŝi tion, kaj el tio vi povu konstrui al vi solidan karieron.

Kaj cis kaj trans la tombo brakumas vin, karega filo, via patro
Melĥioro Hoffner, h.r.[6] advokato."

Per tute alia skribmaniero mi postskribis jenon:

„Ĉi tiu letero estas deklarita aŭtenta, ĉar estas vortigita kaj propramane skribita en plene konscia stato de lia sobra menso de la h.r. advokato Melĥioro Hoffner. La aŭtentikecon de ĉi tiu akto atestas ĉi-date la subaj personoj: Amália Rosenfeld, h.r. notario Tihamér Kopeniczky, advokatoj d-ro Gedeon Leipzig kaj d-ro

6 hungara reĝa – do ŝtata

Izidor Lepkovits.

Kolozsvár, *Januarius*[7] *23*a tago *anno*[8] 1918."

Mi ne estus kredinta, ke en kelkaj horoj mi fariĝos dokumenteble filo de grafo Tasilo Festetich.

Ekde hodiaŭ mi devos vivi konforme al tio. En miaj vejnoj fluas blua sango. Mia vera patro estas princo, kaj laŭ la adiaŭa letero de Patro li certigas al mi materialajn bonojn. Mi estas la propra ido, natura filo de Tasilo Festetich! Ne plu validas la alparolo Horváth-Hoffner-Meĉjo! Al mi ŝuldiĝas la titolo „grafa moŝto". Sed pri tio la princo mem ne devas sciiĝi. Mi ne intencas montri lian moŝton en miskoloroj. Tasilo Festetich, la pli juna – per ĉi tiu nomo kaj la koneksa rango oni povas multe aranĝi.

El mia meditado vekis min frapeto. Kiu volas paroli kun mi ĉi-tempe, kiam oni scias en la urbo, ke mi havas profundan funebron. Ĝi ripetiĝas. Nun jam certas, ke iu volas min vidi.

Apenaŭ mi malfermas la pordon, ŝovante min flanken, eniras hastepaŝe Ambrozio Müller s-ino Schwarzwald. Dum la sepulto ŝi kondolencis min kun sia oficira edzo kaj neatendite diris al mi ion strangan. Nur poste mi kaptis ties sencon, sed tiam mi vidis pli bona forgesi ĝin. „Ankoraŭ hodiaŭ mi vizitos vin hejme" – tio devis esti la enhavo de la mesaĝo, sed eĉ post ĝia klariĝo mi ne prenis ĝin serioze.

Videblis je ŝi, ke haste ŝi ĵetis sur sin kelkajn vestaĵojn, tiel ankaŭ la franĝan ŝultrotukon, per parto de kiu ŝi kovris siajn nigrajn, krispajn buklojn.

Mi ne povis kaŝi mian surprizon. Tra la duone malfermita pordo la vento balais neĝerojn internen.

7 januaro
8 en la jaro

Kiam mi fermis la pordon, kiel unuafare Ambrozio demetis sian ŝultrotukon, deskuis de ĝi la neĝon, poste dufoje turnis la ŝlosilon en la seruro.

Ŝi ĵetis sin ĉirkaŭ mian kolon.

– Ne koleru, Meĉjo, ke mi tiel enrompas al vi, sed mi bezonis revidi vin! Ho, Dio, kiomfoje mi pensis pri vi! Finfine! Mi estas ĉi tie kun vi! Ĉe vi!

Ambrozio restis en mia memoro kiel knabineto. La familio Müller kaj miaj gepatroj preskaŭ ĉiudimanĉe renkontiĝis. Ni kaŝis nin sub la skribotablo, en la ŝranko, post la pordoj, aŭ retiris nin en la ombron de la grandegaj kurtenoj. Ni pelis unu la alian, kaptoludis, plenigis ambaŭ domojn per niaj sonoraj ridoj. Niaj gepatroj ofte admonis, skoldis nin pro nia nedeca konduto, sed ili rekonis, ke ni estas same nebrideblaj kiel ludantaj hundidoj.

Ambrozio venis nun ne por „ludadi”, sed fuĝis al mi. Ŝi eksploris. Ŝiaj larmoj ruliĝis sur ŝiaj pudritaj vangoj kaj postlasis profundajn sulkojn. Spurojn de ŝiaj suferoj.

Antaŭ mia forveturo al Budapeŝto mi tre ŝatis Aminjon. Nur antaŭ tri jaroj mi sciiĝis, ke kontraŭ sia volo ŝi estis edzinigita al la filo de eminenta kuracisto de Kolozsvár, kiun ĉiuj opiniis trompulo. Ne hazarde li elektis la karieron de husaroficiro.

Aminjo forviŝis siajn larmojn. Ni sidiĝis sur la litdivano. Plendante pri sia amara sorto, ŝi prenis, premadis mian manon.

Lia edzo, husara ĉefleŭtenanto Olivero Schwarzwald servas en Kolozsvár, kaj konsideras ŝin plie sia posedaĵo ol edzino. En ilia domo regas kazerna spirito. Ankaŭ ŝin li komandadas kiel siajn soldatojn, servistojn, ĉevaliston, kuiristinon kaj ĝardeniston. Plurfoje okazis, ke per pistolo li trudis ŝin plenumi sian edzinan devon.

– Meĉjo! Mi petas vin... vi scias... ankaŭ vi sentas... ni amas unu

la alian! Vi ne povas permesi, ke mi konsumiĝu pro tia frenezulo. Mi petegas vin, savu min! Eskapigu min! Kunprenu min al Budapeŝto! Kaŝu min ie... en ŝranko! Tutegale! Kune ni komencu novan vivon!

Mi jam kredis, ke mi elturniĝis el mia malfacila situacio pro la morto de Patro – kreditoroj, ŝuldoj. Eĉ, mi fariĝis nobelo, por ĉiu fingro de kiu troviĝos en Budapeŝto pli ol dek multe pli eminentaj junulinoj! Kaj nun ĉi tiu tute forgesita virino starigas min antaŭ sortoturnan decidon! Li alkroĉiĝas al mi kiel kardo al vesto, eĉ pli: ŝi volas mian animon, mian koron! La mian! Tiun de grafo Tasilo Festetich!

Dum tia humida vintro mi ne povas elĵeti ŝin sur la straton. Kion mi faru kun ŝi?

Antaŭ ol mi ekparolus, aŭdiĝas plurfoja laŭta frapado el la flanko de la antaŭĉambro.

– Bonan vesperon, s-ro Horváth! Bonvolu malfermi la pordon! Mi havas urĝan parolon kun vin!

Aminjo forpuŝas min. Ŝia pala vizaĝtono ŝanĝiĝas viola.

– Ho, Dio! Li estas mia edzo!!! Kaŝu min ie! – ŝi petegas terurite.

La frapado kaj la decida peto ripetiĝas. Mi malfermas la alkortan fenestron, kaj trapremas ŝin eksteren. Antaŭ ol mi fermos ĝin, mi vidas ŝian plilongiĝintan ombron, dum ŝi malaperas en la malhelo de la najbara strato.

– S-ro Horváth! Mi scias, ke vi troviĝas hejme! Mi petas vin, malfermu al mi! Mi havas neprokrasteblan parolon kun vi!

En la pordaperturo staras svelta husaroficiro. Mi envenigas lin. Li kunfrapas la maleolojn.

– Mi estas husara ĉefleŭtenanto Olivero Schwarzwald, respektan saluton! Mi petas vian indulgon pro la malfrua perturbo. – Li

deprenas sian ĉakon, detiras siajn blankajn gantojn, kaj per leĝera movo ĵetas ambaŭ sur la antaŭĉambran tablon.

– Vi evidente konas min, mi ne bezonas prezenti min. Bonvolu eniri, prenu lokon!

– Dankon.

Dum li sidiĝas, ankoraŭfoje li senkulpigas sin, ke li kuraĝas ĝeni en ĉi tiu nekutima horo kaj pro eĉ pli nekutima okazo.

– La absolutan pezon de mia ŝajne nedeca konduto donas la deziro, ke mi volus akiri konfirmon pri la praveco de mia supozo.

– S-ro ĉefleŭtenanto! Mi esperas povi alparoli vin tiel... Bonvolu ekspliki unusence kaj klare la celon de via vizito... *Mehr Licht*, do pli da lumo, kiel Goethe estis dirinta.

– Hm... do... – li senraŭkigas la gorĝon. – Mi havas solidan kaŭzon supozi, ke mia edzino restadas en via domo.

Mi disetendas la brakojn. En mian miron enmiksiĝas iom da incitiĝo.

– Pardonu min, s-ro ĉefleŭtenanto! Via honesta familio, mia honoro, krome la fakto, ke mi estas de horoj sola, ekskludas tian supozon.

– Mi petas vin kun respekto... Mi postsekvis kaŝe mian edzinan moŝton, vi malfermis al ŝi la pordon kaj enlasis ŝin.

– Vidu, s-ro leŭtenanto! Mi eksterordinare alte taksas vian honoron, patrujamon, kiujn vi kaj viaj kunoficiroj enkorpigas por mi. Samtempe mi aŭdacas rimarkigi, ke la honestecon de la heredanto de Patro kaj estonta teĥnika inĝeniero vi ne devus pridubi. Mi protestas kontraŭ tia malnobla, malbonvola supozo.

Schwarzwald iom incitiĝis.

– Ŝajnas al mi, ke vi nun pridubas mian oficiran honorvorton. Faktojn, viditajn propraokule vi prezentas kiel malbonvolan su-

pozon. Laŭ mi mia edzino ankoraŭ nun kaŝiĝas ĉi tie.

– Bonvolu ne forgesi, ke vi restadas en mia domo. Kaj vi kondutas nedece. Vi tretas mian honoron. Ĉu vi eble volas fari ankaŭ domtraserĉon?!

– Tio ne necesos! Mi vidas pruvita, ke vi ofendis mian oficiran honoron, tial mi deziras pruvi mian pravon en duelo. – Li ekridetas ironie. – Pardonon! Mi preskaŭ forgesis, ke vi estas nek soldato, nek nobelo, sekve ne duelkapabla.

– Ankaŭ nun vi eraras, s-ro ĉefleŭtenanto! Mi provokos vin al duelo pro la pridubo de mia nobela honoro! Mi estas natura filo de grafo Tasilo Festetich. Legu la pruvaĵojn, atestitajn per la subskriboj de  patro kaj du advokatoj!

Mi metis antaŭ lin mian pli frue skribitan leteron, alŝovis la lampon, por ke li bone vidu. Mi observis lian vizaĝon. Kiu estis indiferenta, fariĝanta miranta, scivola, sufere turmentata, bedaŭra, nerve tikanta, flamruĝa...

Oni frapas. Neĝkovrita, envolvita en nigra ŝultrotuko, la ĉambristino, kuiristino de patro petas enlason.

– Bonan vesperon, junsinjoro! Bonvolu ne koleri, ke mi ree ĝenas, sed... – Mi ne lasis ŝin pluparoli.

– Neniel vi ĝenas min, Borinjo! Envenu kuraĝe! S-ro ĉefleŭtenanto Olivero Schwarzwald honoris min per mallonga vizito. Ŝi estas Borinjo, estinta kuiristino de mia karmemora patro...

– Ho, mi konas la s-ron ĉefleŭtenanto! Ankaŭ ŝian edzinan moŝton! Kvin minutojn antaŭe mi vidis ŝin rapidi hejmen. Certe ŝi tre malvarmis. Mi miris, ke tiel malfrue, en tia malvarmo, nu kaj sola... Espereble okazis nenio malbona, ĉu? – Demande ŝi rigardis nin.

Mi kredis, ke Borinjo estos mia savanto. En mallumo ĉiu virino en nigra ŝultrotuko aspektas same. Krome ŝi komencis per tio, ke

ŝi „ree" venis. Efektive. Ĉirkaŭ la tria ŝi jam estis ĉe mi. El la kuirejo mi donacis al ŝi kelkajn vazojn. Ŝi ligis siajn kusenon kaj kovrilon surdorse, tiel ŝi foriris. Ĉi tiuj virinoj! Kapablas perfidi min!

– Borinjo! Laŭ mi vi malbone vidis, ĉar la ĉefleŭtenanta moŝto... – Mi intermetis iom da emfaza paŭzo – ...restadas ĉe mi.

La ekskuiristino ĉirkaŭrigardas, ŝovas la nazon ankaŭ en la alian ĉambron.

– Bonvolu ne priŝerci min! Ja neniu estas ĉi tie!

Poste ŝi alipensas, ŝanĝas opinion:

– Certe ne ŝin mi vidis. Estas tre mallume, vento pelas neĝerojn. Kion ŝi celus sola surstrate?

– Nu, vidu, Borinjo! Ĉiu povas erari.

Schwarzwald komprenis la aludon. Li havis tempon legi la pliparton de la adiaŭa letero de  Patro.

– Grafa moŝto! – li turnas sin al mi. – Mi petas vian pardonon pro la ĵusaj okazintaĵoj. Referencante al via de mi alte taksataj nobela honoro kaj grandanimeco mi petas vin kun respekto konsideri nuligita miajn asertojn, faritajn pri vi antaŭ nelonge. – Li klinas sin. Metas la leteron sur la skribotablon. Kunfrapas siajn spronajn botojn.

– En ordo! Iru en paco!

Li surkapigas la ĉakon, prenas la gantojn, deziras bonan nokton.

Borinjo ne scias, kiel opinii pri la okazintaĵoj, ĉar eĉ palan ideon ŝi ne havas pri la antecedentoj. Sed ŝi ŝovas la nazon en mian vazon:

– Tamen... Mi certas, ke ŝian moŝton mi vidis ekstere en la neĝado.

– Mi scias! – mi diras, trudante malĝojon kaj kunsenton en mian voĉon. – La s-ro ĉefleŭtenanto forpelis ŝin de ĉi tie!

– Nu, tio estas ja tamen iom tro! Do ĉio veras, kion oni babilas pri ĉi tiu sinpufiga oficireto. Nu, la junsinjoro havas ja belajn amikojn!

– La ĉefleŭtenanto ne estas mia amiko! Estus longe nun klarigi la tutan historion. Prefere diru, por kio vi nun venis!

– Mi estis ĉe Marinjo Somlai, ĉar ŝia filo malsanas, kaj mi portis al ŝi kuracherbojn. Kaj mi vidas, ke la lampo brulas ĉe vi. Mi diras al mi: Borinjo, rigardu la junsinjoron, esperebla nenio malbona okazis al li. Sed sciu, junsinjoro, mi frapis ĉe vi ankaŭ pro tio, ke vi diris, ke mi povas kunpreni la uzitan pelton de la forpasinta sinjora moŝto por mia sinjor' edzo.

Mi prenas de la hoko la trouzitan ŝafpelton. Borinjo volas longe montri sian dankemon, sed mi ne allasas por ŝi tempon.

– Revenu nur post tri tagoj, sabate! Ĝis tiam ne, ne estos necese. (Mi ne ŝatus, se tro frue oni sciiĝus pri mia plano.)

Mia forpasinta patro kolektis kun formika diligento gemojn kaj noblametalajn juvelojn. Volonte li akceptis de siaj klientoj ringojn el oro, arĝento aŭ garnitajn per gemoj. Dum mia infanaĝo li tenis ilin sekrete, sub sep sigeloj, sed danke al mia neestingebla scivolo mi elsnufis ilin. Li konservis siajn trezorojn en metalkesteto en la enmura sekurŝranketo, kies pordon kovras ampleksa pentraĵo kun montara pejzaĝo. Patro malfermis ĝin maksimume du-trifoje en mia ĉeesto.

Singarde mi malpendigas la bildon. En la geometria mezo mi vere trovas la pordeton en la muro, kiu kaŝis la fabelajn trezorojn. Bedaŭrinde mi ne konas la kodon. Tamen ne hazarde mi estis instruato de mia amiko Gabrielo Mettler, kiu jam dufoje punsidis pro ŝtelo kun enrompo kaj estas majstro pri malfermo de sekurkestoj. Mi serĉas lupeon en la tirkesto de la skribotablo. Funde mi ekzamenas la ciferdiskon. Surbaze de ĝia eluziĝo mi konstatas la

kvar plej ofte uzatajn ciferojn: 0, 1, 8, 9. Tio estis la jaro de mia naskiĝo, do 1890! Ĝi malfermiĝas post la unua provo.

Mi inventaras la trovitaĵojn. Du aktopakoj, traligitaj per kanaba ŝnuro, rilataj al la advokata praktiko de Patro, do ili estas por mi senvaloraj. Sub ili du faskoj da usonaj dolaroj! Plezure mi kalkulas, ili ja venas sen herediga proceso en mian posedon. Sescent dolaroj! Terura kvanto da mono! Povas esti, ke per ĝi oni povus kompensi la kreditorojn. Ĉi tiu sumo devis esti ne la propraĵo de Patro, alie li ne subskribus bilojn por uzuraj interezoj.

Du flaviĝintaj fotoj falas sur la plankon. Ĉu nun mi emociiĝu? Ni estas triope en ĝi: Patro, Patrino kaj mi. Eble mi aĝis tiutempe sep jarojn... Kio pli interesas min... En kesteto troviĝas juveloj, gemoj, kolieroj, koljuveloj, gemgarnitaj braceletoj (en kelkaj sidas valoraj fajnaj gemoj, eble briliantoj?!).

Nokte je la dek-unua ekiros trajno tra Szabadka al Budapeŝto. Ĝi ĝuste konvenos al mia plano.

La nemoveblaĵoj de Patro estis ŝarĝitaj per hipoteko. Mi povis esperi iom da heredaĵo, se mi foriros adiaŭŝpare, kaj kunportos ĉiujn facile moveblajn valoraĵojn. Inter ili estis la ebura tigro, kiun Patro uzis por leterpezo, dekoro. Mi enpakis fotojn, kovertojn, sigelilojn, inkokusenon, vizitkartojn, advokatajn aktojn kaj vestaĵojn, nomeblajn elegantaj, en mian vojaĝsakon. Iun alian mi plenŝtopis per malplenaj folioj, kies supran angulon ornamis la nomo, rango kaj adreso de Patro. Ili estas blankaj leteroj! Kiu scias, kio skribiĝos sur ili?!

La stacio estis almenaŭ kvincent metrojn for de la foraŭkciota domo de Patro. Malgraŭ la frosto de ĉirkaŭ dek gradoj kaj densa neĝado mi sentis internan varmon, fieron. Unu ĉapitro de mia vivo finiĝis. La naturan filon de grafo Tasilo Festetich atendas nova, sunbrila estonteco.

En la trajno mi ne povis endormiĝi. Dum mallonga tempo trafis min tiom da impresoj, kaj kelkfoje mi devis esti tiom eltrovema, ke pri ties rezulto postokaze ankaŭ mi mem miris!

Miaj lerto kaj sagaco ankaŭ alifoje ne lasis min en peĉo...

En 1916 mi estis vokita antaŭ rekrutigan komisionon, kiu kvalifikis min taŭga por militservo.

Jam la unuan tagon ŝajnis al mi, ke mia vojo ĝis la kapitana rango estos tre malfacila, sed eĉ serĝento mi ne povos fariĝi senplie. Ĝis tiam mi devus elteni tiom da humiligoj, ke kaj fizike kaj psike mi tute rompiĝus. Min ĉirkaŭis nekleraj, krudaj instruktoroj. Mi povus diri ankaŭ tiel, ke el la civilizacio mi trafis en ian prastaton, kie barbaroj donas la ordonojn. En la unua oportuna okazo mi anoncis min ĉe la helpkuracisto por medicina ekzameno.

– Mi estas husarkapitano Edmundo Kolozsváry – mi sciigis al li –, sed mi petas vin, ne disfamigu tion, ĉar kiel videblas, mi surhavas soldatan kaŝveston. Mi arde deziras defendi nian sanktan patrujon kontraŭ la malamikoj, unuavice kontraŭ Serbio, ja tie oni instigis provoke murdi nian tronheredonton, lian ĉefprincan moŝton Francisko Ferdinando. Nian militon kontraŭ la malamiko mi konsideras sankta, tial mi portas nun ĉi tiun uniformon. Morti kiel simpla soldato por lia ĉefprinca moŝto estas laŭ mi pli memofera ago ol suferi morton kiel oficiro.

Helpkuracisto Schmidt embarasite esprimis sian miron, poste indignon.

– Kion vi babilaĉas al mi?! Ke oficiro! Estas ja tre bele, se vi estas tiom ŝuldosenta al lia reĝa moŝto... sed... – Subite li alipensis kaj diris, ke mi okulsekvu lian montrofingron.

– Jes ja! – mi respondis kaj rigardis en la okulojn de la helpkuracisto. Senpacience li ripetis: – Dio kraŝigu sur vin la ĉielvolbon!

Ne min rigardu sed mian montrofingron!!!

– Jes ja, kiel al vi plaĉas ordoni! – Poste mi rigardis pluen fikse super lia kapo.

Lia kuracista kolego prenis min sub ekzamenon. Sur miaj krucigitaj gamboj li frapadis mian genuon per kaŭĉuka maleo. Miaj refleksoj manifestiĝis kun malfruo kaj en nekutima maniero, dume ne ĉesis mueli mia buŝo, ĉar mi raportis pri la heroagoj de la kompanio, konfidita al mi sur la batalkampo. Vane oni trankviligis min... Post ilia sekreta konsiliĝo estis alprenita la decido: mi taŭgas nur por postfronta servo.

– Kion tio signifas, se mi aŭdacas demandi?

– Vi povas esti soldato, se sur la strato Rákóczi oni bezonos defendi la patrujon. Ĉu vi komprenis?

Aperis el mi la surprizita kaj seniluziigita homo.

– Oj ve, el tio ja fariĝos embaraso! Eble eĉ en la Orienta stacidomo mi ja ne plu povos aĉeti bileton al Kolozsvár!

– Iru hejmen trankvile por dormi! Se tio okazos, oni reaĉetos la biletojn eĉ de tiuj, kiuj ne aĉetis ilin.

Post kiam oni tiel afable senigis min je la eblo esti simpla soldato en la i. & r.[9] armeo, ili donis samtempe ankaŭ bonan ideon.

Ĉe la oficira tajloro apud la Orienta stacidomo mi farigis al mi plaĉan ĉefleŭtenantan uniformon. Dufoje mi devis iri por alĝustigo. La tajloro plenumis sian laboron kun granda entuziasmo kaj riverenco. Li diris, ke mi aspektas kiel vera husaroficiro. Mi satridis pri tio kaj aldonis: „Per kia bonŝanco kaj talento benis min la Eternulo, se, estante vera husaroficiro mi aspektas kiel vera husaroficiro! Kaj tion rimarkas ankaŭ akraokula tajloro."

Por la nomo Melĥioro Francisko Horváth de Beöháza mi skri-

9 imperiestra kaj reĝa

bis por mi legitimilon. Ĝi ne prezentis malfacilan taskon, ĉar dum la studado en la teknika universitato mi trovis plurajn amikojn, kiuj pretigadis dokumentojn, aparte legitimilojn en plej bona kvalito, por bona mono, kaj instruis ankaŭ min pri multaj lertoj. Inter ili troviĝis Ferdinando Dóka, kiu neleĝe forlasis la kazernon de Eger. Anstataŭ mortpafadi italojn, sub la pseŭdonomo Paŭlo Végshő li vivis senzorge la vivon de dandoj. Mia kunstudento en la universitato Vilhelmo Faragó fariĝis danke al legitimo kaj aldonaj dokumentoj, faritaj same same de mi, Tihamero Edmundo de Mintaháza, kiu vendis nutraĵon en ĉiuj kvantoj al la armeo. Ĉiun duan semajnon li ŝanĝis nomon kaj inkognitecon.

Kiam Ferdinando Dóka ekvidis min en la pompa ĉefleŭtenanta uniformo, lia miro desegnis sulkojn sur lia lunronda vizaĝo.

– Meĉjo! Kiom ŝika vi estas! En kiu ministerio vi fariĝis sekreta konsilisto?

Mi ĉirkaŭturnis min antaŭ li, por ke li plezuriĝu pri mi.

– He, vi! Soldato! Montru vian soldatan legitimilon! – mi diris al li neatendite.

– Mi faros unu, kaj tiam mi montros ĝin! – li rebatis memcerte. Per aprezaj vortoj li parolis pri mia uniformo, laŭdis mian tajloron, dume ĉirkaŭiris kaj ekzamenis min kiel faman pentraĵon. Poste flegme li aldonis: kiom ajn ĝi plaĉas al li, li ne portus tian.

– Eskapinta soldataĉo! Vi portas nur vian haŭtaĉon! – mi diris soldatece.

Poste mi rakontis al li miajn planojn. Pere de miaj konatoj mi akiris kelkajn apertajn ordonojn blankajn, kiujn mi plej facile povos plenigi laŭplaĉe.

– Antaŭ tri tagoj mi jam ludis mian rolon ĉe la divizia generalo Elemér Bogáth – mi novaĵumis. – Post kiam li legis la apertan ordonon, mi ricevis de li tutan vagonon da benzino por nia armea

aŭtokolono, avancanta en Galicio.

– He, vi, Meĉjo! Por ties prezo oni povus aĉeti la fraŭlinojn de ĉiuj ruĝlanternaj domoj de Peŝto kaj Buda[10] por kelkaj semajnoj!

– Vi bone kalkulas, sed nun okazos neniaj diboĉoj! Maksimume knalos kelkaj boteloj da ĉampano en Moulin Rouge. La benzino estas jam pluvendita de patro Koller. La mono troviĝas sekure en la Nacia Banko en mia ĉekkonto.

– Ne estas bele, ke vi neglektis min!

Dóka estis unu el miaj plej bonaj amikoj. Mi ne povis preni serioze ĉi tiun riproĉon.

– Ni vendis kune tri luitajn loĝejojn, sub pseŭdonomo du aŭtomobiloj trovis novajn mastrojn, kvankam tiuj kvarradaĵoj efektive eĉ ne ekzistis. Kvar vagonojn da buĉotaj brutoj ni elsendis al Vieno; vidante la dokumentojn, la komisiito tuj pagis, la brutoj ankoraŭ paŝtas sin ie en Hortobány kaj ankoraŭ ne scias, ke ili estas venditaj. Vi forestis en neniuj bonaj amuzoj! Nur en ĉi tiu unusola negoceto. Ĉar por ĝi mi bezonis oficiran uniformiton, kaj ne eskapintan vicsoldaton. – Mi prisilentis tamen, ke Dóka estis absolute sensenta eĉ al la plej bazaj formoj de soldataj honorsalutoj. Do mi ne povis elmeti lin al danĝero.

Ankoraŭ furiozis la milito, sed jam ĉiuj atendis ĝian finon.

[10] Budapeŝto unuiĝis el Peŝto kaj Buda.

# 2. Riĉiĝo

Dum la milito la produktado ŝrumpis, la zorgoj pro vivteno kreskis, la politikaj luktoj akriĝis. La bolŝevista revolucio en 1917 havis fortan influon al malriĉuloj, senrimeduloj. Komenciĝis strikoj kaj disvastiĝis al la tuta lando. De januaro de 1918 plioftiĝis konfliktoj inter laboristoj kaj armitaj policfortoj.

La 17an de oktobro 1918 István Tisza anoncis en la parlamento, ke ni perdis la militon. La naciaj minoritatoj formis unu post aliaj siajn naciajn konsilantarojn. Ili volis memstariĝi. Fine de ĉi tiu monato Ĉeĥoslovakio kaj Kroatio deklaris sian apartiĝon disde Aŭstrio-Hungario. La 25an de oktobro estis establita la Hungara Nacia Konsilantaro el la Socialdemokrata Partio, la Károlyi-partio kaj la Burĝa Radikala Partio.

En proklamo el dek du punktoj ĝi postulis interalie la sendependecon de Hungario, tujan pacon apartan, disigon de la registaro, parlamentajn elektojn, realigon de agrara reformo.

La Nacia Konsilantaro kaj la pliparto de la amasoj atendis, ke la reĝo konfidos Mihály Károlyi formi registaron. Karolo la 4a veturis al Hungario, por plifirmigi la interrilaton de la du landoj kaj por nepre konservi la monarĥion.

Li pretis nomumi Károlyi, tial ili kune veturis al Vieno. La reĝo tamen retretis de sia intenco. Ĉi-hejme ĉiuj akceptis kun indigno la vortorompon, kaj multaj vidis tiel, ke la volo de la nacio realigeblas nur perforte.

La 28an de oktobro oni postulis en manifestacio la nomumon de Károlyi fare de la hungaria vicreĝo, ĉefprinco Jozefo. Ĉe la Ĉen-ponto policanoj alpafis la amason (tri personoj mortis, kvindek vundiĝis).

Informiĝinte, ke la milita komandantaro parton de la trupoj volas sendi al la fronto, grupo de protestantoj marŝis nokte de la 30a de oktobro al la Orienta stacidomo. Ili sukcesis malhelpi tion kaj akiri armilojn. Sen kontraŭstaro ili okupis la urban komandejon, la kazernojn kaj la ĉefpoŝtoficejon. Matene de la 31a de oktobro enormaj amasoj invadis la centrajn stratojn de Budapeŝto. Ili vivuis la revolucion, pacon, liberecon kaj la respublikon.

Tiam ĉefprinco Jozefo konfidis Károlyi formi registaron. Sed tio ne plu trovis pozitivan eĥon.

Ankaŭ province okazis unu post aliaj mitingoj, manifestacioj, eĉ formiĝis konsilantaroj.

La 16an de novembro la registaro de Károlyi anoncis antaŭ la parlamentejo, ke Hungario estas sendependa popola respubliko.

Grupo de militkaptitoj revenis el Rusio fronte kun Béla Kun, ankoraŭ sub la pseŭdonomo d-ro Emil Sebestyén. Multajn homojn ili translogis al si el la socialdemokrata partio. La 24an de novembro ili fondis la Hungarian Partion de Komunistoj. Oni ne devus permesi tion, ĉar sekve de tio povis plagi nin la potenco kaj diktaturo de la ruĝuloj.

Vespere de la 20a de februaro 1919 okazis pafado antaŭ la sidejo de la ĵurnalo Népszava[11], tial samnokte la polico arestis preskaŭ ĉiujn gvidantojn de la komunista partio. Oni disvastigis, ke la bolŝevistoj per armitaj fortoj volis okupi la konstruaĵon.

Mi malfacile povis konsciigi al mi, ke la 21an de marto 1919 oni proklamis la konsilantaran respublikon de la proletoj. Tiu partio kapablis efektivigi tion, kies gvidantoj estis enprizonigitaj, kaj nun liberlasitaj por senbrida banditado. Ĉu ni trafis en tiel pro-

11 voĉo de la popolo

fundan abismon? Ĉu neniu povis aŭ aŭdacis regi, kaj ni pace transdonis la potencon al la sovetoj?

Mi ofte renkontiĝis kun Milico, kiu konsideris sin aktorino. Ni bone interakordis. Mi emfazas tion, ĉar cetere ŝi estis nefacila personeco. Evidente pro tio ŝi povis resti pli longe en neniu teatro. Per sia meza talento ŝi ne povis elstariĝi inter la aliaj. Kaj tio puŝis ŝin al eksterordinaraj ambicioj. Ŝi volis pruvi, ke tia talento ankoraŭ ne rolis sur la tabuloj de la teatroj. Ŝia amikino, Helenjo Sugár posedis same averaĝajn kvalitojn. Se Milinjo povis roli nur en la dancistaro aŭ ĥoro, ŝi humile eltenis tion; ankaŭ kun la rolo de provripetisto ŝi paciĝis portempe, sed ŝiaj emocioj kelkfoje neatendite erupciis.

Mi kutimiĝis al tio. En ŝiaj brakoj mi ĉiufoje absolvis ŝin.

La vojrulilo de la vivo kelkfoje trairis Milinjon. Ŝi naskiĝis la 2an de februaro 1891 en nobela familio en urbeto de Serbio.

– Mi estis la plej juna, miaj fratoj estis du kaj tri jarojn pli aĝaj – ŝi rakontis. Mia patro estas hungara barono Ödön Jankovich, mia patrino Teréz Emerencia Telekessy. La du bienoj unuiĝis. Je nia kvindek-ĉambra kastelo ĉiam troviĝis io por ripari, la tempo postlasis jen tie, jen aliloke siajn spurojn sur la konstruaĵo. Kun plezuro mi rigardis, kiel la laboristoj agadas ene kaj ekstere – precize, fervore.

Mia guvernistino, f-ino Margot malpermesis tion. Ŝi donis pianolecionojn, mi legis partiturojn kaj multege ekzercis min. Mi devis prezenti min dum familiaj kaj ceteraj kunvenoj. Unu semajnon ŝi kaj la alian *Fräulein* Melinda okupiĝis pri mi. Mi funde konatiĝis kun la latina, germana, angla kaj franca literaturoj kaj kaŝe legis la poetojn Petőfi kaj Arany. Ankaŭ la vivo kaj verkoj de komponistoj ne mankis en la lernmaterialo. Mi ekzercis min laŭ

diktado, oni diktis al mi poemojn, por ke mia ortografio cizeliĝu perfekta. Kun miaj gepatroj mi parolis hungare, kun la servistoj kutime serbe. Laŭ la invito de kuzo de Patro mi pasigis unu plenan jaron en Londono, poste ankaŭ en Vieno, kie mi alproprigis la kondutmanieron de la angla aristokrataro kaj ĉefe la anglan lingvon. Mi havis apartajn instruistojn, kiuj turmentis min per la angla gramatiko, decreguloj, literaturo. Mi daŭrigis piani. La filino de mia onklo John kaj lia edzino mortis en aĝo de unu jaro, tial ili konsideris min sia propra filino. Kelkfoje ili alparolis min kun *little Elizabeth*...

– ... per... – mi korektis ŝin. – Ŝi ne koleris pro tio. En ĉiuj lingvoj ŝi faris pli multajn erarojn ol mi. Ankaŭ nun mi havas la impreson, ke mi perfekte esprimas min en la hungara kaj germana, eĉ mia stilo estas kelkfoje individua kaj elektema. En la franca mi malofte faras erarojn en la elparolo, skribo de kelkaj malbone ellernitaj vortoj. La anglan mi bone posedas, aparte tiam, se mi parolas malrapide, kvazaŭ oratorante, ĉar tiufoje mi havas tempon elekti la esprimojn. Mia hispana estas tamen erarplena, kaj nur post certa prepariĝo ĝi povas ŝajni akceptebla.

– Mi konatiĝis kun la ĵurnalisto János Zelinka – ŝi daŭrigis. – Li tamen ne konvenis al mi. En kelkaj ĵurnaloj aperis artikoloj pri ni. Kie oni vidis nin amuziĝi, supozoj pri nia interrilato? Ni kolerigis ĉiujn kontraŭ ni. Skandaloj sekvis, respondecigoj, minacoj fare de Patro... Li formalpermesis min de li, malgraŭ tio ni kune amuziĝis. „La filino de barono Jankovich kun ĵurnalisto! Kia impertinento!!!” Skandaloj sekvis skandalojn. Patro trifoje anoncis, ke li ekskludos min el la heredaĵo. Li fiksis limtempojn. Poste mi lasis perdiĝi ĉion! Ankaŭ János Zelinka. Mi ne scias, ĉu mi efektive amis lin, aŭ nur teksis venĝon kontraŭ miaj gepatroj, kiuj prezentis min al ĉiuj kiel ekzemplodonan knabinon. Kaj mi ne

povis vivi liberan vivon. Pere de miaj mono kaj klereco mi aranĝis ricevi okazajn rolojn en la Nacia Teatro, alifoje mi dungiĝis kiel piana akompanisto, poste mi fariĝis sufloro aŭ provripetisto. Ĉi tiuj laboroj ne kontentigis min. Vi povas imagi, kiom mi degradis min, dungiĝante kiel ĉambristino ĉe konata pianisto sub la pseŭdonomo Melinda. Mi plenumis ĉiajn laborojn en la domo. Dum certa tempo...

Foje, kiam mia mastro forestis, ĉar unu lia instruato renoncis la lecionon, mi sidiĝis antaŭ la piano. Jam delonge mi ne ekzercis min. Manke de notoj mi komencis improvizi. Ofte mi rememoras tiujn minutojn, ĉar... mi agordis min, kvazaŭ... mi estus la piano.

Milinjo ekridetis. Ankaŭ mi havus emon al tio, sed tiom ŝi travivis sian rakonton, ke mi ne volis „veki" ŝin.

– ...la muziko venis el mi... Eble mi imitis Chopin aŭ Liszt kaj improvizis novajn melodiojn. Mi ne scias, kiel longa tempo pasis. Eduardo Goldstein, la pianoinstruisto aperis malantaŭ mia dorso. Lia ombro ĵetiĝis sur la pianon. Mi tre alarmiĝis, tuj saltleviĝis. Li prenis kaj kisis mian manon.

– F-ino Melinda! Vi ja pianas ravege! Kia talento! Dio mia! Kion vi ludis? Mi ne konas ĝin.

– Mi ne scias, nur tiel... ludetis..., se mi ne ĝenas...

Tiam mi vidis lin unuafoje rideti.

– Vi do improvizis, ĉu?

– Je...je...ees...

Sekvatage li dungis alian ĉambristinon. Kaj min instruis senpage. Laŭaĝe li povus esti mia patro. Mi pensis pri tio, ke Dio donis nun al mi tian *Vater*[12], kian mi jam delonge elmeritis.

12 patro (germane)

– Ĉu vi enamiĝis al li? – mi demandis Milinjon.

– Mi ne scias, ja ankaŭ János Zelinka mi ne amis de la verto ĝis la plandoj. Eduardo restis por mi afabla viro, kiu laŭdas, kuraĝigas min, rekonas mian kapablon. Pli malfrue li rigardis min ne plu kiel sian junan, talentan instruaton. Li komencis amindumi al mi, diradis senĉese komplimentojn, sendigis bukedojn al mia luĉambro, kie mia mastrino pli ĝojis pri la alvenantaj komizoj ol mi mem.

– Kaj poste? – mi senpaciencis.

– Mi pianis, kantis, legis partiturojn, kelkfoje improvizis. Kaj foje, sen ajna antaŭsigno li petis mian manon. Mi preskaŭ svenis. Li, kompreneble, kredis, ke pro la feliĉo. Post kiam li alportis glason da akvo, kaj mi trinkis kelkaj gutojn, mi rekonsciiĝis, kaj ĉiuklopode provis elgliti el liaj ungoj.

– Ĉu „el liaj ungoj"? Kial vi vortumis tiel?

– Ĉar mi ne volis edziniĝi al li. Tamen mi ne povis eviti, ke li prezentu min al sia patrino, kiu estis instruistino en elementa lernejo. Mi restis ankaŭ plu la talenta, malriĉa Melinda, kiu konvenis al li nek pro ŝia okupo, nek pro ŝia socia situacio. Eduardo konsideris pli grava obei al sia patrino ol al sia koro. Vidu, mi ne povis edziniĝi al la ĵurnalisto, ĉar mi staris sur pli alta ŝtupo de la socia hierarĥio. Kaj nun la samo okazis sed inverse. Tial mi asertas, ke restu ĉiam sur la pinto!

– Kion vi rakontis al la s-ino instruistino?

– Mi ne plu bone memoras. Sed mi klopodis konduti kiel saĝa kamparana knabino.

– Tiam vi devis esti fortimiga...

– Tiu estis la sola solvo.

– Kiam ni konatiĝis, beleco kaj inteligento radiis el vi... Ankaŭ de tiam mi vidas ilin en vi.

Mi aludis al tio, ke mi renkontis ŝin unuafoje dum prefektuja balo en la hotelo Ora Taŭro de Debrecen. Min invitis loka nobelo, kaj ŝin protektis iu fama urba aktoro. Unuavide ni rekonis, ke kune ni povos multe atingi. *So estvas noch nicht dagewesen!*[13]

– Laŭ mi vi estas ĉarma fripono aŭ blufulo, dandaĉo, blagulo.

– Fraŭlino, por mi estas granda honoro, ke vi bonvolas deklari min, la simplan, ĉiutagan friponon, blagulon, blufulon tiel granda vivartisto.

– Kaj vi, kia vi trovas min?

– Eksterordinare ĉarma, gracia, karega... aktorino, artistino...

– Kaj kiel mi plaĉas al vi sur la scenejo?

– Ĉiufoje vi estas kiel ĉielarko!

Ŝi kisis min dankeme.

– Sed krom vi neniu aprezas ĉi tiun grandan talenton, kiu nestas en ĉiuj miaj fibroj.

Poste ŝi alidirektis la parolon.

– Meĉjo, mi tre timas. Ĉi tiujn ruĝulojn. La milito ankoraŭ ne finiĝis vere, kaj ili faras nun revolucion kiel la moskvanoj. Sed la laboristoj, kamparanoj estas nekleraj, kiel ili povus regi tutan landon? Mi petas vin, ni veturu al Vieno kaj plu al Parizo! Tie ni havus pli bonajn ŝancojn. Béla Kun volas akapari ĉion al si, kiam li parolas pri socialigo.

Mi promesis, ke apenaŭ ni havos eblon, ni elveturos al Vieno. Sed unue mi bezonas akiri monon.

Mi legadis la ĵurnalojn. Streĉis la menson, kion mi povus turni en mian utilon inter la konfuzaj okazaĵoj de la konsilantara respubliko. Al mi ne plaĉis la reĝimo de la ruĝuloj, sed des pli la ĥa-

[13] Io tia ankoraŭ neniam okazis! (germane)

oso, la ĉiutagaj danĝeroj. Tiafoje nenio estas certa. Sed decida, celkonscia, ĉiopreta „komunisto” kapablas agi kredeble!

Fine alvenis la 27a de marto, kiam la ĵurnalo Népszava komunikis, ke la Revolucia Reganta Konsilantaro prenas per dekreto la financajn instituciojn sub sian kontrolon. Mi esperis la impresan forton de la eventoj.

Ni havis matenon sunbrilan. La vetero estis jam aprileca, kvankam la renoviĝo de la naturo ankoraŭ ne povis tion sekvi. Ne verdiĝis la arboj en la avenuo Üllői, nek senteblis florodoroj, kaj la pasantoj ankoraŭ ne malbutonis siajn vintrajn paltojn.

Mi eniris la imponan konstruaĵon de Europa International Bank, kie mi referencis ĉe la pordisto pri nia priparolo kun la s-ro ĝenerala direktoro. Tial uniformita dungito akompanis min kun komplezo kaj respekto, ŝuldataj al eminentaj gastoj, per lifto ĝis la tria etaĝo. Mi diris al la sekretariino nur, ke mi havos konfidencan, privatan interparolon kun la s-ro ĝenerala direktoro. Mi enmanigis al ŝi mian vizitkarton, sur kiu estis presita: „Nome de la Hungara Konsilantara Respubliko la instrukcioj de k-do Ludoviko Fehér obeendas. Budapeŝto, la 25an de marto 1919.” La „dokumento” estis aŭtentigita per ornamita ruĝa rondostampo kaj subskribo de Béla Kun.

Mi prezentis min en la kabineto de Alfréd Meyer-Hubert kaj transdonis mian vizitkarton. Kun trankvilo de mortinto mi rondrigardis en lia kabineto. Sur lia skribotablo staris fotokadro kun la fotografaĵo de lia familio. Li tronis en ĝi meze, dekstre la edzino kaj ambaŭflanke du tronheredontoj.

– Kiel vi certe informiĝis, ĉi-tage Népszava komunikis, rezulte de nia plurtaga prepara laboro ni socialigis 34 budapeŝtajn financajn instituciojn. Laŭ niaj planoj ilin sekvos ankoraŭ 800.

– Mi scias – li respondis rezigne –, kaj la posedantoj de deponaĵoj rajtas repreni po dek procentojn, maksimume du mil kronojn monate. Krom por salajropago, daŭrigo de produktado, aĉeto de krudmaterialoj. Ankaŭ al vi ne estas sekreto, ke nia financa situacio estas katastrofa, kaj tia estis ankaŭ dum la tempo de la popola respubliko. Dum la kvar jaroj de la mondmilito la spezo de bankbiletoj dekobliĝis, kaj kreskis de 3 miliardoj al 31 miliardoj da kronoj. Sed la kovro en oro malkreskis de 1,4 miliardoj al 0,342 miliardoj. Dum la regado de Károlyi estis emisiitaj 5,4 miliardoj da kronoj. Antaŭ la disiĝo de la monarĥio la bankbiletoj estis presataj en Vieno. Post oktobro de 1918 la Viena Instituto de la Aŭstra-Hungara Banko ne intencis disponigi la kliŝojn de la kronaj bankbiletoj al la hungara registaro. Tial estis emisiita provizora papermono. Oni cedis nur la kliŝojn de unu flanko de la 25- kaj 200-kronaj bankbiletoj, tial la alia flanko de la mono restis blanka.

– Ĉiuj ja konas la diferencojn inter la malnova blua kaj la nuna blanka mono! – mi respondis iom incitite.

Mi transiris al la kerno.

– Se vi akceptos niajn kondiĉojn, vi troviĝos en escepta situacio. Jen nia kontrakto.

Laŭvorte mi ne plu scipovas citi. La Revolucia Reganta Konsilantaro deklaris, ke ĝi elektis ĝuste ĉi tiun bankon sia hejma banko. Tial la ĝenerala direktoro estas devigita kontribui al la konservo kaj funkciigo de la institucio. Interalie per tio, ke lia firmao staros je la dispono de la konsilantara respubliko. Ĉi lasta deponos en Europa International Bank la tutan kapitalon, kiun ĝi gajnos el la socialigo de la bankoj. Alfréd Meyer-Hubert restos la direktoro de la banko; kun maksimuma sekretado li devas kunlabori en ĉio kun ni. Tial ni certigos al li signifan profitkvoton. Laŭ la validaj dokumentoj de personoj, plenrajtigitaj de la Revolucia

Reganta Konsilantaro (inter ili aparte Lajos Fehér), li estas devigita pagi kontante (per blua mono) la sumojn de la ĉekoj prezentotaj. 45 procentojn de la kontinue alvenontaj sumoj el la socialigitaj bankoj li devos deponi en neriskajn investojn, kiuj iam ajn kontantigeblas. Li devas ĉesigi ĉiujn komercajn kaj ceterajn agadojn, kiuj montrus al funkciado de ekzistanta banko.

Nun, por la urĝaj kostoj li transdonu kontraŭ kvitanco al k-do vickomisaro Lajos Fehér 10.000 usonajn dolarojn kontantajn.

Li maldungu siajn oficistojn! Anoncu, ke la Revolucia Reganta Konsilantaro socialigis Europa International Bank. Liaj fideblaj homoj aranĝu plu la aferojn. Temas pri kvin ĝis dek personoj, inkluzive lin.

Mi devis montri min firma, decida. Nur tiel mi atingis rapidan sukceson.

Ankoraŭ samtage ĝis posttagmezo mi renkontiĝis kun la ĝeneralaj direktoroj de tri grandaj bankoj. Ĉiufoje mi sukcesis havigi al mi kontante la petitajn sumojn. Ne estus konsilinde kunporti tiom da mono. Mi timis, ke en kelkaj horoj sed plej malfrue post unu ĝis du tagoj ĉio malkaŝiĝos. Postevente mi agnoskas, ne estis bona ideo fari tian fraŭdon. Elpaŝi en la nomo de la Hungara Konsilantara Respubliko, eĉ misuzi ties potencon! Ĝi povus kosti al mi la vivon!

Alvenis la tempo, ke Vilhelmo Faragó, Helenjo, Milinjo kaj mi veturu „por viziti parencojn" en Vieno. La limoj estis jam rigore gardataj.

La milito, la malcerta politika situacio elprovis ankaŭ la vienajn civitanojn. Kelkaj timis, ke la ruĝa danĝero, la milito de la moskvanoj povus gluti ankaŭ Vienon. Laŭ aliaj Vieno estas en sekureco. Béla Kun estas ja la plilongigita mano de Lenin, sed ĝis tie ĝi nen-

iam atingos.

En la elegantaj apartamentoj de Hotel Graben ni vivis en luksaj cirkonstancoj. Ni povis permesi tion al ni, ĉar danke al la respubliko de la konsilantaroj kaj la miskondukitaj bankieroj mi akiris amasegon da mono. Ties granda parto atendis nian alvenon en pluraj vienaj bankoj. Mi ĝiris signifajn sumojn al bankkontoj en Zurigo.

Milinjo kaj Helenjo Sugár ŝategis la teatron, koncertojn. Ili serĉis la bonajn societojn, amuzokazojn. Konkuris unu kun la alia pri elegantaj vestoj, ŝuoj. La peltoj plivibrigis iliajn korojn. Ili nur konjektis, de kie kaj kiel mi akiris ŝlosilon por la senfunda trezorejo. Ili ne esploris la detalojn.

Kvazaŭ la tuta aristokrataro de Hungario rifuĝis al Vieno... Facile ni kreis amikajn interrilatojn. Ĉiuj konsentis, ke oni devas malhelpi la definitivan regadon de senradikaj proletoj kaj komunistoj. Oni devas atingi, ke Entento ekatentu nin. Nur de la triopa alianco – precipe de Francio – ni povis esperi subtenon.

En la fojera kafejo de Hotel Graben mi konatiĝis kun famaj homoj, inter ili István Bethlen, Pál Teleki, Gedeon Rádai, Géza Zichy, István Zichy, György Szmrecsányi, Antal Lehár, nobeloj, ĵurnalistoj kaj ceteraj famuloj. Ĉiuj kredis, ke mi estas ido de la familio Festetich; danke al princo Ghyka mi disponas signifajn naftokampojn en Rumanio.

Ni estis senesperaj, koleraj, ĉar la situacio en Hungario ŝajnis senelireja. Kia estos la packontrakto, se Béla Kun kaj liaj kamaradoj konkludos ĝin, ili ja eĉ ideon ne havas pri la sangoferoj de la milito. Ili akceptos ajnan magran interkonsenton! Kion povis lerni pri la mondo la leninistoj, klerigitaj en Moskvo? Nur ke bolŝevismo devas esti ĉie disvastigata. Ili volas farbi la mapon ruĝa. Tial Lenin sendis ilin hejmen. Ili ne volas pacon!

Per mia aŭtomobilo mi veturis antaŭ la sidejojn de renomaj vienaj firmaoj. Plej ofte mi prezentis min kiel sekretario de princo Tasilo Festetich; mi ofertis benzinon, petrolon, sukeron. Kiel garantion mi deponis akciojn de la Aŭstra-Hungara Banko kaj hipotekbankajn obligaciojn, skribis plenrajtigon por MelĤioro Horváth de Beöháza, kiu transprenos la antaŭpagon por la liverotaj varoj. Post kelkaj tagoj mi aperis kiel plenrajtigito kaj transprenis la antaŭpagon. Tiamaniere la firmao R. Landauer pagis 1.150.000 kronojn kaj la firmao Groag und Co. 1.238.000 kronojn.

Iun antaŭtagmezon mi anoncis min en iu granda viena banko sub la nomo de barono MelĤioro Horváth, kaj transdonis al la sekretario de la direkcia konsilio mian vizitkarton, ornamitan per seppinta krono. Mi rakontis al la afergvida direktoro, ke mi fuĝis el Hungario antaŭ la komunistoj, kiuj instaliĝis en miaj bienoj. Feliĉe, mi havas en Rumanio naftokampojn, tial de jaroj mi staras en negocaj rilatoj kun la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Mi volus setli en Aŭstrio, fondi industriajn entreprenojn; por tio mi bezonas 100.000 dolarojn.

– Barona moŝto, vi certe disponas ĉekkonton ĉe First National Bank – demandis la direktoro.

– Jes, kompreneble. Mi jam ankaŭ plenigis la ĉekon. Jen ĝi!

Mi transdonis ĝin.

– Ĉeko por vido – li diris post paŭzeto kaj aldonis: – Pagenda ok tagojn post la prezento, temas ja pri transoceana banko...

– Estas ja ĝene. Mi bezonas disponi la monon post kvar tagoj – mi respondis. Miaj negocpartneroj postulas kontantan deponon ĉe la kontraktado.

La direktoro okulmezuris min.

– Eble mi povas helpi vin, barona moŝto – li aldonis kompleze

kaj regalis min per cigaro. – Mi estos sincera al vi. Okaze de tiel granda sumo ni kutimas sendi kablogramon al la banko, ĉe kiu nia kliento havas ĉekkonton. Mi zorgos, ke la kablogramo ankoraŭ hodiaŭ..., pli ĝuste morgaŭ eliru. Mi kredas, ke en tri tagoj mi havos la atestan telegramon de First National Bank en mia mano. Prave, mi devos konsulti ankaŭ la ĝeneralan direktoron, sed ĉio estos en ordo.

– Kompreneble. Tion oni ne povas kaj ne devas fari alimaniere. Kaj mi tre dankas vin.

– Mi ankoraŭ mencias, barona moŝto, ke la kostojn de la kablogramoj kutimas anticipi la klientoj – klarigis al mi la direktoro.

Ĉe la kaso mi pagis la bezonatan sumon, sidiĝis en mia aŭtomobilo, kaj mia ŝoforo veturigis min en alian urbocentran bankon. Mi klopodis ankaŭ ĉi tie ludi senmanke mian rolon. Mi transdonis centmil-dolaran ĉekon de First National Bank, kies ateston oni promesis aranĝi kablograme. Ankaŭ trian bankon mi „donacis" per nekovrita ĉeko sub la samaj kondiĉoj.

Ĉio ĉi okazis dum unu antaŭtagmezo. Je la dek-dua kaj duono mi renkontiĝis en la restoracio de Grand Hotel kun Vilhelmo Sugár, kiu estis origine elektroteknikisto kaj muntisto; eminenta fakulo, kiu vivis en Ameriko, Anglio, Francio kaj laboris ĉie en la plej modernaj fabrikoj.

– Atentu bone! – mi komencis, dum mi kuleris la vaporantan buljonon – Mi deponis la ĉekojn. Nun dependas nur de ni, ĉu ni forlasos Aŭstrion kiel riĉuloj aŭ trafos en kaĝon.

Mi rakontis al li miajn antaŭtagmezajn negocojn.

– Ĉu vi eksciis, kie kuŝas la kabloj?

– Jes. Unu estas instalita sub Mariahilfer-Strasse kaj kondukas al Purkersdorf, la alia forlasas Vienon ĉe la landvojo al Baden. Mi havas kamaradon en la centra telegrama oficejo. Li eliradas, se ri-

paroj necesas. Cetere – li enpoŝigis la manon – mi mapis la kabloreton kun la ĉefaj nodoj kaj debranĉiĝoj.

Dum kvaronhoro ni studis la desegnon de Sugár, dum ni atendis la freŝe fritatan, panerumitan sandron danuban. Tio estis granda lukso tiutempe.

– Mi transprenos Baden – mi decidis. – Kaj al Purkersdorf veturos vi. Sed ne forgesu, vi eble devos ripozigi vian pugon kvardek ok horojn, ĝis alvenos la kablogramoj.

– Ĉu ne estas tro danĝere, he? – intermetis Sugár, kiu jam punsidis tri jarojn.

– Ne ekzistas negoco sen risko! Sed mi havas bonajn spertojn pri tiaj laboroj. Rememoru la pavimon de la strato Rottenbiller....

Pri tio ni ambaŭ sate ridis.

Je la kvara horo posttagmeze muntisto en blua supertuto hatis ĉe vojforko de la landvojo inter Vieno kaj Baden. En lia dekstra mano estis pioĉo kaj fosilo, en la maldekstra ilkesto. Tuj li alpaŝis la laboron. Per la pioĉo li rompis la asfalton, poste komencis fosi. Dume aŭtomobiloj preterbruis lin. Tiufoje li ripozis por momento. Post dudek-minuta klopodo li trovis la dividoskatolon de la subŝosea kabloparo. Li tratranĉis la kablojn, malfermis sian keston, el kiu li elprenis porteblan telegrafilon. Dum minutoj li konektis ĝin al la elektita kabloparo kaj komencis atenti.

Kompreneble Vilhelmo estis la pseŭdomuntisto. Kiam ni renkontiĝis, li rakontis la daŭrigon.

Pasis horoj. Ĉirkaŭ la kvina kaj duono komenciĝis la alfluo de aŭtomobiloj al Vieno, ĉar finiĝis la tiutaga vetgalopo en Baden. Kelkaj ŝoforoj gaje alkriis lin:

– Ĉu bone gustas la laboreto? Ĉu ankoraŭ longe vi sidos en tiu truo?

– Prefere malakcelu, ĉar policano punskribos vin! – rebatis la muntisto, kaj li pravis, ĉar post duonhoro trafikpolicano sur motorciklo ekpersekutis impetantan Rolls Royce kaj monpunis ĝian veturigiston pro trorapido. La polica interveno okazis apenaŭ dudek metrojn for de la rompita ŝoseparto. La muntisto vigle prijesis la polican disponon, stentore instigis la atenteman reprezentanton de la leĝoj.

– Ne domaĝu lin, s-ro konstablo, punpagu laŭmerite tiaj ŝosegangsteroj!

La nokto falis. Ĉirkaŭ la deka horo la laboristo elpoŝigis iom da glutaĵoj, sed ankaŭ dum manĝado li tenis la aŭdilon de la aparato ĉe la orelo. Tiel li sidis dum la tuta nokto, kaj ankaŭ la sekvan tagon antaŭtagmeze ĝis la deka kaj duono. Tiam li rekonis la unuajn lin interesantajn morsosignalojn, kiuj klaketis la adreson de First National Bank en Novjorko. La kablogramo de la privata banko alvenis kiel unua.

Pluaj kvin horoj pasis en streĉa atendo. Je la kvara kaj tri kvaronoj posttagmeze la aparato klaketis la mesaĝon de iu granda banko. Li akceptis ankaŭ ĝin kaj atentis plu. Je la sesa aperis blua supertuto sur la landvojo ĉirkaŭ unu kaj duonon da kilometroj for. En la unua minuto Sugár ektimis. Eble vera muntisto, dungito de la telegrama oficejo alvenas. Li estis forkuronta, kiam mi postkriis lin:

– Saluton, kompano! Ne forkuru! Estas mi, Melĥioro!

– Ĉar ankaŭ mi akceptis mesaĝon, ni fosfermis la kavon. Poste ni promenis en la proksiman Baden. Per tramo ni reveturis al Vieno. Vespere ni sate diboĉis, kaj nur sekvatage antaŭtagmeze ni denove alpaŝis la laboron. Ni okupis niajn postenojn ĉe la landvojo, kaj kun unuhoraj intertempoj ni respondis la telegramojn. En la nomo de First National Bank ni atestis, ke oni povas kon-

tantigi al barono Melĥioro Horváth de Beöháza cent mil dolarojn.

Antaŭtagmeze de la sekva tago mi ricevis jesan respondon de ĉiuj tri bankoj.

De la dek-unua kaj duono ĝis la unua horo la aŭtomobilo iris de unu banko al la alia. La ĉefkasistoj precizeme sed envie denombris la enormajn sumojn.

La 14an de aprilo grafo István Bethlen anoncis publike la fondon de la Kontraŭbolŝevista Komitato. Kvankam ankaŭ mi partoprenis la preparojn, feliĉe mi ricevis neniun funkcion.

– Oni devas rompi la potencon de la komunistoj! – Tion oni ripetis plurfoje. Por tiu celo estas permesataj ĉiuj neleĝaj rimedoj. Oni devas eksplodigi strikojn, ribelojn, organizi pasivan reziston. En Sud-Transdanubio oni devas krei senbolŝevistan zonon. Kun gvidantoj, kiujn ankaŭ Entento agnoskos. De tie oni povos direkti la batalojn kontraŭ la konsilantara respubliko.

Antal Lehár, György Szmrecsányi kaj György Pallavicini invitis min neatendite al renkontiĝo. Ili proponis, ke mi entreprenu sekretan mision. Mi portu al iu sud-transdanubia komisiito gravan sendaĵon. Dum la kolektado ankaŭ mi donacis dek mil bluajn kronojn por la realigo de la plano.

Mi devis parkeri du nomojn kaj adresojn, diversajn pasvortojn, personpriskribojn. La monon oni atendos en Nagykanizsa. Kiam en la ĉeesto de ili tri mi transprenis la elegantan palton, mi jam sciis, ke la du adresitoj neniam ricevos la enkudritajn kvincent mil kronojn, mil svisajn frankojn kaj kvar mil dolarojn.

Milinjo, Helenjo kaj Vilhelmo surpriziĝis, kiam mi sciigis al ili, ke ni devas forlasi Vienon. Mi donis du tagojn por la preparoj. Post kiam mi rakontis la detalojn, ili gloraltigis min ĝis la ĉielo pro miaj sagaco kaj aŭdaco.

Ankoraŭ samtage vespere, je la sepa horo ekiris la rapidtrajno

el Vieno al Triesto. Je la sesa kaj duono ni eniris niajn unuaklasajn kupeojn: du amika kaj amikina paroj.

Estis komenco de junio en la jaro 1919... En Triesto mi kaŝe malkudris la palton, el kies interno aperis amaso da mono. Vilhelmo kaj Helenjo tiel same interakordis kiel mi kun Milinjo. Ili ambaŭ estis veturontaj al Parizo, kie ili povos fari karieron. Vilhelmo malkaŝis nenion, sed mi bone konis lin. Ne vane li amindumis tiel arde al Helenjo, mi certis, ke li uzos ŝin por la realigo de sia plano. Ĉu ĝi estos pruntepreno de juveloj de riĉa virino, banka manovro aŭ artefarita situacio, kreita per ĵurnala anonceto, estis indiferente el ĉi tiu vidpunkto!

Al la sagaco de mia talenta amiko bone kontribuos la ĉarmo de Helenjo. Kompreneble, ankaŭ mi fieris pri mi, kvankam mi zorgis pro tio, ke eble oni jam enketas pri mi. Tro longe ni ne restis en Italio. Tamen mi lasis al mi sufiĉan tempon por ĉirkaŭrigardi en la najbaraĵo. Milinjo tiam jam konis miajn antecedentojn.

– Mi vidas, ke en Parizon ni ne povas veturi! Do ni veturu al Brazilo! Tie mi povus fariĝi vera aktorino, ĉar probable en Rio-de-Ĵanejro apenaŭ troviĝas multaj bonaj kantistinoj kaj dancistinoj. En la ombro de oranĝarboj kaj palmoj mi ŝatus pasigi mian restintan tempon.

– Ĉu vi ne deziras tro multe?

– Ne, karulo! Ĉar vi povas fari tion, kaj mi apartenas al vi. Kaj ankaŭ vi ŝatas aventuran vivon. Ĉu?

Mi kapitulacis. Mi ne povis nei sunklarajn faktojn.

Ŝi sidiĝis en mia sino, ĉirkaŭbrakis min. Ni ambaŭ deziras la samon. For de ĉi tie, malproksimen! Ni devas trovi nian bonŝancon.

Se reale mi konsideras, kion mi faris en la nomo de la konsilantara respubliko kaj en Vieno, tio jam mem prezentas tian bon-

ŝancon, kia dufoje apenaŭ doniĝas en la vivo de homo.

Antaŭ nia forveturo al Sud-Ameriko ni vizitis ankaŭ Napolon. De la teraso de la iama reĝa palaco, etendiĝanta sur la plej alta loko de la ĉirkaŭurba montoĉeno, ni rigardis malsupren en la golfon, kie mistike malvolviĝis el la nebulkurteno la impona duobla konuso de Vezuvio. Sed la veran, romantikan Napolon prezentas la malnova urboparto. Malhelaj stratetoj, zigzagaj ŝtuparoj kondukas supren al la antikva urbokerno. La deskvamiĝantajn frontojn de la mallarĝaj stratoj prilumas sunradioj, sed la ŝnuroj, plenaj de sekiĝantaj vestoj, ĵetas akrajn ombrojn sur la pavimitajn vojojn. En la platsupraj domoj sen subtegmentoj oni ne povas sekigi alimaniere. En la apartamentetoj de la ludomoj loĝas multmembraj familioj, tiel la pliparto de ilia vivo okazas sur la tegmentaj terasoj aŭ sur la stratoj. La ruboplenajn stratojn invadas diversaj diskriantaj vendistoj. Sed ankaŭ la aĉetantoj laŭtvoĉe marĉandas, disputas. Ĉie kuradas aroj da vivleraj infanoj. Sub la pordovolboj oni vendas kuiritajn sepiojn, tomatajn panflanojn, farĉitajn per kraboj aŭ fiŝoj. La tagmezajn varmegojn la lokanoj transvivas per babilado kaj vinumado sur terasoj de etaj gastejoj.

*Vede Napoli e poi mori*[14]. Ĉi tiun mallongan diraĵon oni nepre traduku ne tiel, ke apenaŭ oni vidis Napolon, oni preparu sin morti; sed prefere: homfilo ne mortu, dum li ne vidis Napolon. Cetere Napolo mem ne estas plezurplena vidaĵo, plie ĝia ĉirkaŭaĵo, la panoramo prezentas unikaĵon.

De nia hotela balkono oni povis travidi la duonon de la urbo. Antaŭ ni etendiĝis belega parko kun siaj ĉiamverdaj arboj, longaj promenejoj kun jarcentojn aĝaj prapalmoj; en la fundo la trank-

[14] Vidu Napolon kaj poste mortu (itale).

vile fumanta Vezuvio, volvita en blanka mantelo: ene fajro, ekstere neĝo.

Sed la plej sopirata vidaĵo estis la maro. Kiom da ventospecoj blovis, tiom da koloroj ĝi ŝanĝis; foje sur longa strio ĝi fariĝis perfekte nigra, poste denove verda; arĝenta al la horizonto; laste, ĉirkaŭ vesperkrepusko brila de oro, purpuro kaj smeraldoj.

Milinjo dancis sur la sabla bordo, levante ĝisgenue sian jupon. Ŝi eligis krietojn, se ĝi malgraŭe fariĝis humida. Ankaŭ mi demetis la ŝuojn kaj ŝtrumpetojn, refaldis la pantalontubojn, kaj kune ni voris la feliĉon.

# 3. Rio-de-Ĵanejro

Samtempe kun Milinjo mi enŝipiĝis. Nian bagaĝon portis po kvar portistoj. Ni ŝajnigis unuafoje vidi unu la alian. Pro singardo mi uzis la nomon grafo Tasilo Festetich de Beöháza.

Grafino Milinjo Emerencio Barany, posedanto de plugkampoj, paŝtejoj kaj arbaroj kun enormaj areoj ne rifuzis mian ĝentilan proksimiĝon. Niaj kajutoj troviĝis unu apud la alia. Ni devis atenti, ke en societo de aliuloj ni tenu nur supraĵan konversacion. Ŝi rakontis al ĉiuj, ke ŝia edzo, posedanto de kafoplantejoj vivas en Rio. Mi retenis la version, ke mi havas rumanajn, hungarajn, brazilajn firmaojn, tial mi devas ofte veturi al Brazilo. Tie mi posedas plurajn bananplantejojn kaj ĝuas signifan influon en certaj komercistaj rondoj.

Nia ŝipo kontraŭnaĝis ondetojn kaj kruele fendis ĉiujn. Ĉu ni eble konkuris? La oceano indiferente toleris, ke ni tranĉis vundon kojnoforman en ĝia akvo – ĝi malfermiĝis antaŭe, sed kelkajn metrojn poste batis ondojn kaj reunuiĝis.

Rotoj da mevoj flugflirtis ronde-ĉirkaŭe; proksime devis esti insulo. Kelkaj ekripozis sur la pavezo de la supra ferdeko de la oceanŝipo, sur ties elstarantaj ornamaĵoj. Iliaj voĉoj flugis kiel akraj ŝrikoj en la aero plu, miksiĝante poste en kakofonion.

Neatendite gluiĝis du varmaj manetoj sur miaj okuloj. Instinkte mi etendis la manojn malantaŭen. Miaj manoplatoj rekonis la sveltan talion de Milinjo. Mi returnis min. Ŝi komencis ronĝi mian maldekstran orelon, ĉar ŝi sciis, ke mi terure ĝuas tion. Estus danĝere cedi al la trointensiĝo de miaj emocioj, ni ja veturis inkognite.

– Ne, karulinjo, nun ankoraŭ ne! – mi petis. Tenere mi repuŝis

ŝin de mi kaj dume kisis ŝian frunton.

– Mi komprenas, alteminenta moŝto! – ŝi transprenis sian devigan rolon. – Kiel plaĉas al vi la mevoj?

– Mi dankas por via afabla demando, grafino. Nek estetike nek akustike mi alskribas ilian produktaĵon al la artoj.

– Mi konis virinon – ŝi diris mokridete –, ŝi nomiĝis Milinjo. Estis vera kantistino, sur ĉiuj scenejoj de la mondo ŝi pruvis sian taŭgecon.

– Kaj kio okazis al ŝi? – mi demandis.

– Malinde forgesis ŝin la sendanka publiko, post kiam ŝi forveturis al Rio-de-Ĵanejro, por trovi pli bonan ŝancon.

– Ĉu ŝi foriris el la pasinta en la estontan tempon...

– Ne, ne! – ŝi protestis. – Milinjo foriris en la estantan tempon...

Krepuskis. Krom la ŝrikoj de la mevoj aŭdiĝis nur la monotona rompiĝado de la akvosurfaco. Nia ŝipo tranĉis tutelane la oceanon. Kelkaj steloj jam brilis kiel etaj diamantoj sur la ĉielvolbo. El la fenestroj elfiltriĝis malakra lumo sur la ondantan akvon.

Post semajno ni albordiĝos – tre malproksime de Eŭropo, kaj la pasaĝeroj komencos novan vivon en la nekonata Brazilo.

Milinjo transiros en la estantan tempon, tamen tiu estanteco estos tre malproksima kaj malcerta...

– Cetere, unuavide ne nur la freŝa beleco, juneco de via moŝto faris sur min profundan impreson – mi daŭrigis iom alie –, sed ankaŭ tiu kaŝita gustokulturo, kiu manifestiĝas per konkreta formo en la gemgarnitaj ringoj, kolieroj, kiujn via moŝto portas. Kaj ankoraŭ unu afero. Dum tiom da tempo mi havis eblecon observi la brilianton sur la ringofingro sur la maldekstra mano de via moŝto. Tre interesa peco! La belecon de gemoj donas ilia granda refrakta kapablo, intensa disperso kaj koloroj. Akvamarino estas verde blua, safiro blua, rubeno ruĝa, smeraldo verda. Kiu pensus,

ke diamanto parencas kun karbono, ĝiaj kristaloj estas kutime okedraj. La okedraj tavoloj bonege fendiĝas en ok direktoj, kio havas apartan signifon ĉe la prilaboro. Ĝi estas la plej dura mineralo, kiu ekzistas. Pro ĝia intensa refrakto ĝia lumo konfuzeblas kun nenio alia, ĉar ĝi estas karakteriza diamantolumo, ĝia disperso estas intensa. Per facetado de la senkolora diamanto pretiĝas la brilianto. Nu, surbaze de ĝia lunsensivo mi jam tiris la konvenajn konkludojn...

Milinjo klinis sin pli proksimen.

– Ej nu, sinjoro! Ĉu vi nun diras la veron, vidante eĉ en mallumo la disperson kaj lumon de mia ringo?

– Ne! – mi diris resobrige. – Se mi havas tian humoron, ni prefere pokeru iom! – mi proponis. – Antaŭiru, mi postsekvos vin.

En la vasta kartosalono ankaŭ kibicoj havis spacon. Bankiero Mr. Baumann, komercistoj Mr. Beckwith kaj Mr. Hoyt sidis ĉe iu tablo. (De ili mi gajnis plej multe. Kutime ni ludis senliman pokeron.)

Ĉiuj cigaris aŭ cigaredis, sed la forta transversa trablovo purigis la aeron. En nia societo troviĝis kelkaj damoj. La sekretajn signalojn de Milinjo, kiujn ŝi donis per sia ventumilo, nur mi komprenis. Tiufoje ŝi ekfumis. Ŝi faris suĉon el sia cigaredo en orita ingo kaj ellasis ludeme fumringojn. De dekstre, de maldekstre aŭ de ambaŭ flankoj ŝi reĝustigis siajn harojn, apogis sin al la muro de la kajuto. Ni ambaŭ bone sciis, kiu gesto kion signifas.

En iu partio ni restis duope. Anticipe mi povis vidi la kartojn de ĉiuj, kaj konforme al tio mi pliigis miajn vetojn.

– Imagu, Mr. Baumann! Oni kalkulis, kian ŝancon povas havi ludanto por komponi iun kombinon. El kvindek du kartoj konsistigeblas pli ol du kaj duono da milionoj da kombinoj. Ĉar ne ĉiuj kartoj estas disdonitaj, la nombro de la variacioj estas kom-

preneble multe malpli. Se oni disdonas ĉiujn kartojn, la probablo, ke vi havos reĝan emblemon, t.e. la kvin plej valorajn kartojn en unu koloro (de aso ĝis deko), estas unu al sepdek du. Malplena mano des pli ofte okazas: en proporcio unu al du. La ŝanco de unu paro estas unu al dudek unu.

– Pardonu min, s-ro grafo – interrompis min Baumann. – Mi opinias, ke via longa dirindo servas por distri la atenton.

– Mi petas vian pardonon, s-ro Baumann, sed en la ardo de la ludo ekparolas en oni interna voĉo. Tiel bonajn kartojn delonge mi ne havis! Mi tenas vian veton kaj pliigas per samtiom.

Sur la tablo la krupiero ŝovis la necesan kvanton el miaj ĵetonoj en la bankon. Milinjo jam la trian fojon signalis, ke mia partnero havas du sepojn kaj du dekojn, do du parojn. Ankaŭ mi havis tiom sed el naŭoj kaj dekoj.

– *Liebster Freund!*[15] Kara s-ro grafo! Povas esti, ke nun mi gajnos ĝuste pro via ĵusa informo. Kiel vi diris? La proporcio de malplenaj manoj estas unu al du, do tre ofta. Tiu de unu paro estas unu al dek, ĉu?

– Unu al dudek unu – mi precizigis.

– Des pli bone!

– Kaj kiel statas la afero, se la malplena mano aŭ unu paro rilatas ĝuste al viaj kartoj? Vi faris min tre scivola. Mi tenas tri mil kaj ne aldonas. Por ke vi ne kredu, ke vi ĉiam gajnas! Ĉi tiun vian serion oni ja jam devas vere interrompi!

Dume Milinjo transiris en la ruletsalonon, por ne trafi en suspekton.

Samtempe ni metis niajn kartojn sur la tablon. La barono postrestis nur je „harlarĝo", sed en pokero oni ne konas ĉi tiun vor-

15 Plej kara amiko! (germane)

ton. Kiel vera ĝentlemano li eltenis ĉi lastan malvenkon. Li manpremis kun mi, kaj skuante la kapon, ripetis nur: *Es wird sich schon sehen! It remains to be seen!*[16]

Dum la unuaj kelkaj tagoj disfamiĝis, kiel *lucky and dangerous*, do bonŝanca kaj danĝera ludanto mi estas. Tamen multaj ludis kun mi. Je malgrandaj vetoj mi lasis ilin gajni. Sed la bankon ĉiam mi kunprenis.

– Sinjoroj! – mi diris foje. – Mi aŭdas, ke vi volonte daŭrigus, sed vi ne havas sufiĉe da kontanta mono. Vi proponis al mi ankaŭ ĉekojn. Mi inversigus la situacion. Mi estas superstiĉa. Ĉekon mi ja ne povas akcepti, sed volonte mi pruntos.

Pri ĉi mia anonco ĉiuj miris, ĉar kiu gajnas, ĝuste pro superstiĉo ne kutimas pruntedoni.

– Volonte mi aĉetos viajn valoraĵojn: juvelojn, orajn horloĝojn, noblajn metalojn, broĉojn aŭ ion ajn. Sed pagos mi al vi per ĉeko. Konto de svisa banko certe signifas cent-procentan garantion al vi. Tio estus propre ne prunto, ĉar gajninto neniam farus ion tian. Ni nomu tion vendo kaj aĉeto. Morgaŭ mi estos ĉi tie en la kutima tempo kaj atendos vin.

Facile mi faris ĉi tiun oferton, ĉar mi havis ĉe mi abundon da ĉekoj de tri svisaj bankoj, kiujn mia amiko Frederiko Vilhelmo Wetz estis farinta al mi jarojn pli frue. Mi ne avaris ĉe la taksado de juveloj kaj noblametalaĵoj. Miaj ludpartneroj kredis, ke ili faris tre bonan negocon.

Mi engaĝis ankaŭ la krupieron, kiu por rekompenco diligente notis, kiu al kiu per kiom ŝuldas. En Brazilo mi vendis la kolektitajn valoraĵojn al juvelistoj. Pri kelkaj pli valoraj pecoj eĉ nun mi memoras. Inter ili troviĝis kolieroj el pli ol cent perloj; 14-karataj

16 Se ni vivos, ni vidos! (germane kaj angle)

kolieroj kun dek ĝis dudek etaj briliantoj; soliteraj ringoj, diademoj, broĉoj kaj bosita, diskoforma, antikva ormedalo kun almandino.

Milinjo ĉiuvespere trakisis mian tutan korpon. Mi faris same. Ni unuiĝis en feliĉa kunuleco. Ni komencis kredi, ke ĉi tiu ŝipo estas la Paradizo mem, kvankam ĝuste tien ni volis iri.

Mi povas rememori ankaŭ simplajn, ĉiutagajn aferojn. Ekzemple en la banoĉambro de mia kajuto la ŝaŭmo de la lavendodora razosapo bonfartige karesis miajn vangojn. Malrapide mi tiris la razilon... Mi ĝuis la manieron puriĝi. Per malvarma akvo mi forlavis la ŝaŭmrestojn. Tio eksterordinare refreŝigis min. Post kiam mi vestis min, mi observis min en la spegulo kaj antaŭsentis, ke miaj blanka kol-banto, nigra smokingo kaj simpatie alloga aspekto ankaŭ hodiaŭ triumfos. Aŭ ĝuste mi triumfos per ili...

*Madame*[17] Agato Chevré ofte aperis sur la ferdeko de la ŝipo inter la multaj ripozlitoj, sunombreloj. Ŝia blanka seĝo troviĝis iom for de la loko de la pasaĝeroj, pasigantaj sian enuan tempon. Pri ŝia riĉeco oni rakontis legendojn. Antaŭ pluraj jaroj ŝia filo malaperis, de tiam ŝi serĉadas lin en ĉiuj mondopartoj. Per ŝipoj, trajnoj ŝi traveturis multajn landojn, travivis multegajn aventurojn, kelkfoje ŝi povis danki al la blinda hazardo, ke ŝi restis viva. Iufoje ŝi dungis damon de kompanio, alifoje tute sola ŝi entreprenis riskajn vojaĝojn. Jen ŝi rilatis konfidence al kiu ajn, jen sekreteme, rifuze kondutis.

Ŝian edzon, francan generalon Johan Chevré trafis akcidento. En la kvara jaro de ilia geedzeco lia ĉevalo panikiĝis dum revuado kaj deĵetis lin. Lia spino rompiĝis kaj lin trafis malfeliĉa morto.

[17] sinjorino (france)

Ankaŭ Paul Romaine Chevré estis vojaĝadanta tra la mondo. Li surferdekis la plej grandan ŝipon de la mondo, kiu en 1912 sinkis...

Antaŭ kelkaj jaroj mi funde trastudis anglan ĵurnalon. Mi eltondis la artikolon, kiun mi konservas en mia monujo. Ties kaŭzon mi ne scipovus diri. Ankaŭ en mi, Tasilo estas ja kompato kaj kunsento pri ĉi tiu terura tragedio.

Titanic estis konstruita en Belfasto, Irlando, ĝia longo atingis preskaŭ 300 metrojn. Ĝian ŝelon oni fiksis onidire per tri milionoj da ŝraŭboj kaj nitoj. Krom lignon oni uzis marmoron kaj graniton, eĉ por la plialtigo de la nivelo oni ornamis la ensemblojn per orado. Sur la ferdeko de la luksa pasaĝerŝipo estis baseno, lifto kaj ankaŭ turka banejo.

Ĝi elveturis la 10an de aprilo 1912 el la haveno de Southampton al Novjorko kun 2207 pasaĝeroj. La kvaran tagon post la elhaveniĝo, la 14an de aprilo, je la 23a h kaj 40 minutoj ĝi puŝiĝis kontraŭ glacimonton. 1523 homoj perdis la vivon. La pliparto de la savitoj vojaĝis en la unua klaso. La ŝancoj de transvivo de la elmigrantoj en la ŝipofundo egalis praktike la nulon. La giganta korpo sinkis post du horoj.

Oni deklaris Paul malaperinta, lia kadavro ne retroviĝis. S-ino Agato ricevis neniam oficialan ateston pri tio, ke lia filo efektive mortis. De ok jaroj li ne donis vivosignojn pri si. En sia iom perturbita cerbo Agato teksis ĉiaspecajn teoriojn kaj estis konvinkita, ke ŝia filo vivas. Foje en Stokholmo ŝi kredis retrovi Paul, sed evidentiĝis, ke oni erarigis ŝin per hazarda samnomeco.

Ĉion ĉi rakontis al Milinjo la ĉirkaŭ sepdek kvin jarojn aĝa virino – po du-tri fojojn tage. Mia karulinjo citis kelkfoje laŭvorte la dialogojn.

– Mi nomos vin *Petite Fleur*[18], ĉar vi povus esti mia filino. Anstataŭ mia filo nun estu mia filino! Kiam mi aĝis dudek jarojn, mi estis same bela kaj svelta – ŝi diris foje al Milinjo, kiun tedis la naivaj imagoj, detaloj de ŝia nebuleca, eble elpensita pasinteco.

– Karulinjo! – mi instigis ŝin. – Tempon vi disponas abunde! Ankaŭ orelojn vi havas! Dum la monologoj de avino Agato vi povas legi. Sed mi petas vin, tenu la orelojn malfermitaj! Eble ŝi rakontos ion, el kio ni povos havi utilon!

Mia konjekto praviĝis, ĉar sekvis „piratoj" en la rakonto. Kruelaj kruduloj, kiuj kolektas trezorojn, rabadas, predadas, bruligadas, perfortas virinojn. Iun nokton avino Agato havis premsonĝon. Senindulgaj sovaĝuloj atakis nian ŝipon. Ili mortigis la virojn, la virinojn transpelis sur alian ŝipon. Sed antaŭe ili kolektis ĉiujn valoraĵojn kaj monon. La juvelkesteto de Agato vekis la intereson de la unuokula kapitano. Li prenis ĝin al si, sed post petego de Agato li permesis, ke ŝi elektu unu el siaj juveloj. „Tio estas mia donaco!" – diris la unuokululo.

Kiam ŝi vekiĝis el sia inkuba sonĝo, ŝi tuj serĉis la kesteton. Ekscitita ŝi rakontis sian noktan aventuron. Milinjo sukcesis konsoli ŝin.

– *Petite Fleur!* Mi ne povis naski filinon. Ĉiam mi volis havi tian, kia vi estas. Vi estas por mi la enkorpigita anĝelo, juneco, beleco. Diru, kiom vi aĝas?

– Dudek kvar jarojn. La 24an de januaro mi plenumis ĝin.

– Jen nu! *Petite Fleur!* Ankaŭ mi estis dudek-kvarjara! Precize tia estas... estis... mi, mi... mi kaj vi estas mi! Mi ne scias, ĉu vi komprenas tion ĝuste?

Kiam Milinjo alvenis ĝis ĉi tiu punkto en la rakonto, ŝi daŭrigis

18 floreto (france)

jene:

– Nu, Meĉjo, tiam io vere konfuziĝis en la cerbo de la avino. La estanteco kolapsigis la estintecon aŭ inverse. Tamen mi tre ĝentile sciigis al ŝi, ke mi komprenis ŝin. Poste mi aldonis: „*Madame,* vi eble ne imagus, ke ĉi tie interne, en mia koro, en mia animo mi sentas la samon. Ekde nia konatiĝo. Sed nun, ke vi esprimis vin tiel klare... Mi konsciiĝis... Mi tute same povus esprimi min!"

Kaj Milinjo rakontis plu.

– Vi estas mia filino – ŝi ripetadis. – Kun neatendita viglo ŝi sidleviĝis sur la ripozlito, manvokis min apud sin. Feliĉe ŝi brakumis kaj kisis min sur la frunto.

– Venu kun mi, *Petite Fleur,* mi montros al vi ion tian, kion neniu konas, nur mi.

Mi akompanis ŝin en ŝian apartamenton, kie el la fundo de ŝranketo ŝi elprenis tiun perlamote inkrustitan kesteton, pri kiu ŝi sonĝis. Ŝi demetis ĝin sur la tablon. Ceremonie ni sidiĝis, ŝi faris krucosignon. Konfuzita, mi imitis ŝin.

– *Petite Fleur!* – ŝi diris solene. – Vi estas mia filineto, knabineto, floreto. Mi havas neniun alian parencon, konaton, amikinon. Tial mi konfidas al vi sekreton. Mi travivis sepdek sep jarojn; krom mia filo kaj karmemora edzo mi sentis nenian mankon. Sed tio estas dolora manko! Nun mi sentas, ke ankaŭ vi estis manko en mia vivo, ĉar vi malestis ĝis nun! Vi havas tian forton, ke vi povis batali kontraŭ la piratoj. Mi scias, *Petite Fleur*, vi estis ĉi tie, kiam la piratoj invadis la ŝipon. Per via korpo vi ŝirmis min. La latronoj pafis en vin dek du kuglojn, sed vi ne lasis malfermi la ŝrankopordon. Mi dankas vin, *Petite Fleur!* Vi ŝirmis ne nur mian vivon sed ankaŭ mian kesteton. De cent jaroj la piratoj serĉas ĝin.

Plurfoje ŝi turnis sekretan seruron. Malrapide ŝi levis la kovrilon.

Nekredeble tikla vidaĵo de mirinda juvelaro ravis miajn okulojn.

– Ho, kiom mi amas ilin, ho kiom! Aŭ prefere mi amis ilin! Post kiam vi, *Petite Fleur* retroviĝis, mi scias, kio estas vera amo. Venu, sidiĝu pli proksime! Mi volus vin brakumi.

Kiam Milinjo venis ĝis ĉi tiu punkto en sia rakonto, mi laŭdis ŝin. Valoris la penon, ĉu? De ĉi tie distas la juvelkesteto nur je paŝo! Mi supozis, ke ŝi baldaŭ donacos al ŝi la valoraĵojn. La sorto vere disponis tiel, sed kroĉis ĝin al neevitebla tragedio.

Iun antaŭtagmezon ŝi vane atendis Agaton, tial ŝi frapis sur ŝia pordo. Ŝi ne ricevis respondon. La pordo de la kajuto estis malŝlosita! La damo kuŝis senviva sur la ne pormetita lito. Ekscitite Milinjo provis palptrovi ŝian pulson, sed nek la kola, nek la braka arterio pulsis. Ŝia korpo estis ankoraŭ varma... Pluraj demandoj stariĝis en ŝi. Ĉu iu vidis ŝin eniri la kajuton? Se ŝi anoncos la mortokazon, oni povus suspekti ŝin. Kion ŝi diros, se iu envenos? Kiu scias pri la juveloj? Kiel ŝi kunportu ilin?

En sia timo ŝi agis instinkte. Ŝi lasis nur du orĉenojn, ŝajnantajn malpli valoraj, en la kesteto, poste remetis ĝin en la ŝrankon. La aliajn valoraĵojn ŝi kaŝis en la poŝojn, tri pendigis ĉirkaŭ la kolo kaj plialtigis la krispan kolumon de sia bluzo. Ankaŭ en siajn mamzononon kaj korseton ŝi kaŝis kelkajn. *Adieu, Madame!*[19]

En Brazilo ni devis liberiĝi de ĉiuj. Kelkajn pecojn tamen eĉ nun mi bone memoras: 14-karata bukedforma broĉo el ruĝa oro, tri 14-karataj braceletoj el ruĝa oro, koliero Anker, 14-karata korforma medaliono el ruĝa oro kun aversa diamanto, garnita per perletoj, 18-karata orringo kun brilianto en kroĉa muntumo, 18-karata dekorpinglo kun diamanto. Cetere la naturan kristalfor-

19 Ĝis revidio sinjorino! (france)

man diamanton la portugaloj nomas *Naiffos*, la francoj *Points Natives*. En Sud-Afriko oni trovis en 1905 la plej grandan gemon de la mondo, la Cullinan-diamanton.

Milinjo transiris nerimarkite en sian kajuton. Post kelkaj horoj oni frapis. La kapitano persone sciigis la funebran novaĵon. Kvankam ili estis nur konatoj, li esprimis sian kondolencon. Ŝia koro haltis – li diris. Du kuracistoj ekzamenis ŝin. La saman ekspertizon li enskribis ankaŭ en la mortoateston. Milinjo spektaklece ekploris kaj tuj volis vidi Agaton. La kapitano malpermesis tion kaj petis ŝin ne fari skandalon. Post du tagoj oni ja enhaveniĝos en Rio. Sed antaŭe oni devos sepulti la forpasinton. Kiel mariston. Li konsilis forresti ankaŭ de tio.

Kaj tiel okazis. Ni devis humore transagordiĝi, ĉar en Rio feliĉo estis nin atendonta.

Laŭ leksikono, kiun mi deprenis el la librobreto, la areo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo ampleksas 8.522.000 kvadratajn kilometrojn. Ĝia loĝantaro nombras ĉ. 30,5 milionojn. 3,5 milionoj estas enmigrintoj: portugaloj 1.055.000, italoj 1.388.000. Brazilo konsistas el 21 ŝtatoj kaj la federacia teritorio Rio-de-Ĵanejro.

Antaŭ nia alveno, dum la prezidenteco de la konservativa generalo Fonseca Hermes (1910-1914) okazis revoluciaj eventoj, sed la mondmilito baldaŭ deturnis la atenton al la ekstera politiko. La 10an de aprilo 1917 prezidento Braz Vencel rompis kun Germanio kaj la 26an de oktobro li deklaris militon kontraŭ ĝi. La posteulo de Vencel fariĝis prezidento Pessoa. La ministeriojn direktas ŝtatsekretarioj. En ĉiu ŝtato estas nacia asembleo. En la municipoj estas pli ol kvar mil administraciaj unuoj, ĉiu kun memstara aŭtonomio, ĉe kies pinto staras konsilantaro kaj urbestro.

En la mezaj kaj nord-orientaj partoj de Brazilo regas tropika kli-

mato, t.e. la klimato estas varma kaj humida. La suda regiono estas pli malvarma ol la cetera parto de la lando (averaĝa temperaturo estas 18 °C). Koncerne rendimenton de akvo, Amazono estas tutmonde la plej granda, kaj post Nilo la plej longa rivero. Ĝia averaĝa larĝo estas kvin, sed kelkloke ĝi atingas ankaŭ 50 kilometrojn. Ĉi tie estas la plej varia flaŭro de la mondo. Troviĝas interalie praarbaroj, duondezerta arbusta vegetaĵaro, marĉaj, torfaj areoj, savanoj, arbustoj, arbetoj, kampoj. La sudan regionon de Brazilo kovras pingla arbaro.

Brazilo estas la mondunua produktanto de kafo, sisalo kaj oranĝo. Sed al ĝiaj ĉefproduktoj apartenas banano, tritiko, rizo, maizo, furaĝogreno, sukerkano, kokoso kaj ankaŭ kakao. En Brazilo kreskas ankaŭ akaĵuo, manioko, batato, kotono, legomoj, arakido, vinberoj, ananaso, citrono, mango, papajo kaj tabako.

Rio-de-Ĵanejro estis la plej sopirata sonĝo de nia ĝisnuna vivo. Ni alvenis en la regnon de eterna somero. La tropikoj signifis por ni la Paradizon – la surteran edenon, kie forestas zorgoj, kaj kie oni ĝoje kaj ridetante plenumas memvolan laboron. Ni esperis, ke surbaze de mia prestiĝa rango kaj nia riĉo multaj riverencos al ni. Kompreneble, ankaŭ ni riverencadis; aparte kiam ni kontaktis homojn, kiuj helpus nin ĉiam pli alsupri la rangoŝtuparon.

Milinjo jubilis kiel infano. Vane mi admonis ŝin, ke ne decas kaprioli, disĵeti la sablon de la strando en la venton, kuradi en ĝisgenue kuspita jupo en la forte ondanta akvo de la oceano. Pardonon pro la esprimo, sed ŝi similis dise-mise kurantan hundon.

La marbordo estas sabloriĉa, la maro turkisa kaj super la foraj montoj pendas pluvogravedaj nuboj malhelaj. Bonŝance ni vizitis unuafoje tian bordosekcion, kie scivolaj okuloj ne fiksis nin. Mi konsolis min: nia vestmaniero, konduto malkaŝas, ke ni estas fremduloj. Prave, la brazilanoj estas gaja, ridetanta popolo, apre-

zas la bonhumoron. La bordo havas nekutiman formon: ĉirkaŭ duonmejlon longa, plata, la duoncirklon de la akvolavata sablo limas ambaŭflanke flaveca, striita rifaro; dunoj, padoj videblas ĉie. Haste mi alsupris la plej proksiman dunon, mi ne malŝparis la tempon per demeti la ŝuojn kaj ŝtrumpetojn. Mi anhelis pro la fortostreĉo, dum mi kuris supren, sed tio rekte bonfaris al mi; mi sentis renoviĝi miajn fortojn. Kaj desupre mi kuris jam sur la alia flanko...

Post kiam ni satiĝis de la amuziĝo, ni grimpis sur la vojon, kie la taksio atendis. Nia nigra ŝoforo tenis alten la montrofingron de sia dekstra mano – tiel li esprimis sian plaĉon. Poste li aldonis: -- *Tudo bem!* Ĉio estas en ordo. Poste ni ekveturis.

Grandaj blankaj hoteloj sunumis siajn frontojn, iliaj kornicoj, terasaj ombreloj ĵetis bluecajn ombrojn sub ĉ. kvardek-kvingrada angulo. Sub la palmoj malgrandaj societoj sidadis sur blankaj seĝoj ĉe kvarangulaj vitrotabloj. Pli fore mi vidis elegantan damon, kies blanka pudelo implikis la gvidrimenon ĉirkaŭ la piedoj. La situacio estis komika, sed ĝi turnis-returnis sin kaj liberigis sin el la impliko.

– Ankaŭ ekzilitaj reĝoj venas ĉiuj ĉi tien, ĉu? – mi demandis Milinjon en la aŭtomobilo, dum ŝi vane klopodis bridi ambaŭmane siajn flirtantajn harojn.

Anstataŭ respondi, ŝi kisis min sur la buŝo.

– Ankaŭ la ekzilitaj reĝinoj venas ĉi tien! – ŝi kriis al mi en la orelon. Ŝi fermis la okulojn... Mi ŝatis rigardi ŝin: ŝian ekzaltiĝon, sindediĉon, la ludeman flirtadon de ŝiaj haroj.

Nia ŝoforo ridante rerigardadis al ni kaj nur ripetadis: – *Tudo bem!*

La du pordistoj, venantaj renkonte al ni el la Hotelo Benidorm Palace, salutis nin kun profunda riverenco. Aperis ankaŭ tri ĉam-

broservistoj; ili prenis el la taksio niajn valizojn, kaj kun la gvido de la pordistoj ni eniris la pompe luksan konstruaĵon. Unu el ili, en elokventa franca lingvo, petis pardonon, ke la unuan fojon ni devas fari la vojon ĝis nia ĉambro perpiede, ĉar nur tiel estos feliĉa nia restado ĉi tie.

Ni alsupris etaĝon post etaĝo sur la senfinaj friskaj, verde grizecaj marmorŝtupoj al supro, memoriganta nuptan torton. Ni haltis antaŭ la ĉambro n-ro 2445. Post kiam la ĉambristoj enportis la pakaĵojn, teatrece ili klinis sin. Al ĉiu mi donis abundan poŝmonon.

Ĉu songôbildo naskis ĉion en ĉi tiu reĝa domicilo? Kvazaŭ oni konus nian fajnan guston! Kvazaŭ oni scius, kion ni deziras post la longa ŝipvojaĝo! Baldakena lito, vinruĝaj kurtenoj, drapiraĵoj, stukaj ornamaĵoj, imitaĵoj de antikvaj marmorstatuoj, du fontanetoj. Sur la muroj de la tri ĉambroj kaj la vasta salono pendis grandformataj pentraĵoj. Bukedoj, aĵpentraĵoj, tropikaj ĝardenoj, ekzotaj birdoj rigardis al la du jubilantaj eŭropanoj.

Monon ni havis abunde. Parton de la juveloj mi vendis. Post kiam pasis deko da tagoj, ni aĉetis domon en eleganta vilakvartalo sur la supro de monteto. Prefere mi nomus ĝin kastelo. El la bulvardo alsupris vojeto, borderita ambaŭflanke de magnolioj. La vidinde ornamita ferpordego kroĉiĝis al dikaj kolonoj, sur kies suproj staris du elefantoj kun suprentenataj rostroj; iliaj dentegoj brilis en la lumo ĉe sunsubiro. Flegata antaŭĝardeno situis antaŭ la barilo: hibiskoj, figujoj, daktilpalmoj, ceteraj arbustoj kaj bananujoj. La samo ripetiĝis ankaŭ ene de la bieno, plena de aromaj floroj; eĉ la nomojn de multaj mi ne sukcesis noti al mi en la memoro, kaj nun estus superflue streĉi pri ili la kapon. La areo de la kastelo sur nia parcelo de tri mil aroj okupis almenaŭ kvarcent kvadratajn metrojn!

Nian francan parkon, formitan laŭ geometriaj formoj, variigis sablokovritaj promenpadoj, arkadoj, ripozplacetoj kun benkoj. En lagetoj de kelk-kvadrataj metroj en tri proporcie dislokitaj rokĝardenoj naĝadis ornamfiŝoj, kankroj. Ĉirkaŭ ili abunda akva vegetaĵaro, kiu kaŝis ilin for de la scivolaj okuloj kaj ankaŭ de la varmega suno. Kolorriĉaj birdoj flugadis ĉie. La plumaro de la kolibroj *beija-flor* brilis en ĉiuj koloroj de gemoj. Apenaŭ kelk-centimetre longaj, ili suĉas per siaj longaj bekoj nektaron el florkalikoj kaj nutras sin ankaŭ per tre etaj insektoj, troviĝantaj tie. Al tio aludas ilia portugala nomo: „florkisanto". Abunde troviĝis ankaŭ bluaj-flavaj-ruĝaj araoj.

La vidaĵo rememorigis la edenan ĝardenon. La Sukerpano, *Pao de Açúcar*, simbolo de la urbo estas ĉ. kvarcent metrojn alta granita masivo, kiu donas nekonfuzeblan karakteron al la golfo Guanabara, kaj aperas el sud-orienta direkto antaŭ la okuloj. La beleco de la panoramo pulsigis pli vigle niajn korojn aparte ĉe sunsubiro.

La kolonia konstrustilo devenas el la 17-jarcenta Eŭropo; estas barokeca, karakterizata de strebo al vidindeco kun unuavice kurbaj linioj, cirkloj. Kiel poste mi eksciis, ĝi alvenis kun itala, franca, portugala perado. Sed ĉi tie oni troigis la ornamajn elementojn, aplikon de frontaj kolonoj, fenestrokornicoj kaj balkonoj. Antaŭ la pordoj kaj fenestroj oni faris ekzemple pompajn kradojn el ligno aŭ forĝita fero.

Sur la blankŝtona frontono de nia palaco legeblis la jarociferoj 1851. Ĝi konsistigis la portalon de la vilao, la mezan parton de la konstruaĵo. La unuetaĝa konstruaĵo kun ornamita supro rigardis per siaj okdek fenestroj al la parko. Niaj du blankaj Rolls-Royce staris sub rozlaŭbo. Por ne konfuzi ilin, mi gluis sur la internon de iu pordo de la aŭtomobilo de Milinjo nigran slipeton. La gara-

ĝe uzeblaj du vastegaj lokaloj transflanke de la vilao staris plej ofte malplenaj.

Ĉiu sinjoro surhavis panaman ĉapelon palmofibran, kiu estis tre praktika vestopeco. Ĝi tralasis la aeron, ŝirmis kontraŭ sunlumo, la varmego ne stagnis sub ĝi. Plej ofte mi portis tolpantalonon aŭ blankan kostumon, kiuj refraktas la sunlumon. Ankaŭ la damoj surhavis kutime blankajn vestojn, kiuj radiis purecon kaj elegantecon.

Ĉiu vizitanto laŭdis la du aŭtomobilojn. Ili miris pri ties imponaj parametroj, sed eĉ pli imponis al ili, kiam mi rakontis al ili germane, angle, france aŭ en hispana-portugala miksolingvo pri la historio de ilia fabrikado.

– Sinjorinoj kaj sinjoroj! Du diagonale diferencaj personecoj kreis veran majstroverkon. Charles Stewart Rolls devenas el nobela familio, en la universitato li okupiĝis pri inĝenieraj studoj, volonte pasigis sian tempon per aŭtomobilaj konkursoj, sed li „gustumis” ankaŭ la komercadon. La dek jarojn pli maljuna Henry Royce gajnis sian panon jam de sia naŭjara aĝo per manlaboro, kaj dum sia malmulta libera tempo lernis ĉiam pli. La unuan negocan sukceson li rikoltis per elektromotore movataj leviloj, kiuj en la jaroj 1890aj konsideriĝis revoluciaj novigoj. La sukceso de la entrepreno Royce & Co povus finfine ebligi al li iom da ripozo, sed la labormania Henry serĉis novajn taskojn. Inter la angloj, impresiĝemaj al ĉiaj meĥanikaj konstruktoj, ĉiam pli multaj enamiĝis al la senĉevalaj kaleŝoj. Henry transformis sian maŝinon el francaj pecoj en tute anglan fabrikaĵon. La unua tia aŭtomobilo traruliĝis unuafoje la unuan de aprilo 1904 sur la stratoj de Manĉestro. Per tio, kompreneble, mi ne volus subtaksi la de vi posedatajn Daimler-ojn aŭ T-modelojn de Ford. Ankaŭ ili estas ja elstaraj aŭtomobiloj!

Tra kvar ŝtupoj ni alsupris la vastan antaŭhalon, sur kies blankmarmora planko pompis en grandaj potoj ruĝaj, lilaj kaj rozkoloraj floroj. Sur la maldekstra muro pendis tri-kvadratmetra olepentraĵo, kiu bildigis tupiojn en ĝangalo: viroj en buntaj plumaj kapornamoj lulas sin en siaj jupetoj per praa rita danco. Kontraŭflanke estis similformata pentraĵo, en kiu indiana tribestro donas ordonojn al siaj batalistoj, kaj tiuj, ĉiopretaj, levas siajn lancojn en la aeron.

La banoĉambro estis tegita per blanka karara marmoro. En la bankuvo ni ambaŭ povis komforte lokiĝi. Super la lavabo pendis venecia spegulo, ambaŭflanke estis konzolaj lustroj el vitro de Murano, kiuj fiere portis siajn blindige brilajn vitroperlojn, dissendantajn la lumon de la ampoloj. Estas interese, ke eble ĉi tiun ejon mi kaj Milinjo plej ŝatis, ĉar ĉi tie ni povis korpe kaj spirite refreŝiĝi. Konvala kaj roza odoroj ŝvebis en la ĉambroj de la domo, en la koridoroj jasmenaj bukedoj kaŝiĝis malantaŭ porcelanaj plastikaĵoj.

Vastega salono kunligis la du dormoĉambrojn. Ĉiuflanke videblis tri metrojn altaj speguloj kun oritaj kadroj, rokokaj skulptaĵoj sur nigra fono, orfarbitaj kupidoj. La mebloj kaj muroj estis kovritaj per palflava sateno; en vazoj odoris flavaj rozoj longtigaj. La du rozkoloraj baldakenaj litoj estis la scenejo de niaj noktaj ludoj. Ni uzis ilin alterne, varieco ja delektas.

En la manĝejo oni povis pormeti eĉ por 24 personoj. Sur la manĝotablo, skulptita el mahagono, odoris rozoj en mallarĝaj, sveltaj vazoj. Ĉe ĉiu manĝado ĝi ricevis alian kovrilon. La verdo de la planko kaj muroj estis komponita el plej diversaj nuancoj.

La pli frua posedantino perdis sian grandbienulan edzon en akcidento. En Brazilo vivas trideko da serpentospecioj. Lin atakis ĝuste la plej timiga kaj plej granda: iu surukukuo. Ĝi povas atingi

eĉ tri metrojn. Eksterordinare agresema; ĝi mordas ne nur, kiam ĝi sentas danĝeron. Ĝia mordo estas mortiga, ĉar la homa organismo ne eltenas la efikon de la kontraŭserumo. Li eble estus havinta pli da ŝancoj, se li renkontus unu el la plej grandaj, ne venenaj serpentoj, la *sucuri,* do anakondon. Ankaŭ ĝi longas plurajn metrojn, tamen ne havas venenajn dentojn! Sed per sia enorma muskolforto dum sekundoj ĝi rompas la ostojn de kiel ajn fortika besto.

Krom la ŝoforoj (Emilio, Cristiano) la tuta personaro estis donaco de grafino Tereza Azevado Pereira: du ĝardenistoj (Romero, Eduardo), du kuiristinoj (Sophie, Loretta), du ĉambristinoj (Evita, Imelda), la mastrumistino (Glória Barreira) kaj la ĉambristo (Bruno).

Regis tia varmego, kvazaŭ ni starus en la buŝo de forno. La aero kvazaŭ sparkis. Tage ni malfermis la pordojn kaj fenestrojn, kiujn kovris densa dratreto. Ni provis fari trablovon, sed la aero apenaŭ moviĝis. Kiu kredus, ke laŭ Bruno la nombro de nebulaj tagoj en Rio estas averaĝe 120, kaj tiufoje nokte tre malvarmiĝas. „Ĉi tiu akvo estas apenaŭ pli malvarma ol mia ŝvito" – mi rimarkigis foje al la fratino de Bruno. La nigrulino komencis ridi. Ŝiaj mamoj ondis kiel pudingo, ŝiaj enorme granda buŝo, lanecaj haroj, blanke-nigraj okuloj elvokis komikan impreson en mi, sed mi kaŝis ĝin.

– *Sou húngaro, o senhora!* Mi estas hungaro! – mi diris klarige, sed tio ne tuŝis ŝin.

La matenmanĝoj komenciĝas ĉiufoje per fruktoj: ananasaj, akvomelonaj, papajberaj (aŭ karikoberaj) trancâjoj kaj bananoj; la brazilanoj ĵuras, kompreneble, pri la pinta gusto de *banana prata,* arĝenta banano, sed al mi plej gustis *banana mesa,* pomobanano, ĝi estas malgranda, denskorpa kaj bonodora kiel verda pomo.

(La papajoberoj cetere tre bone efikas al la digestado.) La fruktojn sekvas sandviĉoj el ŝinko kaj fromaĝo, fruktosuko kaj la nemalhavebla kafo. La kremfromaĝoj estas tre bongustaj. La brazilanoj trinkas glaci-malvarman, malpezan bieron, vinon aŭ sukerkanan brandon. Nacia trinkaĵo estas *sachaça,* per aliaj nomoj: fajra akvo, vidviniganto. Terure akra ĝi estas.

*Maracuja,* do pasifloro estas tre bongusta frukto. Du speciojn ĝi havas. El la dolĉa, *maracuja doce* oni elkuleras la grajnojn en gelatena kapsulo. Multe pli bongusta estas la alia, el kiu oni faras fruktosukon. Oni elkuleras la internon de la bero, aldonas akvon kaj sukeron, solide miksas ilin, poste filtras la tuton. Ĝiaj gusto, aromo kaj koloro estas harmoniaj. Mi tre ekŝatis ĝin.

Grafino Tereza volis liberiĝi de siaj malĝojaj rememoroj, tial ŝi transloĝiĝis al alia regiono. Persone ni ne renkontiĝis. Dum du semajnoj favorpreze ni aĉetis de ŝi la kastelon pere de du ŝiaj advokatoj. Niaj du kuiristinoj, Sophie Petit kaj Loretta Stern tenis ĝenerale francan kaj germanan kuirejon, sed ni povis mendi anglajn, eĉ indianajn pladojn. Unu el miaj ŝataĵoj estis la indiana kokidosupo.

En la brazila gastronomio dominas cetere rizo kaj fazeoloj, kiujn oni surtabligas kiel garnaĵojn por frititaj bovaĵo, kokidaĵo kaj fiŝoj. Al iliaj specialaĵoj apartenas mara fiŝo *moqueca* kun kokosa lakto, fazeola fritaĵo *feijoada* kaj la legomo *cauru* kun cepo kaj pipro. Anstataŭ supo oni manĝas antaŭplade kutime salatojn, aspergitajn per olivoleo, vinvinagro. El fruktoj oni preparas freŝe elpremitajn, sukeritajn sukojn, *suco natural.* Kompare kun la ne bonkvalitaj brazilaj vinoj la malpeza, hela biero estas tre bongusta.

Ĉirkaŭ nia vilao trafikis luksaj aŭtomobiloj de influhavaj personoj (ministroj, ŝtatsekretarioj, deputitoj, bankieroj, posedantoj de

kafoplantejoj, kakao- kaj ĉokolado-fabrikistoj). Fernando Pease, membro de la malsupera ĉambro ekzemple okupis ses mil laboristojn en siaj plantejoj kaj diversaj fabrikoj. Ĉiuj dependis de ili; al ili apartenis la ŝosea reto, elektrejoj, trafiko, trinkakvo kaj gaskompanio, krome latifundioj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo.

Apud ni loĝis Wáner Marliere Arrunda, oficejestro de la municipo Rio-de-Ĵanejro kaj Sergio Cesar Ramo, kiu gvidis la sekretariejon de la ministerio de internaj kaj militaj aferoj.

Ofte mi babilis kun Ciro Marinho Filipo, membro de la senato, prezidanto de la financa komisiono. Li aprezis mian klerecon kaj riĉecon. Li opiniis Milinjon la plej bela floro de nia ĝardeno. Liaj infanoj ofte ludadis, kuradis en nia ĝardeno.

Rafael Matis-Feselef, membro de la malsupera ĉambro de la senato elveturigis nin al siaj kafo- kaj bananplantejoj. Ni plezuriĝis per la pejzaĝo, laŭdis la rikolton, la diligenton de la mastro kaj laboristoj. Ĝis niaj okuloj atingis, videblis unuflanke kafoarbustoj, aliflanke bananplantejoj. Bananujo produktas nur unufoje, poste oni devas fortranĉi kaj replanti ĝin – rakontis Rafael. El bananoj oni produktas sukeron, marmeladon, brandon; oni manĝas bananojn bakitaj, kiel garnaĵon kaj ankaŭ krudaj.

Fábio Roberto Silva, ŝtatsekretario de la Ministerio de Industrio, la dua plej granda industria magnato de Brazilo (posedanto de tabak- kaj ĉokoladfabrikoj, kafomuelejoj kaj -rostejoj) estis ŝercemulo de niaj elitaj societaj kunvenoj. Liaj kamaradoj ŝatis lin, ĉar li multe bonfaradis: li donacadis monon, kafon, ĉokoladon, fruktojn al orfejoj, malriĉulaj aziloj, hospitaloj, monaĥejoj, eĉ al la centra prizono.

En Rio montoj, trastrekitaj per tuneloj, dividas la multajn golfojn. Iliajn flankojn, suprojn kovras kabanoj, *favela* konstruitaj el lado, tabuloj, kartonoj, de la malriĉuloj. Iliaj loĝantoj estas vere

malriĉaj, kiuj, esperante laboron, almigris de alikoke. Ĉi tiuj kabanoj estas larĝaj, trivitaj-ĉifitaj budoj. Higieno malestas, en la tropika varmego ĉio fetoras en la mizerulaj kvartaloj.

Sed mi kun Milinjo nur malmute perceptis tion. Ni faris vizitojn de ĝentileco al la ŝtatsekretarioj de la registara oficejo kaj gvidantoj de la municipaj instancoj. Ni ricevis invitojn al la palacoj de riĉaj kafoplantejistoj, bankieroj. Ofte ni vizitis la sukeraĵejon Confeitaria Colombo. Ni trapromenis la mallarĝan Rua do Ouvidoro kaj venis ĉe la sekva stratangulo al la mallarĝa Rua Conçalves Dias. Ĉi tie troviĝas de 1894 la *confeitaria*. La grandegaj speguloj sur la muroj estis importitaj el Belgio. Plej ofte ni trinkis bieron Bohemia, kiu estis propra produkto de la firmao, al kiu konvenas fromaĝo *minas.*

Kiuj loĝas en Rio, nomiĝas *carioca.* Ili ne povas preni la vivon serioze – diras pri ili la paŭlanoj. Do la loĝantoj de San-Paŭlo. Plaĉis al ni la palaco Paço Imperial, kiu estis konstruita en 1743 kiel rezidejo de la regentoj, ĝis la portugala reĝa familio, fuĝante antaŭ Napoleono, transmetis ĉi tien sian sidejon. Foje ĉi tie oni aranĝis memorindan akcepton kaj balon por la registaranoj kaj ties invititoj.

Iom ceremonie tamen kun elegantaj movoj Milinjo aperis el la blanka aŭtomobilo. Ŝiaj longaj blondaj haroj estis volvitaj en tubero, do perfekte vidiĝis ŝia belforma kolo kaj plaĉaj arkoj de la nekovritaj ŝultroj. Ŝia haŭto estis velura, persikkolora, la okuloj bluaj, sinteno reĝina. Gracie ŝi moviĝis en la buterkoloraj ŝuetoj kun duonaltaj kalkanumoj. Ŝi ridetis, la okuloj brilis. La alloga odoro de ŝia ŝatata parfumo percepteblis jam de pli fore. Ŝiajn diamantajn orelpendaĵojn ornamis po unu ok-karata brilianto; al ili perfekte konvenis la du grandegaj briliantaj ringoj kaj la har-

monia perlaro.

La gastoj alsupris la duonetaĝon sur la dekstra ŝtuparo. Ili pasis plu tra larĝa duonarka galerio, poste haltis ĉe desupra ŝtuparo. Po paroj ili transdonis siajn vizitkartojn. Kvin ŝtupoj kondukis ĝis la ŝtupara placeto, tie aliĝis lakeo al ĉiu paro. Li paŝis antaŭ ili. Antaŭ ol ili atingis la lastan ŝtupon de la larĝa ŝtuparo, li riverencis, legis de la vizitkarto portugale ĉiujn nomojn kaj titolojn de la alvenintaj altrangaj gastoj. Refoje li klinis sin.

Post tia ceremonio mi paŝis kun Milinjo en la kolonhalon, kie longe-larĝe, sur blanke kovritaj longaj tabloj proponis sin amaso da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Kisinte la manon al Milinjo kaj manpreminte kun mi, Sergio Cesar Ramos, gvidanto de la sekretariejo de la ministerio de internaj kaj militaj aferoj aliĝis al nia kompanio. Solide li miksis la francan kun la germana kaj portugala. Sergio volis ĉiam pli multe ol aliaj – ajnapreze. Ankaŭ Milinjo ludis sian rolon.

Mi ripetis la plendojn, aŭditajn de Fábio Roberto Silva, la plej granda industria magnato de la ŝtato Rio-de-Ĵanejro, posedanto de pluraj kafomuelejoj kaj -rostejoj:

– Mi bedaŭras, ke la ĉi-jara kaforikolto ne estas tiel riĉa kiel la antaŭjara, ĉar la abunde pluva vetero, relative malmulta sunado ne favoris la floriĝon.

– Ne gravas! – li diris portugale kaj jam plu komplimentis al Milinjo.

– Kia diino descendis sur la teron en formo de fea aperaĵo? Tualeton similan al la via mi ne vidis eĉ sur la toloj de la plej famaj pentristoj. Kial ne troviĝas nun ĉi tie almenaŭ unu pentristo? Aŭ fotografisto! Oni devus eternigi nin tri! (Kiel grandanima li estas, ke li pensis ankaŭ pri mi.)

– Mi petas fotografiston! – li postulis preskaŭ plengorĝe.

Kun grandega maŝino sur la ŝultro aperis la fotografisto. Post kiam li pozigis nin, post laŭta knalo kaj blindiga eklumo ni eterniĝis sur la fotoplato por la postepoko kaj historio.

– *Obrigado, por favor!*[20] – mi ĵetis leĝere al la fotografisto.

Kristalglasoj glimis en la lumo de la lustroj; sur blankaj teleroj malhelbluaj buŝtukoj, en blankaj vazoj ruĝaj rozoj... La tablo kun multekostaj porcelanaĵoj prezentis belegan vidaĵon, sur ĝi amasiĝis apetitigaj malvarmaj antaŭpladoj, helikoj, ostroj, delikate fumaĵitaj salmoj, majonezaj terpomoj kun ceporingoj, franca salato kun pizoj kaj pompecoj, farĉitaj ovaĵoj kun majonezo... Regaligis sin krome delikate peklitaj fungetoj, rostitaj junkokinaj brustoj kun krema, majoneza saŭco kaj pizoj...

Post mallongaj alparoloj intertintiĝis la kristalglasoj, kaj la vespermanĝo komenciĝis.

Al ĉiuj reteniĝis la spiro, kiam la kelneroj ĉirkaŭportis, sur grandaj pletoj, la bongustajn gastronomiajn delikataĵojn. Sur la pletoj estis farĉita bovidobrusto kun terpoma pureo. La viandaj rulaĵoj estis ornamitaj per petroselaj folioj, sudlandaj fruktoj. Iom poste alvenis ankaŭ la kapo de la bovido sur granda, ronda arĝenta pleto – por ĉiu tablo po unu bovidokapo! Ĉi tiun scenon akceptis entuziasma aplaŭdo kaj jubilado.

La vespermanĝo konsistis el tiel multaj pladoj, ke ni ĉesis nombri ilin. Supoj, pasteĉoj, kapreola riprostaĵo, bovrostaĵo kun stufita brasiko, rostitaj birdaĵoj, salatoj, saŭcoj, diversaj garnaĵoj... La varieco de la trinkaĵoj rekte proporciis kun tiu de la fajnaj manĝaĵoj.

La surtabligo okazis rapidritme, preskaŭ samtempe. Dume la trinkaĵprovizantoj ĉirkaŭiradis la tablojn, prezentante por elekto diversajn vinojn al la gastoj. Rizosufleo kun vina ovokremaĵo es-

20 Mi tre dankas! (portugale)

tis la krono de la vespermanĝo. Post la konsumo de la fajna deserto la humoro atingis sian zeniton.

– Mi sentas min, kvazaŭ veninta sur la plej grandan scenejon de la mondo! – rimarkis entuziasme Milinjo.

– Hm, tre bone... Tamen ne komencu kanti!

– Ho ne! Sed rigardu, kiel bone mi sukcesis komponi mian tualeton, ĝi similas al la lokaj, tamen individua. Valoris la penon pasigi tridekon da horoj ĉe la kudristinoj.

La blankpudrita, velura haŭto de Milinjo kaj ŝia elradiado al la tuta salonego senĉese altiris la atenton de la grandnombre kunvenintaj eminentuloj.

La haŭtkoloro, vizaĝoformo, sinteno de ĉirkaŭ kvardek-jara sinjoro tute diferencis de tiuj de la brazilanoj. Post kiam mi diris mian nomon, li respondis per *muito prazer,* mi tre ĝojas. Mi interesiĝis, kiun mi povas honori en lia persono. Li respondis, ke mia akĉento estas tre hungareca. Kaj mi replikis hungare: „Pardonu min, kara amiko, ankaŭ la via!" Ni preskaŭ falis reciproke ĉirkaŭ la kolon.

– Saluton, amiko! Mi estas la pli aĝa! Mia honesta nomo estas Aristido Degenfeld de Telekess.

– Saluton, estimata! Kaj mi estas grafo Tasilo Festetich de Beöháza, alinome Melĥioro Horváth, sed nomu min simple Meĉjo. Nu, kaj kia vento vin alblovis? – ni, hungaroj kutimas demandi.

– Ĉio alblovis krom vento – li ŝercis, poste, por precizigi, li aldonis:

– Mi ne pravas, mian praavon ja vento alblovis. Elblovis lin elhejme la vento de Haynau[21]...

Aristido de Telekess rakontis, ke lia praulo, grafo Tihamér de

21 Ĉefa plenuminto de la reprezalioj post la liberecbatalo de 1848-49 en Hungario.

Telekess batalis kiel kolonelo en la armeo de nia gvidanto Kossuth. Li devis emigri, kaj post Vaŝingtono li setlis en Rio en 1852; tiam li estis 32-jara. Li edzinigis mestizinon, la Eternulo benis lin per pluraj infanoj, sed nur du restis vivaj. Feliĉe lia patro travivis la pestajn epidemiojn.

Aristido ekvidis la taglumon en 1880, kaj nun li estas kvardekjara (t.e. dek jarojn pli aĝa ol mi). Li havas du infanojn, momente li estas konsilisto pri eksteraj aferoj de la registaro. Perfekte li parolas la portugalan, francan, germanan, anglan kaj hispanan. Li multege legis, vojaĝis, funde ekkonis la eŭropajn politikajn cirkonstancojn, la pensmanieron de la popoloj. Li komprenas, tradukas la latinan. Sian bibliotekon li ricevis donace post la morto de iu oficiro, ĉar neniu volis okupiĝi pri la libroj kun antikva enhavo kaj nekonata lingvo. Li ellernis la grandajn saĝaĵojn de la vivo, kiuj pluvivas de jarmiloj kaj konsekvence efektiviĝas; perfekte li citadas portugale sentencojn de poetoj. Li pasas sur la spuroj de siaj patro kaj avo, vivas same per konsilado; ankaŭ ili ne timis preni decidojn.

Kompreneble, ankaŭ kontraŭopiniojn oni devas vortigi en brazila maniero: ĉirkaŭskribe, kun nuancoj, ruzete, por ke ili ne estu ofendaj. De Aristido mi lernis, ke brazilanoj kutime ne diras unusencan ne.

– Dum horoj mi povus rakonti la vivepizodojn, aventurojn de mia praavo, ĉar tra generacioj ili konserviĝis en nia familio. Mian grafan avoĉjon oni bone akceptis en Rio, li ĝuis altan reputacion, ĉar li batalis por la libereco de sia patrujo. Iom vi bezonas koni la historion de Brazilo, por ekscii, kion signifas por ili batali kontraŭ fremdaj subpremantoj.

– Bedaŭrinde mi ne konas ĝin sufiĉe – mi sincere konfesis.

Kvazaŭ Aristido atendus ĝuste tian respondon.

– Mian duan patrujon malkovris en 1500 la floto de kapitano Cabral. Ili ekirigis plurajn ekspediciojn, sed ne renkontis kontraŭstarajn indianojn. Ili estigis setlejojn. Ne havis malfacilan farendon. Ilia natura vivmedio estis la praarbaro, la *mato.* Poste, se iu tribo kontraŭstaris, ĝi trudiĝis fuĝi aŭ estis forpelita. La alvenintaj needzigitaj, aventuremaj setlantoj baldaŭ komencis miksiĝi kun la lokanoj. Infanoj, naskitaj el portugala-indiana geedzeco estas mestizoj. La portugaloj plurfoje rebatis francajn entrudiĝintojn, kiujn altiris la brazilarbo. Ilin atakadis piratoj, la angla floto, poste inter 1580 kaj 1640 ili trafis sub hispanan regadon. Pli malfrue nederlandanoj okupis plurajn havenojn, poste ĉiam pli vastajn teritoriojn, sed refoje Portugalio gajnis. En 1808 okazis neatendita turno, ĉar Johano la 6a devis fuĝi, en akompano de grandnombra nobelaro, antaŭ Napoleono kaj li trovis hejmon en la brazila kolonio.

Rememorante post tiel longa tempo, mi ne scipovas precize reciti ĉiun lian frazon. En lia stilo sentiĝis io malnovmoda; kuriozaj vortoturnoj buntigis lian paroladon.

Dume li levadis la kapon. Ekatentis Milinjon, babilantan ses-ok metrojn for en pli malgranda societo.

– Pardonu min, ĉu ĉi tiu bela *nobelina moŝto* estas vere via edzino? – li demandis neatendite. Per la okuloj li indikis ŝin.

– Jes! – mi diris fiere.

Li returnis la kapon kaj daŭrigis:

– Brazilo apartigis sin en 1822 de Portugalio. Ĝia imperiestro fariĝis filo de la portugala reĝo, Pedro la 1a, poste ties filo Pedro la 2a. En 1888 oni promulgis leĝon pri la abolo de la sklaveco. En 1889 oni proklamis la respublikon.

Sekvis ĝin plursemajna brazileca festoserio. Eĉ unu nigrulo ne reveturis en Afrikon.

Aristido sorbis guton el sia drinkaĵo.

– Vi povis aŭdi, kia sanktaĵo estas libereco kaj sendependeco ĉi tie. Kiu venis el fremda lando kaj batalis por ĉi tiuj idealoj, tiu estas vaste respektata. Tamen ne pensu, kara amiko Meĉjo, ke mia grava avo alvenis sola. Multaj rifuĝis tiutempe. Inter ili Károly Kornis, kiu funkciis en 1849 kiel ministro pri publika instruado de la revolucia registaro. Li fariĝis membro de la Akademio de San-Paŭlo, post kiam li verkis gravan traktaton pri la civila geedziĝo.

Mi laŭdis la universitat-nivelan, profesoran erudicion kaj koncizan rakontmanieron de Aristido. Sed li eĉ iom ne atentis min.

– La unuaj jezuitoj ĉi tie estis hungaroj. Ferenc Heller, Ignác Szentmártony, János Szluha, Dávid Fáy kaj József Kailing alveturis, por plenumi mapadajn laborojn. Probable en la 19a jarcento venis en Brazilon tiu hungaro, kies veran nomon neniu konas, ĉar li alprenis la nomon Hungria. Ĉi tiu nomo ĝis nun konserviĝis, inter la tute braziliĝintaj posteuloj estis la plej fama Nelson Hungria, iama sanministro, sed inter la familianoj troviĝas ankaŭ pluraj kuracistoj.

Neatendite li rimarkigis:

– Kio koncernas vian portugalan parolmanieron...

Mi interrompis lin.

– Mi ne atendas laŭdojn.

– Do ni interkonsentas: vi ankoraŭ havas iom por postlerni. Sciu, ke la portugala ĉi tie sonas multe pli softe, simple ol en Portugalio. En ĝia vorttrezoro senteblas amerikaj, afrikaj kaj indianaj efikoj. La lingvo de la brazilanoj estas tiel same fleksebla kiel la lianoj, grimpantaj sur la arboj de la praarbaroj. Oni ne multe atentas la regulojn kaj gramatikon de la lingvo. La ciumado estas ĝenerala, multaj afablaj bombastaĵoj kaj sennombraj novvortoj kre-

iĝas. Kompare kun la hispana ĝi estas pli melodia, sed enhavas amason da diversaj dusonoj, do diftongoj, kaj pro tio por fremdulo ili malfacile lerneblas. Sed ne gravas! Ankaŭ per via hispana vi bone progresos...

Poste Aristido petis min, ke ankaŭ mi rakontu pri mi. Skize mi rakontis pri mia ĝisnuna vivo: pri la Festetich-kastelo, miaj gepatroj, la rumaniaj naftominejoj. Pri mia senheredigo pro tio, ke mi edzinigis Milinjon, kiu ja estas same de nobela deveno, sed preparis sin por kantistino... Nia celo estis veni plejeble for de la Aŭstra-Hungara Monarĥio. Dume ni legis en la ĵurnaloj, ke ĝi disfalis en pecojn. Kaj ke por kelka tempo la komunistoj akiris la regopovon; ni emigris en Vienon, poste tra Italio al Brazilo.

– Kaj nun kion vi intencas fari?

– Milinjo estas aktorino. Rave ŝi kantas, sed ŝin interesas prefere la inventaĵo de la francaj fratoj Lumiére, la movobildoj, la kinematografio. Kompreneble, ankaŭ min. Eble ni faros filmojn, kaj ŝi rolos en ili.

– Se tiel, vi bezonas iom koni la brazilan filmarton. La unuaj projekciiloj alvenis ĉe ni en 1896. Unu jaron poste la portugala Aurelio da Paz dos Reis kaj la itala Vittorio Maio prezentis jam siajn filmojn. En 1906 la filmo „La sufokantoj", aŭtorita de la reĝisoro Francisco Marzulo rikoltis bruan sukceson; ĝi temis pri siatempaj murdoj. La filmo estas 700 metrojn longa! En 1907 Antonio Serrador turnis kelkajn mallongajn sonfilmojn. La aktoroj kantis kaj parolis, kaŝitaj post la projekcia tolo. Inter tiaj kantofilmoj „Paco kaj amo" estis la plej sukcesa, ĉar ĝi temis pri aktualaj eventoj, ironiado pri gvidaj personecoj. Komence de la dekaj jaroj oni turnis jam almenaŭ cent filmojn jare. Poste multe pli.

– La brazilanoj estas tre afablaj, babilemaj – mi rimarkigis.

– Kia la lingvo, tiaj la homoj. Ili volonte tuŝas unu la aliajn, ilia

vivoĝojo estas senlima, multe ili gestadas, ŝercadas, faras mienojn. Ili tre ŝatas bonan societon, facile amikiĝas kun nekonatoj. Eĉ la plej malriĉaj ne forgesas rideti, kaj preskaŭ ĉiuj multe dancas, kantas kaj zumkantas. La eŭropa homo ĉiam zorgas pro la vintro, do planas, flankenmetas. Por brazilano tio estas ŝarĝo, ĉar forturnas lian atenton de la vivo. Kaj vera vivo ekzistas nur hodiaŭ, do ĉiutage. Ni diras *Tudo bem!*, ĉio en ordo! Se nian dekstran fingron ni tenas supren, tio signifas ion plej bonan. Tiuokaze oni povas frapeti la ŝultron de sia kunbabilanto, delikate brakumi lin, afable bateti lian brakon. *Tudo bem!*

## 4. La sentalenta aktorino

Ni produktis kvin filmojn kun enormaj kostoj. La biletenspezoj de la kinematografiejoj reportis nur onojn de la elspezoj. Ĉar la elekteblo inter la 10- ĝis 20-minutaj filmoj estis grandega, niaj filmoj ne grimpis sur la pinton de la furorlisto.

– La vaste konata verkisto de la romantikismo, Bernardo Guimãraes vivis en 1825 ĝis 1884. Lia romano, verkita post la liberigo de la sklavoj titoliĝas „La sklavino Isaura", *A Escrava Isaura*. El ĝi vi devus fari parolfilmon – konsilis reĝisoro Mano Pinheiro.

Mi estis de alia opinio.

– Laŭ mi ĝi tute ne estas bezonata. Oni ne konfuzu kinematografion kun teatro! Se oni kopuligas azenon kun ĉevalino, la rezulto fariĝas mulo. Bonvolu pardoni min pro la komparo: mestizo estas miksaĵo de la rasoj blanka kaj indiana; mi konsideras ambaŭ egalaj, tamen ilia haŭtkoloro diferencas. Ŝanĝi ĝin postevente ne eblas. Neniam iu ajn konfuzas ilin – mi respondis.

– En teatro oni praktikas unuavice la arton de parolado. Kinematografio baziĝas sur intermitigo de proksimaj kaj malproksimaj planoj, prezento de esprimplenaj vizaĝoj, sentoj. Tio ja veras. Ĉi tie videblas diferencoj. Sed en la vivo ni movas nin kaj rolas, babilas aŭ kantas – la filmo devas plenvalide speguli la realon – obĵetis Mano Pinheiro.

– Eble ni devus imiti la usonanojn. Ili jam eksperimentas per parolfilmoj. Sed tio estas sensencaĵo, ĉar ili konfuzas la teatron kun la filmo, kiu povas esti nur muta. Ĝi ne povas ekparoli, ĉar tiam ĝi fariĝas teatro, ŝmirita sur muro! La muro, la tolo ne povas paroli, nur tiom kaj tiel, kiel nun ĝi faras. Piana akompano, etoskrea gitarmuziko, kanto el la fono. Filmon oni devas rigardi, teat-

ran prezentadon kaj rigardi, kaj aŭdi.

Pinheiro devis cedi, ĉar li sciis, ke la mono estas en mia poŝo.

Mi kun Milinjo komencis elpensi scenarojn, poste laŭ la propono de Pinheiro ni verkigis du. Ni kondiĉis, ke nin interesas tia, en kiu Milinjo estas jen mirinde feliĉa, jen trompita. La filmistoj atentigis min, ke ĉi tie malĝojajn historiojn oni ne ŝatas. Ni devus sekvi la amerikan filmkulturon. En tiaj movobildoj oftas interbatiĝoj, humuraĵoj, amscenoj. Relative malmultas tekstokadroj, ĉar ankaŭ sen ili ĉio kompreneblas. Tio tre gravas, ĉar en Brazilo estas multaj analfabetoj. Prave, la tekstojn oni laŭtlegas, tamen la bildeca esprimo pli ĝueblas ol ties priskribo.

Mi konvinkadis Milinjon, ke ŝi obeu iliajn konsilojn. Ŝi ne cedis, nun kaj ĉi tie ŝi volis montri siajn talenton kaj belecon. La agado ŝin efektive ne interesis. En ĉiu sceno ŝi volis roli! Estis turnitaj pri ŝi unuavice kadroj en la unua plano, do proksimaj bildoj, por ke ŝiaj mimiko, vibradoj, beleco elstariĝu. La neplaĉajn partojn de la scenaro ŝi igis ŝanĝi (aŭ forlasi), tial la kadroj sekvis sin kelkfoje sen logiko.

Tiom obstina mi ankoraŭ neniam vidis ŝin kaj konkludis, ke pro siaj egoismo, malobjektiveco ŝi eĉ la Plejaltulon ne obeus.

La nova nomo de Milinjo fariĝis Clarissa Melchior.

En la filmo „Sur la bordo de feliĉo” la almozulino Fatima ploretas ĉe stratangulo. Iu riĉulo kompatas ŝin. Kondukas ŝin hejmen, kie ŝi povas purlavi sin. Lia edzino estas forvojaĝinta por pli longa tempo, tial ŝi povas surmeti ties vestojn. Ŝi rebeliĝas.... José Costa enamiĝas al ŝi. Ili forvojaĝas al Vaŝingtono, por komenci novan vivon. La bienulo havas komplikajn negocajn aferojn, fraŭdojn. Dumvoje la ŝipo trafas en ŝtormon kaj sinkas. Ili du kuŝas dum kelkaj tagoj sur granda tabulo, senfortaj, sen akvo kaj nutraĵo. Usona ŝipo trovas ilin. Nenio povas malhelpi ilian feliĉon.

En alia historio Clarissa, do Milinjo ludas rave belan princinon, sed ne sentas sin bone kun sia edzo Paulo Davide Santo. S-ino Irasema havas ĉion necesan. Tamen sur ŝia vizaĝo kaj en ŝiaj okuloj sidas malĝojo. La viro, kiun pli frue ŝi amis, estas same riĉa, sed vivas en alia lando. Irasema klopodas konveni al la plaĉo de sia edzo. Ofte ili kune rajdpromenas. Foje la ĉevalo de Paulo panikiĝas, deĵetas sian mastron, kiu tuj mortas. Post la sepulto Irasema postlasas ĉion, forŝipas al Caracas, Venezuelo. Evidentiĝas, ke ŝia pli frua amanto Jesualdo Cardoso jam delonge estas edziĝinta, havas du infanojn. Irasema venas sur la straton, almozpetadas kaj nur ploras, ploras kaj ploradas...

Mano Pinheiro petegis, ke la filmo havu feliĉan elnodiĝon.

– Ŝi ne ploru! Ŝi konatiĝu kun iu kaj ligu al li sian vivon! Kara Melĥioro! Belega Clarissa! Feliĉan elnodiĝon! Jesualdo Cardoso ne havu familion, edzinigu ŝin! Pro Dio mi petas vin!...

Milinjo-Clarissa restis nefleksebla kaj donis la klarigon, ke ŝia vizaĝo estas bela kaj alloga, ankaŭ se ĝi estas trista. Ludi tian animstaton estas multe pli malfacila ol „malplenkapan virinon, kapriolantan kiel sinhundeto”. Tiel do: *it ended in smoke* – ankaŭ tio vanuis kiel fumo.

En Brazilo oni projekciis relative malmultajn usonajn filmojn, abundis ja propraj produktaĵoj. Tamen parto de la publiko ŝatis la eksterlandan „sovaĝan” stilon. Milinjo elpensis ankaŭ ion tian. Antaŭ la fotografado de la filmo „En vira vesto” ŝi farbis la vizaĝon per fulgo, kelkfoje surmetis maskon, kuradis kun revolvero en la mano kaj rabadis. Ŝi, t.e. Lucílo Baptista havis du kunulojn, kiuj ne sciis, ke ŝi estas virino. Ili prirabis riĉulojn, la monon kaj ceterajn valoraĵojn sekrete disdonadis al malriĉuloj. Nur tre malmulte ili retenis por persona uzo. Ŝiaj du akompanantoj interdisputis pro io, duelis, sed samtempe ili pafis kaj ambaŭ mort-

falis. Lucílio Baptista restis sola, tamen ŝi plu rabis. Pafo vundis ŝin. Oni deŝiris ŝian maskon. Konsternite oni malkovris, ke li estas ŝi!!! Fino!

Mano Pinheiro ne entreprenis la filmigon. Lin anstataŭis Cesar Dorneles Soares, kiun mi same bone pagis, tial neniam li faris gravajn obĵetojn. Prave, plurfoje li demandis: *Quanto custa?* Kiom ĝi kostas? Eksciinte, li trankviliĝis.

La filmo „Kelo" okazas en Rio. La burĝodevena edzo de Amanda, Bernardo fermis ŝin en kelo, ĉar li ĵaluzas, kredante, ke ŝi kokras lin. Malsupre ŝi dormas, manĝas, trinkas, nur nokte ŝi povas elkeliĝi por promeno. Amanda plurfoje provas mortigi sian edzon, sed ŝi fiaskas ĉiufoje. Foje Bernardo malbonfartas, povas diri al sia kuracisto nur: „Kelo..., kelo...!" Oni kredas, ke li deliras. Oni enterigas lin, lian domon aĉetas riĉa vidvo. Li ekaŭdas la frapegadon de Amanda en la kelo. Li liberigas, konsolas ŝin, enamiĝas al ŝi kaj edzinigas ŝin.

En ĝi estis feliĉa elnodiĝo, tial povas esti, ke je du pli multaj oni vidis ĝin. Sed la falon ankaŭ ĉi-foje ni ne evitis.

Nia vivo fluadis en filmstudioj: konstruistoj, reĝisoroj, teĥnikistoj, aktoroj, verkistoj, muzikistoj, pentristoj svarmadis ĉirkaŭ ni, temis daŭre pri luprezoj, limdatoj, kontraktoj, kostumoj, dekoracioj. La ĉefrolo apartenis ĉiufoje al mi, kiu donis la monon, la monon kaj Dio scias, kiomfoje la monon, kiu daŭre konsumiĝis...

– Ne forgesu, karulinjo, ke ankaŭ hodiaŭ vi devas iri al kostumprovo – mi atentigis ŝin foje, kiam post la frapfermiĝo de la biblioteka pordo ni ekiris en la manĝejon.

– Hodiaŭ mi ne volas iri en la urbon. Ankaŭ hieraŭ posttagmeze estis tiel terura varmego, ke min trafis migreno.

– Mi tre bedaŭras. Antaŭ ekveturo glutu aspirinon! Ĉu vi volas, ke mi akompanu vin? – Dum ŝi pensis pri la respondo, mi

jam imagis ŝin en ŝia helblua silkorobo. Ŝi estis kvazaŭ elpaŝinta el pentraĵo. Ŝi ravis min per siaj grandaj bluaj okuloj, delikataj, proprecaj trajtoj, blonda hartorento. Min ensorĉis ĉi tiu imagata vidaĵo kaj ne aŭdis, kion ŝi respondis. Ŝi malaperis en sia ĉambro.

Mi plu fantaziis pri ŝi. Mi ne scias, kiom da tempo pasis, ĝis ŝi reaperis. Ŝi aspektis en sia blanka vesto kiel feinreĝino; kvazaŭ ŝi ŝvebis, ŝiaj piedoj estis kaŝitaj en buterkoloraj satenŝuetoj, ŝian frunton kronis perle punktita punta kapornamo. Ŝia nekredeble svelta talio estis kvazaŭ skulptita el alabastro. Ŝiaj okuloj brilis de feliĉo.

– Ni povas iri.

Bedaŭrinde mia mono daŭre malpliiĝis.

Alvenis la tempo, kiam ankaŭ al Milinjo mi devis mencii la aferon.

– Dum ses monatoj almenaŭ la duono de la dolaroj, akiritaj en Vieno kaj mono, juveloj gajnitaj sur la ŝipo vanuis. En la luitaj projekciejoj maldense sidadas spektantoj. Restis al ni eble du mil dolaroj, sed se ni tiel daŭrigos, forfumiĝos aŭtomobilo, vilao, servistoj, elita societo, vesperamuzoj, ankaŭ ĉampano! Ankaŭ vi ne volas tion, karulinjo, ĉu?

Ŝi alpremis sin al mi kaj alfrotis sin kiel kato. Sed ŝi ne ronronis. Torentis ŝiaj larmoj. Senvoĉe ŝi ploris. Tiel ŝi adiaŭis la mondon de niaj revoj. Mi ne konsolis, nur tenere karesis ŝin kiel katon.

Kion signifis por mi Milinjo? – multfoje mi metis al mi la demandon. Mi ŝategis, kiel ŝi kroĉis sian brakon en la mian en elita societo. Ŝi efikis kiel rozodoro en la aero.

Mi ŝategis, kiam per sia floranta korpo ŝi fandiĝis en la mian, levis min super la horizonton de emocioj kaj tie ŝi montris la brilan vojon al la suno. Ankaŭ en duonhelo aŭ malhelo konturiĝis

ŝiaj amorvekaj, blankaj ŝultroj. Same videblis ŝiaj bel- kaj plenformaj mamoj. Ŝian blankan vizaĝon kronis pajlokolora, longa hararo, kiu onde, abunde disfluis sur la kuseno. Mi boris per la kapo en la falantan blondan hartorenton kaj forgesis ĉion.

En la konstruaĵo n-ro 47-51 de Rua dos Latoeiros oni inaŭguris en 1857 la unuan teatron de Rio, la Teatron Alcazara, kiu funkciis komence kiel kabaredo, poste ĝia trupo, venigita el Eŭropo, prezentis francajn operetojn.

La avenuo Rio Branco longas pli ol du kilometrojn, larĝas tridek metrojn, estas borderita de arboj, ĝiajn trotuarojn ornamas desegnoj el blankaj kaj nigraj pavimeroj. Sur unu el la anguloj staras la Municipa Teatro. Ĝi estis konstruita en 1909 laŭ la planoj de Francisco Oliveira Massos. Ĝi estas malgrandigita replikaĵo de la pariza operejo, ĝia spektejo ampleksas 2400 sidilojn. Sur ĝia templovasta scenejo Milinjo movis sin tiel, ke en ĉiuj ŝiaj gestoj montriĝis io disdegna, interrompita aŭ nefinita; ŝiaj movoj evidentiĝis tro teatrecaj.

La teatra direktoro Felipe Emmanuel Ferreira konfidis al Milinjo, per kiu kantonumero ŝi volas debuti al la elita publiko. Ĝi povus esti ario el Karmeno de Bizet aŭ ajno cetera, kio movas la bolsangan, temperamento-plenan publikon, en kiu ŝi memfidele povas montri sin, akompanata de admirantaj viraj kaj virinaj rigardoj.

Ŝi insistis pri la „Magia fluto” de Mozart.

Milinjo, la reĝino de aktorinoj, la aktorino de reĝinoj cedis al nenia persvado. Ŝi ŝajnis kiel fajroglobo aŭ prefere kiel vulkano. Ŝi tratorentis ĉion, kio venis al ŝi sur la vojo. De malproksime ŝi varmigis la koron de la trafito, poste bruligis, paralizis lian korpon. Kiam iu falis ĝis freneziĝo sub ŝian potencon, ŝi humiligis

lin ankaŭ en ties vireco, kotis lian animon. Milinjo estis la fato mem.

Inter ŝiaj pluraj maskoj valoras mencii la flateman, kiu promesis rekonon, estimon – aparte al la viroj. Serio de flirtaj ridetoj, tempumita, alloga gesto, ĉirkaŭturniĝoj, sonoraj ridoj aŭ teneraj rigardoj apartenis tiel same al ŝiaj konkeroj, kiel uniformo al husaroficiro aŭ narkota odoro al floroj.

Mi estimis Milinjon, ĉar ankaŭ ŝi montris estimon al mi. Tamen plurfoje mi vortigis mian neplaĉon, kiam ŝi kondutis amordefie, kiam ŝi uzis sian korpon por koketado. Ŝi ridetis tiel al la brazilaj grandsinjoroj, plantejistoj, ke tiuj preskaŭ perdis la prudenton. Nur la tradicio, bona gusto kaj okulfulmoj de la edzinoj retenis ilin peti rendevuon. Sed metante al provo sian tutan sorĉistinan ravon, ŝi atingis, ke ŝi tamen rendevuis kun kelkaj teo- aŭ kafoplantejistoj, konsilistoj. Al la vero apartenas ankaŭ, ke en kelkaj okazoj mi mem petis ŝin renkontiĝi kun tiaj elituloj, kies decidoj eventuale helpos min realigi miajn planojn.

En tiaj okazoj mi deviĝis fermi la okulojn pri ŝia koketado.

Foje ŝi konsolis min jene:

– Ankaŭ plue mi pretos konduti, kvazaŭ mi estas via edzino...

– ...estus... – mi korektis rapide ŝian lingvan mison.

– Nu jes... estus... – ŝi aprobis. – Sekrete tamen mi devas konkeri ilin, ĉar kelkfoje ankaŭ vi tion deziras, krome tio estas afero tre plaĉa al mi. Vi scias, ke mi estas aktorino, mi nur ludas mian rolon.

La teatran direktoron Felipe Emmanuel Ferreira ne estis malfacile logi en la kaptoreton de Milinjo. Kvankam ni aperis en la akceptoj de la elitanoj de Rio kiel edzo kaj edzino, ŝi renkontiĝadis kun Felipe en sekretaj rendevuoj, esperante ian bonan rolon. Antaŭ ol ŝi cindrigis la tutan estaĵon de la direktoro per sia

korpa, spirita kaj anima fajro, la premiero fariĝis neevitebla.

– Nokte mi havis inkuban sonĝon – plendis antaŭ ĝi Milinjo. – Ĉio ŝajnis kvazaŭ okazanta en la realo. La tutan nokton mi turniĝadis en la lito. Mi kuŝis sur la bordo de la oceano en la varma sablo kaj ekregis min monduma sento. Estis agrable aŭskulti la plaŭdadon de la ondoj. Mi sentis, ke mi estas la reganto de ĉiuj kaj ĉio. Tio daŭris ne longe. Aperis nana homo kaj komencis hurli per besta voĉo. Kiam li vidis, ke mi teruriĝis ĝismorte, li provis trankviligi min per tio, ke li estas ravavoĉa operkantisto. Poste li eligis denove neartikulitajn voĉojn. Vane mi ŝtopis al mi la orelojn, ili penetris tra ili.

– Kompatinda mia!

– Hurlado de azeno devis esti kompare muziko. Poste saltis subite en mian menson, ke tio ne estas vera. Mi malfermis la okulojn kaj sentis, ke mi troviĝas en la realo, kaj ĝi aspektas tute alia.

Mi certigis ŝin pri mia kunsento. Demando lanĉiĝis en mi, ĉu ŝia sonĝo iel rilatas al ŝia proksimiĝanta debuto?

Ne ĉiuj konas la „Magian fluton” de Mozart, en kiu la Reĝino de la Nokto kantas tra kvar ĝis kvin minutoj sian neforgeseblan arion. Por kompreni la fiaskon de Milinjo, ni devas kulpigi ne nur ŝian senfortan voĉon. Ŝi elprenis el la nekonataĵo ion, kion ŝi ne scipovis konvene interpreti.

Por bone komprenigi, kion mi celas, mi devas memorigi, pri kio temas la opero?

Princo Tamino fuĝas antaŭ giganta serpento. Tri honordamoj de la Reĝino de la Nokto mortigas la serpenton, poste haste foriras. Kiam Tamino rekonsciiĝas, li vidas antaŭ si la plumornamitan birdiston Papageno, kiu mensogas sia la heroaĵon. Pro tio la tri honordamoj punas lin, metante pendseruron sur lia buŝo. La filino de la Reĝino de la Nokto, Pamina troviĝas en kaptiteco de

malica sorĉisto. Tamino entreprenas liberigi ŝin. Li ricevas magian fluton, kies voĉo kapablas mildigi eĉ la plej malicajn emociojn. Ili donas al Papageno tintilaron, kiu ŝirmos lin kontraŭ danĝeroj.

Tamino ekscias de maljuna pastro, ke Sarastro estas efektive ne rabisto sed ĉefpastro de la templo de amo kaj saĝo. Kaj en lian templon ne rajtas eniri tiuj, en kies koro estas kolero aŭ venĝemo. Tamino kaj Pamina renkontas sin. Dum eskapo ili estas kaptitaj. Sarastro pretas pardoni. Li kondukas ilin en la halon de elprovoj. Tiam Tamino ekscias, ke Sarastro rabis la reĝidinon, por savi la purecon de ŝia animo kontraŭ ŝia malica patrino, la Reĝino de la Nokto. Danke al la magia fluto kaj ilia persista amo ili transpasas la elprovojn. Sed tiam la Reĝino de la Nokto atakas kun siaj tri honordamoj la regnon de Sarastro. La batalo daŭras ne longe, la atakantoj malaperas dum fulmado kaj tondrado en la eterna nokto. La suno ekbrilas, kaj en la templo de Sarastro kolektiĝas la pastroj. Niaj protagonistoj kune festas la helon, kiu pelis for ĉiujn malicon kaj kulpojn.

Nur dufoje mi kuraĝis fari mencion pri tio, ke laŭ mia opinio ĉi tiu ario postulas kantistinon de alia kvalito. Pro sia kolero Milinjo eĉ pli malkaŝe renkontiĝadis kun la direktoro kaj parolis sinmontreme pri ilia interrilato. Mi sciis, ke nur dufoje ŝi faris provon sur scenejo. En mi mem mi opiniis, ke ŝia maldiketa voĉeto perfekte efikus meze, eĉ ekstere de romantika baldakena lito. Sed en potence vasta spaco ĝia forto, tono, ĉiuj ĝiaj nuancoj kaj sonoroj perdiĝos kiel ŝtono ĵetita en oceanon.

Dum pluraj tagoj antaŭ la premiero oni diskonigis sur grandegaj afiŝtabuloj, ke Milico Sabin, mondfama eŭropa operkantistino prezentas sin post la opero „Brazila fraŭlo" per sia mallonga programero. La biletoj disvendiĝis, sed efektive ne eblis scii, ĉu

pro la brazila opero aŭ pro Milico. La opero „Brazila fraŭlo” tro longe tiriĝis. La interaktaj paŭzoj estis longaj. La tempo ne gravas en Brazilo. La eminenta teatra societo pasigis la tempon agrable en la paŭzoj, ili trinkadis ĉe la bufedo, doniĝis konvena okazo eĉ por konkludi negocojn.

Dum nia kelkmonata restado multaj konatiĝis kun ni. Plie nur tiuj kaj iliaj parencoj restis.

Milico estis, kiel iu, kiu fiŝe malfermadas la buŝon en muta filmo. La orkestro ludis ĉiam pli mallaŭte, ŝia malforteta voĉo kelkfoje plilaŭtiĝis, sed ne akordiĝis laŭdeve kun la muziko.

Fine de la prezentaĵo ne eksplodis aplaŭdo, la publiko senkomprene gapis en la aeron, tial, gvidata de subita ideo, Felipe Emmanuel Ferreira hastis sur la scenejon kaj diris en la portugala ion tian, ke la kantistino, domaĝe, ankoraŭ ne povis adaptiĝi al la loka klimato. Kvankam ŝi estas Eŭrop-fama, sed nun ŝi perdis la voĉon, kaj nur por vin ĝojigi ŝi provis kanti, por ke vi ne trompiĝu kaj vidu ŝin. La prezento signifis por ŝi grandan fortostreĉon, ŝi ja estas febre malsana. Ĉi tiu monologo entuziasmigis la publikon, ĝi stariĝis kaj longe aklamis ŝin. Dum ambaŭ klinante sin dankis por la aplaŭdo, ili paŝo post paŝo eliris dorse de la scenejo.

Ĉi tiu estis la plej granda fiasko en la kariero de Milico, kvankam ĝi vere ankoraŭ eĉ ne komenciĝis.

## 5. Nafto estas kaj malestas

Foje mi eniris elegantan kafejon, por refreŝigi min per malvarma trinkaĵo. Devis estis ĉirkaŭ la naŭa vespere, kaj tiuhore jam komenciĝas la nokta vivo. Dum la posttagmezaj horoj ĉiuj siestas, eĉ en la oficejoj, vendejoj la laboro ĉesas. Kiu povas, retiras sin en ombron, kolektante forton por la plua parto de la tago.

Mi sidiĝis ĉe la tablo de fremdulo, veninta el alia regiono. *Boa noite! Com liçenca?* Bonan vesperon! Ĉu vi permesas?. *Sim.* Jes.

Ni komencis babili. Post kiam en mia kutima maniero rakontis miajn elpensitajn historiojn pri miaj naftoputoj, la lignokomercisto Carlos Salgade parolis pri sia familio. Malfacile li vivtenas siajn sep infanojn kaj edzinon. Li volus ŝanĝi sian vivon.

– Estimata sinjoro! Kredu al mi, ke ĉi tiu regiono povus fariĝi nekutime riĉa, se oni ekspluatus tiun maron da nafto, kiun la regiono Gran Chaco kaŝas. Ĝia granda parto transetendiĝas en Paragvajon. Brazilo estas multe pli evoluinta ol mia lando, do ili devus malkovri ĉi tiun eblon.

– Kial vi opinias, ke tie estas efektive multa nafto? – mi demandis dubeme.

– Kiam ni fosas truojn por la barilfostoj de bovopaŝtejoj, aŭ ni enbatas ilin en la teron, post kelkaj tagoj likas ĉirkaŭ ili naftodora, malhele bruna likvo. Ankaŭ mi scias, kian odoron nafto havas! Iun ajn vi povus demandi, se vi farus viziton. Sed kial demandi, se oni propraokule vidas tion. Ĉu mi pravas?

– Evidente. Sed pardonu min, mi ne povas kredi, ke en ĉiuj valoj de Gran Chaco statas simile.

– Mi ne asertis tion! Sed tie estas pluraj tiaj valoj kaj deklivoj.

– S-ro Salgade! Mi kredas al vi, sed tio multe ne sufiĉas, por fari

tie provboradojn.

– Vi menciis, ke vi estas fakulo pri ekspluatado de naftejoj. Eĉ ideon mi ne havas, kie troviĝas la lando, de kie vi venis, sed nun vi diris, ke vi estas naftospecialisto aŭ io tia! Se vi ne kredas al mi, alsendu iun. – Li rigardis maldekstren, poste eligis krion.

– He, Marco Aurélio! Jen mi estas ĉi tie! Alsaltu! – Poste turninte sin al mi: – Nu, vidu! Ĝuste tie pasas mia amiko!

Post nelonge triope ni sidis ĉe la tablo. Mi mendis laŭ iliaj deziroj, ili ja ambaŭ fariĝis miaj gastoj. Marco Aurélio rakontis la samon pri la barilfostoj.

– Min plej ĝenas, ke miaj brutoj ofte ne volas trinki el la akvo de la rivereto, ĉar naftomakuloj flosas sur ĝi. Brutoj estas tre delikatgustaj bestoj.

– De kiam vi spertas tion?

– Jam de ĉirkaŭ tri jaroj. Multaj kunprenas eluzitajn paltojn aŭ ĉifonojn, kolektas la nafton kaj hejme uzas ilin por bruligado.

– Ĉu vi estas lignokomercisto?

– Jes! Tial mi konas bone la regionon. Nu, tamen mi havas ankaŭ kvindek brutojn, ĉar kiu ne havas, tiun oni ne konsideras vera viro. La familianoj alterne pelas, gardas ilin.

Ni interparolis unu horon. *„A conta, por favor!”* La fakturon mi petas! – mi alvokis la kelneron. Li baldaŭ aperis kaj montris sur slipo sumon, kiu ŝajnis sensignifa. Kun abunda trinkmono mi pagis ĝin. Kiam mi dankis miajn freŝajn konatojn por la informoj, trafis min surprizo. Per internacia gestado ili montris, poste ankaŭ eldiris, ke ili volas ricevi monon por ĉi tiuj konfidencaj novaĵoj. Mi ne memoras precize la sumon, sed ĝi ne estis alta. Post kiam ili ricevis ĝin, feliĉe ili foriris.

En mi ekparolis petola diablido: „Ĉu vi lasas, ke ĉi du mizeruloj trompu vin? Ĉu vi ricevis ian garantion? Ĉu certas, ke trov-

iĝas tie nafto? Propraokule vi bezonas konvinkiĝi!"

Malgraŭ tio, ke laŭfame mi fakule kompetentas pri naftomin-ado, kaj ĉiuj miaj havaĵoj rumaniaj devenas de ĝi, mi ja havis mankoplenajn konojn pri ĉi tiu scienco. Dum dek tagoj mi studis en la biblioteko de la Brazila Akademio priajn librojn, leksikonojn, gazetojn. Multege mi notis, kaj laŭ miaj kalkuloj mi levis min inter la kvin plej kompetentajn naftofakulojn.

Mi estas devigita dividi kun vi kelkajn historiajn faktojn por pruvi, kiel gravan rolon la nafto ludis kaj ludas en la ekonomia vivo de la evoluintaj landoj, unuavice de Usono.

La unua moderna naftoputo estis borita en Titusville, Pensilvanio en 1859. Ĝi rezultigis nur po 20 ĝis 25 barelojn da nafto tage, sed ĝi sufiĉis por riĉiĝo. La famo rapide disvastiĝis. La unu jaron pli frue ankoraŭ senvaloraj parceloj vendiĝis por fantastaj sumoj. La teritorio estis nomita Oil City (Naftourbo), kiun invadis dum kelkaj monatoj ĉ. 350 mil *oilsmeller,* naftokomercistoj. Rapidritme konstruiĝis domoj, hoteloj, vendejoj...

En ĉi tiu tempo vivis kaj agadis miks-vara komercisto el Cleveland, John D. Rockefeller. „Oni perlaboru tiom, kiom oni povas!" – jen estis lia devizo. Kun siaj kunnegocistoj li aĉetis naftorafinejon. Ĝis 1883 la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko kontentigis pli ol 80 procentojn de la naftobezono de la mondo.

Londona juda etkomercisto Marcus Samuel ĵetis sin en konstruadon de cisternoŝipoj. En 1892 trapasis la unua cisternulo la Suezan Kanalon. El ĝi estiĝis la naftofirmao Shell, kiu de 1907 alprenis la nomon Royal Dutch Shell. Usono elpensis la esprimon *Mei Fu,* kiu signifas: bonŝanco, feliĉo. Ĝiaj senco kaj esenco estas, ke Usono donis al ĉiuj preskaŭ nulpreze petrollampojn. Tio estis grandega negoco, ĉar la petrolon por la lampoj ĝi jam vendis kare. En 1911 la Shell-cisternulo jam trafikis ĝis Novjorko kaj San-

Francisko. Do ankaŭ Anglio klopodis penetri en la Unuiĝintajn Ŝtatojn.

Karl Benz inventis la eksplodmotoron, kiu estis muntita en 1909 ankaŭ en la T-modelon de Ford. En 1912 jam trafikis unu milionoj da aŭtomobiloj en Usono.

Mi invitis al tagmanĝo mian najbaron Fábia Roberto Silva, ŝtat-sekretarion de la Industria Ministerio kun lia edzino. Ĉar estis dimanĉo, ili anticipis agrablan tempopasigon, kaj efektive tiel okazis. *Senhora*[22] Leonarda estis treege simpatia virino; pli frue ŝi plurfoje intervidiĝis kun Milico. *Senhor* [23] Fábio ŝatis aŭtomobilojn. La du blankaj Rolls-Royce tute ravis lin. Mi proponis al li elprovi ilin. Li kun la ŝoforo uzis T-modelon de Ford. Malofte li ŝoforis. Unue li senkulpigis sin dirante, ke li ne havas praktikon, sed mi kuraĝigis lin per tio, ke mi sekvos lin per alia aŭtomobilo.

– S-ro Tasilo, ĉu vi ne zorgas pro ĉi tiu belega juvelo?

– Ne, altemineneta moŝto, mi ja pleje fidas vin.

Fábio montris sin ne mallerta. Malrapide sed sekure ni avancis. Povas esti, ke li volis satĝui ĉiun traveturitan metron. Fine de la tri-kilometra vojo tien kaj reen li estis kontenta pri si.

Ĉu vi scipovus diri, kie kaj kiel mi povus havi tiel mirindan veturilon? Mi ŝatas nigrakolorajn.

– Kompreneble, eĉ mi entreprenos aĉeti ĝin.

Feliĉe li ne miskomprenis min, do li ne pensis, ke miamone mi aĉetu por li la deziratan nigran Rolls. Kvankam mia malegoismo ne estus sencela, ĉar por la efektivigo de miaj planoj pri naftomin-ado mi bezonis potenculon kun grandaj financaj fontoj.

---

[22] sinjorino (portugale)
[23] sinjoro (portugale)

Sur la manĝotablo daŭre intersekvis la diversaj pladoj; ili ne ŝparis laŭdi la kulinaran arton de miaj kuiristinoj. Ni diris tostojn. Mi aprezis la Unuiĝintajn Ŝtatojn de Brazilo kaj prezidenton Epitácio Pessoa, kaj li elstarigis per ornamaj epitetoj miajn sukcesojn en la naftofako.

– Koran dankon, alteminenta moŝto. Mi konfesas sincere, mi ne scipovus klarigi, kiel mi elsnufas, kie ŝprucas la nigra likvo.

– Kara amiko Tasilo! Ne gravas. Sed mi petas vin, trovu ankaŭ ĉe ni nafton! Nia lando bezonegas energion.

Ĉiuj prenis la peton kiel ŝercan kaj ridetis.

– Alteminenta moŝto! Mi deziras, ke ĉiuj viaj ideoj tiel rapide realiĝu! – Mi jam havas la trovejon.

Mia anonco vekis viglan atenton.

– En la biblioteko de la Scienca Akademio mi studis la geodezion de Brazilo kaj la ĉirkaŭaj landoj – mi daŭrigis.

– Ĉu ankaŭ surbaze de mapoj kaj priskriboj vi snufas la odoron de nafto?

– Ne, alteminenta moŝto, nur surloke mi povas konstati, kie la esploristoj boru. Se en pluraj libroj almenaŭ dudek-maniere oni priskribas, bazante sin sur faktoj, kie nafto povas troviĝi. Laŭ la opinio de kelkaj esploristoj la „nigra oro” povas esti variaĵo de metano, formita spontanee sub granda premo; en tia formo ĝi povas estiĝi ankaŭ kontinue en la terkrusto. Ĉi tiuj hidrokarbonoj estiĝis el la restaĵoj de vegetaĵoj kaj animaloj, pereintaj antaŭ multaj milionoj da jaroj. En profundo de dudek ĝis sescent metroj ie ajn ili povas okazi, kie ili efektive ekzistas.

– Estas mirinde, kiel multe vi scias! – laŭdis Leonarda miajn konojn.

– Per nafto oni ornamis statuojn jam en la antikveco, preparis medikamentojn, kosmetikaĵojn. Oni aplikis ĝin kiel bazan sub-

stancon por medicinaĵoj kontraŭ tusado, astmo kaj dentodoloro, sed ĝi taŭgis ankaŭ por traktado kaj seninfektigo de inflamaj, pusaj vundoj. En Mezopotamio sumeranoj kungluis per ĝi bakitajn brikojn; izolis tegmentojn, ŝipojn. Ĝi pruviĝis nemalhavebla materialo por la plankoj de temploj kaj palacoj, por konstruado de vojoj kaj digoj. La nafton, kolektitan en la naturo oni uzis kiel radŝmiraĵon, militan ŝtofon, por lumigado. La ĉinoj, mongoloj, tataroj, persoj, helenoj, romianoj, bizancanoj, kaj multe malpli frue, la indianoj pretigis fajrajn sagojn, t.e. provizis la sagopintojn per oletrempita stupo kaj bruligis la domojn de la malamiko. Ankaŭ en la flamĵetiloj de la mondmilito oni uzis nafton.

– Vi havas tre utilajn informojn, s-ro Tasilo! Mi konfesas sincere, ke via erudicio plezurigas min!

– Mi dankas vin, alteminenta moŝto! Se vi permesas, mi malkaŝos, ke proksime al Andoj, pli precize oriente de Campo Grande, en la proksimeco de la urbo Forte Coimbra – eble jam sur paragvaja teritorio – devas troviĝi nafto! Ĉi mian kalkulon konfirmis antaŭ kelkaj tagoj du paragvajaj komercistoj, laŭ kiuj en la valoj de la rivero Plata la akvoj havas naftomakulojn, ne eblas trinkigi ĝin al brutoj.

Mi detalis, kiajn avantaĝojn Brazilo havus, se oni ekspluatus la nafton.

– Kara s-ro Tasilo! Vi, la elstara fakulo scipovas decidi, ĉu ĉi tiuj fremduloj diris la veron? Ĉu vi ne preferus konvinkiĝi propraokule pri la tiea realo?

Jen kion mi atendis delonge. La bonŝanco vizitis min en la persono de la ŝtatsekretario. Li promesis, ke jam sekvatage li konsultos pri la afero kaj provos akiri ankaŭ la necesan financan subtenon. Li parolos kun Aristido Degenfeld, la hungardevena konsilisto, kiu havas gravan influon al s-ro prezidento Epitácio Pessoa.

Post kiam la gastoj foriris kontente, Milico esprimis sian neplaĉon. Ŝin okupis ankaŭ plu ŝia teatra kariero. Ŝi aŭguris fiaskon de miaj esploroj kaj diris al mi en la vizaĝon, kiom mi kompetentas pri naftoekspluatado.

– Se mi ne vidos vin dum monatoj, kiu zorgos pri mi? Kiu donos al mi monon por la antaŭenigo de mia kariero?

Mi ne sukcesis konsoli ŝin. Mi havis nenion por konvinki ŝin. Malkovroj kaj aktorado estas du nekompareblaj aferoj. Sed eĉ per vorto ŝi ne aludis, ke dum tiel longa foresto la fadeno de nia amo povus ŝiriĝi.

Postevente mi prijuĝas tiel, ke mi kondutis egoisme, kiam mi lasis ŝin sola. Pli ĝuste, ŝi neniam restis sola, ĉar ŝi plaĉigis sin al riĉuloj, kiuj ĝoje priŝutis ŝin per siaj komplimentoj. Mi volis ajnapreze fariĝi fama. Kiel ŝi.

Post tri semajnoj Fábio transprenis preskaŭ kun infana ĝojo la nigran Rolls. Feliĉe, li ne kredis ricevi ĝin donace, do li pagis la prezon de la aŭtomobilo al la peranto.

Fábio plenumis, kion li promesis. Post tri semajnoj li sukcesis akiri la subtenon de la Industria Ministerio kaj la fidon de tri fakspertaj inĝenieroj, laborantaj en la universitato de Rio kaj necesaj por la esplorvojaĝo.

Kiam mi renkontiĝis kun ili, mi timzorgis, mi ja sidis kun veraj profesoroj geologoj ĉe la sama tablo. Sed antaŭe mi funde preparis min. Ne nur fake sed ankaŭ lingve. La profesoroj parolis diversnivele la anglan kaj francan. Mi insistis pri la angla, ĉar preskaŭ la tutan fakliteraturon mi povis kolekti en ĉi tiu lingvo en la biblioteko de la Brazila Scienca Akademio.

Mia debuto bone sukcesis. Ili kredis min. Mi havis la impreson, ke la aventura ekskurso pli altiris ilin ol la malkovro de nafto. Tial ili ne harfendis pri detaloj. Ja ĉio decidiĝos surloke. La regist-

aro atingis, ke la ŝtato Rio-de-Ĵanejro subtenu nian ekspedicion per signifaj monsumoj.

Gran Chaco (en la keĉua lingvo *chaqu*, „lando de ĉasistoj") estas varma, meze seka baslando, troviĝanta en la ĉirkaŭaĵo de la baseno Rio Plata; ĝia teritorio disetendiĝas en Bolivio, Paragvajo, Argentino kaj Brazilo (Mato Grosso). Ĝia areo ampleksas ĉirkaŭ 647 500 kvadratajn kilometrojn (kvankam ekzistas diversaj taksoj), kaj ĝi troviĝas okcidente de la rivero Paragvajo kaj oriente de Andoj en la menciitaj landoj. La teritorio, bunta je arbaroj kaj paŝtejoj, povas havi mezume alton de 300 metroj; laŭ la riveroj, precipe laŭ Vermejo kaj Pilcomayo la vegetaĵaro estas tiel abunda kiel en la brazilaj praarbaroj; meze kaj en la sudaj regionoj troviĝas ankaŭ sekaj, akvobezonaj stepoj. La seka vetero daŭras de aprilo ĝis septembro. La pluvoj, komenciĝantaj en oktobro, ŝveligas la riverojn, multloke ili inundas vastajn teritoriojn.

Mato Grosso signifas Grandan Arbaron. Ĝia areo estas 881 mil kvadrataj kilometroj. Onidire ĝi estas loĝata nur de cent mil homoj. En 1748 ĝi estis fondita en regiono, loĝata de malamikaj indianoj. Ĝian estiĝon motivis unuavice la oravido. Ĉu efektive oni trovis ĉi tie orpecojn, pri tio la fontoj silentas.

La ŝtato liveris la ekipaĵon, kunskribitan de miaj helpantoj. La du kuracistoj, kvar fakinĝenieroj kaj la ceteraj fakuloj ricevis kune kun mi siajn kvar-monatajn salajrojn. La envagonigo postulis tri tagojn. Je mia granda ĝojo ne mi devis zorgi pri ilia provizado. La registaro donis al ni helpe kuiristojn, ĉevalistojn, biologojn, kuracistojn, librotenistoн, laborestron. Parto de la ekipaĵo ekveturis kune kun ni per trajno la 2an de majo 1921 al la urbo Campo Grande, troviĝanta 650 metrojn super la marnivelo. La tie antaŭaĉetitaj materialoj (nutraĵo, tendoj, vestoj ktp) jam atendis nin. Al la urbo

Forte Coimbra ni ekiris perpiede kaj surĉevale; parton de niaj necesaĵoj ni kunportis. Kiam ni alvenis, oni transdonis la transportilojn, borturojn, ĉevalojn, mulojn kaj ĉion ceteran, kion ni bezonis.

Mi estis la gvidanto de la ekspedicio. Kompreneble, sen fakulaj konsiloj mi ne multe progresus. Pli ĝuste, ili atingus nenion sen mi, ĉar mi kondukis ilin je la nazo.

Se prijuĝi el perspektivo de pli ol jardeko, mi opinias, ke tiam mi plenumis mision. Nun mi jam scias, ke en 1928 oni malkovris signifan naftokampon en la Chaco-regiono, najbara al Bolivio. La ankaŭ cetere ekzistanta teritoria disputo inter la du landoj pligraviĝis. La senĉesaj limincidentoj kondukis fine en 1932 al la milito de Gran Chaco.

Mi avancas en la denso de la praarbaro, antaŭ mi indiĝenoj tranĉas vojon per maĉetoj. Kvankam la arboj de la ĝangalo ĵetas ombron, la aero estas neelporteble varmega kaj humida. Ĉiutage plurfoje mi traŝvitas mian senkoloriĝintan ĉemizon kaj ĉe ripozhaltoj mi sternas ĝin por sekiĝo. Ĉiuj faras tiel. Nia organismo deziras akvon, sed ni ŝparas per ĝi. Se ni alvenas fonton, ni refreŝigas nin.

Mia akompananto Paulo Coelho estas tre babilema. Plej ofte li komunikas siajn konojn pri la sovaĝejo. Alifoje li rakontas epizodojn. Unu klare restis en mia memoro. Iun tagon la azeno de kamparano falis en puton. Li venis al la konkludo, ke la besto estas jam maljuna, kaj ja tempas plenŝuti la puton. Li transvokis siajn najbarojn, por ke ili helpu. La azeno komprenis, kio okazas. Unue ĝi terure hurlis. Poste ĝi trankviliĝis. La kamparano vidis surprizite, ke la azeno deŝutas de si la teron, kaj grimpas ĉiam pli supren. Post duonhoro li jam transpaŝis la randon de la puto!

La vidaĵo estas spirhaltiga. La subon de la arboj kovras seninterrompa flortapiŝo: malhele bluaj hidrangeoj, domaĝe, ili jam grandparte forfloris. Inter la arboj travideblas akvofaloj, profundaĵoj. La dikaj arboj estas kovritaj per densa muskaro, humidaĵo gutadas ĉie. Ĝis kiam la okuloj vidas, leviĝas krutaj montetflankoj kaj kompakta, nepenetrebla arbaro, birdoj senĉese kriĉas.

Kiam mi haltis, por reĝustigi mian tornistron, mia akompananto Paulo Coelho tuj atingis min, li ja pasis apenaŭ du-tri paŝojn post mi. Ankaŭ li forte anhelis. La transportistoj demetis la ŝarĝojn, portatajn sur la dorsoj kaj kapoj sur la mallarĝan padon. Post duonminuto preskaŭ la tuta praarbaro samritme aerkaptadis, anhelis. Ĝustatempe okazas ĉi tiu ripozo.

Verde flava serpento kun nigraj makuloj glitfuĝis inter la folioj.

– *Jararaca! Jararaca!* – flustris niaj akompanantoj; Paulo klarigis al mi, ke ni vidis botropon aŭ papagan kobron, kiu atakas la homojn je la kapo. Poste per ĝoja voĉo kun ioma humuro li rimarkigis:

– Ĝi bone kondutis, ĝi rimarkis, ke ni ne vokis ĝin... Rigardu, aliflanke, sur tiu seka arbo dormas korala kobro, pompanta per belegaj koloroj. Ĝi malofte mordas homojn, sed ĝia veneno estas tre forta, ĝia buŝo estas malgranda, ĝia venendentoj mallongaj. Oni ofte konfuzas ĝin kun la falsa korala serpento, kiu ne estas venena.

Mi tremskuiĝis, kio percepteblis je mia voĉo.

– Mi ankaŭ la falsan specion ne ŝatus trafi. Ĉu eble ankaŭ ĉi tiu ne estas vera?

– Se vi ne volas trafi ĝin, kial ĝi interesas vin? – ŝercis mia akompananto.

Mi forgestis, per kio mi evidente esprimis, ke li pravas, kaj prefere ni parolu pri io alia. Tamen ni ne babilis. Ĉiu elprenis sian

pendbotelon, kaj ŝpareme tiris kelkajn gutojn el ĝi, poste oportuneme remetis ĝin. La akvo estas la plej granda trezoro ĉi tie.

Ade-ree ni vidis nur vepron post vepro, arbojn post arboj. Blankaj egretardeoj timleviĝis en grandaj rotoj. Ie kaj tie grupeto de indiĝenaj kabanoj kaŝrigardis nin inter la arboj kun aerradikoj, aŭ soleca palmo videblis, sed plej ofte nur folia vegetaĵaro: robinioj kaj nekonataj specioj, ĉefe arbustoj, kvazaŭ ili estus antaŭdiluvaj filikoj. Sulfurflavaj, verdaj, ruĝaj birdoj svarmis, kaj ŝajnis, kvazaŭ opala kloŝo kovrus la sunon. Tio estas vaporo, en kiu oni povas preskaŭ vidi la varmegon.

Dum nia plurtaga marŝado plurfoje trafis nin tropika pluvo, kiu falis kvazaŭ torente el la ĉielo. Ni trahumidiĝis ĝishaŭte, kaj kiam post horoj ni pene sukcesis sekigi nin, refoje longe pluvegis. Nia ŝvito unuiĝis kun la malpura akvo, verŝiĝanta de la arbofolioj. Kiam ni alvenis lagon, mi ne aŭskultis la deadmonajn vortojn, vadis en ĝin, kaj eble dum momento mi sentis, ke mi puriĝas. Poste alvenis la seniluziiga realo. Subite eknaŭzis min la insektoj, bobeloj sur la bruna akvosurfaco. Mi timis, ke atakos min kajmano aŭ krokodilo. Mi fuĝis el la lago, kaj sentis min pli odoraĉa – kaj malplaĉa – ol antaŭe. La suno pigre palpebrumis, kaj priridis min.

Mi retiriĝis en ombron. Ĉirkaŭis min nanaj akacioj, lianoj, senmovaj aerradikoj... Ruĝaj birdoj super la lago. Sur la blankeca ĉielvolbo la suno ŝajnis kvazaŭ pakita en vato. Ni ne volis vidi unu la alian. La sunlumo fluis gelatenece kaj la vaporo estis glueca. Ĉie flariĝis la fetoro de putriĝo; dum mi forviŝis la ŝviton de la vizaĝo, mi sentis fiŝodoron. Fine mi ne forviŝis ĝin, nur sidis kun fermitaj okuloj, fermita buŝo, spirante tra la nazo, kun kapo apogita al arbo kaj etenditaj gamboj.

Ni aventuris tra kampoj, stepoj, praarbaroj. Alifoje, dum nia

peniga vojaĝo ni vadis tra veprejoj, poste pasis sur montoj, kampoj, marĉejoj, paŝtejoj. Helpe de miaj gvaraniaj indianoj ni feliĉe alvenis en nia plej proksima stacio: loĝloko de la *sŭita* tribo, kiu situis borde de belega lago. En silenta pompo kuŝis antaŭ ni placo; antaŭ kabano estis hisitaj sur tri stangoj diversaj ĉifonoj aŭ ĉu flagoj. Virinoj portis sur la kapo akvon en vazo kaj verŝis ĝin en lignokuvon. Ie kaj tie zigzagis rotoj da infanoj. Ni malkovris malgrandajn ĝardenojn ĉirkaŭbaritajn per bambuoj, en kiuj kreskis probable kukumoj kaj maizo. Paulo Coelho direktis nin al la kabano situanta plej alte. Antaŭ ĝi dek ĝis dek kvin duonnudaj viroj pipfumis duonkuŝe. Tio estis la „rezidejo" de la tribestro. Nek por la meblaro, nek por la grandeco konvenis ĉi tiu vorto. Mi tamen ne povas skribi 'komunuma domo'.

Ni klinis nin antaŭ la indiana tribestro, ornamita per grandegaj plumoj. Li sidiĝis sur troneca aplikaĵo. Ni, kvin viroj restis starantaj.

– Sinjoro pli Brila ol la Suno! Reĝo de Indianoj! – mi alparolis lin kaj Coelho interpretis. – Humile ni venas antaŭ vin. Ni venis beni vian grandecon kaj potencon... Reĝo de Indianoj! – mi daŭrigis. – Esprimante nian respekton al vi, mi, kun miaj akompanantoj petas vin samtempe, permesu al ni, viaj humilaj gastoj, venintaj kun paca intenco, tranokti ekster via vilaĝo. Permesu, ke satripozinte, ni kun paco povu trapasi viajn netravideble riĉajn teritoriojn, sen trafi en militon kun vi kaj via popolo.

La Sinjoro pli Brila ol la Suno faris per la mano kelkajn vidindajn gestojn. Laŭ nia interpretisto tio estis la unusenca signo de aprobo. Li „resignalis" al ni. Paulo transdonis nian donackorbon, en kiu estis simplaj objektoj: konservaĵoj, alumetoj, spegulo, buntaj tuketoj, lancopintoj, vizaĝfarboj, krajonoj, dratoj... Por ili ĉiuj utilaj aĵoj...

Kiam ni revenis al nia grupo, eĉ spuro de streĉita atendo ne sperteblis. La membroj de nia ekspedicio kuŝiĝis por ripozi, dormetis aŭ purlavis sin. Aperis kelkaj indianoj, kun kiuj ili faris interŝanĝan komercon. Ili ricevis fruktojn, ornamaĵojn, sekigitan viandon interŝanĝe por metalaj objektoj, papero, gazetfolioj.

Post horo kuregis al ni indiana kuriero kaj terurite diris al Paulo, ke okazis granda malfeliĉo. Li klinis sin, manvokis nin kuniri. Antaŭ la „rezidejo" de la tribestro staris sorĉisto. Ĉiuj retiriĝis en siajn kabanojn.

Per terura voĉo li sciigis al ni, ke en la brilaj vitroj, kuŝantaj dise sur la tero (speguloj), ili malkovris la detranĉitajn kapojn de siaj ferocaj malamikoj. Ne! Ne! Ili mem volas detranĉi la kapojn de ĉiuj siaj malamikoj!

Ni reprenu ilin, kaj se ni foriros, ni ĵetu ilin en la proksiman rivereton, por ke ili „dronu". Ni kolektis la disĵetitajn poŝspegulojn. Post profunda riverenco ni retiriĝis. Nia interpretisto sciigis al ni, ke ili deklaris nin danĝeraj fremduloj. Kvankam ni rajtas pasi tra la tero de la indianoj, sed tuj ni devas forlasi la vilaĝon. Estis malfacile konvinki nian taĉmenton el 120 personoj. Forirante kelkaj kolere intermurmuris, aliaj grumblis en si.

Ni ne foriris malproksimen. Forlasinte la indianajn plummarkojn, distajn ducent metrojn, ni avancis unu kilometron norden, poste ni deprenis la ŝarĝojn de la muloj kaj ĉevaloj. Ni pelis ilin al senarbejo por paŝti sin. El la akvo de la preterfluanta rivereto ĉiuj forlavis la polvon, ŝviton de la vojaĝo.

Nia ekspedicio daŭris preskaŭ tri monatojn. Tre malofte ni povis purlavi nin, nia manĝado estis mankohava, nokte ni ofte malvarmis. Min spronis kun multobligita forto la konscio, ke mi povas direkti mian sorton propramane. Mi tre fidis mian bon-

ŝancon.

Carrau José Petro lekciis pri geografio. Oni konsideris lin fakulo de rokaĵoj. Perfekte li konis la terhistoriajn tempaĝojn. Li parolis malmulte, sed se li ekparolis, ĉiu lia vorto havis sian pezon, ĉar li prezentis sian dirindon logike, bazante sur faktoj. Bedaŭrinde li ne volis rekoni mian fakscion. Kvankam neniam li esprimis unusence siajn dubojn, tamen li ŝajnis skeptika. Probable pro tio, ke kompare kun la aliaj du profesoroj li malpli kompetentis pri la angla terminologio de naftoesplorado.

Estante ja ne biologo, prof. Ramon Joaguim Brito tamen havis klaran bildon pri tio, kiel kaj kial estiĝas nafto. Siajn teoriajn konojn li klopodis pravigi surloke. Tio okazis tiel, ke sur dekliveto li faris mallongan lekcion, poste li daŭrigis ĝin en alia valo.

Prof. Manuel Artagave pasie ŝatis maĉi kokafoliojn, kio tenis lin spirite ĉiam freŝa. Liajn daŭre faratajn maposkizojn oni povis ĉiufoje fidi. Li estis homo preciza inter la plej precizaj! Li parolis plej bone la anglan. Li cizelis mian portugalan, tiel mia elparolo pliboniĝadis, mia vorttrezoro plivastiĝis.

Apartan taskon prezentis la lokalizo de la borejo. La profesoroj konsentis ĝenerale pri tio, ke post antaŭa rokaĵkolekto kaj tavolanaliza borado kie ni ekfunkciigu la borŝildon. Kvankam mi laŭaserte „elsnufis" la naftotrovejojn, la kunan respondecon mi ĉiam pli volonte elektis. Se en kelkaj okazoj mi decidis sola, kaj ni ne trovis spurojn de la avidata nigra oro, kvazaŭ ĉiuj estus pli ol kutime seniluziiĝintaj...

Ni ne sciis ekzakte, ĉu ni troviĝas ankoraŭ en Brazilo aŭ jam pasas sur paragvaja teritorio. La landlimon markis nur niaj mapoj, kelkfoje ne unusence. Ĉio estis samforma: arbaroj, senarbejoj, valoj, rokoj, montetoj, paŝtejoj, brutaroj, riveretoj, marĉoj, buntaj birdoj, inundejoj... La demando de landlimo tute ne mal-

trankviligis min, ĉar la brazila ŝtato petis kaj ankaŭ ricevis permeson por naftoesplorado ankaŭ en Paragvajo.

Sur ĉirkaŭ du kvadratkilometra areo ni jam faris boradojn en dek kvin lokoj. Surbaze de la konsisto de la rokaĵo povus estiĝi nafto teorie ie ajn, sed praktike eĉ ĝiajn spurojn ni ne trovis. La lastajn truojn mi ne lasis replenigi. Mi kalkulis kun tio, ke neatendite ie tralikiĝos la nigra „suko”. Por tio ni havis apenaŭ ŝancon. Ni faris malkovrajn boradojn en profundo de dudek kvin kaj kvindek metroj.

La nafton, venigitan sekrete el la proksima urbo mi tenis kaŝita jam de du semajnoj. Alvenis la tempo utiligi ĝin. Bedaŭrinde dum laboro mi ne sukcesis krei tian situacion, ke mi enverŝu nerimarkite mian grandan trezoron en iun aperturon. Nia kuracisto Don Uruchurtu, Petro, unu el la kuiristoj kaj ankoraŭ kvin personoj entreprenis kontraŭ konvena sumo da kontanta mono helpi soblasi la nigran oron en specialaj korbetoj, plektitaj el palmofolioj. Antaŭgarde ili starigis postenantojn. Atinginte grundon, la fundo de la korboj, pruvantaj la inventemon de la indianoj, malfermiĝis. Por ke la borilo povu suprenigi sufiĉan kvanton, kelkfoje ni devis ripeti la operacion en pluraj truoj. Post ne malgranda ekscitiĝo, ankoraŭ antaŭ matenkrepusko ni reŝovis nin en niajn tendojn. Sekvamatene mi decide montris tiujn putojn, en kiujn laŭ mia sonĝo tralikiĝis nafto. Kvankam la inĝenieroj ne oponis, ili tute ne kredis la sukceson.

Neniam mi forgesos la ĝojon, kiun la membroj de la ekspedicio daŭre travivis, kiam ili pluboris la de mi montritajn truojn...

Post la tria sukceso ili ĵetis min en la aeron. Ho, se Milico povus tion vidi!

Dum du horoj ni preparis nian regreson. Mi prenis al mi kvarkapan taĉmenton. Ni iris antaŭen, por anonci telegrame al la In-

dustria Ministerio la sensacian malkovron. Ĝis la plej proksima loĝloko flugigis nin niaj ĉevaloj. Dum la hejmenveturo la tri profesoroj priskribis siajn spertojn, la rezulton de la malkovro en la trajno: ni malkovris riĉan naftotrovejon.

Preskaŭ en ĉiuj ministerioj oni volis vidi min, konkuris por renkonti min.

Estas tre agrable senti esti sukcesa! Tuta Rio festis nin. En kelkaj tagoj ni sukcesis fondi  la bankon Banca Rio de la Plata. La kapitalon aldonis la ministerioj kaj la municipo tiel, ke preskaŭ senkalkule aĉetis el la haste presitaj, grandformataj, dekore ilustritaj akcioj. Krom la elito de Rio ankaŭ malriĉuloj vidis bonan negocon en la paperoj. Kelkfoje okazis perturboj, ĉar la grandegan kaj daŭre aperantan bezonon ne eblis kontentigi en ĉiuj horoj de la tago, en ĉiuj bankoj.

Oni vidis min kiel heroon. Ankaŭ Aristido Degenfeld entuziasmis. En li same ne vekiĝis dubo, ke „eble okazis ia eraro”. La gazetoj publikigis mian nomon ĉeftitole, oni petis intervjuojn de mi. Sen miaj helpantoj mi ne sukcesus – mi ja ripetis –, tamen oni preteratentis tion. Ŝajnis, ke la tri profesoroj kaj iliaj ekspertizoj estas iuspeca kromaĵo aŭ prefere sekvo de la malkovro de la naftokampo.

La prezidento de la ŝtato akceptis min. Kun rekono li menciis la ĝisnunajn sukcesojn de mia vivo, kiujn fundamentis miaj multdirektaj studadoj, eminenta deveno kaj miaj rumaniaj naftokampoj.

De prezidento Epitácio Pessoa mi petis mian akcepton en la vicojn de la diplomataro. Aristido Degenfeld helpis vortigi mian peticion. Mi referencis al tio, ke mi batalis jam dekomence flanke de Entento, la venkinta flanko. Mia onklo, rumana princo kaj

naftomagnato provizis sekrete per benzino la francan armeon. Mi estis la peranto, kaj ne unufoje mi trafis pro tio en danĝeron.

La kvinpaĝa teksto pruviĝis tre efika. Mia peticio estis akceptita.

Milico, mia belega juvelo, perlo de mia vivo ne ĝisatendis mian revenon kun la tri profesoroj en Rio. Vane ŝi disponis ĉion belan kaj bonan en la kastelo, ŝi malgraŭe enuis. Ne estis dece viziti sola societojn. Iel ŝi do konatiĝis kun cirka direktoro, kiu estis hazarde tiel sama enmigrinto kiel ni. Li promesis al ŝi daŭran sukceson, aplaŭdojn, famon. Ŝi elektis la vagan vivon de ciganoj anstataŭ min. Ŝi postlasis adiaŭan leteron, en kiu ŝi sentimentale rememoris nian kelkjaran emociplenan kaj materialan interrilaton. Ŝi bedaŭris la finiĝon de nia amromano, kiun ŝi nomis la plej bela periodo de sia vivo. „Kiel vi entreprenas, karuĉjo, ade kaj ree malkovrojn de la nekonata, ankaŭ min same influas, se iu submetas min al elprovo. Kaj la sorto sendis al mi novan eblon en persono de alia viro. Vin la Eternulo forvokis de apud mi, sed min Li alvokis por io alia... Vi restos por mi mia unusola, eterna viro, kunulo de mia vivo, kiu frenezigis mian koron. Ĉiam mi nur vin amos, tute ĝis mia tombo."

Poste tamen ŝi riproĉis al mi: mi konsideris pli grava foriri en la praarbaron inter sovaĝulojn por fremdaj interesoj, necerta sukceso...

La forsaluto de Milico ne apartenas al la plej belaj am- aŭ adiaŭleteroj de la beletro. Mi ne ekploris, kiel ŝi evidente volis.

Iom post iom ekregis min maltrankvilo. Nun, kiam ĉiuj festas min, kiam mi havas liberan aliron en la ministeriojn, tamen Milico okupis mian menson.

Mi klopodis transpreni la pensmanieron de mia ekskarulino kiel detektivo tiun de krimulo. Mi ne emis kredi, ke virino, kuti-

miĝinta al luksa vivo, foriras por pli longa tempo por malcertaj esperoj kaj sukcesoj. Ŝi devas vivi malriĉa inter maldelikataj, neflegataj homoj. Kromas daŭra vagado, necerteco, mizeroj. Siajn balkostumojn – se entute restis al ŝi kelkaj – ŝi povas porti nur sur la cirka areno kiel rekviziton. Ŝi ne estas tia! Evidente ŝin trafos hejmveo, kiel ankaŭ min.

Ĉiuj miaj fibroj sopiris al Vieno. Ankaŭ ŝi devos esti tie! Nur tie ni povos renkontiĝi! Kvankam min oni serĉigas police en pluraj landoj de Eŭropo, tamen mi devas veturi al Vieno. La gajnita diplomatia statuso povos min helpi.

Mi do anoncis, ke en urĝa afero mi devas veturi por mallonga tempo al Vieno.

– Sed kara amiko! Ĉu ĝuste nun, kiam la akciojn de Banca Rio de la Plata aĉetas eĉ malriĉuloj? Virinoj vendas siajn silkajn jupojn kaj viroj siajn boatojn. Ili vidas elsaviĝon en la naftonegoco.

– Mi scias, alteminenta moŝto – mi respondis al Fábio Roberto. – Sed mi volus utiligi miajn eŭropajn kontaktojn, por trovi novajn investantojn por la ekspluatado de la nafto. Do ekskluzive en negoca afero mi veturos, kaj tio povos esti tre grava ankaŭ por mia dua patrujo, Brazilo.

Li pravigis min.

En Vieno mi pli bone orientiĝas ol en Brazilo, kie pli-malpli frue evidentiĝos, ke kie „estas nafto”, tie malestas nafto! Tiam mi ne povos eviti la respondecigon.

Emociplene mi diris adiaŭ al miaj dungitoj en la kastelo. Nur ili povis konjekti, kiel longe mi forestos, ĉar por kvin monatoj mi anticipis iliajn salajrojn.

## 6. Simio, mono, virinoj

La unuan de junio 1921, ĉirkaŭ tagmezo la suno brile radiis. Viro kun kurioza eksteraĵo aperis en la amaso de promenantoj sur la viena bulvardo Ring.

Tio estis mi! Mi surhavis akrakoloran uniformon pasamentitan kun larĝaj generalaj pantalonstrioj. Sur mia flanko balanciĝis sabro, kaj sur la maldekstra ŝultro sidis simieto. Ŝi estis Vilhenjo, nana simio amazonia; ĉ. dek ses centimetrojn alta, sed ŝia vosto atingis tridek centimetrojn. Ŝi estas tre afabla, amikema besto. Pacienca, alkroĉiĝas ne nur laŭvorte al la homo. Germane oni diras: *Affen haben,* kio signifas en strikta senco 'havi simion'. Sed oni uzas la esprimon ankaŭ por la okazo, se iu havas vaporon en la kapo aŭ estas ebria. Mi estis venkoebria.

Mi ĝuis la popularecon. Mi paŝis malrapide, por ke ĉiuj satgapu min; mi pasigis la okulojn sur la damoj, kiuj trafikis sur la vojo inter la hoteloj Bristol, Grand Hotel kaj Imperial Hotel. Mi sendis ridetojn al ili eĉ tiam, se apud ili fierpaŝis kavaliro. Aroganta junulo saltis neatendite antaŭ min, prezentis sin kiel aristokrato kaj protestis, ke mi fiksrigardas lin kaj lian edzinon. Kun granda trankvilo mi ĝisaŭskultis lin, poste mi diris ion tian en la portugala, ke li pravas, trankviliĝu, ĝis revido. Poste mi deturnis min kaj pluiris. La kolerigitan sinjoron rekvietigadis lia edzino, liaj amikoj prenis lin je la brakoj kaj forkondukis.

– Kiu scias, kiu estas ĉi tiu homo! Eble ia ententa diplomato papago, ne okupiĝu pri li! – konsolis lin liaj aŭstraj kunuloj.

Mi promenis ĝis la placo Schwarzenberg, en kies mezo viena policisto en trivita uniformo direktis la trafikon. Serene mi observis la lernitajn gestojn de la postenanto. Vilhenjo komencis bald-

aŭ imiti la policanon: ŝi gestadis, turnadis sin. La ludo plaĉis al la pasantoj. Por kelkaj minutoj ili sentis sin en senpaga teatro kaj montriĝis tre dankema publiko. Fine ankaŭ mi ridis kune kun ili.

Poste mi tagmanĝis en la restoracio de Hotel Imperial. Vilhenjo kaŭris sur la seĝo apud mi; por la amuziĝo de la gastoj kaj kelneroj ŝi manĝis kun buŝtuko sub la mentono la stufitan rizon, kiun aparte por ŝi oni malvarmigis. Post kiam mi pagis, kun Vilhenjo sur la ŝultro mi direktis miajn paŝojn al la palaco Belvedere. Mi returniĝis al mia loĝejo, luata en Salesianer Gasse en la triadistrikta diplomata kvartalo. Sur la latuna tabuleto, najlita sur la pordo legeblis: Melĥioro Horváth, Freiherr von Beöháza[24]. El mia registriĝa papero oni povis ekscii, ke mi estas iama imperiestra kaj reĝa husarkapitano, nun brazila armea ataŝeo.

Dum la unuaj semajnoj mi dediĉis min al miaj ŝatokupoj: delikataj tag- kaj vespermanĝoj, abundaj trinkmonoj, promenoj kun Vilhenjo, por la granda miro de la pasantoj sur la stratoj. Mi telegrafis al miaj amikoj kaj sendis kurierojn kun pluraj leteroj, en kiuj mi venigis ilin al renkontiĝo la 18an de junio por la sesa horo vespera. Poste mi decidis fari ekskurson al Pozsony, jama Bratislavo, kiu nun apartenis al nova lando Ĉeĥoslovakio. Tie oni pli mirgapis mian uniformon de brazila ataŝeo kaj mian simion Vilhenjo ol en Vieno.

Foje mi okupis lokon ĉe tablo, metita en ombron, en Savoy Hotel & Restaurant. Pro Vilhenjo tio estis nepre necesa. Ŝi ja estis brazila, tamen ne ŝatis staradi longe sub la brilpika suno.

La preterpromenantoj ĵetis sindetenajn rigardojn al ni. Ili ekhaltadis, kiam Vilhenjo prezentis ian kuriozaĵon: donis al mi bananon, manĝis, dancis sur la tablo, sidante sur mia ŝultro grat-

24 barono de Beöháza (germane)

adis sin aŭ gapis la scivolan publikon kaj kriaĉis en praarbara lingvo. Pasis longa tempo, ĝis kelnero aŭdacis veni pli proksimen. Alia gasto tiam ankoraŭ ne videblis. Pro mia uniformo mi ne volis alparoli lin hungare. En lingvo miksita el la portugala, angla kaj germana mi mendis surbaze de la *Menükarte*[25] malvarman akvon, legompladon al Vilhenjo kaj limonadon al mi.

Dekon da metroj tiam sidiĝis al tablo baronino de Majthény, kun kiu mia vivo por kelka tempo interplektiĝis. Mi jam plenumis miajn 32 jarojn, sed en mia brazila generala uniformo kun multaj butonoj kaj pasamentoj mi aspektis dek jarojn pli aĝa. (Kiel poste mi eksciis, ŝi estis tiam 42-jara.) Ŝi surhavis vastrandan ĉapelon kun flavaj rozoj, kiu parte ombris ŝian vizaĝon. Subite ŝi turnis sin al mi. Ŝi miris kiel infano, kiu neatendite trafas ion delonge deziratan. Ŝi demetis siajn ĝiskubutajn blankajn gantojn kaj leĝere ĵetis ilin sur la dorsapogilon de la fotelo. Ŝi komencis studi la manĝokarton. Ĝentile ŝi resendis la kelneron dirante, ke ŝi ankoraŭ ne elektis. Ŝiaj blankaj, allogaj ŝultroj, ŝia vibranta radiado ne lasis stagni mian sangon. Ŝi foliumis la manĝokarton tiel, ke mi sentis, ke ŝi rigardas nin. Vilhenjo komence ne dediĉis atenton al ŝi. (La gapanta amaso observadis en deca distanco malantaŭ la barilo de la ĝardenrestoracio.)

Vilhenjo facile elturniĝis en ĉia situacio. Ŝi konatiĝis kun kiu ajn en maniero, ke tiu ne trovis tion ĝeno. Saltante de tablo al tablo nun ŝi venis proksime al la ĉapelhava damo.

Oni scias vere malmulte pri simioj, kvankam ili estas en multaj rilatoj pli sentemaj, elturniĝemaj ol ni. Vilhenjo „ludis" sian amkonfeson (mian konfeson?) sur la najbara tablo al la damo. Sidiĝinte sur la postaj piedoj, tenante en la antaŭaj piedoj ne senŝelig-

25 manĝokarto (germane)

itan bananon, ŝi prezentis sian „monologon”. Antaŭe ŝi sufiĉe altiris la atenton de la publiko. Tiom, ke du kelneroj interpuŝiĝis, pro kies sekvo kelkaj glasoj rompiĝis. Mi multe aŭdis Vilhenjon „paroli”. Ofte ŝi respondis al miaj demandoj. Sed tiajn sonojn ŝi ankoraŭ ne eligis. Rapide elpuŝante la langeton, huante fascine kaj volupte, gestante per sia banano ŝi debutis al la damo, el kiu post longa rideto elŝprucis rido, kaj ŝi akceptis la prezentitan bananon. Vilhenjo atendis iom, lulis sin en danceto, kvazaŭ dankante post la „ludo”. Poste ŝi saltis per kelkaj sinĵetoj sur mian ŝultron.

La ĉapelita damo tiam turnis sin al mi per sia tuta korpo. Ŝi estis embarasita, en sia vivo ŝi ja ankoraŭ apenaŭ trafis en tian ekstreman situacion. Mi sciis, ke nur mi povas esti elnodiganto de ĉi tiu neatendita situacio.

Post kiam mi improvizis germane kelkajn pardonpetajn esprimojn al la eleganta, ĉapelita damo, mi demandis, ĉu mi rajtas sidiĝi kun Vilhenjo al ŝia tablo. La nekonatino prononcis kun hungara akĉento la germanajn frazojn.

– Ho, ĉu vi estas do hungara?! – mi miris. Permesu al mi prezenti min. Mi estas Daniel Paulo Jorge Alberto Alfredo Santos, sed alparolu min nur simple grafo Tasilo Festetich!

– Mar-Mar-... Margareto, baronino... de Majthény – ŝi balbutis surprizite. – Kiel...? Ĉu eblas, ke vi estas ne hispana oficiro? Ĉar...

– Pardonu! – mi interrompis ŝin. – Brazila generalo!

– ...des pli, kaj tiel vi parolas la hungaran!

Post kiam mi sidiĝis kun Vilhenjo en la sino, mi metis la montrofingron antaŭ la lipojn kaj diris sekreteme:

– Sekreta misio, sinjorino. Diplomatia komisio!

– Mi ne komprenas – ŝi respondis ankoraŭ en embaraso.

– Pardonu, pardonu! Ĝuste tiel estas bone.

En ĉi tiu minuto eleganta blonda fraŭlino aperis proksime al nia tablo. En sekundoj evidentiĝis, ke ŝia filino Klaro alvenis. Vilhenjon ŝi tuj fermis en sian koron. Ankaŭ Vilhenjo reciprokis la feliĉigan senton radiantan al ŝi. La delikate violodora tualeto de Klaro tre altiris ŝin. Per siaj manoj, pepado „klarigis", ke ŝi volus iri al ŝi. Mi konsentis.

Tiel komenciĝis nia konateco kun Margareto kaj Klaro.

Ni trinkis kelkajn limonadojn. Babilis pri la vetero, amuzebloj en Bratislavo kaj Vieno... Mian inviton al tagmanĝo ili ambaŭ akceptis kun ĝojo. Ni ĉiuj tri manĝis buljonon, bifstekon kaj ĉokoladan torton. Ni trinkis botelon da mirinde bongusta franca Château Cheval Blanc kaj monto-fontan akvon.

Ankaŭ plu Vilhenjo restis en la centro. La kelneroj preparis por ŝi tablon sur tabureto, kaj sidante sur benketo, ŝi ronĝadis kun granda plezuro la pladon el diversaj legomoj.

– Grafo Tasilo, kion vi faras en Bratislavo? – demandis Margareto.

– Mi enhoteliĝis en Vieno, mi nur ekskursas ĉi tie. Kvankam mi estas grafo, volonte mi okupiĝas pri internacia komerco. Komisie de diversaj ministerioj de eksteraj aferoj kaj komerco mi plenumas negocojn. Mi multe vojaĝas. Mi estas kontenta, ĉar ĉiun mian mision mi prenas por feriado. En Brazilo mi fondis bankon kun la nomo Banca Rio de la Plata. Fakuloj de mia akcia kompanio malkovris antaŭ jaro naftokampon en la valoj de Mato Grosso. Mi okupiĝas ankaŭ pri eksporto kaj importo. Nur tiom mi rajtas diri, la cetero estas sekreto!

– Mi jam multe aŭdis pri via familio, precipe pri grafo Georgo Festetich, kiu fondis la studejon Georgicon por klerigo de bienaj ekonomoj. En Keszthely ĉiujare oni aranĝas la Helikon-festojn, al kiuj estas invitataj bienmastroj, verkistoj, poetoj, scienculoj. Mi

jam vidis sur la ĉefplaco la statuon de la grafo.

– Estas honoro por mi, ke la pasintecon de mia praavo tiel bone vi konas. Li estis unu el tiuj, kiuj por la evoluigo de la neglektata agrikulturo disvolvis benindan agadon. En sia bienaro de 162.000 akreoj li enkondukis ekzemplodonan mastrumadon. Fondis kalvinanan gimnazion, konstruigis preĝejon en la regiono.

Vilhenjo signis per siaj voĉo kaj manoj, ke ŝi devas retiriĝi en pli foran veprejon. Mi gestis al ŝi, ke ŝi povas iri. Malgraŭ sia eta staturo ŝi foriĝis kun grandegaj saltoj.

– Kio okazis? – demandis la damoj preskaŭ samtempe.

– Pardonon, sinjorinoj! Ankaŭ Vilhenjo havas naturajn bezonojn.

Post paso de kelkaj minutoj Vilhenjo promenis reen kun paŝoj indikantaj kontentecon al nia tablo. La publiko, staranta pli fore, ankoraŭ gapis pro ĉiu ŝia movo.

– Ŝi havas escepte bonan konduton..., se decas diri ion tian pri simio – rimarkis Margareto.

– Decas, licas – mi aprobis. – *Comme il faut.*[26]

Laŭ mia invito aperis la 18an de junio Andreo Faragó, Vilhelmo Sugár, Sigfrido Tolnai-Turteltaub, Aleksandro Klaár, Marteno Goldschmidt, Frederiko Vilhelmo Wetz, Ladislao Fürst. Ni priparolis la farendojn. Miaj amikoj Ladislao Harmath kaj Akoŝo Jarinay revenis du tagojn pli frue el Svislando, kie ili kontrolis niajn deponojn kaj redeponis ilin kun pli altaj interezoj. Evidente ili havis ankaŭ ceterajn kaŭzojn por forveturi.

Post kiam mi rakontis al ili, ke nuntempe mi estas la eŭropa negoca reprezentanto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo, ili ambaŭ

26 kiel decas (france)

surpriziĝis.

– Meĉjo! – diris Akoŝo. – Vi estas inter ni la plej granda, la plej bona, la Maksimumo!

Mi volis montri min modesta.

– Neee! Maĉjo Goldschmidt estas la plej granda, li ja per kontrakto defraŭdis la tutan havaĵon de s-ino Leona Salvatore.

– Ne! Ne! – mangestis nee Akoŝo. – Ĉi tio estas centoble pli bona ol tio.

Duonhoron pli malfrue, post kiam ili ekkonis mian planon, Akoŝo aldonis:

– Pardonu, amiko! Mi eraris. Vi estas milfoje pli bona ol Maĉjo.

Ankaŭ Ladislao ne volis postresti. Jene li superatutis:

– Permesu al mi estis tute preciza. La plejplej bona en tuta Eŭropo kaj Brazilo.

Ankaŭ Maĉjo Goldschmidt akceptis modeste ĉi tiun kvalifikon.

Ni dividis inter ni la bankojn, eksport-importajn kompaniojn, fiksis la datojn.

Tri semajnoj pasis kun zorgaj preparoj. Ni pretigis aŭstrajn devizocentrajn permesojn, ĉekojn, komisiojn, stampilojn, legitimilojn. Dume tamen mi havis kelkajn horojn ĉiutage, por pasigi kun s-ino de Majtény. Ladislao Harmath kaj Akoŝo Jarinay agis same, sed ili pasigis la belan someran tempon kun f-ino Klaro.

Iun vesperon kaj duonnokton mi sukcesis tute intimiĝi kun Margareto. Diskrete mi prisilentas la detalojn de ĉi tiu neforgesebla kunesto. Mi mencias nur, ke ni trinkis ciuman toston. Poste, se ni restis duope, ni ĉiufoje ciumis unu la alian.

Vilhenjon mi konfidis al s-ino de Majtény kaj Klaro.

La 16an de julio 1921 ni trovis alveninta la tempon, por komenci la bone preparitan agadon. La grandan parton de miaj brazilaj akcioj, kunportitaj en du valizegoj, ni dividis inter ni. Kiel ger-

mana magnato kaj bankiero, vivanta en Vieno, mi vizitis la direktoron de Internationale Export-Import A.G. (INTAG), s-ron Berhard Janowitzer. Mi prezentis al li la permeson de la aŭstra devizocentro, kiu rajtigas min, elporti en Brazilon nemarkitajn bankbiletojn en valoro de ducent milionoj da kronoj, kaj resendi en aŭgusto almenaŭ dudek procentojn pli multe en dolaroj. (Oni devas scii, ke markitaj bankbiletoj, elportitaj eksterlanden kaj reportitaj, valoras multe pli ol la nur en Aŭstrio aŭ Hungario cirkuligataj.) Kiel garantion mi devis lasi kaŭcie ĉekon pri 30 milionoj da kronoj de Banca Rio de la Plata ĉe INTAG.

Simile mi procedis ankoraŭ ĉe ok kompanioj kaj bankoj. Estas kurioze, ke mi vizitis ankaŭ la alian direktoron de INTAG, s-ron Singer. Post kiam evidentiĝis, ke lia rilato al Janowitzer nomeblas nuboplena, post ioma taktika modifo mi sukcesis konkludi kun li diskretan interkonsenton. Blinde li fidis min, ĉar estiel avidulo li esperis povi signife kreskigi sian havaĵon. Mi promesis skribe, ke mi deponos ducent milionojn da nemarkitaj kronoj en Brazilo en alta kurzo. S-ro Singer intertraktis kun mi en tiel silenta, oleglata stilo, kvazaŭ li estus nova Singer-stebilo.

La utilon ni duigos en proporcio 30 al 70 – tio estis unu el la kondiĉoj de nia interkonsento. (Kompreneble, mi kiel peranto ricevus 30 procentojn.) Wilhelm Singer povis kolekti dum semajno ĉi tiun enorman sumon en bankbiletoj de grandaj titoloj. Kiel garantion ankaŭ ĉi-foje mi transdonis kaŭcie la 30-milionan ĉekon de Banca Rio de la Plata. Mi promesis mian revenon por la fino de aŭgusto, post kiam tra mia banko mi transsendos al li la dolarmilojn, kalkulitajn laŭ la lasta kurzo.

Post la finiĝo de nia operacio, okazinta dum tri tagoj, ni renkontiĝis en sekreta loko, kie ĉiu demetis sian akiritan sumon sur marmoran tablon. Tiom da bankbiletoj ni ne vidis samtempe

dum nia tuta vivo. Ni povus pesi po kilogramoj la dolarojn, svisajn kaj francajn frankojn, anglajn pundojn kaj aŭstrajn ŝilingojn.

Ĉar la ideo originis de mi, mi ricevis dudek procentojn pli ol miaj amikoj. Ili mem proponis tion, vane mi protestis. Mi plenigis du kofrojn kaj ĉiujn poŝojn de mia kompleto. Tiel riĉa mi ankoraŭ neniam sentis min!

La dividado daŭris du horojn. Surbaze de preciza registro ni sciis, kiujn bankojn ni preterlasis, tial de tie ni ĝiris la pliparton de la kontanta mono al niaj svisaj bankkontoj. Mi aĉetis multekostegajn kolierojn, braceletojn, ringojn, broĉojn, ornamitajn per briliantoj. Ni devis rapidi.

– Karegaj sinjorinoj! Hieraŭ mi ricevis telegramon de Alberto Alfredo Demetrio Senchaw. Li estas ĉefkonsilisto de la Komerca Ministerio de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo. Li volas vidi min laŭeble plej baldaŭ. Mi devas raporti pri la konkluditaj negocoj, kontraktoj. La alvoko trafis min neatendite, mi kredis havi ankoraŭ du monatojn. Tre malfacile mi povus senigi min je via eminenta societo. Mi scias, ke vi ambaŭ havas multe da libera tempo, sopiras liberecon, mondovidadon... Tial permesu al mi plenumi ĉion ĉi. Kun granda ĝojo mi invitas vin al Rio. Veturu kun mi el Ĝenovo! Ĝuu mian gastamon!

– Sed estas ja malfacile eĉ imagi!... Tiel subite...

– Vi ne bezonas imagi tion, ni ja veturos ne per la flugiloj de fantazio. Nia trajno ekiros postmorgaŭ je la oka matene. Kompreneble, ĉiujn eventualajn kostojn pagos mi. Ekde la aĉeto de tualeto ĝis la brazila gastigo. Kun via afabla permeso kunveturos du miaj bonaj amikoj, Ladislao kaj Akoŝo. Eĉ: ankaŭ la muzikistoj Oskaro Virág kaj Jozefo Steiner, por ke ne manku bona humoro kaj amuziĝo.

Vilhenjon mi konfidis al Aleksandro Klaár. Malfeliĉa besto ne

eksentis, ke mi definitive forlasos ŝin. Aleksandro tre ĝuis la societon de Vilhenjo.

En Ĝenovo mi rezervis plurajn apartamentojn de Hotel Caesar por Margareto, Klaro, Ladislao Harmath, Akoŝo Jarinay kaj por la du ciganmuzikistoj. Mi luis la ĉinan apartamenton. Dum la tago de nia alveno, post kelkaj horoj mi interesiĝis ĉe la akceptejo de la hotelo, kiam veturos ŝipo al Rio-de-Ĵanejro.

– *Signore!*[27] Mi bedaŭras, ĝuste antaŭhieraŭ elnaĝis la vaporŝipo, plena de pasaĝeroj, unuavice de elmigrantoj. La sekva veturos plej baldaŭ eble post kvar aŭ ses semajnoj. Ĉu tien vi bonvolus veturi?

– Jes, sed ne gravas. Tiel ni havos okazon pasigi agrable ĉi kelkajn semajnojn.

– Kun pura koro mi rekomendas, ke veturu per aŭtomobilo al la Francia Riviero, Monte Carlo. Sed ne preterlasu ankaŭ ĝian ĉirkaŭaĵon!

– Dankon por la rekomendo. Se mi petos, ĉu vi povos rezervi al ni du aŭtomobilojn?

– Kompreneble, *signore*. Mi petas vin, unu tagon antaŭe mencii la aferon.

– Mi sentas min en la paradizo! – akceptis min Margareto en sia apartamento, kiam mi returniĝis. Antaŭ ŝi, sur la tablo staris du glasoj kaj duone malplenigita botelo da ĉampano.

– Venu! Al vi mi lasis ĝin. La aliaj iris malsupren al la bordo. Poste ili trairos la promenejon. Nur por vespermanĝo ili revenos.

Mi sentis, ke la sango de ĉi tiu virino ekbolis. Mi ne trinkis la ĉampanon, destinitan por mi, kvankam ĝiaj marko kaj produkto-

27 sinjoro (itale)

jaro tre allogis min. Sed senlime mi volis ĝui ĉiujn voluptaĵojn de Margareto, volis malkovri, deĉifri ĉiujn sekretojn de ŝia korpo.

Senvorte mi brakumis ŝin. Ni interkisis kiel kunkutimiĝinta paro. Dum mi forte alpremis ŝin al mi, mi sentis, ke sub sia negliĝo ŝi „portas" nur sian nudan haŭton...

Post duonhoro ŝi decidis, rakonti al mi sian vivon, ĉar ŝi volis liberigi sin je sia prema pasinteco.

– Mi originas el eminenta familio el ĉirkaŭ Trenĉino. Mia patro estis Pál Kemeniczky, mia patrio Anna-Mária Pleibert. Mi havis du fratinojn: Clementina kaj Amália. Nia despota patro devigis ilin ambaŭ en klostron. Postevente mi juĝas tiel, nur pro tio, ke en ilia infanaĝo ili multe ploris, nokte ne lasis lin trankvile dormi! Patrino malsaniĝis pro la kruelaĵoj de Patro kaj falis en melankolion. Juna ŝi mortis. Mi estis edukita alimaniere. Kvazaŭ Patro volus ripari antaŭ la Eternulo sian tiranecon kontraŭ miaj fratinoj, la ĝismortan turmentadon de Patrino, li donis al mi ĉion necesan kaj deziratan. Sed nur en sia nekutima maniero. Li ludis kun mi kiel kun katido. Mi akiris seriozan klerecon; mi dankas por ĝi mian onklinon, kiu estis same perfortema, sed ĉion elbatalis por mia intereso. Eble ŝi faris tion pro tio, ke ŝi ne ŝatis Patron. „Katideto" ne bezonus lerni la germanan, francan, anglan, kaj ankaŭ la fortepiano servus al ŝi, por ke ŝi ludu kaŝludon sub ĝi. Patro terure ŝatis amuziĝi kaj ridi. Li aranĝis popolajn festojn, kartopartiojn, ĉevalkurigojn, kiujn tre multaj vizitis. En tiaj okazoj libere fluis vino, brando, eĉ la hundoj manĝis viandon. Kiu fariĝis tiel ebria, ke li ne povis stariĝi de la tablo, konsideriĝis vera heroo, kaj kiu finis sian drinkokarieron sub la tablo, gajnis la unua premion. Min gajnis Paŭlo de Majtény en kartopartio, en kiu la vetaĵo estis miaj mano kaj doto.

– Sed tio estas ja terura! – mi rimarkigis kaj brakumis ŝin al mi.

– Humiliga kaj neeltenebla! – ŝi daŭrigis ploretante. – Tiutempe mi apenaŭ transpasis la dek-okan jaron, sed post jaro mi jam naskis. La barona moŝto volis filon, kaj eĉ pli multe li malŝatis min, kiam la Kreinto sendis al li filinon. Mi luktis per ĉiuj fortoj, dentoj kaj ungoj kontraŭ tio, ke per sia vinodora, cigarfetora buŝo, gluecaj lipharoj kaj barbo, ŝvitinta, misodora korpo li tuŝu, subigu min. Plej ofte vane! Pro lia salivo min kaptis vomemo, mi svenis pro la fizika doloro, naŭzo kaj malestimo. Mia plurtage daŭranta migreno ĉesis nur por horoj. Aŭ kiam li eliris kun siaj kompanoj por pli longa tempo en la ĉasodomon en akompano de ciganmuzikistoj, ciganinoj kaj ceteraj senhontaj virinaĉoj.

– Iun tagon, post kiam la Sinjoro aŭskultis mian peton, lia plej ŝatata ĉevalo Fulmo deĵetis lin, kaj dum du tagoj li baraktis kontraŭ la morto. Post kiam li forlasis la mondon de la vivantoj, mia vivo ŝanĝiĝis. Mi konfidis la mastrumadon al iu fidebla parenco nia. Kaj mi kun Klara travojaĝis plurajn landojn de Eŭropo.

Post tio mi estimis, amis Margareton ne nur kiel admirindan virinon, sed ankaŭ kiel iun, kiun viktime taŭzis la sorto, tamen kapablis denove malfermi siajn petalojn kaj doni al mi ĝojon kaj kontenton.

Dum la konsumado de la sep-persona vespermanĝo, surtabligita en mia apartamento, mi rimarkigis, ke ni malfruis la vaporŝipon, kaj ni povos pasigi kvar ĝis ses semajnojn kun agrabla ripozo kaj distriĝoj. La ĝojo, entuziasmo estis granda.

En Nizza ni pasigis plurajn tagojn. Ĉiufoje ni manĝis en alia restoracio; ni elektadis inter la plej delikataj, plej multekostaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. La unuan premion tamen alproprigis la rostita kapreolaĵo, dekorita per trufoj. Nian societon entuziasmigis unue la spektaklo de la surtabligo, poste tiuj neordinaraj gustoj, kiujn oni povas nur senti sed ne priskribi. Sur la marborda

promenejo en Nizza niaj elegantaj kostumoj vekis ĝeneralan atenton. Ni fariĝis la centro de la societo.

– Oni ĉirkaŭsvarmas vin, Tasilo, kiel ciganmuzikistoj en la viena amuzlokalo de Laxemburg! – rimarkigis Oskaro Virág.

Ankaŭ Jozefo Steiner ne detenis sin de komento.

– Kaj mi tiel bele, tiel bele basakompanus vin, ke vi krevus pro plezurego!

– Ne ja, mi ne mortus proe! – mi oponis. – Ĉu ĝuste nun, kiam ni estas veturontaj al Brazilo?!

Vilhelmo iom meditis pri mia respondo, poste rezignacie aldonis:

– Prave, ja prave, kompreneble...

– Brila kariero atendos vin en Rio! En la tuta lando eĉ unu ciganmuzikisto ne estas! Se vi komencos ludi, ĉies koro krevos pro plezuro... Tio estas certa...

– Nu, tio ne estos bona, ĉar tiam estos kapute al ili – rimarkigis Joĉjo.

– Ja ne tiel! – mi retrankviligis lin. – Nur simbole mi diris.

Videblis je lia vizaĝo, ke li ne komprenas.

– Senbule, sen...bule... ĉu? Do bone.

Monako situas sur la bordo de la Mediteranea Maro. Ĝia norda najbaro estas Francio. Ĝia areo ampleksas eble du kvadratajn kilometrojn. Ĝia ŝtatformo estas oficiale konstitucia monarĥio, sed fakte la unupersona regado de la duko dominas. La pliparto de ĝia loĝantaro estas francoj, italoj kaj ceteraj nacianoj. Ĝia klimato estas mirinda. La Alpoj ŝirmas ĝin de mistraloj, la malvarmaj nord-okcidentaj ventoj. La jara meza temperaturo estas 19 celsiaj gradoj. La nombro de sunhoroj en unu jaro estas pli ol 2700. Tiel prezentis mallonge la direktoro de nia hotelo Monakon, antaŭ ol ni ekiris.

Monako kun sia haveno kaj Monte Carlo aspektis kiel juvelkesteto. En la haveno aspektis la multaj blankaj kaj alikoloraj velboatoj kiel gemoj! La panoramo el la monaka duklando profunde impresis nin. (La du muzikistoj kaj ankaŭ Jarinay kaj Harmath ne kunveturis.) Malfacile mi povis kaŝi al la mirgapantaj Margareto kaj Klaro, ke mi konsideras longa ilian plezuriĝon, mi deziris vidi prefere la ludosalonojn. Kompreneble, ankaŭ tio okazis. Ĉe la pokera tablo bedaŭrinde ne povis stari Milico, kvankam ŝiajn signojn mi tre bezonus. La nekonataj ludantoj malmulte parolis, sur iliaj vizaĝoj legeblis nenio. Mi ludis kun sensentaj maŝinoj. Senbabile ili blufis, plej ofte havis bonajn kartojn. Mi multe perdis. Feliĉe, miajn du akompanantinojn okupis denove la vidaĵo, kiu malfermiĝis al ili sur la vastega teraso de la kazino.

– Volonte mi estus dukino aŭ dukedzino en Monako! – revis ili ambaŭ.

– En tiu okazo mi estus via duko...

„Via malriĉa duko, ĉar mia kapitalo forte konsumiĝis.” Mi ne kuraĝis eldiri tion. Reveturinte el Monako, mi monigis parton de mia briliantkolekto el sesdek pecoj, en kiu la plej malgranda estis du-karata gemo, sed troviĝis ankaŭ 33-karata.

– Ĉu f-ino Klaro ne havus emon iom promeni en la parko? Ĉu mi rajtas vin akompani? Aŭ ĉu ni iru al la promenejo? – mi proponis, se mi volis resti sola kun Margareto.

Tiafoje Harmath, laŭ nia interkonsento, intermetis:

– Kara Tasilo! Ni neniel volas ofendi vin, sed laŭ nia scio f-ino Klaro deziras prefere nian societon. Nur ni kapablas aŭskulti ŝin kun plej granda kunsentemo de la mondo, kiam ŝi parolas pri siaj promenoj en la arbaro, krome ni povas vidi la pinarbarojn en ŝiaj nekontraŭstareble brilantaj bluaj okuloj!

Járay kompletigis:

– Ĉu vi ankoraŭ memoras, kiel bone ni tri amuziĝis dum la longa trajnoveturo?

F-ino Klaro ruĝiĝis-paliĝis, klopodis kaŝi sian embarason per la ĉifado de sia brodita poŝtuko. Ŝi stariĝis de unu piedo sur la alian, dume mallevis siajn revemajn, marbluajn okulojn. La simbolon de senkulpeco iu modelos iam evidente de ŝi.

Tiel kun la baronino mi vagadis tra la stratoj kaj muzeoj de Ĝenovo. Ĉe la ombra ĝardena tablo de la restoracio de Hotel Astoria ni pasigis la tempon en intima duopo. Iufoje ŝi interesiĝis pri la brazilaj indianoj.

– Ekzistas multspecaj indianoj – mi rakontis. – La infanoj ne vizitas lernejojn, la gepatroj ne punas ilin. Cetere la indianoj, portugaloj kaj la afrikaj nigruloj tre intermiksiĝis. Kelkaj senharigas, tatuas aŭ farbas per arbaraj plantoj la korpon, la hararon tondas rondforma. Ili preparas sian liton el arbofolioj, arboŝeloj. Troviĝas tiaj, kiuj traboras sian naz-alon kaj enmetas ringon; cetere ili ne portas veston...

– Terure ekzote! Ho ve! Prefere ne rakontu plu!!! – teruriĝis mia akompanantino.

La ideo de f-ino Klaro estis sendi bildkartojn al niaj konatoj pri nia brila vojaĝo.

Ni aĉetis kvindek bildkartojn. Kompreneble, ankaŭ la muzikistoj ricevis kelkajn el ili. Klaro feliĉe helpis ĉe la skribado. Ĉiun bildkarton ni ĉiuj subskribis. Laŭ mi miaj kartoj estis la plej gravaj, ĉar la adresitoj estis Wilhelm Singer, la ĝenerala direktoro de la banko INTAG kaj aliaj riĉaj personoj, kun kiuj mi konkludis negocojn. Laŭ mia memoro mi skribis ion similan:

Altestimata Moŝto! Kun la ŝuldata respekto mi salutas vin kune kun mia eta kompanio el la fora, fabeleca Ĝenovo. Daŭre min okupas, kiel mi povus esprimi mian dankemon por la bon-

faraĵoj de via altestimata moŝto. Via humila servisto Melĥioro kaj la membroj de lia kompanio.

Singer certe ne ĉi tie serĉigos min, mi opiniis, li ja apenaŭ supozas pri trompisto, ke sur bildkarto li sciigas sian veran restadejon. La spurhundoj do povas flarserĉi min en ĉiuj landoj krom Ĝenovo.

Bedaŭrinde mia kalkulo ne praviĝis. La 21an de septembro matene oni frapegis sur la pordo de mia hotelĉambro. Mi konjektis, ke ne la kelnero, ĉar tiel frue li kutime ne aperis kaj estis ĉiufoje rekonebla pro sia diskreta frapetado.

Ne kaj ne!...

Tamen mi ne povas eviti rememori tiujn humilajn minutojn, kiam en la ĉeesto de tri detektivoj mi devis vesti min. Miksante italajn kaj germanajn frazojn, ili prezentis la kaŭzon de mia suspektigo: uzo de falsa nomo, bankaj fraŭdoj en Vieno, plurfoja dokumentofalsado, internacia serĉigo, falsado de akciaj biletoj, miskonduko de bankaj gvidantoj.

Indignigite mi deklaris, ke mi estas diplomato, ĝuas eksterteritoriecon.

La sinjoroj tiam malpli laŭte postulis, plie nur petis, ke mi bonvolu veni kun ili al la ĝendarmejo, por klarigi la miskomprenon. Sed mi insistis, ke ili informu la brazilan konsulon, ĉar nur en lia ĉeesto mi pretas respondi iliajn demandojn.

En la ĝendarmejo mi devis atendi kvar plenajn horojn, ĝis aperis Assis Emanuel Jardim. Unuafoje ni vidis unu la alian. Dum nia interparolo inter kvar okuloj mi montris al li du akciojn de la Banca Rio de la Plata kaj la akreditan leteron de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo, skribitan en kvar lingvoj. En ĝi tekstis interalie: neniu malhelpu la plenumon de mia konfidenca diplomatia misio, eĉ oni estu ĉiel helpa al mi.

Post kiam la konsulo laŭtlegis en la ĝendarmejo la itallingvan varianton de ĉi tiu dokumento, li petis la instancojn liberigi min kune kun mia akompano sekve de la internaciaj rajtoj de diplomatoj, t.e. pro mia rajto de imuneco, temas ja pri miskompreno.

Evidentiĝis, ke ĉiujn membrojn de mia kompanio oni alkondukis.

Almenaŭ duonhora sekreta intertraktado sekvis en alia ĉambro, kiun mi ne povis partopreni.

Sed ties rezulton mi akceptis kun senlima ĝojo, ĉar post listigo de niaj nomoj ni ricevis tian dokumenton, kiu unusence pruvis nian brazilan naciecon, nian konfidencan diplomatian mision. Ĝin konfirmis ankaŭ la brazila konsulo per siaj subskribo kaj stampo.

Kiam mi denove restis en duopo kun Assis Emanuel Jardim, mi proponis al li la jam pli frue prezentitajn du akciojn. Mi referencis pri Sergio Cesar Ramos, kiu gvidis la sekretariejon de la Ministerio de Internaj kaj Militaj aferoj. Li rajtigis min, donaci al miaj helpantoj akciojn de la banko de Rio. Mi alvokis lian atenton, ke dum unu-du jaroj li ne monigu ilin, ĉar ilia valoro daŭre plialtiĝos. Cetere pri la malkovro de la naftokampo en Gran Chaco ankaŭ li jam informiĝis.

Oni kunvokis nin ĉiujn, kaj la ĝendarma komandanto kaj la brazila konsulo petis nian pardonon pro la bedaŭrinda incidento. Ni veturis per taksio al la brazila eksterlanda misiejo, kie, krom afablaj vortoj, oni akceptis nin kun bufeda lunĉo. Vane oni klopodis restigi nin, ni decidis, post duhora gastado, fini la festadon.

Jarinay kaj Harmath evidente konjektis, en kiel rafinita maniero mi elsavis nin. Ĉiuj laŭdis mian saĝon.

Bedaŭrinde mi jam ne havis sufiĉan monon, por aĉeti ŝipbiletojn al Rio-de-Ĵanejro ankaŭ por la du muzikistoj. Mi donacis al ili

miajn briliantajn manumajn kaj ĉemizbrustajn butonojn, dikan orkolieron, por ke ili monigi tiujn. Por ties prezo ili povus aĉeti eĉ po dek biletojn.

Akoŝo kaj Ladislao veturis al Parizo, por prove trovi tie sian bonŝancon. La adiaŭo ne suferigis Klaron, ĉar ŝi jam pensis pri Brazilo.

Margareto kaj Klaro eniris tiel la marŝipon Intercontinental, kvazaŭ ili aĉetis bileton por la lando de promesoj (pli precize mi donacis al ili la biletojn, sed tio ne gravis ĉi-koncerne). Ankaŭ dum sia ĝisnuna vivo ili ne devis mizeri, tamen ili sopiris pri neimageble bela tera paradizo. Sud-Ameriko estis por ili tiu ideala loko, kie klera, riĉa eŭropano povas efektivigi luksan vivon. Krome kaj kreme en mirinda palaco kun priservo fare de armeo da servistoj. Ili kredis, ke la vivo konsistas tie nur el amuziĝoj, baniĝoj, ekskursoj. La servistoj plenumos ĉiujn iliajn dezirojn kaj ne konsideras iliajn plej neatenditajn petojn strangaj.

Mi ne atendis paradizajn kondiĉojn en Brazilo. Min zorgigis, ke jam evidentiĝis ĉiuj detaloj de mia naftotrompo en Gran Chaco. Miaj du akompanantinoj povus ekscii, kiu mi estas efektive, kaj mia aresto eble sekvigos mian malliberigon. Miaj influhavaj najbaroj, miaj iamaj amikoj evidente ne volos helpi min, ja tiam ili sin mem diskreditus. Cetere ankaŭ ili devos peli sin post sia mono, ĉar ili aĉetis tre multajn akciojn; la ŝtato Rio-de-Ĵanejro alprenis garantion por ili.

F-ino Klaro trovis kompanion konvenan al si – kelkajn anglajn dandojn kaj damojn. Plej ofte ili kune pasigis la tempon sur la ferdeko aŭ en la salonoj. Margareto kaj mi klopodis lasi solaj la gejunulojn; kun la familianoj de la geangloj ni estigis nur formalajn kontaktojn.

El Margareto forte radiis la ĉarmo de matura virino. Ŝi estis kiel

bongusta, ruĝa pomo, kiu preskaŭ petegas esti gustumata. Mi ne estas poeto, estas do sensence tiel vortigi; tio estas pli ĝuste katakrezo, pomo ja ne povas petegi, prefere igas onin deziri ŝin.

En la ŝipo mi plu rakontis pri la brazilanoj.

– La vorto kaŭĉuko estas indian-devena. Nuntempe el Brazilo oni eksportas plej multe en ĉiujn landojn. Estas tre interese, kiel pretiĝas kaŭĉuko. La kolektisto tranĉas padojn en la praarbaro, tra ili li aliras la arbojn, distancajn kvindek ĝis cent metrojn unu de la aliaj. La du padojn ĉiutage li uzas alterne, por ke la arboj povu ripozi post la ŝvitigo. Li faras konvenan tranĉon sur la arboŝelo, submetas stanan kruĉeton por la akcepto de la gumolakto. Por la elgutinta lakto li povas iri jam post kelkaj horoj. De unu arbo li povas kolekti kvar ĝis kvin kilogramojn. La gumolakton oni fumaĵas, kaj dume ĝi formiĝas malmola pilko...

– Ej nu, ej nu! – incitetis min Margareto. – Fine evidentiĝos, ke vi ne havas kastelon, havaĵon, sed kolektas kaŭĉukon en la praarbaro...

– Ne, ne – mi protestis kaj transprenis ŝian stilon. – Fakte mia grandbiena sistemo baziĝas ankaŭ nun sur sklava laboro, kvankam la sklavecon oni jam delonge malpermesis. Sed mi dungas liberigitajn nigrulojn, kiuj jam komencis kapitalistajn entreprenojn. Ili uzas maŝinojn, kemiajn sterkojn, plantoŝirmajn substancojn.

– Tio estas ja io alia! Se tiel, tie gutas mielo el la ĉielo.

– Ne, tiu estas alia regiono. La mielo estas tie kafarbustoj, maizo, sisalo, kotono, fazeoloj, bananoj kaj ananasoj. Ĉevaloj, bubaloj, bovinoj, ŝafoj, kaproj svarmas ĉie...

Ni ŝercpiketis unu la alian, kelkfoje ankaŭ f-ino Klaro aliĝis al ni. Sed mi neniam liberiĝis de la premo, ĉar zorgigis min la proksima futuro.

Kiam ni alvenis en la haveno de Rio, la entuziasmo de Margareto kaj Klaro kulminis. Ili miris pri ĉiu bagatelo kiel infanoj. De la ŝipo mi sendis telegramon al mia ŝoforo, ke li atendu nin.

Kiom ajn bonfartigis min la aero de la „hejmo", interne mi estis ekscitita. Kiu scias, kiom da surprizoj atendas min – ekde la opinioj de miaj konatoj tra la Banca Rio de la Plata ĝis la plena kolapso.

Emilio rimarkigis, ke laŭdinda gesto estis miaflanke, kiam por duonjaro mi antaŭpagis lian salajron kaj tiujn de la servistaro. Nun denove tempas aranĝi la pagendojn. Pri Milico venis nenia famo, sed estas malĝojige, ke ŝi kunprenis unu el la Rolls-Royce. Ke ŝi ne revenis, tio konsidereblas favora fakto en mia nuna situacio.

La personaro akceptis kun ĝojo mian alvenon. Ili ĉirkaŭsvarmis Margareton kaj Klaron, atendis iliajn instrukciojn. Tamen ili petis nenion de iu ajn, ja nenion ili bezonis. Ili okupis sin per la ĝuado de la belaĵoj de la palaco kaj ĝardeno. Sian raviĝon ili esprimis ofte per feliĉaj suspiroj.

Mi telefonis al Aristido de Telekess.

– Kie vi forestis? Kelkajn monatojn mi ne vidis vin – li demandis.

– Volonte mi rakontos, se ni renkontiĝos – mi respondis.

– Eble mi havos pli da direndoj. Estis pli bone, ke vi ne estis hejme.

Mi sendis por li mian Rolls-Roys. Mi prezentis lin al Margareto kaj Klaro.

– Melĥioro diris, ke ŝi venigis kun si du brilajn stelojn. El la ĉielo.

– Dankon por la komplimento. Kaj ni eĉ pensi ne riskis, ke en Rio iu salutos nin en elokventa hungara lingvo.

Ni retiriĝis. Aristido pentris tre malĝojigan bildon pri mia situacio. Kiam mi forveturis al Eŭropo, ankoraŭ ardis la naftofebro. Laŭ la paso de la tempo ĉiam pli multaj faris viziton al la regiono Gran Chaco, sed eĉ spurojn de nafto kaj ekspluatado ili ne trovis. Jam de monato evidentiĝis la trompo, sed la brazila registaro kaj la konsilantaro de Rio-de-Ĵanejro – la du plej gravaj akciuloj – malfruigis la eksplodon de la skandalo.

La aĉetado de la akcioj de Banca de la Plata estas pro teknikaj kaŭzoj suspendita. Jen aperte, jen sekrete oni vendis preskaŭ senpage la akciojn. Oni povis aŭdi ankaŭ pri memmortigo de detruitaj etinvestantoj.

Aristido donacis al mi du-tri kilogramojn da tute senvaloraj paperoj. Li kolektis ilin el la paperkorboj de registaraj oficejoj.

– Mi ne pensas pri vi ion malbonan, sed viaj ekspertoj certe trompis vin. Vi estas ilia viktimo tiel same, kiel cent-miloj en la lando. Sed mia opinio estas nesufiĉa, por ke ĉe enketado oni deklaru vin senkulpa.

Nun mi komencis vere timi, kvankam mi ne montris tion. Mi deviĝis rekoni la fiaskon kaj krom esti konsternita, mi demandis lin pri miaj perspektivoj.

– Meĉjo! Estas feliĉe, ke mi ne sidas en via haŭto. Mi nun dungus bonan advokaton kaj dum kelkaj tagoj mi nepre vendus mian havaĵon. Reŝipus al Eŭropo. Li vidis la miron sur mia vizaĝo.

– Alie oni povus vin respondecigi! Kaj tiam ĉio perdiĝos!

Ankoraŭ samtage mi vokis mian advokaton Paulo Dani Santos. Konante la situacion, ankaŭ li vidis kiel eblan elturniĝon la tujan likvidon de mia tuta havaĵo. Mia kastelo kun ĝiaj sonĝe belaj ĝardenoj, miaj pli malgrandaj tabak- kaj kafoplantejoj, akcioj de aliaj firmaoj vendiĝis duonpreze. Kvazaŭ mia advokato antaŭkalkulus kun ĉi tiu evento, ĉar en unu-du horoj li trovis aĉet-

antojn por ĉio. Helpe de lia amiko notario ili pretigis por la sekva tago ĉiujn kontraktojn. Mi fariĝis senhava... Prave, en miaj svisaj kontoj amasiĝis novaj miloj da dolaroj.

Miaj du gastinoj perceptis el ĉi tiu febra aktivado nur tiom, ke mi aranĝas miajn urĝajn aferojn. Ili ne scivolis pri la detaloj. Ankaŭ plu ili estis okupataj de la lukso, kiun miaj palaco, ĝardeno kaj personaro prezentis al ili.

Plurfoje ili promenveturis en la urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Nek ili, ne mi sciis, kiu estos ilia lasta veturo.

La akciojn, ricevitajn de Aristido mi envolvis en miajn vestaĵojn kaj metis inter la vojpakaĵojn. Dume ĉirkaŭ cent dekoritaj, stampitaj „aktoj", restintaj netuŝitaj, fariĝis mia sola palpebla brazila „heredaĵo". Mi kalkulis tiel, ke en Eŭropo mi ankoraŭ povos utiligi ilin.

La seniluziiĝo de Margareto kaj Klaro estis enorma, kiam mi anoncis, ke pro aranĝo de miaj neprokrasteblaj negocoj mi devas denove ŝipi al Eŭropo. Ankaŭ plu mi proponis mian gastamon. Mi konsolis ilin: „Vi estos la direktantoj, mastroj de miaj kastelo kaj malgranda mastrumo kaj povos libere disponi pri ĉio."

Mi postlasis grandsuman kontantan monon. Ili ne konjektis, ke mi transdonas mian efemeran grandecon, kaj la donacita sumo servos al ili por la kovro de la kostoj de reveturo.

Mi ne eldiris la veron, ne difektis ilian bonan humoron. Mi ŝparis al ili, indigni en mia ĉeesto.

Mi bezonis ankoraŭ du tagojn, por akiri falsajn dokumentojn.

Mi sukcesis aĉeti nigre bileton kontraŭ iom da kontanta mono por la marŝipo Continental. Laŭ miaj novaj paperoj mi estis berlinano kun la nomo Robert Springer, direktoro de la eksporta-importa firmao Schimex.

Ĉe la enŝipiĝo la uniformitaj kaj civilaj detektivoj de la brazila

polico kontrolis la ŝipveturontojn. Mi devis ludi la rolon de kontenta, decida, leĝera, riĉa, memfida kapitalisto. En la germana, franca kaj portugala lingvoj mi laŭdis Brazilon. Mi rakontis, ke ni subskribis kontrakton favoran kaj por la brazila registaro kaj por mia firmao pri liverado de brazila ligno. Interŝanĝe Germanio liveros lignoprilaborajn maŝinojn en la ĉefurbon.

„Miaj kontrolistoj" klopodis laŭeble plej rapide liberigi sin je mia sonorvoĉa personeco kaj baldaŭ lasis min al mia vojo.

Ne malproksime de mi iu okulfrape elegante vestita damo sciigis siajn donitaĵon en la franca. Sur la ferdeko akompanis min matrosoj al mia kajuto. La damo, kiel skribite en la lernolibroj de etikedo, lasis fali sian blankan poŝtukon, por ke mi povu levi ĝin. Tiel komenciĝis mia konateco kun Katerino Chempce. Ŝi portis siajn longajn blondajn harojn nodigitaj, dekoritaj per harbroĉoj. Ŝian vizaĝon elstarigis ĉi tiu eleganteco, de kiu cetere radiis gajo. Kiel poste evidentiĝis, ankaŭ petolemo.

Ŝi loĝis en Parizo, kie ŝi vivis daŭran societan vivon kun sia edzo, varian per akceptoj, bankedoj, vespermanĝoj, premieroj, koncertoj. Sed Katerino estis nur juvelo por sia edzo. Objekto... En societo li tre afable traktis ŝin, sed hejme senindulge dominigis sian volon. Disputoj okazis ofte inter ili. Nur pro tio ili ne divorcis, ke signifa perdo trafus baronon Vincent Chempce. Kaj Katerino devus seniĝi je kelkaj siaj nemoveblaĵoj. Lia edzo ĝoje lasis forŝipi ŝin al Rio por duonjaro al la familio de sia kuzino. Ĉi tiu tempo alportis al ambaŭ ili kvieton.

Ĉi tiujn diskretajn aferojn Katerino rakontis seninterrompe kelkajn horojn post nia interkonatiĝo. Ŝi atendis kompaton, kunsenton de mi, kaj ŝi ankaŭ ricevis ilin de mi senmanke.

Ni dividis ankaŭ niajn korpojn reciproke. La kun mi samaĝa virino, sentema al plezuroj, konsideris niajn kunestadojn kiel ĉie-

lan benon. Mi same opiniis, kvankam eĉ por momento mi ne kredis, ke la Reĝo de la Universo, la Eternulo kutimas doni sian benon pri tia adulto.

Kompreneble, mi klopodis ŝajnigi min plej plaĉa. Kion mi rakontis en la ĉeesto de la kontrolantaj detektivoj, estis nur ŝerco – mi diris al Katerino. Poste mi prezentis mian historion pri la rumana kaj brazila naftokampoj. Mia riĉeco kaj famo ne interesis ŝin. Multe pli okupis ŝin, kion ŝi ne povis ricevi de sia edzo. Jam tiam mi decidis, ke ajnapreze mi retenos ŝin al mi. Ŝia bankiera edzo same faris ŝin „alloga", li ja proponis kvazaŭ persone al mi novajn monakirajn eblojn.

Komence Katerino zorgis pro tio, ke ŝi renkontos konatojn sur la ŝipo, sed poste ŝi trankviliĝis. Ŝi ne konjektis, ke mi pli multe klopodas eviti tiajn renkontojn. Mi havis pli multe por sekreti.

– Propre mi ne estas racia temperamento – ŝi diris. Ĉiuj miaj pensoj turniĝas ĉirkaŭ romantiko, eĉ kelkfoje eĉ sentimentalismo. Tamen mi povas regi miajn emociojn. Kapablas direkti mian volon. Se oni devigas min al tio. Mia edzo faras tion ĉiuminute. En Rio, flanke de mia kuzino mi liberiĝis de ĉiuj katenoj; ilin anstataŭigis libera pensado. Eĉ nun mi estas sub ties vibriga influo. Ŝajnas, kvazaŭ mi trinkus francan ĉampanon en malgrandaj porcioj.

– Cafe de Paris, Dom Perignon, J. P. Chenet, Krug Grande Cuvée, Laurent Perrier Brut, Laurend Perrier Rosé, Mumm Cordon Rouge – mi listigis la elstarajn markojn.

Ŝi estis mirravita de mia „klereco".

Alvenis la okazo por sciigi al ŝi: mi akompanos ŝin al Parizo, mi ja havas tie ankaŭ cetere kelkajn negocojn...

Ŝiaj okuloj komencis brili. Preskaŭ mi aŭdis, kiel forflugas el ŝia kapo la resto de racieco, ŝian koron plenigas romantiko kaj sentimentalismo. Ŝi plektis siajn brakojn ĉirkaŭ mia kolo... Poste

longe ni amoris...

Parizo... La panoramon regas Sejno, kiu dividas la urbon. Multaj pontoj kondukas super ĝi. Dum sia ĝisnuna historio ĝi estis preskaŭ ĉiam centro de modo, artoj kaj amuziĝoj. Kompreneble, ankaŭ la ideo de libereco devenas de ĉi tie; kvazaŭ ĉi tiu vorto havus nur ĉi unusolan interpreton. Eble mi tro simpligas la aferon: kiu ne estas revoluciulo, tiu fermendas en Bastilo aŭ senkapigendas. La reĝa familio estis murdita. La potenco falis en la manon de komunumo, gvidata de Danton, Marat kaj Robespierre. Almenaŭ 4000 homoj estis ekzekutitaj, ĉar laŭaserte ili estis malamikoj. Inter ili troviĝis ankaŭ Danton kaj Camille Desmoulins. Per tio la komunumo perdis sian moralan subtenon, tial moderuloj transprenis la potencon, kiuj sendis Robespierre kaj liajn aliancanojn sub la gilotinon. Ties potencon ili povis faligi kun la helpo de Napoleono Bonaparte. La imperiestro denove skribis propramane la historion, ĉar li volis krei „france romian imperion”. En Ruslando li falis. En 1848 okazis refoja franca revolucio, kaj fondiĝis la dua franca respubliko. Denove estis miloj ekzekutitaj. Louis-Napoléon Bonaparte, la nevo de la pli frua imperiestro kronigis sin en 1851 imperiestro sub la nomo Napoleono la 3a. Dum lia regado formiĝis la hodiaŭa Parizo. En 1853 li komisiis baronon Haussmann modernigi la urbon. Tiu malkonstruigis grandan parton de la malnova kerno de Parizo, projektis larĝajn, rektajn aleojn kaj bulvardojn. Tiam fariĝis Bois de Vincennes publika ĝardeno. Post la malvenko de Napoleono kontraŭ la prusoj fondiĝis la tria franca respubliko. La 28an de januaro 1871 Parizo liberiĝis el sub la prusa regado. Dum la periodo de la tria respubliko Parizo travivis denove sian brilepokon; tiam estis konstruita interalie la Eiffel-turo, Moulin Rouge kaj en 1900 ekfunkciis la metropolitena

reto de Parizo.

Mi ne vere pretiĝis prezenti Parizon. Preterlasiĝis ja Champs Elisées, Etoile (triumfarko), Montmarte, Louvre, Notre Dame, la katakomboj, la Montparnasse-turo... kaj ankoraŭ multnombraj belegaj vidindaĵoj.

La familio de Katerino estis eminenta reprezentanto de la *haute-finance*, la financa aristokrataro, kaj kompreneble, apartenis al la *haute-volée,* la supra dek-milo. En Parizo amikoj ofte nomas sin karulo. Nu, mia karulinjo, la eleganta, riĉa, enuanta virino relative baldaŭ atingis, ke lia edzo, Vincent Chempce, membro de la direkcia konsilio de Banque Nationale akceptu min.

Li informiĝis, kompreneble, de Katerino, ke mi havas vastegajn naftokampojn en Rumanio, kaj laste mi akiris gigantan havaĵon en Brazilo. Laŭ nia interkonsento ŝi rakontis ankaŭ, ke mi savis ŝin sur la ŝipo, kiam matroso provis molesti ŝin.

Post tiel bonega rekomendo li baldaŭ deklaris: *Nous sommes amis,* do ke ni estas amikoj.)

Mi luis apartamenton en Hotel Paris. Ladislao Fürst, Aleksandro Klaár kaj Frederiko Vilhelmo Wetz veturis post mia unua voko el Vieno al Parizo. Ĝojante pri la revido, ni ĉampanumis kelkajn horojn. Sekvatage ni mendis tagmanĝon en mian hotelĉambron. Dume mi rakontis... Ili prenis por bona aŭguro, ke Katerino pli altiriĝas al mi ol al sia edzo. Sed la *Madame* estis nur eta parto en tiu plano, kiun mi preparis.

Nepris rakonti miajn brazilajn travivaĵojn. Mi kompatis la postlasitajn s-inon de Majtény kaj Klaron. Miaj kompanoj ne kredis pri Milico, ke ŝi forlasos min. Ili laŭdis min pro la malkovro de la „senfina” naftokampo.

Miaj amikoj jam konis la senvalorajn akciojn de Banca Rio de la

Plata. Parton da ili ni dividis inter ni. Ni volis nepre utiligi la monavidon de Vincent.

Unu post aliaj ili vizitis Vincent. Per vizitkartoj de germanaj, anglaj kaj svisaj bankoj ili rekonigis sin.

El la rakonto de Aleksandro Klaár, alinome Christopher Hillington mi scias, kiel okazis ĝenerale ĉi tuj interparoloj.

– Pardonu min, *Monsieur*[28] Chempce! Mi estas dungito de iu prestiĝa banko de Britio. Mia nomo estas Christopher Hillington. La nomojn de mia prezidanto direktoro kaj mia banko mi bedaŭrinde ne povas malkaŝi, ĉar mi estas komisiita per konfidenca afero.

Vincent ne povis kaŝi sian scivolon. Per ĝentila gesto li indikis, ke li okupu lokon en la grandega blanka ledfotelo. Sur lia vizaĝo aperis signoj de senpacienco. Li ŝatus urĝi sian gaston, sed diplomatece li retenis sin, eĉ regalis lin per franca konjako kaj kuba cigaro.

– Ripete mi mencias, *Monsieur,* ke la afero estas eksterordinare konfidenca, kaj povas esti, ke ĝi ŝajnos al vi iom bizara – sed nur ĉe la unua aŭdo.

– Vi faris min tre scivola.

– En la lasta tempo vi kelkfoje intervidiĝis kun grafo Tasilo von Festetich, kiu alŝipis rekte el Rio-de-Ĵanejro. Lia vera nomo estas Nivaldo Rodrigo Alvim. Antaŭ duonjaro oni komencis ekspluati en Brazilo tre riĉan naftokampon. La ĉefurbo kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo fondis apartan bankon por la vendado de la akcioj. Li aĉetis almenaŭ sepdek procentojn de la akcioj. La ceteron posedas probable tute eksterlandanoj.

– Jes, mi konjektas, ke temas pri la akcioj de la Banca Rio de la

28 sinjoro (france)

Plata. Sed ili ja valoras jam tre malmulte, eble ili eĉ ne estas cirkuligataj en la borso.

Sur la vizaĝo de Aleksandro Klaár aperis seniluziiĝo.

– Nu, se tiel, bedaŭrinde mi malfruis.

– Pardonu, sed mi ne komprenas la interrilaton.

– Pluraj eŭropaj bankoj preparis sekretan kartelon cele de tio, ke ĉi tiuj akcioj ne revenu al Brazilo. Nome, la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo disvastigis tra konvenaj kanaloj, ke la paperoj de la Banca Rio de la Plata valoras neniom, eĉ, la de vi menciita banko randas bankroton, ĉar la boradoj ne alportis rezulton. Fakte ne tio okazis! La brazila registaro dissendis siajn agentojn en la mondon, por aĉeti por groŝoj la cetere tre valorajn akciojn.

– Tio estas impertinenta manipulado el la plej senhontaj! – indignis Vincent.

– Pardonu, *Monsieur,* pro la sinceraj vortoj, sed via konato, Nivaldo Rodrigo Alvim estas unu el la agentoj de la brazila registaro, kiu baldaŭ komencos la plenumon de sia komisio.

– Jes, nun mi jam vidas la interrilaton. S-ro Tasilo jam dufoje demandis min pretere, ĉu mi havas brazilajn akciojn. Sed mi ne donis unusencan respondon, ĉar demandi pri io tia ne decas post mallonga konateco.

– Mi petas vin, *Monsieur,* estu tre singarda! Nepre informu la direkcian konsilion de via banko. Kompreneble, mi ne rajtas enmiksiĝi en vian decidon, sed mi petas vin aliĝi al nia kartelo. Ni ne havas tempon tekstigi skribe niajn konceptojn, ĉar en unu-du tagoj multnombraj spekulaciaj agentoj kaj akcioj de la Banca Rio de la Plata aperos en la pariza borso. La brazila komisiito lanĉos ĉi tiujn akciojn por malalta prezo, kaj liaj kunuloj daŭre aĉetos ilin... Ĉar temas pri pli granda kvanto, ankaŭ aliaj ekatentos la transakcion. Ili kredos, ke ĝi ŝajnas bona negoco. Tiam intervenos

la reprezentantoj de la eŭropaj bankoj. Dum la aŭkcioj valoras doni eĉ la dekoblon de la nominala valoro. La brazila registaro jam ne povos proponi tiel multe pere de siaj agentoj, kvankam ankaŭ tiel ĝi gajnus ne malmulte.

– Mi dankas vin, Sir Hillington, por la konfidencaj informoj. Kompreneble, vi ĉiel povos kalkuli je miaj helpo kaj diskreteco.

– Tasilo von Festetich, alinome Nivaldo Rodrigo Alvim direktos la tutan maĥinacion. Sed li agados fone.

– Ankoraŭfoje mi dankas, ke vi pensis pri nia banko.

Frederiko Vilhelmo Wetz aperis en reprezento de germana, Ladislao Fürst, alinome Jürgen Stephan Norden en tiu de sveda financinstitucio ĉe po tri bankoj. La kartelo baldaŭ kreiĝis. Ni povis komenci la konkretan realigon de nia plano, por kiu ankaŭ kelkaj makleristoj kunhelpis.

La preparo de la borsa agado okazis ĝis la limdato kaj en preciza maniero. Kun miaj kompanoj ni kunvenis en apartamento de Hotel Paris. Ni provludis kelkajn aŭkciojn. En la plej malbona kazo ni kalkulis je tio, ke ni vendos unu al la aliaj kelkajn akciojn de la Banca Rio de la Plata, se ne troviĝos sufiĉe da interesiĝantoj.

– Jam ĉe vendo de unu akcio ni estos gajnintoj – diris Fürst.

– Mi ne ŝatus kontentiĝi je tiom! – esperigis ĉiujn Freĉjo. – Ne zorgu, ĉiu bankiero kaptis la hokon. La logmanĝigo estis bona. La prezidanto de iu banko demandis, kiom mi postulas por la konfidencaj informoj. „Sed altestimata moŝto, ni ja navigas en la sama boato. Prave, mi ne havas informon pri tio, kiom da akcioj enborsiĝos. Kaj kiom el ili ni povos reteni. Tio estas komuna laboro, ni bezonas kunlabori! Se ni volas akiri bonan profiton, ni ne lasos reimporti la brazilan naftokapitalon!"

– Kara amiko! Se mi ne eraras, vi estas nur dungito en tiu eksterlanda banko, kiun vi ne deziris nomi. Mi volus esprimi ankaŭ

per mono mian dankon. Prave, nur per simboleca, tamen ne malmulta sumo...

– Kiel vi taksas, kiom estas en ĉi tiu obligacio? – Freĉjo feliĉe svingis la paperon, sed tiel, ke ni ne povu vidi la ciferojn.

Sur la obligacio estis skribitaj dek mil dolaroj. Ni interkonsentis, ke morgaŭ li ĝiros la monon al iu el niaj komunaj bankkontoj.

– Vi estas genio, karega amiko! – mi laŭdis lin.

– Eble jes, en ĉi unu afero, sed ankaŭ la bonŝanco kunuliĝis al mi. Sed vi, kara Meĉjo, kiel ideinto de la plano meritus pli ornaman epiteton.

Vincent evidente ne volis min plu vidi. Telefone mi sciigis al li, ke por la aranĝado de miaj aferoj mi devas forveturi por kelkaj semajnoj. Ni deziris unu al la alia ĉion plej bonan, sed eble ni ambaŭ sciis, ke neniam plu ni vidos nin. Sed Katerino kaj mi tre ofte ĝuis la ĝojojn de la revidoj.

Mi luis loĝejon pli malproksime de la interna urbo. Katerino disvastigis la informon, ke ŝi vizitadas sian amikinon Yvette, tiel ŝi tenis en sekreto niajn rendevuojn. Yvette Maire Chruse estis advokata edzino kun simila sorto, tiel la du damoj perfekte interkompreniĝis. Kelkfoje mi devis ŝanĝi la luĉambrojn, por ke nenies okulojn frapu, ke eleganta, soleca damo tiel ofte honoras solecan sinjoron per siaj vizitoj, ĉe kiu ŝi restadas dum horoj, eĉ kelkfoje ankaŭ la nokton ŝi pasigas tie. (Cetere francoj kutime fermas la okulojn pri tiaj geamikaj interrilatoj.)

Laŭ Katerino nia amromano valoris pli por ŝi ol ajna koljuvelo, transoceana vojaĝo, riĉeco de ŝia edzo. Kiel ajn funde mi elkonis ŝin, mi ne kuraĝis riski malkovri al ŝi nian agadplanon, kies viktimo ankaŭ ŝia edzo fariĝis.

Katerino povus fariĝi la vera virino en mia vivo. Aŭ ĉu tamen prefere Milico, kiu malnoble forlasis min pro sia kariero, kaj ne

interesis ŝin mia naftoekspedicio? Ne, ankaŭ mi ne povis resti longe samloke, kvankam kiel grandburĝo mi povus vivi en grandioza kastelo. Evidente ankaŭ Katerino repaciĝus kun sia sorto, se tra jaroj ni daŭrigus nian sekretan rilaton. Povas esti, ke ŝi helpus min ĉe atingo de eĉ pli granda profito, sed ŝi povus reagi ankaŭ malamike. Ŝi povus interpreti la okazintaĵojn ankaŭ tiel, ke ŝi estas nur rimedo en la realigo de mia plano. Ŝi neniam ludis la rolon de pasia, enamiĝinta virino, ĉar ĉiufoje ŝi donis sin mem – sen interesoj. *Carpe diem!* Rikoltu la tagon! Aŭ pli klare: profitu la momenton! (Laŭ la flugil-vortiĝinta esprimo de Horacio.)

Miaj kompanoj relative rapide preparis la scenejon, kio konsistis parte el tio, ke kelkajn borsajn makleristojn ili inicis tiom, kiom ili konsideris tion necesa. Kompreneble tiuj kaj la de ili informitaj investantoj kredis, ke ili faros tre profitan negocon. Mi restis for de la operacioj, ĉar ne estus bonŝance, se la homoj de Vincent ekvidus en la borso la elfone direktantan Nivaldo Rodrigo Alvim, sekretan komisiiton de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo.

Mi scias el rakontoj de la aliaj, ke dum du tagoj la financa aristokrataro okupiĝis en Parizo kaj ankaŭ aliloke pri la akcioj de la Banca Rio de la Plata. Kelkfoje oni proponis eĉ dudekoblan prezon, sed ĝenerale ni sukcesis vendi la akciojn por okobla-dekobla sumo. Kaj tio estas tre respektinda valoro!

La enormajn sumojn ni ĝiris al niaj novjorkaj kaj svislandaj bankkontoj. Ni apartigis signifajn sumojn por tiuj, kiu troviĝis ĝuste en enketa aresto aŭ pasigis sian puntempon en prizonoj.

Ĉar ni devis rapide forvaporiĝi, alvenis la tempo de adiaŭo. Mi ne volis suferigi Katerinon, kaj vidi, kiel mi kaŭzas al ŝi doloron: kiel invadas humido ŝiajn ĉielbluajn okulojn, kiujn mi tiomfoje kisis, kaj ekruliĝas el ili larmogutoj.

Ni pasigis tiel same la lastajn posttagmezon, vesperon kaj nok-

ton kiel cetere. En mia luata loĝejo mi postlasis al ŝi adiaŭan leteron. Ĉar mi sciis, ke al neniu ŝi povas montri ĝin, mi ĉion konfesis. Ke mi gardos ŝian amon en mia koro, kaj la monon de ŝia edzo kaj de la aliaj bankoj en mia konto. Povas esti, ke tio jam randis impertinenton. Nun mi tamen surpaperigis tion. Mi konsolis min per tio, ke fine mi povis esti sincera, eĉ se mi kaŭzis al ŝi doloron.

Malfermita koro estas raraĵo nuntempe. Kruele mi trompis kaj forlasis ŝin, tamen mi ne sentis min fripono. Ĝentilhomo restas ĉiam ĝentilhomo. En ajnajn cirkonstancojn li trafas!

En Hotel Paris ni festis modeste nian venkon. Ladislao Fürst, Aleksandro Klaár kaj Frederiko Vilhelmo Wetz celis Londonon, kaj ili devis kompensi iom da malfruo, tial ni ne havis okazon jubili. Kialon ni havis por tio, ja ĉi tiu estis la plej alta enspezo de nia triopo.

Mi ne scias kial, mi veturis al Vieno. Tien, kie mi estis jam tre serĉata, eble ankaŭ kaptilo estis jam starigita por mi. Povas esti, tio altiris min. Mi volis azenigi ilin. Ne tiel okazis.

Estis mi azenigita...

# 7. Aresto kaj sanatorio

En la amuzejo Lolita en Berlino mi alvenis la 20an de januaro 1922 ĉirkaŭ la dek-unua horo nokte. En la vestejo mi apartiĝis de miaj peltmantelo, promenbastono, peltoĉapo, kaj gvidata de subita ideo, mi decidis trinki ĉe la bufedo de la antaŭhalo kafon kun vanila bovlokuko. Apenaŭ mi finis la konsumadon, alta, liphara viro en nigra mantelo kun malserena rigardo ekstaris antaŭ mi. Montrinte sian legitimilon, li petis min pruvi mian veran personecon, t.e. ke mi identigu min.

– *Mein Herr*[29] – li diris. – Vi estas verŝajne de nobela deveno, sed vi uzas pseŭdonomon. Delonge mi postsekvas vin kaj scipovas pruvi, ke arestomandato estas eldonita kontraŭ vi. Via nomo estas Melchior von Horváth Freiherr von Beöháza.

– Tio devas esti eraro, ĉar mia nomo estas grafo Tasilo von Festetich.

– Tio baldaŭ evidentiĝos. Mi petas vin iri antaŭ mi, sen veki atenton.

– Momenton! En la atendanta taksio estas mia legitimilo, mi eliros por ĝi.

Dirinte tion, mi lanĉis min kun rapideco, inda ankaŭ je olimpika kuristo, al la 20-25 metrojn fora elirejo.

La mano de la detektivo – pli malfrue mi eksciis lian nomon: Stephan Schwartz – estis eksterordinare rapida. Dufoje li alvokis min halti, poste li pafis. Dufoje. Unue en la plafonon, poste celante al mi.

Mi rekonsciiĝis en la ambulanco. Krom la kuracisto kaj flegist-

29 mia sinjoro (germane)

ino ĝojis du detektivoj, ke mi revenis el la mondo de ombroj. Malfacile klariĝis al mi, kio okazis kun mi...

Mi kuŝas en prizona hospitalo, kaj oni eloperaciis la revolveran kuglon el mia maldekstra brako. Ĉi tiu klorodora, blanka lito signifas transiron al enketadoj, tabullito de la prizona ĉelo kaj la juĝeja benko. Nur malrapide mi volis konvaleski. La trian tagon mi venigis advokaton helpe de la du detektivoj, komanditaj por mia gardado.

D-ro Marteno Goldschmidt, iama budapeŝta kompano mia, transmetis sian sidejon al Berlino, kaj kompleze entreprenis oficiale tekstigi mian kolere diktitan plendon. Mi kritikis, ke okazis senekzempla impertinentaĵo, kiam la detektivo, sen atentigo, uzis sian armilon. Mi ne fuĝis, sed kun lia permeso mi volis eliri por mia legitimilo, lasita en la aŭtomobilo.

La polico aprobis mian plendon. Sed ankaŭ tio ne motivis ilin, lasi libera la „misvojintan grandsinjoran idon". Ili daŭrigis la pruvan proceduron kontraŭ Melĥioro Horváth Freiherr von Beöháza pri falsigo de privataj kaj publikaj dokumentoj, kiun mi plurfoje kulpis. Sed mi ja estis Tasilo Festetich!

Oni tenis min en enketa aresto, kaj probable volis ekstradicii al la aŭstraj instancoj. Mi submetis peticion, por ke ĝis mia resaniĝo mi povu resti en Germanio. *In optima forma,* kiel decas, mi kovros ĉion proprakoste, inkluzive la plenan provizadon de miaj gardantoj kaj ilian sanatorian loĝadon kunan kun mi.

Danke al la interveno de Marteĉjo mi ricevis permeson, pasigi la tempon ĝis mia resaniĝo en la saninstituto de la urbeto Fürstenwalde, distanca je tridek kilometroj oriente de Berlino.

La sanatorio situas proksime al la urbo en pinarbaro. Du ornamitaj ŝtonpontoj najbaraj kondukas super la rapidflua rivereto Spree. Unu servas nur por piedirantoj, sur la alia povas pasi ank-

aŭ lukaleŝoj kaj aŭtomobiloj unu preter la aliaj.

La trietaĝan sanatorion, konstruitan en alpa stilo, oni povas aliri sur pavimita vojo, borderita per ĉiamverdaj hedervicoj kaj ŝtuparoj. Pitoreska pejzaĝo prezentiĝas al la okuloj de la vizitantoj, enhospitaligitoj de sur la korto kaj la vastega teraso.

Jam en la antaŭhalo mi sentis min kvazaŭ en eleganta hotelo. La uniformitaj hotelknaboj, komplezaj servi al la gastoj, faris entuziasme sian laboron. La salonmebloj, multaj livistonoj kaj ceteraj ekzotikaj plantoj, la ŝvelmolaj tapiŝoj, etoskrea lumigado, la grandegaj rozofenestroj vekis la impreson, ke ĉi tie vivoviglaj, gajaj homoj pasigas sian tempon. Tamen la plimulto estis maljunaj sed tre riĉaj homoj.

La personaro, kuracistoj, flegistinoj portis helbluajn uniformojn. Ni vivis kune, kiel ekzemplodona familio, respektanta la verajn homajn valorojn.

La duono de la vasta, duonombrita korto estis pavimita per poluritaj slaboj, kie sidante sur ripozseĝoj aŭ ĉe blankaj tabloj, oni povis pasigi la grandan parton de la tago per konversacio, legado, somnolado. (Vintre kaj dum malvarmaj somertagoj la subvitra ĝardeno, odoranta de pompaj floroj, servis al la sama celo.) La gazono kaj la tuta korto estis ĉirkaŭita en talioalto de ŝtonmuro. Riveretoj torentis al la valoj. En klara vetero la montoj bluetis, antaŭ kaj post pluvo nuboj, similaj al pipfumo, vualis la forajn montopintojn.

Ĉiuj havis liberan eliron el la konstruaĵo. Per antaŭmendita lukaleŝo oni povis veturi al la urbo aŭ reveni de tie. La piediro tra la du-kilometra distanco tien-reen signifis por mi distriĝon. Sed plurfoje okazis, ke kun miaj eskortantoj ni elektis tamen lukaleŝon, ĉar por nia eleganteco ĝi konvenis.

Prof. direktoro kaj psikiatro Heinrich von Luzenbacher akcep-

tis min jam origine konfidence. Li malkaŝis al mi la instrukcion de la germana ministerio de internaj aferoj: laŭeble oni traktu min kompleze, plenumu ĉiujn miajn dezirojn. Ja ne eblas scii, kiu mi estas.

– S-ro profesoro! Mi dankas por viaj sinceraj vortoj. Kompreneble, mi scias, kiu mi estas. Ĉu tio signifas, ke oficiale mi ne estas en aresto?

– Nek jes, nek ne mi povas diri, ĉar oni ne sciigis al mi. Mi proponas, kara Tasilo von Festetich, ke ni gardu kune ĉi tiun sekreton. Por nia sanatorio ne estus avantaĝe, se iu konjektus ion kaj komentus negative.

– Mi havas la saman opinion.

– Ni rakontu, ke post bonŝanca ĉasakcidento trovis vin viaj kunuloj. Du tagojn ili serĉis vin. Vi estis en senkonscia stato en la arbaro. Pro via vundiĝo, kaŭzita de apro, vi bezonas kuracadon, observadon, samtempe ankaŭ psikan flegadon. Estas sendube, ke tiel niaj elegantaj gastoj rilatos al vi kun bedaŭro, profunda kunsento.

– S-ro profesoro! Mi dankas, ke vi akceptis min en vian konfidon kaj dividis kun mi vian sekreton. Mi esperas, ke baldaŭ klariĝos mia situacio.

El la interna poŝo de mia jako mi elprenis koverton kaj metis ĝin sur la tablon de la direktoro.

– Kun insisto mi petas vin, bonvolu legi ĉi tiun leteron.

– Pardonu min! Kiel mi povus legi vian leteron, kiam...

– Mi rajtigas vin... En ĝi nome ne estas sekreto, nur pruvo. Por klarigo sufiĉu, ke origine mia karmemora patro skribis ĝin antaŭ sia morto hungare, sed en oficiala traduko vi nun povas legi ĝin germane.

Heinrich von Luzenbacher konsentis per kapjeso, kaj kun vid-

ebla scivolo komencis legi la liniojn. Kiel jam konate, la priskribo de la lasta volo de mia patro estas tre longa, kaj pasis jam ĉirkaŭ dek minutoj, kiam mia bonfaranto venis al la fino. Dume li kelkfoje levis la rigardon, kaj kvazaŭ li demandus per la okuloj, ĉu vere mi estas, pri kiu temas kaj al kiu estas adresita la letero. Eĉ por momento ne malcertigis lin la dubo, ke ne mia patro skribis ĝin. Li demetis ĝin sur la tablon, kunplektis la manojn, iom meditis: li ne volis aŭ ne kuraĝis ekparoli.

– Mi komprenas vin, s-ro profesoro, ĉar en ĉi tiu ekstrema kazo estas malfacile trovi vortojn. La bona gusto, kristana moralo, kalkulema sinteno, honoro, pureco anima, tra jardekoj sekretata rilato de patro kaj filo, honto de la patrino, trompo al la filo... Povas stariĝi tiel multaj demandoj, diri opinion pri kiuj aŭ eĉ nur kompletigi ilin per du frazoj momente ne eblas. Tial mi ne volus puŝi vin en malagrablan situacion. Estas certe, ke ĉi tiuj estas ne elpensitaj sed veraj faktoj. Ne el la vivo de iu Melĥioro von Horváth Freiherr von Beöháza sed el mia vivo, tiu de Tasilo von Festetich.

Mi stariĝis por adiaŭi. Ankaŭ la profesoro faris same.

– Mi dankas vin, ke vi dividis kun mi la plej grandan sekreton de via vivo – li diris kunsente. Post manpremo mi prenis la leteron kaj forlasis la kabineton.

Mi havis du civile vestitajn eskortantojn. La blonda ĉielskrapa ĉefkaporalo Heinrich Weiss petis kelkfoje de mi permeson, por povi viziti sian familion, vivantan proksime. Lia dikmalalta, nigrahara kunulo, serĝento Albert Wirtz, estis formale superulo de Heinrich, sed estante bonaj amikoj, ili ne tro zorgis pro sub- kaj superordigo.

– Mi scias tiel, ke via plena nomo estas Melĥioro von Horváth Freiherr von Beöháza. Vi devenas el princa familio – diris foje Albert.

– Ne tute – mi replikis. – Tion asertas la polico, sed ne povas pruvi. Efektive mi devenas el princa familio. Mia vera nomo estas grafo Tasilo von Festetich. Kun la menciita persono mi estas konfuzita, tial alpafis min via kolego... Kun tiu Melĥioro mi havas nenion komunan. Eble miaj vizaĝtrajtoj, staturo povas simili la serĉatan personon. Mi esperas, ke vi ne kredas al via trofervora kolego, s-ro Stephan Schwartz, kiu senmotive pafis en min kuglon. Mi tre atendas, ke mi resaniĝu, estu ekstradiciita al Aŭstrio, kaj tie per dokumentoj en mia posedo tuj mi povu legitimi mian identecon.

– Kiel ni povas alparoli vian princan moŝton? – demandis Heinrich kunsente.

– Ĉar dum pluraj semajnoj ni estos kune, se vi permesos, mi alparolos vin per viaj baptonomoj, kaj vi diru al mi simple *Herr* Festetich.

Albert, la pli „erudicia" detektivo rimarkigis, ke li devis trastudi miajn dokumentojn, kaj jam tiam li certis, ke oni konfuzas min kun iu. Ili volas kaŭzi al mi neniajn malagrablaĵojn, sed ili estas respondecaj por la observado de la reguloj. Sed tion oni ne bezonas preni tiel serioze, ja ĉi tie la kutima kontrolado mankas.

– Ekzemple ni pensis pri tio, se s-ro Festetich havus emon eliri al la urbo, ni sekvos vin, kvazaŭ ni estus viaj kunuloj.

– Dankon, sinjoroj. Sed ni povus viziti lokojn, kie – vi devas pardoni min – ĉi via nuna civilvesto ne elvokus agrablan impreson. Nu, se vi konsentas, pli malfrue mi elektos por vi kostumojn, kiuj konvenas por ĉiaj okazoj. La kostoj ŝarĝos, kompreneble, min. *Carpe diem*, profitu la momenton, kiel la granda romia poeto Horacio skribis.

– Ho, ni vere ne petas tiel grandan oferon! – diris Albert.

– Sinjoroj! Tio estas flanke de mi ne ofero. Kredu min! Mi havas

monon, honoron, honestan nomon kaj nobelecon. Mi havos sanon kaj liberecon! Ni atendu pacience, sed ankaŭ ĝis tiam ni ne vivu kiel tri ermitoj en vasta, homsvarma sanatorio.

– Kie troviĝas ankaŭ serioze malsanaj homoj, eĉ invalidoj... – kompletigis Albert.

– Jes, prave! Mi, ekzemple, volonte kolektus donacojn por subteni ilin. En Svislando la ĉefnobela prezidanto de la Internacia Fondaĵo por Malriĉuloj estas mia kara amiko. Li certe ĝiros kelkmil dolarojn por la subvenciado de la instituto. Kaj mi povus imagi ankaŭ, ke ni faru kolekton en la urbo aŭ aranĝu bonfaran vesperon.

– S-ro Festetich! Kiom da boneco kaj grandanimeco hejmas en vi! Mi estas ravita!

En tia stato ili ankaŭ restis ambaŭ. De tago al tago ili ĉiam pli serĉis miajn dezirojn, post kiam mi vestis ilin elegantaj, kaj ofte ni vizitis la retoraciojn de la urbo. Ili sendis pri mi favorajn raportojn... (Do ke mi ĉiam plu konvaleskas.)

Dum sia vivo ili ankoraŭ ne sentis sin tiel bone en sia haŭto.

En la sanatorio ĉiu laŭeble sekretis al aliaj sian veran malsanon. „Mi sentas min malforta, venis por plifortiĝi, la s-ro direktoro faras miraklojn, la ĉirkaŭaĵo estas bela, bonfaras la longaj promenoj en la arbaroj, la panoramo kaj la aero estas idealaj" – jen kion oni kutimas diri. La malsanuloj pasigis sian tempon prefere sur la vitrita teraso aŭ gazona korto en ripozlitoj, ŝirmataj per plurtavolaj kovriloj. Kun mi ili devis esti kvardek. (Du miajn gardistojn mi ne alkalkulas.)

Sur la vizaĝo de la ĉirkaŭ 25-jara f-ino Aŭgustino Betrieger sidis ĉiam rideto. Ŝi vestis sin distinge. Sur ŝia svelta staturo ĉiam glatsidis la kun gusto elektita kaj kudrita vesto. Ŝi vizitis sian grandaĝan parencinon, *Tante* Hella, sed ankaŭ kun aliaj ŝi volonte

konversaciis.

Nia interkonatiĝo – post deca sinprezento mallonga – daŭris plu per klasika muziko. Aŭgustino sidiĝis al la piano de la vasta manĝosalono kaj prezentis kun granda emocio unu pecon post aliaj. De sia okaza publiko ŝi ricevis tiel laŭtan aplaŭdon, kiel vera pianisto en koncertejo.

– Mi ŝatas ankaŭ Chopin, ĉar laŭ mia opinio lia piana muziko estas unika, kaj samtempe kvazaŭ ĝi enhavus la stilon de Bach. Liaj melodioj estas neordinaraj, gracie delikataj, ilia solfeĝo tamen donas harmonion. Li alojas nokturnon kun mazurko kaj viena valso. Se mi bone memoras, li komponis almenaŭ dudek nokturnojn, havas preskaŭ tridek preludojn kaj etudojn – ŝi rakontis entuziasme.

– Kara fraŭlino! Se vi ne sonigas la notojn de Chopin, ili neniam reviviĝas. La plej granda trezoro por ni hodiaŭ estis via muziko. Vi eĉ imagi ne povas, kun kia enprofundiĝo ni aŭskultis vian elstaran interpretadon. Danke al ĝi ni venis paŝon pli proksimen al la resaniĝo. Se ĉi tiu admirinda muziko komenciĝus matene, la tuta tago de la gastoj estus neforgesebla. Sed tiel, nur de nun ili sentas, ke ekde ĉi tiu momento valoras vivi, ĉar la vivo konservas por ili ankoraŭ tre multajn ĝojojn.

Aŭgustino ruĝiĝis, sed kontente suĉis en sin miajn komplimentojn. Kaj tiam trafulmis mian cerbon, ke ŝian helpon mi bezonos dum la donackolekta agado. Bonfara vespero, ligita kun koncerto – jen ĝi estos io tre bona!

Post kelktaga preparo kaj konateco mi prezentis min ankaŭ kiel helpanto de la Internacia Fondaĵo por Malriĉuloj.

– Kun mia modesta kapablo mi volonte helpos al malfortuloj. La koncerto estos ĝojo por mi. Via propono estas tre grandanima.

Miaj amikoj, Sigfrido Tolnai-Turteltaub, Aleksandro Klaár,

Marteno Goldschmidt, Frederiko Vilhelmo Wetz, Ladislao Fürst aranĝis, ke mi ofte ricevu oficialajn kaj privatajn leterojn el la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Aŭstrio, de svisaj fondaĵoj, bankoj, de la rumanaj naftokampoj; kelkfoje ili estis senditaj per kuriero, alifoje alvenis kiel postrestantaj. En tiaj okazoj mi sendis unu el miaj gardistoj al la loka poŝtoficejo, ĉar mi certis, ke la evento tuj dissciiĝos.

Aleksandro Klaár, Frederiko Vilhelmo Wetz kaj Ladislao Fürst daŭre vizitadis min. Mi sciigis al ili mian ideon. Unu monaton ni antaŭvidis por la organizado.

La invitilojn ni skribis en la germana, franca kaj angla lingvoj. Danke al Ladislao Fürst ducent da ili estis presitaj sur belega tabakverda papero kun malhele lila inko. La plurlingveco levis la nivelon de la aranĝaĵo. Ni sciigis la eventon al la dungitoj de la sanatorio kaj la parencoj de la invititoj. Ĝi disfamiĝis en la urbo.

La koncerto, en kiu eksonis la melodioj de Chopin kaj Schumann, entuziasmigis ĉiujn. La plej multaj gastoj originis el kleraj, riĉaj familioj, ricevis elitan edukadon. Schiller, Goethe, Heine aŭ Liszt apartenis tiel same al ilia infanaĝo, kiel notkapoj al notoj, ritmo kaj rimo al versoj.

Mi montris al prof. Luzenbacher la leteron de la Fondaĵo, kiu servis kiel permeso por kolektado. La tekston de la falsa letero, kopiitan de la originala, ankaŭ nun mi scipovas citi laŭvorte.

*Internacia Fondaĵo por Malriĉuloj*
*Luzern*
*Str. Goethe 23/A*

*Altestimata Grafa Moŝto Tasilo de Festetich!*

*La Internacia Fondaĵo por Malriĉuloj, establita en 1899, salutas Vin kun alta estimo kaj esprimas ripetfoje sian dankon por la oferemo, kiun Vi de jardeko efektivigas por la helpado al malriĉaj homoj.*

*La loĝantoj kaj gvidantoj de la Hejmo por Malriĉuloj en Tuluzo pensas kun dankema koro pri Vi pro tiu signifa materiala subteno, kiun Vi bonvolis havigi al ili en 1918, dum la tempo de la sangoverŝa historia periodo de Eŭropo.*

*Via nomo estas konata dise en Eŭropo en la subtenaj institucioj de la necesbezonantoj; per Viaj kolektadoj Vi atingis la pliboniĝon de la vivo de multaj miloj. Pere de Viaj kunhelpantoj ni informiĝis, ke la Ripozdomo kaj Sanatorio de Fürstenwalde pretas kolekti monon kaj ceterajn donaĵojn por ili. La beno de la Eternulo vivigu Vian Altestimatan Moŝton tre longe en plej bona sano!*

*Mi sendas mian dankemon kaj respekton al Vi.*
*Luzern, la 3an tagon de monato julio 1922*
*Robert Koltensberger*
*direktoro prezidanto*

*Postskribo: Niaj delegitoj baldaŭ transdonos al Vi sian konfidan leteron kaj ceterajn dokumentojn, necesajn por la pli nova kolektado.*

Ĉi tiu letero samtempe pruvis, ke mia vera nomo estas grafo Tasilo de Festetich kaj ke anstataŭ krimado mi okupiĝas pri subteno al malriĉuloj.

– Kompreneble ankaŭ mi subtenas ĉi tiun aranĝaĵon, samtempe mi malcertiĝis, kion fari – diris la profesoro.

Li cerbumis iom. – Jam ne la unua fojon mi sendis neveran medicinan raporton, por ke vi povu resti pli longe ĉe ni, kara s-ro Tasilo. Nun mi denove deviĝos fari tion. Ni diru..., ke „post la forigo de la splitoj, trafitaj viajn brakon kaj kolon dum la granda milito, la vundoj pusiĝis kaj povus fariĝi akutaj sen regula medicina superrigardo... La daŭro de konvalesko momente ne determineblas."

– Mi ŝuldas al vi eksterordinara dankon, s-ro profesoro...

Mi konatiĝis kun la gepatroj de Aŭgustino: Otto von Betrieger kaj lia edzino. Ni kartludis, ŝakludis, priparolis la aktualajn politikajn eventoj.

Alvenis la tago, kiam Otto von Betrieger, la bankiero invitis min por tagmanĝo. Ili aprezis, ke krom du bukedoj, bonbonoj mi kunportis donace ankaŭ botelon da franca ĉampano de la marko Billcart-Salmon Brut Blanc de Blanks.

– Pri miaj sekreta misio, kontaktoj kaj negocoj mi ne rajtas paroli, sed mi scias, ke eble danĝero embuskas min. Jen videble, jen nevideble. Tial mi bezonas konstantajn eskortantojn.

Ĉi kelkaj sinceraj vortoj kontentigis ĉiujn, eĉ pliigis mian popularecon.

Mi rakontis pri Brazilo.

Eŭropano eĉ imagi ne scipovas la senfinajn praarbarojn, la *mato*-jn. Inkluzive Amazonion, kvardek procentoj de la regiono estas praarbaroj. Almenaŭ kvar mil arbospecioj estas registritaj. Ekzemple tie kreskas la t.n. bovinarbo, spilinte kiun oni ricevas refreŝigan likvaĵon, similan al lakto. Multspecajn fruktojn oni povas manĝi tra la tuta jaro. El la grajnoj de la fruktoj de *peri-peri, tiririca, babaçu, guaraná* oni preparas ĝenerale ŝatatan refreŝigan

trinkaĵon kaj medicinaĵon. La lastan la indianoj konsideras viveliksiro. Ili uzas ĝin por stomakalgio, mildigo de doloroj de nerva origino.

– Mi jam aŭdis pri la brazilarbo, sed mi ne scias, kia ĝi estas – rimarkis Rozalinda, patrino de Aŭgustino.

– La nomo de la lando devenas el ĉi tiu vorto. La arbo enhavas ruĝecan farboŝtofon. La vorto *brasil* en la portugala signifas braĝon, do ankaŭ ĝi aludas al la koloro de la farbo, gajnebla el la arbo. Cetere tropikaj praarbaroj troviĝas ekster Amazonio ankaŭ en la nord-okcidenta parto de Mato Grosso. Ĉi tie la plej grava arbospecio estas *jacaranda*. Laŭ mi ĝi estas la plej bela brazila arbo. El ĝi pretiĝas belegaj mebloj, lignoskulptaĵoj. Sur vastaj areoj troviĝas kaktoj, dornaj veproj. Ĉiu regiono tre riĉas je orkideoj. Tie ili ne konsideriĝas lukso: dudekon da ili decas doni donace.

– Ĉu vi eble renkontis ankaŭ serpentojn, *Herr* Tasilo? – demandis Aŭgustino, kaj iom ŝi ektremis.

– Se mi ne kaŭzos konsternon kaj teruron, mi respondos. Nu, ekzistas sonserpento, nomata *cascavel,* kiu en stato de ekscitiĝo vibrigas 8 ĝis 20 moveblajn kornoringojn en la ekstremo de sia vosto, tiamaniere ĝi produktas tiun specialan klaketantan sonon, de kiu ĝi ricevis sian nomon. Sendanĝera serpento estas male la akvokobro. Venenserpento-vora estas la *mussurana.* Ĝin ne damaĝas veneno; ĝi sufokas kaj glutas sian predon.

Sur la vizaĝo de Rozalinda kaj Aŭgustino aperis konsterno.

– Pardonu min, sinjorinoj! Mi ne volus vin ankaŭ plu teni en teruro. Ni parolu prefere pri pli gajaj temoj!

Poste ni tuŝis la veteron, modon kaj la ĉirkaŭan montoĉenon.

Ni flankeniris en la fumejon.

– Mia banko, la Deutsche Volksbank von Betrieger troviĝas en Dresdeno, sed la reto nombras sume dek du filiojn – rakontis

Otto. Feliĉe, mia ag-lerta, saĝa nevo scipovas ĉion aranĝi anstataŭ mi. Ni okupiĝas unuavice pri hipotekaj kreditoj kaj cirkuligas valorpaperojn. Sed mi opinias, s-ro grafo, ke vin tedas interezoj, profito, rentoj kaj la borso.

– Pardonon! Mi estas devigita korekti vin, altestimata moŝto! Evidente, la ekskluziva ĝentileco, karakterizanta vin, diktis al vi ĉi lastan frazon. Probable vi ne ŝatas paroli pri via profesio kun tiuj, kiuj ne kompetentas pri ĝi, kiujn ĝi ne interesas. Sed mi ne estas tia. Ĉar signifa kvanto da miaj akcioj estas deponitaj, ekzemple, ĉe akciaj kompanioj de sud-afrikaj orminejoj kaj en la nov-jorka borso, do se mi havas oportunon, mi klopodas sekvi la spezon de la valorpaperoj.

– Pardonu min, s-ro grafo, se eble vi sentis tiel, ke mi pridubis vian kompetenton. Vi tre bone vidas, ke ĉion ĉi mi diris nur pro ĝentileco. Ĉu vi menciis la sud-afrikajn orminejojn?

– Jes.

– Tio estis tre bona decido. La tieaj akcioj plivaloriĝis en la lastaj du monatoj je tri procentoj.

Mi aŭdis pri tio la unuan fojon, ĉar neniajn akciojn, investojn mi havis tie, eĉ, laŭ mia scio, nek miaj kompanoj. Tamen esprimiĝis natura ĝojo sur mia vizaĝo. Mi rimarkigis, ke mi informiĝis, eĉ atendeblas pluaj pozitivaj disvolviĝoj.

Betrieger konsentis. Tiam mi gajnis lian tutan fidon. Sed tio ankoraŭ ne sufiĉis por la preparo de mia plano.

– Pardonu min, ke mi pensas laŭte, sed certe ankaŭ laŭ via altestimata moŝto ne estas *comme il faut,* demandi gaston pri konfidencaj familiaj, investaj kaj ceteraj negocoj. Sed se iu parolas sen esti demandata, do memvole, la situacio aspektas tute alie. Mi nun tiel faras.

Mi enpensiĝis.

– Mia altestimata patro, grafo Tasilo de Festetich vivas en Hungario en sia kastelo en Keszthely ĉe la lago Balatono en sia 30 mil-akrea bienaro. Li jam donis mondfamajn ĉevalojn por la internaciaj ĉevalkonkursoj. Li havas apartan laboratorion, en kiu daŭre okazas eksperimentoj. Li sukcesis selekti bovinvariojn kun eksterordinare multa viando- kaj laktoprodukto. Li oferas kvin, kelkfoje dek procentojn de siaj enspezoj por bonfaraj celoj. Estus maldiskrete paroli pri la havaĵa situacio, rilatoj al diversaj bankoj de miaj gepatroj, du fratoj kaj ties edzinoj plue ceteraj parencoj. Mi ricevis elitan edukon en Vieno, Berlino kaj Novjorko. Mi vojaĝis plurfoje ankaŭ en aliaj landoj, por akiri spertojn. Mi mencias ankoraŭ nian parencon, la rumanan princon Ghyka, danke al kiu mi povis alproprigi konojn pri naftoekspluatado. Mi havas signifajn kapitalinvestojn en la rumania Constanța, kies naftoputoj troviĝas en la posedo de princo Ghyka kaj mi mem.

Kvazaŭ vokita, aperis la ĉambristo de la domo. Petante plurfoje pardonon, li anoncis, ke li alportis al mi telegramon.

Danke al miaj amikoj la elpensita manovro ankaŭ ĉi-foje glitis glate, kvazaŭ oleita. La kablogramo de mia onklo Ghyka alvenis, en kiu li sciigis, ke nova naftokampo estas malkovrita ĉe la aliaj dek. Sed pro tio mi ne interrompu mian negocvojaĝon, ĉar hejme li ĉion aranĝos.

La lipoj de Otto kurbiĝis ĝis la oreloj, same kiel la miaj.

– Mi gratulas vin! Mi opinias, ankaŭ vi estas en same feliĉa situacio kiel mi, kio koncernas la perfektan kunposedanton. Estas agrabla sento, se oni povas fidi iun centprocente.

– Efektive estas tiel, altestimata moŝto – mi aprobis.

Poste neatendite li proponis, ke pro la ĵus ricevita bona novaĵo kaj nia amika interrilato ni tostu interciumante.

– Estas honoro por mi... – mi respondis riverencante.

Stariĝinte ni intertintigis niajn glasojn kun la franca ĉampano. Poste Rozalinda kaj Aŭgustino revokis nin en la salonon. Kun ĝojo ili konstatis, ke nia interrilato fariĝis jam tute amika.

– Mi tre agrable babilis kun Tasilo... pri ĉiuj aktualaj demandoj. Imagu, nun li ricevis telegramon kun la informo, ke lia rumania onklo malkovris signifan naftokampon apud la aliaj dek ekzistantaj. Kaj ĝi nun fariĝis posedaĵo de ili ambaŭ.

Jubile ili gratulis min.

– Mia patro informiĝis certe ankaŭ pri tio – diris Aŭgustino, ke grafo Tasilo estas elstara subtenanto de la svisa Internacia Fondaĵo por Malriĉuloj. Li petis min, doni koncerton por la gastoj de la sanatorio, kaj ties donacojn li ĝiros senmanke al la fondaĵo. Mi opinias, ke muziki por tiel nobla celo estas la plej granda ĝojo en la mondo.

– Kompreneble, vi ja jam menciis, filineto. Mi konsentas kun vi.

– Kara Otto! – mi turnis min al la dommastro. – La fakto, ke f-ino Aŭgustino ĝojigos la malsanulojn per sia kor- kaj animsereniga muziko, estas jam mem sufiĉa kontribuo al la estonta sukceso.

– Tio estas ŝiaj parto kaj tasko, amiko Tasilo. Sed mi volus esprimi ankaŭ per kapitalo nian kunsenton. Se ni ricevos inviton, ni, kompreneble, ĉeestos kaj donos nian decan kontribuon.

Je tiel granda honorigo mi ne kalkulis.

La delegitoj de la fondaĵo estis Sigfrido Tolnai-Turteltaub kaj Frederiko Vilhelmo Wetz. Ili montris siajn legitimilon kaj insignon al la direktoro, sed tiu ne esploris ilin pli atente. Se li farus tion kiel mi, li trovus ion kaj tion por kritiki. Anstataŭ la stampo de la fondaĵo, funkcianta en tuta Eŭropo, „pruvis” la funkciadon de la organizo tiu de svisa urba ruĝkruca organizo. Prave, en germana, franca, itala, angla kaj hispana lingvoj!

Alvenis la tago de la koncerto kaj bonfara vespero.

Prof. Luzenbacher faris kortuŝan malferman paroladon. Se mi estus tiel emociema tipo kiel kelkaj *Tante*, kiuj viŝis siajn larmojn, mi fuĝus pro honto. Tamen mi volus diskrii al la mondo: „Sinjorinoj kaj sinjoroj! Ne kredu al ni! Pardonu nin! Aŭskultu nur la muzikon, sed ne donacu, ĉar ni trompos vin!" Evidente, neniu kredus min. Sed tiel ĉiuj volis helpi, ili ja venis por tio.

F-ino Aŭgustino prezentis verkojn de Chopin kaj Schumann facilmane kaj kun profunda sento. Inter la unuopaj komponaĵoj ŝi faris nur mallongajn paŭzojn. Ŝi ne stariĝis, por lasi sin aplaŭdi. Post preskaŭ unuhora mirinda muzikado ŝi klinis sin antaŭ sia cent-kapa publiko. Oni dankis ŝin per sonora ovacio kaj ritma aplaŭdado. Ŝi ĝuis tion, samtempe honteme ruĝiĝis.

De Luzenbacher ni ricevis du ampleksajn, ornamitajn korbojn plektitajn, kiujn Sigfrido kaj Frederiko ĉirkaŭportis.

Unue f-ino Aŭgustino oferis sian briliantan koljuvelon. Poste faladis kolieroj, orringoj, braceletoj, orelpendaĵoj, broĉoj, usonaj dolaroj, svisaj frankoj... Pli frue mi donis al ambaŭ miaj gardistoj po 500 dolarojn, por ke ili metu tiujn spektaklece en la korbon.

F-ino Clara Mayer, ĉarma filino de la loka spicvendisto, estis memvola konversacianto de la pli aĝaj damoj. Ŝi dediĉis siajn koron kaj animon al ĉiuj, eĉ se nur por kelkaj minutoj ŝi haltis por babili kaj ankaŭ se ŝi laŭtlegis artikolojn el ĵurnaloj. Ĉar bonfaremo radiis el ŝia tuto, la fraŭlino, riĉa je animaj valoroj, oferis sian briliantan koljuvelon.

Ŝi aperis en la akompano de siaj gepatroj. Preskaŭ ĉiuj konis kaj respektis la komercistan familion en la urbo. La gepatroj konfirmis sian bonan famon per dika koverto. La donacoj venis abunde kaj redunde, ĝis fine Sigfrido kaj Frederiko transmetis ilin en monsakon kun la emblemo de svisa banko.

Dum la akcepto ĉiu trovis al si konvenan kontakton kaj kun-

babilanton. Oni alparolis unu post aliaj Aŭgustinon, Sigfridon kaj Frederikon. Apenaŭ ni povis danki ĉiujn por la multaj donacoj.

Sekvatage la du reprezentantoj de nia fondaĵo vizitis kune kun mi *Herr* Luzenbacher en lia kabineto kaj transdonis al li tri mil dolarojn por la sanatorio. La direktoro diris jes kaj subskribis la kvitancon, nur post kiam mi longe persvadis lin.

Mi ja ŝatis Aŭgustinon, kelkfoje ŝi tamen nervozigis min. Ŝia naiveco montriĝis ankaŭ en tio, ke ŝi konis nur la homgrupojn de bonuloj kaj konvertenduloj. Pro sia bigota religiemo ŝi pretis direkti al la vojo de justuloj eĉ rabmurdistojn, se tiuj lasus sin! La influo de ŝiaj gepatroj senteblis je ĉiuj ŝiaj agoj kaj tuta pensmaniero. Ŝi konsideris obeemon egalranga al bonfaremo. Bonŝance, ŝi ĉiufoje akceptis miajn proponojn.

Ĉi tiun laŭnature kaj pro ŝia familia edukado virtan kaj virgecan fraŭlinon destinis al mi Otto. Iun fojon diskrete li sciigis al mi, ke Aŭgustino flegas tenerajn sentojn al mi. Al li ŝajnas, ke mi ankoraŭ ne donis signon de mia simpatio, kiu donus kaŭzon por esperoj.

Mi ekhontis. Eble la unuan fojon en mia vivo. Mi bedaŭris eĉ, ke per miaj ne ekzistantaj valorpaperoj mi trompis Otto, proponantan sin kiel mia onta bopatro. Kia sendankemo!

Otto estas patro anstataŭ mia patro dum mia efemera brilado en la sanatorio. Ĉu nun mi detruu lian familion, la bonan famon de lia filino, kiu jam flegas tenerajn sentojn al mi?

Se la cirkonstancoj disvolviĝus alimaniere, danke al ĉi tiu geedzeco mi povus esti eble bankdirektoro. Sed ĝis kiam? Ĝis mi bankrotigus ĉiujn filiojn de la Deutsche Bank von Betrieger. Ne, per io tio mi ne povas ŝarĝi min.

Sigfrido Tolnai-Turteltaub kaj Frederiko Vilhelmo Wetz portis

al mi la januaran numeron 1922 de la semajngazeto *Die Börse*[30], en kiu oni vortigis tre gravajn akuzojn kontraŭ mi, pli precize kontraŭ Melĥioro von Beöháza. El la artikolo evidentiĝas, kun kiu pseŭdonomo mi prenis hotelĉambron pli frue en la aŭstra ĉefurbo kaj faris tutan serion da fraŭdoj en du semajnoj. Mi monigis la senvalorajn akciojn de la Banca Rio de la Plata, fondita por la utiligo de la ne ekzistanta nafto en Gran Chaco, poste mi deponis la ĉekojn de la banko ĉe diversaj firmaoj. „La fraŭdisto estis jam delonge en Berlino – skribas la gazeto –, kiam la damaĝitoj ekkomprenis, ke ili estis kondukitaj je la nazo. Eĉ, oni povas firme aserti, ke li metis ankaŭ ringon en la bankierajn nazojn. Tio dissciiĝis, kiam viena ekonomika semajngazeto publikigis la fotokopion de ĉeko de la Banca Rio de la Plata. Sur la ĉeko videblis la nomo de direktoro I. W. Geneves kiel tratanto kaj Juao Machado kiel prenanto. Nu, Geneves signifas en la slango de la krimula mondo trompiston, nome plurale, kaj Machado plenumanton de fraŭdoj. Ĉu mirindas, ke tuta Vieno eĉ nun ridegas pri la humuro de la ĉekfalsisto kaj la naiveco de la damaĝitoj?

Kvankam oni skribis ne pri Tasilo de Festetich, tamen se elsciiĝos la nomŝanĝo, ni trafos en gravan embarason!

Kara Otto! – mi komencis la respondon post ioma pripenso. – Mi dankas, ke vi sincere malkovris tion al mi. Ankaŭ mi ne flegas indiferentajn sentojn al via ĉarma kaj sindediĉa filino. Aŭgustino donis kelkajn etajn, ĝentilajn signojn de sia simpatio al mi. Kompreneble, en deca maniero ankaŭ mi reciprokis ilin. Ŝiaj talento, beleco kaj virineca radiado profunde impresas min. Sed..., jen estas tubero en la afero!...

– Kia tubero, kara amiko?

30 La Borso (germane)

– Bedaŭrinde, mia negoca vojaĝo, sekreta misio ne permesas al mi okupiĝi pri personaj aferoj. Se mi farus, eble mi kaŭzus dolorojn al aliuloj. Kara, estimata Otto! Vi estus la unua, al kiu mi malkovrus, kiel malfacilaj, hom-elprovaj estas ĉi tiuj taskoj! Sed mi ne rajtas! Mi devas atendi... Eble nur kelkajn semajnojn, kaj tiam ĉio solviĝos.

– Eĉ imagi mi ne scipovas, kiajn sekretajn aferojn vi aranĝas! Kio vi estas? Ĉu sekreta konsilisto, spiono (ho, pardonu!), diplomato aŭ gardanĝelo?

Mi ĝojis, ke malgraŭ sia seniluziiĝo li prenas la aferon kun ioma humuro.

– Bone vi vidas. Krom anĝelo iom da ĉiuj troviĝas en mi, tamen tute laŭleĝe. Vi ne bezonas zorgi pro mi.

Ankaŭ la prof. direktoro bone preparis sin, ĉar li konsultis la leksikonon pri la familio Festetich. Ĉar li ŝategis dombestojn, lin impresis unuavice, ke mia patro, kiel posedanto de stalo de vetkuraj ĉevaloj, fondis en 1900 en Fenékpuszta la faman purrasan ĉevalaron. Samtempe li estis sekreta konsilisto, reĝa ĉefkelmajstro, ĉefkortegestro; distingita per la orŝaffela ordeno; en 1911 plialtigita al princa rango kun alteminenca titolo.

– La bonan laktoproduktan kapablon de la bovino de Bonyhád la germanaj setlintoj pluevoluigis kun instinkta bredkapablo, surbaze de siaj spertoj. Por plubredado ili selektis ĉiufoje la plej bone laktoproduktajn individuojn, neglektante aŭ tute ignorante la ceterajn karakterizaĵojn – mi kompletigis liajn leksikonajn konojn. (Ĉu eblas, ke ni ambaŭ konsultis la saman leksikonon?)

– Tio estas ja laŭdinda, sed jen estas granda problemo! Imagu, *Herr* Tasilo! Mi ricevis sciigon, ke postmorgaŭ alvenos ĉefkonsilisto el la germana Ministerio de Internaj Aferoj, por kontroli vian sanstaton. Kion nun mi volas fari, kontraŭdiras mian profesion

kaj kuracistan ĵuron. Pli frue mi raportis, ke ni eloperaciis militajn splitojn el via kolo kaj ŝultroj. Bedaŭrinde la vundoj inflamiĝis.

– Jes, mi memoras kaj estas tre dankema al vi pro tio!

– Nu, ne miru, se morgaŭ iu mia konfidenca kuracisto bandaĝos vin. Li rakontos al vi, kiajn simptomojn produktas viaj renperturboj, bone atentu lin.

La ĉefkonsilisto estis barbohava sinjoro kun nazopinĉilo. Li kondutis jen oficiale, jen afable.

– De la s-ro direktoro poste mi informiĝis, ke dokumentoj, alpetitaj el Hungario, unusence pruvas, ke mi disponas ĉiujn trajtojn de la serĉata persono. Oni ricevis ankaŭ eltiron el mia naskiĝatesto, kiu estas registrita por la nomo Melĥioro Hoffner. La familio Festetich neniam aŭdis pri parenco ĉirkaŭ tridek jarojn aĝa kun la nomo Tasilo.

– Kompreneble, ili ne povas koni lin! – respondis al li Luzenbacher. – Ĉar li estas neleĝa infano. Oni malheredigis lin. Apenaŭ aŭdis tion Erich Reinhard Heydrich, li tuj postulis pruvojn.

Oni kondukis lin en la ĉambron, kie mi kuŝis bandaĝita, kun dolortordita vizaĝo. Oni petis de mi la leteron de mia patro. Ĉefkonsilisto Heydrich apenaŭ kredis al siaj okuloj. Vane li petis, definitive mi ne transdonis ĝin al li. Mi proponis al li, farigi kopion de ĝi fare de notario. (Kvankam mi havis ankoraŭ du germanlingvajn aŭtentikajn kopiojn, mi ne transdonis al li! Pli frue mi tradukis ĝin ankaŭ en la anglan, francan kaj hispanan, kiujn la subskribo kaj stampo de mia amiko notario faris oficiala.

– Mi mem proponos, ke vi restu ĉi tie ĝis via plena resaniĝo. Malgraŭ tio ni plu faros esplorojn en via afero kaj kolektos informojn. Bedaŭrinde pri la nuna stato de la afero mi ne rajtas informi vin.

Poste ree pasis feliĉe du monatoj. Promenoj kun Aŭgustino,

varmaj tagoj, sidado sur la malvarmeta teraso, bongustaj tag- kaj vespermanĝoj, agrablaj konversacioj, teksado de novaj planoj kun miaj kompanoj. La tempo pasis sagrapide.

Luzenbacher petis min al si.

– Mi salutas vin – li diris malgaje, poste senvorte transdonis la oficialan leteron, kiun li ricevis el Berlino. Mi sciis, ke iam alvenos ankaŭ ĉi tiu tempo! Sed kial ĝuste nun? Oni petis la s-ron direktoro, ke ĝis la 16a de oktobro, do ene de semajno „li finu mian kuracadon", ĉar la 18an oni venos por mi de la berlina polico. En la letero oni dankis lin samtempe por lia konscienca saniga laboro.

– Eksterordinare mi bedaŭras, ke ni devas disiĝi – diris la *Herr Direktor.*

– Mi sentas same, samtempe mi ankaŭ ĝojas, ĉar fine mi povos pruvi mian senkulpecon.

– S-ro Festetich! Mi scias, ke pro tio vi devas foriri. Estis granda gajno por ni, ke vi pasigis inter ni ĉi kelkajn monatojn.

Mi devis adiaŭi la familion de Otto. Mi klopodis fari gajan mienon, kvankam estis tre malfacile, ja baldaŭ mi estos elpelita el la paradizo. La familio Betrieger rimarkis neniom mian internan streĉon. Eskapante iliajn demandojn, mi komencis entuziasme rakonti.

– Profunda ĝojo plenigas mian koron, ke en dek tagoj ekde morgaŭ mi plenumos mian mision, kaj poste mi fariĝos vere libera homo. Tiam ĉiuj povos ekscii, kia estas la vera Tasilo de Festetich! Sed mi ne volus laŭdi min. Do alvenis la tempo, kiun mi de tiel longe – mi konfesas – kelkfoje senpacience atendis.

– Ĉu tio signifas ankaŭ, ke vi povos malkaŝi al ni ĉiujn viajn sekretojn? – demandis Otto kun vizaĝo, ruĝigita de ekscito.

– Kompreneble – mi respondis feliĉe.

Oni adiaŭis min kun ĝojo kaj grandaj atendoj.

La neevitebla estis ja spitebla, tamen ne preterglitebla. Oni ekstradiciis min al Aŭstrio. La 6an de novembro 1922 la tribunalo, en Ramsau, de la viena landa kortumo juĝis pri mi. La kunsido daŭris du tagojn. Ĉi tie oni laŭtlegis la indikojn, kiujn la budapeŝta ŝtatpolico sendis al la aŭstraj aŭtoritatoj. Tiam eksciis la okcidenta mondo, ke Melĥioro Horváth barono de Beöháza neniam vivis, kaj mia vera nomo estas Francisko Melĥioro Hoffner. Malgraŭ miaj laŭtlegitaj veraj biografiaj indikoj mi insistis pri mia grandsinjora deveno. Mi protestis, ke la prezidanto alparolu min simple per Hoffner. Tamen vane mi emfazis, ke la indikoj de la budapeŝta polico baziĝas sur bedaŭrinda eraro.

Alvenis ĉiuj vienaj damaĝitoj, bankdirektoroj, fabrikistoj, respondecaj gvidantoj de multaj komercaj firmaoj. Aperis antaŭ la tribunalo ankaŭ „senkulpigaj atestantoj”, kiuj pli malutilis ol helpis. Kelneroj, muzikistoj, aktoroj, ĵurnalistoj asertis, ke mi disdonadis reĝajn trinkmonojn. Elvokis ĝeneralan bonhumoron en la ĉambrego, kiam la noktolokalaj muzikistoj Virágh kaj Steiner raportis pri siaj impresoj en Italio kaj mia malavaremo. Kiam la muzikistoj forlasis la kunsidejon, ili adiaŭis min kun profunda riverenco.

Oni fermis min en prizono por ses jaroj...

## 8. Postlasaĵo de la infantino

Rompita en korpo kaj animo, mi alvenis en la pundomo en Stein, kiu situas sur altaĵo de la Alpoj.

Ĝi impresis al mi kiel mezepoka kastelo. Unue ŝajnis al mi, ke Dante, la plej granda poeto de sia epoko staris antaŭ la pordego de ĉi tiu fortikaĵ-simila pundomo, kiam pensante pri la pordo de la infero li skribis: „Ĉiun esperon lasu ĉe l` enpaŝo!"

Turoj, ferbendaj kverkopordegoj, mornaj konstruaĵoj, fingrodikaj kradoj! Kvankam apenaŭ sesdek kilometrojn for de Vieno, ĝi neniel memorigis pri la baroka kaj rokoka stiloj arĥitektaj, vigla svarmado, sennuba libereco de la ĉefurbo. El la turoj, duetaĝaj konstruaĵoj malfermiĝis vido al la ruiniĝantaj muroj de la mezepoka Stein. Danubo meandris en neatingebla malproksimo.

Ĉi tiuj muroj glutis min por kelkaj jaroj.

Prizonoj, pundomoj estas ne nur konstruaĵoj, aĵoj senvivaj sed institucioj kun animo. Ĉi tiu animo estas komprenenda laŭvorte. Pri tio povas atesti, kiuj en elaĉetaj misioj de kaptitoj faris netakseble valoran laboron. Ankaŭ tiuj, kiuj pasigas longajn jarojn inter tiaj muroj kiel mi.

Post la hororveka enirejo la provosoj kondukis min tra zorge flegata parketo al la direkcia konstruaĵo. La komandanto de la gardo transprenis min.

Post baniĝo oni submetis min al funda korpa ekzameno. En granda libro estis precize registritaj miaj korpoalto kaj pezo, persona priskribo, specifaj trajtoj.

Poste oni eskortis min en mian ĉelon. Maljuna provoso, kiu impresis kiel bonvolema kaj honesta homo, donis al mi detalan priskribon, inicante min en la sekretojn de la domordo.

– Se vi ricevas viziton, vi devas tuj stariĝi, ĉesigi vian laboron, ĝentile saluti kaj respondi al ĉiuj demandoj konvene al la faktoj. Ĉu vi komprenis? Je la kvina matene, ĉe la unua sonorilsono endas vekiĝi, rearanĝi la liton, vesti, zorge lavi sin, fari ordon en la ĉelo, purbalai, purigi ĝin. Poste vi ricevos la matenan supon, kiun endas manĝi! Post la dua sonorilsono vi devas meti vin al laboro. La matena promeno daŭras unu horon: somere de la sesa kaj duono ĝis la sepa kaj duono, vintre de la sepa horo ĝis la oka. Post la promenado vi devas denove labori seninterrompe ĝis la dek-unua kaj duono. Tiam vi ricevos vian tagmanĝon. Ankaŭ ĝin endas manĝi! Poste vi povas iom promeni en via ĉelo. Eĉ, ankaŭ legi estas permesite. Kondiĉe, ke vi scipovas legi. Ĉi tiu ripoztempo daŭras ĝis la naŭa horo. Tiam nova sonorilbato signalas, ke vi devas prepari la liton kaj enlitiĝi. Cetere la presita domordo pendas sur la muro, legu ĝin kaj notu ĝin al vi bone, ĉar ĉiu malobservo de la domordo sekvigas rigoran punon. Ĉi tie, sur la pordo troviĝas gvatotrueto, kiel vi vidas. Sed ne elrigardu tra ĝi! Mi gvatas tra ĝi kutime, kion vi faras kaj agas. Ĉu vi komprenis?

– Kompreneble – mi respondis. Kion oni povus respondi al tio?!

Poste la maljunulo neatendite ŝanĝis tonon.

– Pardonu min, s-ro Hoffner, ke mi kondutis tiel rigore, sed tion mi devas sciigi al ĉiuj. La s-ro direktoro jam instrukciis al mi, ke vin oni devas alimaniere trakti. Vi vidos, ke via sorto turniĝos en pli bonan direkton. Oni diras, ke pro eraro vi trafis ĉi tien. Ĉu vere?

– Estas precize tiel. Nobelon oni konfuzis kun latrono!

– Ĉi tie vi havos tempon ĉion repensi kaj klarigi.

Kun tio mia afabla instrukciisto forlasis mian ĉelon. En la seruro ekgrincis la ŝlosilo, kaj mi restis sola, rompita, preda al miaj ri-

morsoj.

Mi estis registrita sub la nomo Francisko Melĥioro Horváth-Hoffner, kiel ankaŭ kondamnita de la tribunalo. Nur palaj spuroj de Tasilo povis resti en mi.

Pri mia deveno kaj aventuroj cirkulis legendoj inter la malliberuloj kaj provosoj. Ankaŭ la direktoro mem atendis kun scivola ekscito mian alvenon. Oni faris kun mi escepton, kredante, ke mi estas efektive de nobela sango; kaj ke nur pro fatala miskompreno mi trafis inter la murojn. Oni aranĝis, ke la malliberula vesto estu fasonita laŭ mia figuro, sed pli gravas, ke ĝi pretiĝis el mola ŝtofo. Propramone mi alportigis bonodoran sapon, teon, nutraĵojn. Kion mi ne bezonis, favorpreze mi pluvendis al miaj samsortanoj. Mi faris mian ĉelon hejmeca.

Estis neeviteble renkonti murdistojn, fraŭdistojn, enrompistojn, rabistojn. Iun el ili ĉiuj nomis Lex. La nomo signifas leĝon en la latina, kaj fakte: ĉiufoje li difinis la leĝon. Kion li povis fari proprainiciate, li senmanke ankaŭ faris.

Li sidiĝis, por interparoli kun mi. La aliaj gape aŭskultis nin. Kiel bone interkompreniĝas barono kaj kasrompisto! Tamen estas vere, ke mian nobeldevenan animon ĉiu frazo de Lex priĵetis per koto, kvankam tio ne estis intenca fare de li. Kiel en protokolo, li rakontis ĉiujn „ĝuindajn" detalojn de siaj sesdek enrompoj. Jam trifoje li punsidis. Sian monon li kaŝis en sekura loko. Ĝis la fino de sia vivo li povus vivi per ĝi, sed avido lin obsedis, li volis ĉiam pli multe. Eĉ tiel granda talento faras erarojn. Lastafoje parton de siaj iloj li lasis apud la ŝtalŝranko. Pro la *corpus delicti*[31] li povis ĝui la akiritan monon nur dum unu semajno. Li estis kondamnita al ok jaroj, kaj nun plenumis la kvaran. La komplika priskribo de la

31 pruvobjekto (latina)

faksperta borado, trukoj de la malfermo de seruroj ne povis min okupi, ĉar mi ne uzis tiel vulgarajn rimedojn.

Jam tempis, por ke ankaŭ mi ricevu parolon. Ĉar en tiaj cirkonstancoj mi ne povis esti modesta, mi ne avaris per realaj kaj elpensitaj vivepizodoj. Miaj nobela origino, trista edukado, naftoputoj en Rumanio, parizaj, vienaj studoj, brazilaj banko kaj naftokampo... Eĉ unu el ili ne estas krimo, plie mirgapiga serio de fabeloj. Tial detale mi rakontis pri la eventoj de mia bankofondo kaj ĉekfalsado. Kompreneble, ankaŭ Milico kaj la mirindaj brazilaninoj ne povis manki.

Lex agnoskis, ke la plej grandaj, kiel mi, nur skribas ion sur papero, ĝuste tie, kie necesas, kaj la mono jam torentas al ili. Ĉion ĉi rerakontis nek li, nek liaj kunuloj tiel, sed per vulgaraj vortoj en krudaj frazoj. Mi ne volis, kaj feliĉe ankaŭ ne povus transpreni ĉi tiun stilon. Mi provis alĝustigi mian lingvouzon al la ilia, sed mi ne sukcesis. La oblikvokula, makulvizaĝa Fritz rimarkigis: „Vi parolas, kvazaŭ vi legus la vortojn.” Ĉi tiu frazo kunestis kun mi dum miaj malliberulaj jaroj.

Ĉiu sentis sia devo rakonti al mi sian vivon. Nur kelkaj montris penton. Kvankam ili konfesis, kiel al pastro, sed bonŝance ne atendis de mi absolvon.

Dio mia! Ĉu miaj ses jaroj konsistos el tio?

Foje la s-ro direktoro venigis min al si. Gardisto nomata Weisberg eskortis min al li. La s-ro ĉefkonsilisto konfidis al li, gardi min tre atente kaj helpi min, en kio li povas.

Direktoro Hofbauer demandis min pri mia vivo. Mi prezentis al li la vivovojon de Tasilo de Festetich.

– S-ro registara konsilisto! Oni devas akcepti la verdikton de la tribunalo ankaŭ tiam, se ĝi baziĝas sur eraro. Tamen, kion mi rakontis al vi, estas nuraj faktoj!

– Nu jes, kara filo! Mi pretas kredi, ke vi estas kurioza viktimo de la sorto. Povas esti, ke vi havas malamikojn, kiuj dole brulstampis vin per krimuleco. Ankaŭ mi estas devigita akcepti la verdikton de la tribunalo. Kion mi povas fari, estas nur tiom, ke mi klopodas fari vian malliberecon eltenebla. Ekzemple nun mi povas proponi al vi, ke vi estu ĉi tie en mia proksimeco. En la pasinta semajno liberiĝis mia kontora asistanto. De tiam la laboroj akumuliĝis. Ĉu vi komprenas pri io tia?

– S-ro ĉefkonsilisto! Mi ne kredas, ke zorgi pri la librotenado, registri, korespondi, inventari, sendi mesaĝojn  estus tasko malfacila... Temas pri io simila, ĉu?

Ekde tiam mi laboris tiom, kiom du prizonaj sekretarioj en unu persono. La vesperan senlumigon mi ne devis atenti. Mi trastudis la aferojn de miaj kunkondamnitoj, la alvenintajn leterojn transdonis kun unu- ĝis du-taga malfruo al la malliberuloj. Post kiam mi informiĝis pri la senditaj novaĵoj, mi vizitis la koncernulojn, kaj antaŭdiris, kio novas en ilia hejmo. La malbonajn novaĵojn mi ĉiufoje prisilentis dirante, ke mia futurvidado ne venas de la diablo. Bonŝance, pri ĉi mia mirinda talento la s-ro direktoro eksciis nenion. Mi laboris ĉirkaŭ kvar semajnojn en la kontoro, kiam la vento alblovis iun eksan ministerian sekretarion en nian prizonon.

Mi petis transmeti min en la presejon.

– Mi nun preskaŭ adiaŭis vin emociplene, kara filo, sed bedaŭrinde vi ankaŭ plu restos ĉi tie.

Longe mi esprimis mian dankon. La s-ro direktoro ankaŭ plu certigis al mi la favoraĵojn: kvar leteroj, kvar vizitantoj ĉiumonate, miaj okazaj komisiitoj povis fari aĉetojn por mi en la urbo. Miaj amikoj vizitadis min, tiel mi povis teni kontakton kun ĉiuj miaj kompanoj.

Max Swoboda kompostis ĝuste la lavoslipojn, kiam la deĵoranta *faci* postenigis min apud lin. Tiel oni nomis malnovajn malliberulojn, komisiitajn per la laborestrado de prizonuloj. La vorto devenas el la latina vorto *facit,* fari. *Faci* estas, kiu faras, plenumas ion.

Max estis kondamnita pro falsado de tratoj. Li afable frapis mian ŝultron.

– Do vi estas tiu fama Tasilo-Melĥioro Hoffner-Horváth von Beöháza, ĉu? Aŭ ĉu neniu scias tion? Tio estas plej kurioza! He, amiko! Multe oni parolis pri vi en Madrido. Vi estas ja vera artisto pri ĉekoj, bankoj! Kaj la brazila naftokampo! Fantaste!

– Mi ne ŝatas, se oni laŭdas min senkaŭze – mi diris modeste.

Li bonguste ridis pri mia rimarko, poste submurmurante li rimarkigis: „Hundo ne ŝatas, se oni rememorigas al ĝi la foskaŝitan lardon."

Kia proverbo ĝi estas? Mi ne volis demandi.

– Vi certe aŭdis malmulte pri mi. Mi forkomercis unuavice antikvaĵojn. Kelkfoje ankaŭ al muzeoj. Feliĉe, nur poste evidentiĝis, ke la vazo, statueto, torso ne estas antikvaj. La juvelŝtono valoris, kiom sablo en dezerto.

– Mi aŭdis de la *faci*, ke vi scipovas kaŝi vin nerimarkite eĉ en la gorĝo de spurhundo, se vi estas en danĝero.

– Povas esti. Sed vidu, la „spurhundo" tamen malfermis sian faŭkon.

Max estis mondsperta homo kiel mi. Jarojn li vivis en Hispanio, kie – ne sciate de mi – provis imiti min. Li aŭdis mian famon kaj prenis min modelo por si, kvankam li aĝis dek jarojn pli ol mi. En la Kanarioj li malkovris „orminejon", sed liaj trompoj relative baldaŭ malkaŝiĝis, kaj li devis fuĝi. Li revenis en Ĉeĥoslovakion, poste aperis en Vieno, kie pro sia neatento li jam ne povis eviti la

areston. Li estis kondamnita al ok jaroj (estis liberigota du jarojn pli malfrue ol mi). Max transkopiis kun elstara faksperto ĉion, kaj kapablis fari dokumentojn, ŝajnantajn pli originalaj ol la originaloj mem.

La pliparto de nia laboro prezentis nenian cerbumadon, ĝi ja konsistis en tio, ke ni kunmetis aŭ dismetis kompostaĵojn. Pli malfrue mi uzis, riparis la manpresilojn. Ni presis en la prizonoj kutimajn afiŝetojn, slipojn, kartojn, permesojn kaj ceterajn paperaĵojn. Kun granda intereso mi studis la diversajn prestipojn.

Dume mi rakontis mian tutan vivon. Ni ambaŭ havis la saman opinion. Ni ne estas veraj krimuloj, ĉar perforte (per armiloj, tranĉiloj, fizika forto) neniam ni forprenas ion ajn. Peli homojn en vivdanĝeron aŭ morton estas tute fremde al ni. Neniam ni tute senhavigas homojn. Ni „vendas" ne nian patrujon sed tiun de aliuloj. Niajn helpantojn ni neniam perfidas. Vera amiko ĉiam helpas sian kunulon.

Kune ni organizis nian maĥinacion en Hispanio.

En la sesa monato de mia mallibereco disvastiĝis kun rapideco de pajlofajro: mi heredis plurajn milionojn.

Iun posttagmezon provoso Klaus Graumann paŝis en la kompostejon:

– Hoffner-Horváth! Tuj al la direktoro!

– Nu, barono, iru! *Was hast du ausgefressen?*[32] – demandis min kompostestro Valentin.

– Miascie nenion – mi respondis.

La provoso eskortis min tra du vastaj kortoj, poste ni paŝis en la ĉefkonstruaĵon de la puninstitucio.

Mi anoncis min laŭregule.

32 Kion misan vi faris? (germane)

Registara konsilisto Hofbauer okulmezuris min de la plandoj ĝis la verto. Evidente plaĉis al li mia pura vesto; pluraj jam diris, ke mi portas la malliberulan veston kiel naskita sinjoro. La direktoro tenis en la mano plurfoje sigelitan koverton.

– Hoffner? Aŭ ĉu Horváth?... Tasilo aŭ Melĥioro? Nu, egale! Mi devas sciigi al vi gravan novaĵon. – Li montris al la koverto. – Eksterordinare mi bedaŭras..., akceptu mian sinceran kunsenton. Oni informas vin, ke via onklino... forpasis.

Mi trudis profundan konsternon al mia vizaĝo.

– Bedaŭrinde – daŭrigis la registara konsilisto – tio estas certa, ĉar la viena advokato, via defendinto d-ro Karl Schimanek sciigas la malĝojigan novaĵon. Via onklino – li ĵetis rigardon en la leteron – ŝia reĝprincina moŝto infantino Dorothea Annunciata Soledad forlasis en Valencio, Hispanio la ĉi-teran mondon.

Ekestis momenta silento. La registara konsilisto travivis mian funebron. Poste gaje, trankvilige li diris, levante mian koverton:

– Sed disponi pri vi ŝi kompreneble ne forgesis. D-ro Schimanek sendis ankaŭ la leteron de la madrida notario Fernando Gonzalez. Aldonita estas la aŭtentika traduko de la hispana interpretisto. Laŭ ĝi – kiel feliĉe elparoli! – vi heredis kvin milionojn da pesetoj...

Sur mia vizaĝo ruliĝis fine kelkaj larmogutoj. Komenciĝis do la procezo, fine de kiu estos havigita al mi kaj miaj kompanoj enorma sumo. Tio estas evento, kiu ekfunkciigas la larmosakojn.

– Vi ne bezonas senesperiĝi, karega filo! – daŭrigis la direktoro. – La vojoj de Dio estas neantaŭvideblaj. Se iam vi eliros de ĉi tie, vi estos riĉa homo.

Denove li priokulis la leterojn.

– Tamen estas tekstoparto, kiu starigas vin antaŭ malfacilan taskon. En ĝi skribas ĉi tiu madrida notario... Gonzalez, ke la he-

reda imposto sumas 130 mil pesetojn. Laŭ via advokato ĝi faras ducent mil ŝilingojn, se konverti ĝin en nian monon. Ĝin vi devos enpagi, se vi volas veni en la posedon de via heredaĵo.

– Bedaŭrinde mi ne disponas tiel grandan sumon, s-ro registara konsilisto – mi respondis indiferente.

– Tamen pripensu, karega filo! – li kuraĝigis min bonvoleme. – Certe vi havas altrangajn parencojn, amikojn, kiuj pretus anticipi ĉi tiujn ducent mil ŝilingojn.

– Portempe tiom rompis min ĉi tiu funebra sciigo, s-ro registara konsilisto – mi respondis kun okuloj humidiĝintaj –, ke eĉ pensi mi ne povas pri io alia.

– Nu ja la afero ne estas tiom urĝa. Retrankviliĝu, ripozu!

Li levis la telefonaŭdilon. – Mi petas la presejon... Kompostestron Valentin... jes... – ĉu Valentin? Ha-lo! Ĉi tie direktoro Hofbauer. Mi volas sciigi al vi, ke mi liberigas ĉi tiun Hoffner aŭ Horváth, kiu estas Tasilo kaj ankaŭ Melĥioro, por dek kvar tagoj je ĉiuj laboroj... Lin trafis funebro... mortokazo. La malfeliĉo taŭzis liajn nervojn... Ĉu vi komprenis, Valentin? – Li demetis la aŭdilon.

– Kaj vi, kara Horváth, kiel mi diris, ripozu, konsoliĝu! Vi iros al la kuracisto, mi parolos kun li. Tiu sendos vin en la hospitalon, kaj tie vi ricevos manĝon por konvaleskantoj. Iom da bovidaĵo, tagmeze glaseto da ruĝa vino, vi povos promeni sur la korto, eventuale en la direkcia parko...

Ambaŭ manojn li etendis, tiel li manpremis kun mi.

La trian tagon mi anoncis min por priaŭskulto.

– Nu, ĉu vi pripensis vian aferon, filo mia?

– Jes, s-ro registara konsilisto – mi respondis –, mi ekmemoris, ke mi havas malnovan konaton, nomatan Margareto, baronino de Majthény, bienposedantino en Trenĉino. Se vi permesos, mi

skribos al ŝi. Eble ŝi povos akiri la monon...

– Do skribu plej baldaŭ! – li instigis min –, mi zorgos plusendi ĝin.

Li sidigis min ĉe la gastotablo. Mi ricevis paperon kaj plumon. Li lasis min sola. Mi skribis la sekvan leteron:

*Al la Altestimata Baronino Margareto de Majthény*
*en Trenĉino (Ĉeĥoslovakio)*

*Altestimata Baronina Moŝto!*

*Barono Tasilo de Festetich aŭdacas ĝeni vian trankvilon kaj esperplenajn tagojn. Mi insiste petas vian pardonon, probable ne estas* comme il faut, *ke mi skribas al vi, sed kaŭze de nepro mi devas fari tion.*

*Depost nia konatiĝo en Bratislavo mi ne anoncis min en letero ĉe Vi, nek omaĝante al Vi persone per mia honora respekto. Ties kaŭzon – mian maron da farendoj – probable vi bone konas, ja en pluraj okazoj ni intertraktadis pri ekonomiaj kaj komercaj negocoj.*

*Plej Estiminda Baronina Moŝto!*

*Kiel ankaŭ al Vi estas konate, pro mia aristokrata deveno mi disponas vastan parencaron eminentan en eksterlando. La madrida notario Fernando Gonzalez sciigis al mi en aŭtentika interpreto, ke en la hispania Valencio faris sian lastan translokiĝon al pli bona mondo infantino Dorothea Annunciata Soledad, mia plej proksima parenco. Ŝia Reĝprincina Moŝto postlasis por mi herede kvin milionojn da pesetoj. La herediga imposto sur ĉi tiu sumo egalas 130 mil pesetojn, respondajn al 200 mil ŝilingoj. Ĉi tiun sumon mi nepre bezonas anticipe pagi al la fisko de la hispana ŝtato, ĉar nur poste mi povos veni en la posedon de la al mi ŝuldata heredaĵo.*

*Altestimata Baronina Moŝto, mi facile imagas Viajn ambivalencajn*

*sentojn, kiujn elvokas el Vi ĉi tiu novaĵo, tiel multa heredaĵo ja egalas fabelecan havaĵon! Samtempe la herediga imposto estas tiel alta, ke en mia nuna situacio mi ne kapablas pagi ĝin.*

*Se konsideri, ke de jaroj ligas min al Vi emociplenaj amikaj kaj enhavoriĉaj negocaj fadenoj, en miaj pensoj Vi aperis plej unue kiel mia savanĝelo. Mi estus tre dankema al Vi, se Vi alprenus la taskon, deponi la heredan imposton ĉe mia advokato, kiu tuj pagos ĝin al la fisko. Se mi venos en la posedon de mia laŭrajta heredaĵo, mi repagos al Vi ĉi tiun sumon kun ties interezoj. Kaze de via konsento niaj advokatoj redaktus obligacion pri tio!*

*Kun profunda dankemo mi pensas pri Vi, eĉ se sen ajna klarigo Vi rifuzos ĉi mian peton, kaj ankaŭ se Vi akceptos ĉi tiun negocan oferton. En ĉi lasta okazo vi savus min, Kara Mia Amikino, kaj eble elkondukus min el la mornaj fortikaĵmuroj de la prizono de Stein, kie mi senkulpe suferas. Oni konfuzis min kun multsperta fripono. Vi scias vere, kiom oni eraras. Viaj pruvoj estus proces-decidaj antaŭ la tribunalo, Vi ja delonge konas miajn honoran pasintecon, devenon, mian veran nomon.*

*Kun sincera respekto mi atendas Vian plejeble baldaŭan respondon kaj sendas mian respektoplenan honoron al Vi kaj al Via belega filino.*

*Mi deziras Di-benitajn tagojn, vivogajajn horojn al Vi, Estimata Baronina Moŝto!*

*Bridante mian senpaciencon, esperante Vian pozitivan reagon mi*

*restos kun profunda respekto*
*barono Tasilo de Festetich*

*Postskribo: La enmaniginto de ĉi letero sciigos al Vi mian adreson, al kiu Vi povos skribi Vian respondon, kaj per kiu Vi povos sendi ĝin al mi.*

Pasis eble du semajnoj.

Advokato d-ro Karl Schimanek aperis en la puninstitucio kaj informis direktoron Hofbauer pri la plua disvolviĝo de la afero. Baronino de Majthény prenis ĉe granda banko en Prago hipotekan krediton egalan al unu miliono da ĉeĥaj kronoj, per kiuj estis ŝarĝita ŝia bieno ĉe Trenĉino. La ducent mil ŝilingojn ŝi deziras pagi en la manon de la advokato. D-ro Schimanek petis okazon paroli kun mi, ĉar por la efektivigo de la transakcio li bezonas novan rajtigon.

– Kara amiko! Pro bedaŭrinda koincido de hazardoj ni devas ĉi tie renkontiĝi...

– Vi faris vian devon, s-ro advokato!

– Mi vidas tiel, ke la afero en Hispanio glate glitas, kaj mi estas tre kontenta ankaŭ pri la ellaborado de la detaloj. S-ro Vilhelmo Sugár rakontis al mi pri ĉio... Cetere, kiel vi fartas?

– Mi ĉiam difinas al mi celon, kiun mi klopodas atingi. Tial neniam mi enuas – mi respondis.

– Ankaŭ mia profesio estas tia...

– Plena de ekscitoj. Ĉu ne? – Mi ne atendis la respondon. – Tamen ni tre diferencas. Pri mi pli aŭ malpli frue ĉio evidentiĝas, kaj pri vi neniam. Jam tio mem estas bonŝanco, eĉ pli: eminenta laboro.

– Se la providenco tiel disponis, mi... nu mi estas en tia situacio, ke mi povas helpi al vi s-ro Horváth.

La advokato detalis la aferon, poste petis min, legi, subskribi la novan plenrajtigon.

Post kelkaj tagoj la baronino pagis la sumon, kaj d-ro Schimanek sendis ĝin al la madrida adreso de Fernando Gonzalez. La aranĝo de la postlasaĵo de la infantino do iris sur sia vojo.

Pli ĝuste, tamen ne... Evidentiĝis, ke la hereda imposto mal-

multe helpis progresigi la aranĝon de la hereda proceso. La muelŝtonoj de la hispana burokratismo evidente malrapide muelis, ĉar jam tri monatoj pasis, kaj la tribunala decido pri la kvin milionoj da pesetoj ankoraŭ ne alvenis. D-ro Schimanek plurfoje urĝis sian kolegon, sed li ricevis respondon nur al sia unua letero. Liaj pluaj leteroj revenis kun la poŝta rimarkigo, ke „la adresito forveturis".

Baronino de Majthény ne povis plu atendi. Ŝi vizitis min en la prizono.

Ŝi havis taŭzitan vizaĝon. Sidiĝis kontraŭ mi. Longe ŝi reĝustigis siajn jupon, faltojn de sia bluzo, por ne devi rigardi al mi. La muskoloj de ŝiaj manoj kaj vizaĝo tremetis. Ankaŭ en tia stato ŝi plaĉis al mi.

Pasis eble tuta minuto sen saluto, senvorte. Mi ekparolis kiel unua. En mia voĉo vibris kontraŭvole iom da kunsento.

– Margareto! Kara! Pardonu min, ĉefkulpulon, ke ĉiam plu mi amas vin kaj elpensis tian artifikon, por revidi vin.

Ŝi eklevis la kapon. Ŝiaj okuloj pafis fulmojn.

– Mi ne konas vin... Tasilo, Melĥioro..., Melĥioro von Beöháza, Horváth-Festetich! grafo de Hundodomo kaj barono de...

Poste abrupte ŝi ŝanĝis tonon.

– Kial vi bezonis trompi min en tiel fia maniero?! Kiun ajn vi rajtas trompi, nur min ne! – Per sia blanka puntotuketo ŝi viŝis sian maldekstran okulon. Poste iom malpli bataleme ŝi daŭrigis:

– Ne ekzistas tia Fernando Gonzalez en tuta Madrido, pri kiu vi pensis!... Ĉe la indikita adreso mi trovis pensionon. Kvankam tie pli frue loĝis iu sinjoro kun tiu nomo, sed laŭ sia anoncpapero li alvenis el Pamplona. Mi veturis ankaŭ tien. Neniu konas lin. En Madrido laboras dek du advokatoj kaj du notarioj nomataj Gonzalez, sed neniu nomiĝas Fernando! Melĥioro! Vi ne plu estas tiu

Francisko Hoffner, tiu bohemia, facilanima, sed baze bonkora, aminda kavaliro, kiun mi siatempe ekkonis.

Poste ŝi senbridigis sian langon:

– Via advokato, tiu d-ro Schimanek komplicas kun vi! Mi denuncis lin! Ĉu vi kapablas kompreni, kion vi fifaris?

Konsternite mi aŭskultis ŝin. Dio mia! Ĉi tiu karega, gracia virino pretis traveturi duonan Hispanion, por trovi ne ekzistantan notarion! Se mi estus sciinta...

Kial mi kaŭzis al ŝi tiom da ĉagrenoj! „Mi miskonis vin, kara Margareto" – mi dirus al ŝi, se mi havus por tio sufiĉan kuraĝon. „Mi kredis, ke tiom ja valoris al vi kaj via filino la italia, poste la aventura brazila vojaĝoj. Kial vi komencis postspuri min? Vi agis por via perdo!"

– Vi estas fia! – ŝi eldiris simple kaj krude.

– Vi pravas. Mi estas fia kaj kalkulema. *Ich bin ein Schwein*[33]...

– Jes, vi estas tio! Kaj oni devas scii, ke porko havas lokon en porkejo!!! Vi estos puŝita eĉ en pli malbonan lokon! Vi elvringis mian tutan havaĵon. Kun mi vi faris tion... Ĉu vi komprenas? Kun mi! Tial mi venigos vin sur pendumilon, barono de Beöháza!!!

La enketado tiriĝis tra monatoj. La prokuroro akuzis min je trompo kaj dokumentofalsado, kiujn mi efektivigis per tio, ke en trompa maniero, uzo de falsitaj dokumentoj mi instigis baroninon de Majthény pagi 200 mil ŝilingojn en la manon de advokato d-ro Karl Schimanek. La prokuroro rezervis al si la rajton, etendi la akuzon surbaze de la indikoj de la proceso al aliaj personoj, eventuale ankaŭ al la persono de d-ro Schimanek.

Oni kalkulis je tio, ke mi neos mian kulpecon, ja neniu rekta pruvo estis trovita kontraŭ mi.

33 Mi estas porko. (germane)

Sed okazis alie. Mi parolis jene:

– Mi konfesas, ke elpensis mi kaj efektivigis mi la tutan heredan komedion. Sed mi ne sentas min kulpa, ĉar mi nur reakiris tion, kio estas la mia, sole la mia. Baronino de Majthény ŝuldis al mi antaŭ la elpago de la 200 mil ŝilingoj per 600 mil ŝilingoj.

Margareto, kiu observis ekscitite la disvolviĝon de la proceso, nun saltleviĝis de la seĝo.

– Fia mensogo! Ĉu mi ŝuldus al li?! Eĉ unu vorto ne veras en tio, kion li asertas!

La juĝisto admonis ŝin al trankvilo, kaj ŝi residiĝis.

– Vi do asertas, ke vi nur reakiris parton de tiu mono – kvankam per vojo artifika –, per kiu s-ino de Majthény ŝuldis al vi. Per kio vi povas pruvi tion? Aŭ ĉu vi kredas – li aldonis ironie –, ke oni kredos al vi je via „barona honorvorto”?

Schimanek petis vorton. Li fosis en sia aktujo kaj elprenis kelkajn leterojn.

– Jen estas ĉi tie la leteroj de la baronino, en kiuj ŝi agnoskas la ŝuldon. La leterojn mi disponigas al la tribunalo. – Kun tio li demetis la aktaron sur la tablon de la juĝisto.

Margareto sidis mirfrapita, ruĝigita de ekscito sur sia loko. Senkonsile ŝi turnis sin al sia advokato.

– Tio estas nekomprenebla... Tute nekaptebla... Tio ne estas vero! – ŝi ripetis terurite.

Ŝia advokato stariĝis.

– En la nomo de mia kliento mi plej decide refutas, ke ŝi iam ajn ŝuldus al la ĉi tie per trompo kaj dokumentofalsado akuzita Francisko Hoffner; mi deklaras, ke la prezentitaj leteroj estas falsaĵoj.

La juĝisto alvokis s-inon de Majthény.

– Mi petas vin, bonvolu rigardi ĉi tiujn leterojn, poste fari dek-

laron. – Li transdonis la aktaron.

Per tremantaj manoj Margareto transprenis la leterfaskon. Ĉiu erarige similis tiun lilan leterpaperon, kiun ŝi uzis. El la leteroj emanis la odoro de ŝia parfumo Farnezia. La skribaĵo... ŝiaj reklinitaj, taŭzitaj literoj... Ŝia skribmaniero... Estas ja frenezige... Tion skribis ja ŝi...

Ĉio ekturniĝis ĉirkaŭ ŝi: ŝi kolapsis sveninta.

La juĝisto suspendis la traktadon por duonhoro. Oni telefonis por kuracisto.

S-ino de Majthény estis flegata en apuda ĉambro.

La paŭzo daŭris tri kvaronojn da horoj. Poste la advokato de Margareto faris sensacian deklaron:

– Komisie de s-ino de Majthény mi anoncas, ke mia kliento ne deziras pridubi la verecon de la dum la traktado prezentitaj leteroj. Ŝi rezignas la pluan partoprenon en la proceso. Samtempe ŝi retiras ankaŭ sian pretendon pri kompenso.

El la benkoj de la publiko aŭdiĝis duonlaŭtaj murmurado kaj aĥ-aĥ-ado. La juĝisto skuis la sonorilon.

– Mi petas silenton, alie mi ordonos malplenigi la ĉambron!

Mi kredis, ke per tio la afero estas finita. Sed ne! La retiro de la pretendo pri kompenso ne signifis la ĉesigon de la afero, ĉar temis pri laŭofice persekutenda krimo. La prokuroro kaj la defendanto luktis longan vortoduelon koncerne la jurdemandon, ĉu estas krimo, se iu artifike reakiras tion, kio estas la lia. Poste la tribunalo retiriĝis por decidi la verdikton.

Post horo kaj duono oni publikigis la verdikton antaŭ la dense okupitaj benkovicoj de la spektantaro: Francisko Melĥioro Hoffner, t.e. mi estas liberigita je la akuzoj, levitaj kontraŭ li.

Kiel tio efektive okazis? Swoboda, kiu bone parolis la hispanan, pretigis en la presejo de la pundomo de Stein la notariajn dokumentojn. Liberiĝinta prizonulo kunportis la paketon al Vieno. Tie li transdonis ĝin al Vilhelmo Faragó, kiu veturis al Madrido, parte por povi resendi la leteron de Gonzalez kun la loka poŝta stampo al d-ro Schimanek, aliparte por transpreni la monon, ĝiritan el Vieno. El la 200 mil ŝilingoj mi ricevis nur malgrandan sumon post mia liberiĝo. Grandan parton de la mono ni uzis por la helpado de niaj arestitaj amikoj. La leterojn de Margareto pretigis Akoŝo Jarinay. Nur unufoje li bezonis ĵeti rigardon al la teksto, kaj li jam tiel lerte imitis ĝin, ke eĉ la skribinto de la originalo ne scipovis diferencigi la sian de la falsa.

## 9. Kompano de la alumetfabrikisto

Mi liberiĝis la 5an de marto 1928 el la pundomo de Stein. Tuj mi veturis al Vieno, sed seniluziigite mi devis konstati, ke miajn kontaktojn – kiuj en la pundomo tre bone funkciis –, mi ne povas uzi, ĉar senĉese postsekvas min detektivoj. Kun ioma malfruo, tamen oni validigis la ellandigan decidon de la aŭstraj aŭtoritatoj. Mia vojo kondukis al Berlino.

Mi ne povis paroli kun Vilhelmo Faragó, Sigfrido Tolnai-Turteltaub kaj la aliaj. Sed unu el miaj fidelaj amikoj konservis miajn akciojn de la Banca Rio de la Plata kaj la iamajn blankajn leterpaperojn de mia patro, do ĉion, kio bezonatas por komenci novan vivon. El mia svisa bankkonto ili ĝiris tiom da mono, por ke mi povu bone vivi kaj ne rezignu la esperon.

Ladislao Fürst hazarde trafis min en Hotel Arcadia. Li havis nur kelkajn minutojn da tempo. Kion mi eksciis, estis tre senesperige. Kvar niaj komunaj amikoj estis arestitaj. Ankaŭ li estis delonge serĉata, sed ĝis nun li sukcesis trovi eskapvojon. Li proponis al mi ne resti en Berlino, ĉefe en frekventataj lokoj mi ne aperu.

Ni ne povis scii, kiuj el niaj kompanoj kion kulpis, dum mi punsidis. Povus esti, ke malkovriĝis kelkaj malnovaj aferoj, en kiuj mi partoprenis.

Mi devis forveturi en lokon, kie ankoraŭ oni ne konas min.

La ĵurnaloj estis plenaj de artikoloj pri la sveda alumetfabrikisto Ivar Kreuger. Alumetfabriko, segejoj, hoteloj, paperfabrikoj, feruzinoj, fandejoj, gazeteldonejoj, trafikaj retoj, elektrejoj, ledfabrikoj – jen nur kelkaj el liaj firmaoj, troviĝantaj en 28 landoj. Li donis pruntojn al ŝtatoj, kaj por tio li certigis al si vendomonopolojn

en la koncernaj landoj.

Li naskiĝis en 1880. Origine li estis inĝeniero kaj konstru-industria entreprenisto. Sian unuan alumetfabrikan akcian kompanion li fondis en 1917. Dum dek jaroj li glutis ĉion en la merkato, kion eblis.

Do ne estas hazarde, ke mi elektis Svedion.

Stokholmo estas konstruita sur almenaŭ 24 mil rifoj kaj insuloj inter la Balta Maro kaj la lago Mälaren. Pro ĝiaj donitaĵoj oni nomas ĝin, kompreneble, Venecio de nordo. La fondo de la urbo estas ligita al la nomo de Birger Jarl. Unue formiĝis la Malnova Úrbo (Stadsholmen) kun potenca fortikaĵo. En la urbo estas multegaj pontoj. Pri la kutimoj mi diru nur, ke oni alparolas per baptonomo, la titolon oni mencias nur en plej oficialaj okazoj. Kutima salutformo estas *God dag,* Bonan tagon!, *God morgon,* Bonan matenon! *Hej,* Saluton! kaj *Adjö,* Ĝis revido!. La akurateco estas elstare grava. La tipa matenmanĝo konsistas el kafo, fruktosuko, *knäckerbröd,* do krakpano, ovoj kaj *filmjölk,* do acidlakto. Oni manĝas multajn haringojn, frititajn hakbulojn, marinitajn salmojn *(gravad lax)* kaj terpomojn *(potatist).* La lastaj tri semajnoj de aŭgusto estas kankrosezono, tiam kreskas la kankrokonsumo en la lando. Tradicia plado konsideriĝas ankaŭ la supo el rompitaj pizoj.

Nek per telefono, nek persone mi povis atingi, ke la alumetreĝo akceptu min. Eble pro tio, ke mi nomis min ĵurnalisto.

„Eksterordinare okupita li estas, eble post monato!” „Pli longan tempon li restados eksterlande, ni ne scias, kiam li revenos.” „Postlasu vian atingeblon, ni transdonos ĝin al li. Sed ne kalkulu je rapida intervidiĝo!”

La sekretariino de Kreuger, Elke estis tipo de norda belulino. Kun torente falanta norda hararo, bluaj okuloj, bonguste ŝminkita

vizaĝo. Foje mi portis al ŝi bukedon. La motivo estis, ke mi vizitis ŝin ĝuste la dekan fojon. Post kiam mi prezentis min ne plu kiel ĵurnalisto sed negocisto, ŝi malkaŝis la veron. Kreuger revenos nur post monato, ĉar li veturis al Kanado, Usono kaj Meksiko. Pli frue ŝi rifuzis min almenaŭ kvinfoje, kiam mi invitis ŝin al vespermanĝo. Nun degelis la glacio.

– Kun tia persisto vi povos atingi ion eĉ ĉe s-ro Kreuger! – ŝi ekridetis.

– Mia invito al la restoracio Savoy ankaŭ hodiaŭ validas.

– Estu, kiel vi volas – ŝi fine cedis. – Je la kvina mi finos. Atendu min ĉe la elirejo!

Tiel komenciĝis niaj vespermanĝoj, hejmaj kunestadoj kun Elke.

Pri Ivar mi eksciis pli multe ol el malfermita libro aŭ el la ĵurnaloj. Kompense ankaŭ mi prezentis min: mi estas fondinto de brazilaj banka kaj akcia kompanioj, posedas plurajn naftokampojn; mi havas negocajn, amikajn rilatojn kun francaj, germanaj, anglaj influhavaj personoj.

Elke estis nur unu el la bone pagataj fraŭlinoj de Ivar. Kiu scias, kiom da fidelaj homoj direktis liajn 150 alumetfabrikojn kaj ceterajn entreprenojn en 28 landoj. Kreuger amegis virinojn. Pri ilia elekto li almenaŭ tiom kompetentis, ol pri la produktojaroj de la burgundaj vinoj. Liaj damoj adoris la galantan kavaliron en ĉiuj pli signifaj urboj de la mondo. Eble eĉ Ivar mem ne registris al si, kiom da elegantaj virinoj adoras lin, kaj kiom da donacoj li disdonadas por iliaj abundaj servoj. Li ne estis de ĵaluza naturo.

– Kreuger estas tre kuraĝa – diris Elke. – Li ne agnoskas fiaskojn. Se negoco iom lamas, li serenigas sian humoron per la aliaj kaj pli novaj.

Tio signifis kompreneble, ke en la foresto de Ivar mi devis pro-

vizi Elke kiel reĝinon per ĉio bona – ĉu en emocia, korpa aŭ materiala rilatoj. Mi profitis de ŝia avidemo. Jam delonge ŝi volus fariĝi posedanto de akcioj. Mi donacis al ŝi kelkajn miajn tute senvalorajn brazilajn valorpaperojn. Vidante la multajn nulojn, skribitajn post la unuaj ciferoj de la vastaj, koloraj, desegnoplenaj, vidindaj akcioj ŝi tute moliĝis en miaj brakoj. Per tio ni ĵuris defensivan kaj ofensivan aliancon. Mi petis ŝin, prezenti min al Ivar kiel komisiiton de la Industria Ministerio de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo, alvenintan „hieraŭ" por negocaj aferoj – kio signifas, ke la unuan tagon post lia reveno el Ameriko mi devas intervidiĝi kun li. En Brazilo li funkciigis tri alumetfabrikojn, la detalan dokumentaron pri tio Elke disponigis al mi. La sekretario kaj la aliaj dungitoj de Kreuger suspektis nenion. Miaj vizitoj en la oficejo ne estis oftaj, ĉar kun Elke mi renkontiĝadis en la Grand Hotel kaj mia luita loĝejo. Kun la sekretario mi parolis nur dufoje telefone; eble trifoje ni salutis unu la alian en la koridoro. Li sidis en pli fora kontoro apud tiuj de la aliaj dungitoj.

Laŭ telegramo, sendita la 13an de majo 1928, Kreuger alvenis post tri tagoj. Anstataŭ aranĝi siajn plurajn lokajn farendojn, akumuliĝintajn dum pluraj semajnoj, li preskaŭ tuj akceptis min. Min, la komisiiton de la Industria Ministerio de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo.

– Kiu reprezentas mian negocpartneron, apartenas jam en la unua minuto al miaj plej bonaj amikoj. Kvankam nun ni parolas germane, tamen vi devas scii, ke en la sveda lingvo la pli intima alparolo okazas tre facile. Mi opinias, vi ne havas ion kontraŭ tio.

Mi ne havis. Mi transprenis lian stilon.

– Dankon por via fido, kara Ivar, reĝa moŝto de alumetfabrikistoj. Ĉiuj tiel nomas vin.

– Oni troigas, kiel pri ĉio... Ne mi malkovris Amerikon. La

alumeto de la sveda universitata profesoro Fasch Gustav Erik, patentita en 1844, havis kapon el kalia klorato, sulfura floro kaj araba gumo, kaj povis esti ekbruligita sur speciala frotsurfaco. Uzante kaj iom pliperfektiginte ĉi tiun patenton, komencis fabriki la fratoj Lundström en 1845 la sekuran bruligilon, t.e. la svedan alumeton en Jönköping.

Lundström pretigis frotsurfacon per pasto el ruĝa fosforo, antimonito, umbro kaj gelatena gluo sur la flankoj de la alumetskatoloj, dum la kapo de la alumetoj restis senfosfora; ĝi konsistis el kalia klorato, antimonito, umbro kaj araba gumo... Mi estas tro scienca, ĉu?

– Jes, jes! Tio estas tre interesa kaj instruriĉa!

– Sed vi venis, kara amiko, ne por laŭdi min. Ĉu vi alportis ian bonan negocon?

– Kompreneble. – Dume senvorte ni sorbadis el la konjako, pretigita sur la tablo.

– Oni pensas pri vi kun rekono de viaj meritoj kaj apogas vin en ĉio en Brazilo. Lia moŝto ministro pri industrio Sergio Jesus Waner kaj lia moŝto ministro pri eksteraj aferoj Alfred Marinho Cesar salutas vin kun deca respekto. Ili scias, ni scias, ke la spezo de viaj akcioj estis tre bona pasintjare kaj ĉi-jare. En viaj tri alumetfabrikoj vi duobligis la produktadon malgraŭ tio, ke vi maldungis almenaŭ ducent laboristojn. Lastatempe vi aĉetis en pluraj landoj konzernojn, gazetojn, eldonejojn...

– Kara amiko! – interrompis min Ivar. – Ĉion ĉi skribis la prestiĝaj mondumaj gazetoj kaj ankaŭ miaj ĵurnaloj. Vi venis evidente ne por tio...

– Tamen jes! La gazetoj... Kvazaŭ vi divenus miajn pensojn. La du plej prestiĝaj gazetoj de Brazilo, la Brasil kaj Verídico, do Vero estas vendeblaj. Kun favoraj kondiĉoj ni volus rekomendi ilin al

via atento.

Ivar ŝajnigis, kvazaŭ li jam aŭdis pri la du taggazetoj.

– Aha!... En Rio-de-Ĵanejro...

– Kompreneble. La pura enspezo de ĉi du ĵurnaloj, esprimita en germanaj markoj... – Mi kuntiris la brovojn, kaj la rapideco de transkalkulo aperigis sulkojn sur mia frunto. Mi tre koncentris min, ĉar mi ne preparis min por tio. Mi devis diveni kredeblan, tamen altan sumon.

– Pli ol duonmiliono da markoj, sed subtrahendas la imposto-faciligoj.

Nun jam ne kiel amiko sed kiel negocpartnero li interesiĝis.

– Kiom da personoj vi okupas? Ĉu por-registaraj estas ĉi tiuj ĵurnaloj? Ĉu ili ricevas subvenciojn? Entute kial vi volas vendi ilin, se ili bone enspezigas?

– Do... Post la lastaj maldungoj duono da homoj plenumas la saman laboron ankaŭ ĉe ni kiel en viaj fabrikoj. Por apenaŭ pli altaj salajroj. Ambaŭ ĵurnaloj estas sendependaj, sed nur sur papero. Fakte ili apartenas al la sfero de la kultura ministerio. Du filoj de la ministro estis la direktoroj de la du gazetoj. Sed antaŭ nelonge ambaŭ malfeliĉuloj suferis akcidentan morton, kiam en la praarbaro fulmo trafis ilin. La kulturministra moŝto nun volas ajnapreze liberiĝi de la firmao. Li ne volas, ke brazilano aĉetu ĝin – kiel li diris –, li malfacile tolerus, se sampatrujano, eventuale unu el liaj konatoj sidiĝus en lian havaĵon. Mi rekomendis vin al li, ĉar mi scias, ke sub via mano ĉio floras kaj progresas.

– De kiu vi aŭdis tion?

– Ho, se oni legas ĵurnalojn, vizitadas influhavajn rondojn, oni parolas pli ol ofte pri la alumetreĝo.

Sur la vizaĝo de Ivar montriĝis signoj de memkontento. Li prenis sian konjakglason kaj klinis sin dorsen. Pro lia figuro kaj pezo

li bezonis tiel grandan fotelon, sed mi ne volis loki min en ĝi oportune, ĉar ĝi estis fasonita ne por averaĝuloj. Mi sidis rektatalie, sur ĝia rando.

Li regalis min per kuba cigaro. Senvorte ni plenumis la tiaokaze kutiman ceremonion. La arto de la cigarfabrikado konsistas en tio, ke oni intermiksas diversajn tabakojn en kovrofolio, kaj tiel komponas la kombinaĵon de la dezirataj gustoj, akreco, brulaj karakterizoj. Pro la fiksado de la kovrofolio oni ne povas ĝisfumi la cigaron, ĉar ĝiaj aerkanaloj estas netralasaj. La ideala detranĉa loko estas 2-3 centmetrojn de la pinto, kie la ekstermo de la cigaro komencas mallarĝiĝi. Por la manovro plej taŭgas gilotino. Oni devas teni la finon de la cigaro je duon-centrimetro super la flamo, kaj turni en angulo de 40-45 gradoj, por ke ĝia fino egale travarmiĝu. Poste ni prenas ĝin en la buŝon, kaj iom proksimigante ĝin al la flamo, ni faras la unuajn suĉojn, dum kio ni seninterrompe turnas ĝin.

– Mi komisias vin per la aranĝado de miaj aferoj en Brazilo – li diris neatendite. – Kara Melĥioro! Mi rigardas vian vizitkarton. Ĉu bone mi legas vian nomon?

– Jes, sed alparolu min simple per Meĉjo.

– Bone, kara *Mesjo*! Pri vi mem ankoraŭ nenion vi rakontis.

– Pardonu min, Ivar, ke mi tuj transiris al la negoco.

– Tiel estis ĝuste – li aprobis. – Sed ni prenu tiel, ke mi diris jes, kaj ni jam estas trans tio.

Mi ne imagis, ke tiel rapide mi povos fari kun li negocon. Portempe la prezo kaj la kontrakto ne interesis lin.

– Do mia nomo – laŭ la vizitkarto – estas Tasilo Melĥioro Horváth de Beöháza. Mi estas brazila-hungara-rumana aristokrato, devenas el grafa familio. Mi studis en Parizo, Londono, Novjorko, Romo juron, ekonomikon, prospektoradon, financojn, komer-

con kaj diplomation. En Rumanio, Ploiești mi kun mia onklo, grandduko Ghyka posedas ĉiujn naftoputojn ĉe la Nigra Maro. En Brazilo mi posedas signifajn kafo- kaj tabakplantejojn, prilaborajn fabrikojn, eĉ lastatempe mi fariĝis posedanto de naftokampoj en Gran Chaco. En la ŝtato Rio-de-Ĵanejro mi fondis kune kun la registaro bankon. Niajn akciojn ni vendas en la tuta lando.

Ivar langoklakis kaj kontente komplimentis.

– Jen, jen! Bone vi faris! En tio estas estonteco!

El mia teko mi elprenis tri ornamitajn akciojn, kies valoro estis po 1.000.000 milrejsoj.

– Kara amiko! Permesu al mi, ke signe de mia alta estimo mi donacu al vi ĉi tiujn akciojn. Konsideru ilin kiel signon de simbola respekto, ja la veran oni ne povas, nek eblas esprimi per mono. Ĝin oni devas senti. Ĉi tie, interne... – Mi montris al mia koro.

Ĉi tiu grandpeca dikulo emociiĝis proporcie al sia pezo.

– Negoco kaj amikeco kune! Malofte ili kuniras. Dankon.

Ni intertintigis la glasojn. Poste li akceptis la aĉetprezon por la du gazetoj.

Du tagojn mi petis por la subskribo de la kontrakto surbaze de la kunprenita inventaro. Kun miaj kompanoj aktoskribistoj kaj bankspecialistoj Ernesto Spitz, Elek Mátray ni anticipe priparolis, ke ili atendos min en Hotel Astoria.

Triope ni kompilis dum 15-20 horoj tiun kvinpaĝan germanlingvan kontrakton, sur kiu ni premis la emblemon kaj stampon de la Kultura Ministerio de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo. La kontrakton parafis, stampis du (ne ekzistantaj) advokatoj. Ni kompletigis ĝin per klaŭzo. En ĝi tekstis, ke post la subskribo de la kontrakto la plenrajtigita reprezentanto de ambaŭ eldonejoj estos Tasilo Melĥioro Hoffner-Horváth de Beöháza aŭ iu de li komisiita brazila negocisto. Mi ricevos dek procentojn de la aĉet-

prezo de 600 mil markoj, ĝirendajn en ok tagoj en svislandan konton. Mia profitkvoto estos kvin procentoj de la estontaj enspezoj. Ankaŭ la 90 procentoj de la aĉetprezo ĝirendos en alian konton, nomitan en la portugala lingvo, pri kiu mi kaj kelkaj miaj amikoj disponis.

Ivar igis trarigardi la tekston de la kontrakto per siaj du advokatoj, kiuj trovis ĉion laŭregula. La du fakuloj ekzamenis nur la tekston, enhavon, stilon, la leĝajn referencojn, t.e. nur formalaĵojn. Ne venis en ilian menson peti ateston pri la ekzisto de la du gazetoj kaj la donitaj indikoj el Brazilo.

Estas nekredeble, sed dum nia negoca kaj amika interrilato eĉ unufoje Ivar ne demandis, kiaj enspezoj alvenis al li de la du gazetoj. Ĉu eble liaj kunlaborantoj, librotenistoj eĉ la kontrakton ne vidis? Ĉio povas okazi, ĉar poste mi plurfoje certiĝis, ke Ivar estas tro supraĵa, fidas ĉiujn kaj certas, ke al li ĉio sukcesas.

Elke tre ĝuis, ke kaŝe ŝi povas esti kun mi. Ofte ŝi vizitis min en Hotel Europa.

Iun tagon ŝi sciigis al mi, ke ŝiaj gepatroj baldaŭ alveturos. Mi ne donis gravecon al tio, sed ŝi ekploris. Jam delonge ili volas edzinigi ŝin al riĉulo, apud kiu ŝi povus certigi al si senzorgan vivon. Sed ŝi preferus resti sendependa virino laboranta.

– Kial mi bezonus edzon? Jen estas por mi Ivar, kaj krome ankaŭ vi. Mi havas bonan postenon, mi faras, kion mi volas. Libereco donas forton. Miaj gepatroj estas dolore konservativaj. „Virino ne laboru, la domsinjoro vivtenu ŝin! Ŝi nasku infanojn, estru la servistaron, divenu ĉiam la dezirojn de sia edzo!” Nu, tion mi ne volas! Mia patrino vizitos la ĥirurgian profesoron Laorusse, ĉar verŝajne ŝi havas galŝtonojn. Bonŝance, ili loĝas 300 kilometrojn for, malofte ni renkontiĝas, sed ofte korespondas. Kelkfoje ni telefonas. Nur hieraŭ ili sciigis al mi, ke morgaŭ ili alvenos.

– Strange, tre strange... – mi murmuris al mi.

– Karulo! – Mi havas peton al vi. Mi tre trankviligus ilin, se, vi..., nu kiel diri, mi povus prezenti vin... kiel mian fianĉon.

Subite mi devis decidi, ĉu temas pri artifiko aŭ pri senkulpa rolludo. Bizara situacio! Se tro bone mi ludos la rolon, mi neniam scipovos apartigi min de Elke kaj ŝiaj gepatroj. Kaj se ni „rompos”, ili povus fari skandalon...

– Mi ne scias, mi ne scias... – mi respondis malcerte.

– Sed tio estus ja nur rolo!

Ĉu ĉi tiu virino legas miajn pensojn? Aŭ ĉu tiel bone ŝi scias, pri kio mi cerbumas?

– Ni supozu... Kio povus esti ties sekvo? Ĉu vi jam pensis pri tio?

– Kompreneble. Antaŭ ol la afero fariĝus serioza, ni komencos kvereli kaj disiĝos. Fidu min!

– Kaj se fariĝos granda skandalo? – mi demandis.

– Ni aranĝos tiel, ke mi estu la kulpa. Ke klare kaj unusence mi estu la kulpa.

Tio trankviligis min, ĉar mi havis fidon al Elke.

– Bone, mi ne kontraŭas... Do kiu nun mi estas kaj kiel mi kondutu?

– Via nomo estas Ernst Holakin, vi estas germandevena, sed ĉi tie vi vivas. Viaj gepatroj estas riĉaj. Via patro estas bankiero, via patrino estas hejme en la kastelo, kaj vi vivas ĉe ni, ĉar vi reprezentas vian bankon, konkludas negocojn. Ni elpensu iun bonan bankonomon.

– Bank Europa! – mi tuj eldiris.

– Vi naskiĝis en Berlino, ricevis solidan edukadon, studis en Svislando... – kompletigis Elke...

Mi interrompis ŝin.

– Elke! Vi mem scias, ke tio ne estas vera!

– Mi petas vin... Tio estu vera! Vi estas efektiva negocisto!

– Ĉu? Ĉu mi estas negocisto? – Mi ne atendis la respondon. – Se tiel, kion mi ricevos interŝanĝe? Ankaŭ ni konkludu negocon!

Elke enpensiĝis. Mia propono ne plaĉis al ŝi... Poste neatendite ŝi proponis sin mem.

– Nu, min vi ricevos... por tio, interŝanĝe, kaj mi estos via sindediĉa fidelulo.

– Sed ne por eterne kaj ne kiel edzino – mi precizigis.

– Kompreneble.

Mi cerbumis. Mi ne volis diri, ke ja ankaŭ ĝis nun, preskaŭ sen ĉia sindevigo ŝi estis mia „sindediĉa fidelulo”. Se tiel, kion mi gajnos efektive per la negoco? Aventuremo min pelis, mi do konsentis.

Ni ellaboris planon ĝis la plej etaj detaloj. Kiuj estas niaj ŝatataj koloroj, verkistoj, poetoj, komponistoj, pladoj, trinkaĵoj, urboj, kion ni ŝatis ludi infanaĝe. Ni klarigis, kiel aspektas miaj gepatroj, kun kiuj Elke jam renkontiĝis. Mi eksciis, ke s-ro Felix Mühsam kaj s-ino Martha ŝatas, se iu admiras belajn aĵojn.

– Do unue mi admiros vin.

– Mi ne estas aĵo! Tamen estos bone... Sed ne forgesu, ke jam de du jaroj ni konas unu la alian.

– Ĝis kie mi povos aŭdaci en la amindumado?

– Ili estas sufiĉe konservativaj. Do modere. Kelkaj komplimentoj, afablaj rimarkoj... Gravas, ke ni ambaŭ asertu la samon, ajna diferenceto povus veki suspekton. Kaj se ili demandos ion tian, pri kio vi ne povas, tamen decus scii, diru: „Ho, pri tio ni ĝis nun ne parolis!...” Cetere la gefianĉigon ni festos, kiam via patro, Gustav Holakin revenos el Aŭstralio, kie li oficvojaĝas. T.e. en la tago de Sankta Neniamo ni gefianĉiĝos.

Elke kaj ŝiaj gepatroj vespermanĝis en Hotel Girland. En la sekva tago dum tagmanĝa tempo mi aperis en la loĝejo de Elke. Mi kunportis du belegajn bukedojn kaj botelon da franca ĉampano. Laŭ la interkonsento mi atentis ĉion.

La patro de Elke, Felix Mühsam estis mezlerneja profesoro, norda homtipo kun alta staturo, blondaj haroj. Li instruis la germanan kaj francan, bonege konis la literaturon, gramatikon, estis „hejme" en la stilistiko, etiko kaj ĉiuj branĉoj de la homsciencoj.

Ŝia patrino Martha estis gracia, afabla virino, el kiu radiis admiro al ŝia filino. Scivole, preskaŭ ĵaluze ŝi esplorrigardis kaj konfesigadis min ĉe la tablo.

– Kaj diru, kara Melĥioro! Ĉu vi jam pensis pri tio, ke se jam de du jaroj vi konas unu la alian, tiam... pardonu, ke mi tiom sinceras..., do... kiam estos la gefianĉiĝo?

Elke protestis.

– Sed Panjo! Ne...

Ŝi reprenis la vorton.

– Mi scias, ke ne decas, sed vi diris, ke vi jam multe parolis pri tiu eventualo.

– Efektive, sinjorino...

– Alparolu min per Martha, mi petas vin...

– Dankon. Do... kara Martha, apenaŭ pasas semajno, ke ni ne parolas pri ĝi. Mia patro restadas en Aŭstralio, Sidnejo, por subskribi eksterordinare bonajn kontraktojn, eĉ establi novan bankfilion. Ĵus hieraŭ li sendis telegramon. Li estas devigata direkti la tiean projektadon kaj ekfunkciigon. Sen li mi ne volus... Vi komprenas, ĉu? Patro unufoje jam havis la feliĉon renkontiĝi kun Elke. Mi povas diri, ŝiaj beleco, afablo, ĉarmo, eleganteco, delikata edukiteco, kiuj radias el ŝia persono, tute ĉarmis lin. Kaj praktike li donis por ni sian benon, kune kun Patrino... Sed tion devus ra-

konti prefere Elke.

– S-ino Suzana estas eksterordinare ĉarma kaj helpema – kompletigis mia „parulino”. – Mi esperas, ke ankaŭ vi baldaŭ ekkonos ŝin. Bedaŭrinde nun ŝi ne povis alveturi, ĉar ŝi devas helpi al sia fratino, kiu malsanas.

– Kio okazis al ŝi? – demandis Martha zorgoplene.

– Ho, nenio eksterordinara. Ŝi nur havas gripon kaj bezonas flegon.

– Jes, ŝi estas tre antaŭvidema, gripo estas ja infekta. Bone ŝi decidis.

– Kiajn planojn vi havas? – demandis Felix.

– Patro konfidis al mi, flegi liajn ĉi-lokajn bankajn kontaktojn, dum li forestas. Sed pardonu, ili estas de konfidenca karaktero...

– Pardonu, se mi estis maldiskreta. Kompreneble vi pravas.

– Melĥioro estas cetere granda amiko de s-ro Kreuger, lia patro estas ja membro de pluraj liaj konzernoj – daŭrigis Elke.

– Nu, ne troigu – mi klopodis moderigi la fanfaronantan sekretariinon –, temas ja nur pri du konzernoj.

– Tio estas tre bona, kara Tasilo! Du estas ja sufiĉaj! – rimarkigis Felix.

– Portempe! – aldonis Elke ruzete.

Mi ne komprenis, kian sencon havas ĉiam pli gapmirigi, do trompi ŝiajn gepatrojn, ilia seniluziiĝo fariĝos ja des pli granda. Elke volis nur komedion. Mi esperis: se alvenos la tempo, ŝi anoncos, ke pro ŝia eraro ni rompis. Mi ne bezonos doni klarigojn. Kion ajn mi eltenos krom esti humiligita!

– Se mi povus, probable ankaŭ mi elektus la instruistan karieron. Prave, la instruado mem, transdono kaj kontrolo de konoj, enskribo de nulnotoj tre foras de mi. Sed transplanti la propran scion en la kapojn de lernantoj devas esti tia sento, kvazaŭ la in-

struisto donus pecon el siaj intima memo, konscio. Kaj ĉi multaj novaj konoj neniam elĉerpiĝas, ili ja renaskiĝas.

– Mi taksas eksterordinare valoraj viajn ideojn, kara Melĥioro – diris mia „estonta bopatro”. – Mi havas plurajn klerajn instruatojn, al kiuj mi ŝatigis la rokokajn meblojn tiel same, kiel ekz. la operojn de Verdi, kvankam tio estas ne mia tasko.

– Mi konfesas al vi sincere, kara Melĥioro, ke mi ŝatas nur komikajn operojn – aldonis Martha. – Ĉiu fatalo konsternas min! Kaj kiel animskua muziko akompanas ĉi tiujn ĉagrenajn historiojn! Se Lucia di Lammermoor povus fariĝi feliĉa kun Edgar, ĉio okazus laŭ mia koro en la opero. Sed la komponistoj ne atentas miajn dezirojn.

– La Eternulo kreis la animon de la virinoj tiel, ke Li pensis ĝuste pri harpo. La virina animo havas multajn kordojn, kaj eĉ pli da melodioj ĝi konservas. Sed ĉu eblas ludi sur harpo la dolorojn de la protagonisto de vivtragedio? Ne, ja ne! La tuta opero transsubstanciĝus al liro, poezio, solfeĝo. Kara Martha! La kordoj de via animo kutimiĝis al Mozart, Chopin.

– Vi pravas! Sed la bona societo, deco kaj tradicio postulas, ke oni ne preterlasu eĉ nur unu prezentadon...

– ... nek koncerton – mi aldonis.

Ĉiuj unuanime aprobis.

Poste mi parolis pri la religiaj muzikaĵoj de Liszt kaj Bruckner kun tia natureco, kvazaŭ antaŭ kelkaj tagoj mi aŭskultus ilin en Stephansdom[34] aŭ Augustiner Kirche[35].

– Liszt estis eksterordinare grandanima homo. Li ne konis envion. Kiel sciate, li ne havis konstantan loĝejon en Vieno, plej ofte

34 katedralo Sankta Stefano en Vieno
35 aŭgustenana preĝejo en Vieno

tranoktis ĉe sia kuzo, aŭstra kronadvokato Franz Xaver Liszt, kiu havis ok-ĉambran apartamenton en Schottenhof, ĉe la angulo de la stratoj Herrengasse kaj Schottenring. Cetere nun loĝas en ĝi la filo de la kronadvokato. La ĉambro, en kiu la granda muzikisto loĝis, statas ankaŭ nun netuŝita. Sur la piano kuŝas notarlibreto, kiun Liszt forgesis tie ĉe sia lasta vizito.

Nu... Iun posttagmezon Liszt invitis kelkajn siajn amikojn al sia loĝejo en Schottendorf. Komponistojn, pianistojn kaj violonistojn, kelkajn damojn, ĉefprincinojn. Liszt estis brila konversacianto, la ravo de lia personeco ĉarmis ĉiujn. Dum teumado la lakeo anoncis, ke junulo, nomata Bruckner, volus paroli kun la majstro. Li diras sin komponisto. Taŭzhara hometo ĉirkaŭ tridekjara en eluzita vesto stumblis en la ĉambron. Li profunde klinis sin unue antaŭ Liszt, poste antaŭ la societo. Sub la akselo li tenis notlibreton. Li petis pardonon pro la ĝeno. Li ne sciis, ke societo kunvenis. Li venis, por prezenti sian modestan verketon al la senmorta majstro. Liszt prenis de li la notaron kaj sidiĝis al la piano. Sur la klavoj eksonoris la dua meso de Bruckner. La majstro ludis kun ĉiam pli varma sindediĉo, lia vizaĝo ardiĝis pro entuziasmo. Kiam li finis, li stariĝis, brakumis kaj kisis Bruckner.

– Vi estas tre talenta, sinjoro! – li diris kaj turnis sin al la societo. – Ĉi tiu junulo fariĝos la plej granda muzikpoeto de nia tempo. Nu, kaj la fino de la historio: du semajnojn poste, laŭ la rekomendo de Liszt, oni prezentis la meson de Bruckner en la Augustiner Kirche sur orgeno kun orkestra akompano. La famo de la juna komponisto estis fundamentita.

Poste Elke kaj ŝia patrino eliris por umadi en la kuirejo, kaj mi kun Felix transsidiĝis al la tableto. El mia teko mi elprenis mian surprizaĵon kaj regalis lin per kuba cigaro. Iom li embarasiĝis, ĉar apenaŭ kelkajn li verŝajne fumis dum sia vivo. Kompleze mi klar-

igis al li la manieron gilotini la cigarfinon. Baldaŭ li ellernis ĝin, feliĉe ŝvebigis la fumon. Li laŭdis la varian guston de la cigaroj.

Ni interparolis pri la rokoka meblaro. Al Felix plaĉis unuavice ne la ofte troigitaj oritaj ornamaĵoj, plie la ekzotaj lignospecoj, marmoro, silko kaj bronzo. Mi rimarkigis, ke la gracia framo, art-guste remburitaj sidiloj, dorsapogiloj faras ĉiujn individuaj.

Pri la barokaj sidmebloj mi eksplikis, ke pro la veluraj, silkaj ŝtofoj, gobelinoj, fajnaj gemoj, marketraĵoj, konko- kaj flordesegnoj, girlandoj, kurbigo de la kruroj, kelkfoje kun leonpiedoj Ludoviko 14a ne hazarde preferis ilin.

Ni ambaŭ konsentis, ke la du plej grandaj figuroj de la franca klasikisma pentroarto estis Jacques-Louis David kaj Jean-Auguste-Dominique Ingres.

Kiam Martha kaj Elke revenis el la kuirejo, ni jam tiom enprofundiĝis en la analizo de la franca klasika literaturo, ke la du damoj ne scipovis sekvi niajn pensofadenojn. Mi rigardis mian poŝhorloĝon kaj menciinte la progresintan tempon, mi adiaŭis. Mi dankis por la fajna vespermanĝo kaj la agrablaj horoj de la enhavoriĉa kunesto.

Elke akompanis min ĝis la dompordo, sed ni ne povis longe kisi unu la alian. Kvankam ni ambaŭ arde deziris tion.

– Nun mi jam estas via fianĉino – ŝi diris ruze.

– Tamen ni kverelos! – mi aldonis sobre.

– Prave – ŝi konsentis tristete. – Tiam ĉio restos senŝanĝa, kvazaŭ nenio estus okazinta.

– *Jawohl!*[36] – mi kunfrapis la kalkanojn, honorsalutis kaj ekiris al mia aŭtomobilo, kiu staris en la apuda strato.

Saŭno, svede *bastu* estas ejo aŭ aparta lignodometo, kiun oni

36 Ja certe! (germane)

hejtas ŝvitige varma. Kun Ivar kaj liaj amikoj mi kunvenis unufoje en semajno por tia celo. Tiu estas nekonata baniĝa kaj refreŝiĝa maniero por hungaroj. La solida saŭnado konsistas el tri-kvar partoj kaj povas daŭri ĝis horo kaj duono. Estiĝas 80-90 celsiaj gradoj sekve de la varmega vaporo, produktiĝanta el la akvo, ŝprucigita sur ŝtonojn. Post ŝvitiĝo oni malvarmigas sin, mergiĝante en malvarma baseno. Min konsternis la kutimo, ke vintre la plej kuraĝaj hakas breĉon en la glacio kaj tie baniĝas. Al mi sufiĉis vintre kaj somere stariĝi en la liberan aeron, kaj post kelkaj minutoj mia korpo malvarmiĝis. Poste mi, kompreneble, reiris. Laŭ la konsilo de miaj amikoj mi trinkis multan akvon. Ŝvitado estas tre utila laŭ la kuracistoj, ĉar foriĝas toksaj substancoj el la organismo, kaj tio efikas favore al la haŭto. Ankaŭ kontraŭ sendormeco ĝi estas bona medikamento. Kompreneble, se mi volis pasigi kelkajn horojn kun Elke, antaŭe mi neniam saŭnis.

La gazetoj de Ivar skribis nur la supraĵon, eksteraĵon de ĉiuj liaj negocoj. Hosanaj laŭdoj estis panegirataj pri li, kaj li sunumis sin en la glorlumo. Kun la helpo de Elke, kiun mi „premiis" per novaj akcioj de la Banca Rio de la Plata, mi povis ekkoni preskaŭ ĉiujn detalojn de tiuj kontraktoj, kiujn li aŭ liaj komisiitoj en ĉiuj partoj de la mondo konkludis. Mi rimarkis la avidemon de Ivar. La Kreuger-imperio konsideriĝis egalranga kun tiuj de la grandaj usonaj miliarduloj Rockefeller, Morgan, Astor, kvankam interne ĉio krakis-vrakis. Ivar Kreuger povus esti la plej senzorga homo de la mondo. Dum li donis pruntojn al diversaj ŝtatoj, interŝanĝe por kiuj li ricevis la monopolon de la ŝulda ŝtato fabriki alumetojn, lia havaĵo daŭre plimultiĝis. Sed lia fantazio obsedis lin. Li aĉetis grandan parton de la arbaraj areoj de la skandinavaj ŝtatoj, malfermis minejojn, konstruigis ferfandejojn kaj laminejojn, fon-

dis bankojn, akiris akciajn plimultojn en transoceanaj nafto-firmaoj – sen disponi la por tio necesajn enormajn financajn rimedojn. Tiel li devis ĝiskreve streĉi siajn kreditojn, por povi teni la ŝajnon alekstere kaj montri sukcesojn ajnapreze. Tiel li fariĝis senskrupula aventuristo. Danke al Elke kaj la dokumentoj mi jam pli frue malkovris tion.

Ernesto Spitz kaj Alekso Mátray, dum la tempo post la vendo de la du brazilaj gazetoj, akiris signifajn sumojn en bankoj de diversaj svedaj urboj. Ankaŭ min ili volis enigi, sed kiel amiko de Ivar mi devis gardi mian bonan famon.

– Ni jam faru ion grandan! – diris Ernesto senpacience.

– Ĉu ne sufiĉis al vi, ke ni vendis du ne ekzistantajn gazetojn? – mi demandis.

– Tio estas jam fora pasinteco...

Neatendite mi fingromontris la mapon de Svedio, kaj mi mem ne scias, kial, mi diris:

– Ĉi tie devas esti oro!

Mia fingro ekripozis sur la gubernio Norrbotten. Mi intencis fari ŝercon, sed Ernesto prenis ĝin serioze.

– Vi pravas! Ankaŭ tion ni faros! – Ni priparolis, ke por du semajnoj mi forveturos el la ĉefurbo, kaj reveninte, jubile mi novaĵumos al Ivar, ke la akvo de la riveretoj, kiuj fontas en la montoj de Norrbotten, kundrivigas orgrajnojn, kaj la lokanoj okupiĝas per orlavado. Ĉi tiuj du semajnoj sufiĉos al ili, por aĉeti pli-malpli grandajn orgrajnojn, eventuale nefacetitajn fajnajn gemojn.

Mi diris, ke mi ĉirkaŭrigardos en ĉi tiu mirinda lando. Miaj koro kaj animo avidas estetikajn plezurojn.

– Mi ne pensis, ke vi estas tiel sentimentala! – diris Elke.

Iun alian fojon Ivar komentis jene mian anoncon:

– Ĝis nun vi bone sekretis, ke krom via granda menso vi havas

ankaŭ grandan animon. Iru do, amiko!...

Mi veturis al urbeto distanca centon da kilometroj, en kies unusola hotelo mi luis la plej belan apartamenton. Helpe de la babilema direktoro mi konatiĝis kun preskaŭ ĉiuj eminentuloj de la urbeto. Mi prezentis min kiel traveturanta bankiero, kiu por tempeto eskapis la streĉojn de la laboro; mi volas spiri freŝan aeron, por renaskiĝi.

Ankaŭ la prezidanto de la loka banko ekatentis min. Dum nia kvarokula interparolo mi prezentis min same kiel al Ivar. Post la mencio de la naftokampoj en Gran Chaco kaj Banca Rio de la Plata li montris pliigitan intereson pri mia persono. Kiam mi montris al li la dekoritan akcion pri 500 mil milrejsoj de mia banko, li tuj volis ĝin aĉeti. Mi ne plu memoras precize, sed mi diris tre altan sumon. Mi klarigis al li, ke ĝia kurzo plialtiĝas de tago al tago, do ne konsilindas baldaŭ monigi ĝin. Li entuziasme konsentis. Mi petis kontantan monon, kiun post horo mi ankaŭ ricevis.

La ĉambristinon, ĉirkaŭ dudek-kivnjaran oni nomis Colette. Ŝi ne estis vera sveda belulino, sed el ĉiuj punktoj de sia korpo ŝi kapablis emani tian magian forton, kiu ne lasis trankvila mian vireco n. En ŝia rigardo montriĝis speco de humilo, ĉasteco.

Ŝiaj movoj, vibroj de ŝia figuro malkaŝis virinon avidan je viro. En ŝia ĉeesto mi ne povis resti indiferenta. Ŝia plena, tamen belforma figuro elvokis la impreson de Venero de Botticelli, kreita por amoro. Ŝi enkorpigis tian virinon, kiu konsumas kun plezuro la terajn bonojn kaj ne kalkulas kun la sekvoj. Ĉi tiu natura amo al la vivo, kontenteco, interna trankvilo faris ŝian personecon rava. Kaj tio manifestiĝis ankaŭ en la ĉarmaj trajtoj de ŝia vizaĝo.

– Colette! – mi alparolis ŝin. – Ĉu iu jam diris al vi, kiel ĉarma vi estas?

Ŝi ne perpleksiĝis. Ŝi ŝanĝis ĝuste la littolaĵon. Ŝi staris dorse,

sed returnis sin al mi.

– Sinjoro! Dankon. Ĵus diris iu al mi. Kaj tiu estis vi.

El ŝiaj okuloj mi legis instigon. Ekde ĉi tiu punkto kovru vualo nian ok- aŭ dek-tagan rilaton.

Fidele al sia promeso, Ernesto Spitz kaj Alekso Mátray alvenis la dek-kvaran tagon. Siajn kofretojn ili malfermis en mia ĉambro en akompano de solena parolado. En ili kaŝiĝis la pli-malpli grandaj orgrajnoj, volvitaj en lintolo.

– Ili devis kosti riĉan havaĵon, sed abunde ili profitigos – mi diris al ili plena de entuziasmo.

– Nu, kompreneble! – konsentis Ernesto kaj enmanigis rokaĵon jugland-mezuran, kaj ŝerce aldonis: – Nur ĉi unu ni portis al vi signe de nia amikeco, t.e. donace. La aliaj valoraĵoj tamen devos miloble rentumi!

Ekde tiam daŭris plu aŭ prefere komenciĝis la orĉasado en Norrbotten. Ni elektis kelkajn ŝtonojn, brilantajn de flavaj kristaloj...

Malkune ni reveturis al Stokholmo, por ne veki atenton.

Apenaŭ mi alvenis, mi telefonis al Ivar kaj novaĵumis, ke mi liveros al li sensacian „materialon”. La vorto aŭdiĝis enigme. Plurfoje li demandis pri ĝia senco. Fine mi sukcesis mildigi lian senpaciencon per tio, ke mi portos al li surprizaĵon, t.e. donaceton.

Kiel infano li kondutis en sia kabineto, kiam li ekvidis en mia mano la dekoritan kofreton. Post manpremo li tuj postulis, ke mi malfermu la pakaĵon. Li volis vidi, senti, palpi la nevideblan donacon.

– Ne, kara amiko! – mi trankviligis lin. – Transdoni donacon ĉiam havas sian propran tempon. Kaj tio havas ankaŭ sian ceremonion!

Li sidiĝis en sia ampleksa fotelo. La maldekstran piedon li me-

tis sur sian dekstran femuron tiel, ke de la plando de lia ŝuo mi povis vidi: hodiaŭ li jam tenisis. (Neniam por la rezulto, nur por la moviĝo li ludis.)

– Kion vi farus, se iu konsilus al vi aĉeti riveretojn, arbarojn kaj montojn en la norda parto de Svedio?

– Via demando estas tute absurda...

– Pardonon! Mi, kiel negocisto, respondus en via loko alimaniere. La ĝusta respondo estas: tio dependas, kion kaŝas la regiono sub la tero...

Li enpensiĝis kaj elbuŝigis nur:

– Finfine... vi ja pravas...

– Nu, tiu regiono rezervas por ni orgrajnojn. La riveretoj kundrivigas ilin el la interno de la montoj; la loka loĝantaro okupiĝas pri orlavado.

Mi malfermis mian kofreton, en kiu kaŝiĝis miaj pruvaĵoj, volvitaj en lintolo. Mi malvolvis ĉiujn.

– En la lasta tago antaŭ mia forveturo, dum du horoj mi kolektis ĉi tiujn belajn ekzemplerojn en la gubernio Norrbotten.

Sur la vizaĝo de Ivar aperis ekscito, elvokita de la surprizo.

– Ĉi tiu estas la plej granda malkovro de via vivo! – li komplimentis tre sincere.

– Mi korektas: la plej granda malkovro de nia vivo! Sen vi eĉ unu paŝon mi ne povus fari!

– Jen tia estas la vera amiko! – li entuziasmis.

– Se vi aĉetos tiun regionon, ni povos malfermi pli grandajn orminejojn ol en Sud-Afriko! Post kelkaj jaroj Svedio estos la plej granda or-ekspluata potenco de la mondo!

Por la sukceso de niaj planoj kaj festado de nia entuziasmo ni plurfoje tintigis niajn glasojn per ĉampano Törley, surtabligita de Elke.

(Al Elke nur sekvatage mi malkovris la sensacion. Ŝia diskreteco estis vere bezonata ankaŭ ĉi-foje. Neniu povis ekscii antaŭtempe, kion rulas la riveretoj de Norrbotten.)

Ivar skribis leteron al Arne Lindström kaj Gerd Holler, du geologoj de la Terscienca Instituto de Gotenburgo. Li petis ilin partopreni en la de mi organizota ekspedicio. Ili malkovru la precizan lokon kaj amplekson de la orkampo, taksu la eblojn malkovri minejon kaj ties eventualajn kostojn. Ili eksciu, kiu estas la posedanto de la teritorio. Se la ŝtato, same ne gravas!

Post kiam mi pasigis feliĉan nokton kun Elke, per la matena trajno mi forveturis al Gotenburgo.

Gotenburgo estas la dua plej granda urbo de Svedio kun eturba etoso sed svarmado de grandurbo. Ĝi famas interalie pro ĝia en 1621 fondita haveno kaj vendostrato, ĝi havas nenombreble multajn restoraciojn, teraskafejojn. Mi ne povis preterlasi la historian muzeon Ostindiska Huset. En la belarta muzeo Konstmuseet mi rigardis pentraĵojn de Rubens, Van Gogh, Rembrandt kaj la mirindajn kreaĵojn de la franca impresionismo. La vidindajn kastelojn kaj fortikaĵojn ĉirkaŭ la urbo mi ne havis okazon malkovri. Gotenburgo estas vera verda urbo kun freŝa, pura aero.

Prof. Arne Lindström proksimis al sia sesdeka vivojaro, sed pro lia moviĝemo, rufaj haroj aspektis multe pli juna. Ŝia ŝatata parolturno estis: *„Nur Mut!"*, Nur kuraĝe!, *„Im Fluge!"*, Pli ol tuj!. Li vestis sin mezume, verŝajne ne tre ŝatis sian profesion. Mi pensas tiel, ĉar kelkfoje skeptike li parolis pri la tempo de la estiĝo de mineraloj en la diversaj geokronologiaj epokoj. Kiam oni taksis rokaĵon kvin aŭ ses milionojn da jaroj aĝa, li opiniis la indikon falsa. Oni ne devus erari unu milionon da jaroj, li insistis, ĉar tiel la takso estas tute ne aŭtentika.

Prof. Gerd Holler estis kontraŭo de sia kolego. Kompare kun

sia kvindek-jara aĝo li aspektis kelkfoje sepdek-jara; li iris ŝovpaŝe, neglekte vestis sin. Li portis dikframajn, plur-dioptriajn okulvitrojn, liaj blankaj haroj kaj brovoj aspektigis lin tute profesoreca. Li ŝajnis preciza, kelkfoje tamen elvokis la impreson de distrita maljunulo. Li pretis miri pri la plej naturaj aferoj – ankaŭ plurfoje! Jam sekvatage li forgesis, kion li vespermanĝis, sed plastike li priskribis la procezon kaj periodojn de la elformiĝo de Tero. Pluraj liaj libroj aperis, kaj ĉiu ricevis favoran akcepton.

Gerd perfekte konis la nordan gastronomion. Se li ekmalsatis, li daŭre parolis pri tio. En Norrland konsideriĝas nacia plado la hordea kaĉo kun malvarma lakto kaj ruĝ-vakcinia marmelado. La marinitajn haringojn oni manĝas kun terpoma garnaĵo kaj cepoj, mustardo, aneto aŭ kun terpomoj, kuiritaj en la propra ŝelo, sur ilin oni ŝutas fromaĝon, tranĉitan en maldikaj pecoj. Al ĝi oni trinkas brandon aŭ bieron. La lesivita fiŝo – kiun antaŭ Kristnasko oni vendas en lesivita stato en la vendejoj – havas dudekon da pretigaj manieroj. La acidigita haringo, *surströmming,* estas sveda specialaĵo, komparebla al nenio. Ĝi havas teruran odoron. Malgraŭ tio kelkaj ĵuras, ke ĝi estas la plej bongusta aĵo en la mondo.

En la antikvaj tempoj oni havis malmulte da salo, kaj ĝin oni povis anstataŭigi per nenio alia. Nur kiam la salliverado fariĝis ebla en pli grandaj kvantoj, oni povis sali la grandamasajn haringojn, kaptitajn en majo en la Balta Maro, kiujn oficiale oni nomis *strömming.* Do pli frue pro manko de salo kaj la varmo oni enterigis ilin en bareloj. Kaj tie ili komencis fermenti, tial fine de la somero fariĝis tute molaj. Kaj bele fetoraj. La unu-litrajn konservskatolojn oni malfermas nur en la libera aero, laŭeble sub akvo. Alie la katoj malaperus el la ĉirkaŭaĵo, kaj nur post la ĉeso de la penetranta odoraĉo revenus.

Post zorga purigado, forigo de la tute putrintaj partoj konsilindas ĝin manĝi kun kuiritaj terpomoj, miksitaj kun multaj cepoj kaj kremo kaj volvitaj en buterpano – per unusola mordo. La brando, kiel efektiva gargarilo kaj sensensigilo, estas deviga poste. Mi trinkis ankaŭ antaŭe.

Oni povus longe karakterizi la du profesorojn, mi ja havis por tio tempon dum nia trisemajna ekspedicio en julio de 1928. Danke al mia plenrajtigo kaj mono, ricevitaj de Ivar, la dudek-membra ekspedicio devis plenumi ĉiujn miajn dezirojn. Ernesto kaj Alekso organizis, ke en Norrbotten akceptu nin kompetentaj, la regionon bone konantaj gvidantoj.

Prof. Gerd Holler ne volis aŭ ne povis koncentri sin al serĉado de orgrajnoj. Li kolektis ĉiuspecajn ŝtonojn, kaj latine nomadis la mineralojn. Li estis feliĉa kiel infano, kiun oni enlasis en ludilvendejon, kie li povas akiri ĉion senpage.

Multegaj lagoj kaj riveroj troviĝas en ĉi tiu regiono. La vetero kompareblas ankaŭ somere nur al la mez-eŭropa averaĝa printempa vetero.

Kalix-elf estas 400 kilometrojn longa rivero en la gubernio Norrbotten; ĝi akceptas Koitom-elf, branĉon de Tornea-elf, Angesat, transformiĝas en longan lagon kaj enfluas en la Botnian Golfon. Tio estis mia trezorpromesa regiono.

En Svedio la plej granda festo post Kristnasko estas la somera solstico, t.e. la 21a de julio. Tiam estas la plej mallonga nokto kaj la plej longa tago. Norde la sundisko malaperas nur duone, kaj ĝi denove komencas leviĝi. En julio ankaŭ en ĉi tiu regiono ankoraŭ plene regas blankaj noktoj. Pli-malpli mi ja konis tian potencon de la norda lumo, tamen ĉio ŝajnis al mi mistera. Ne estis mallume, eĉ ĉirkaŭ meznokto oni povis legi ĵurnalon. La preskaŭ palpebla grizeca helo aŭ prefere noktokrepusko brakumis min, penet-

ris en mian korpon. Mi plenigis mian animon. Kune kun la aliaj ankaŭ mi ne deziris dormi. Sed post ĉiu tria tago subigis min laco, tiufoje mi devis dormi kvar ĝis ses horojn. Preskaŭ fizike doloris min la manko de Milico, poste Margareto. Kial mi ne povas kunĝui kun ili ĉi tiun laktoblankan lumtorenton?...

Por malkovri orgrajnojn, mi bezonis trovi aliancanojn. Kun niaj montaj gvidantoj Otto Rehhagealt kaj Joachim Löwe mi sukcesis, post transdono de grasa sumo, interkonsenti, kie ni trovu orgrajnojn. Ili kaŝis la grajnojn rande de rapidfluaj riveretoj, en kavoj de akvolavataj rokoj, inter aliaj rokaĵoj. La membroj de la ekspedicio unu post alia malkovris la valorajn mineralojn.

Gerd Holler kaj Arne Lindström entuziasmis, ĝojdancis ĉe la malkovro de ĉiu trovaĵo. Ni aranĝis tiel, ke duonon de la dudek du rokaĵoj ili malkovru. Tio des pli altigis ilian bonan humoron.

Al Ivar trifoje ni sendis telegramojn, en kiuj ni sciigis, ke nia ekspedicio havas sukceson. Laŭ mia memoro unu el ili tekstis jene: „Ĉi tiu regiono estas vera orminejo. Ripetfoje ni trovas ties pruvojn. Ni laboras entuziasme, diligente kolektas rokaĵojn. S-ro Kreuger povas kalkuli je grandega sukceso."

Pro mono ni ne sentis mankon. La plenrajtigo de Ivar ampleksis ankaŭ, ke ni povis preni monon kiam ajn el donita konto laŭ niaj postuloj.

Ivar malpacience atendis nian revenon. La du profesoroj vorte eksplikis sian eksterordinare pozitivan opinion, poste transdonis sian preparitan ekspertizon. En ĝi ili precize lokalizis la areon, kie la membroj de la ekspedicio trovis orgrajnojn. Ili ne avaris je laŭdaj kaj esperigaj epitetoj. Ne povis ja esti alimaniere, surbaze de la komponentoj de la kaŝitaj kaj retrovitaj valoraĵoj ili ja indis je kolektoj de miliarduloj aŭ esti en muzeoj.

Ĉio iris sur sia vojo. Ivar informis sian gazetaran imperion pri

la unika malkovro. La gazetoj dise en la mondo diskriis la sensacion per titolliteroj. Ne malmulte kontentigis min, ke grandan parton de mia germane skribita projekto Ivar aprobis, kaj ties tradukon enprenis en sian deklaron. Mia nomo kune kun la du profesoroj plurfoje menciiĝis en ĝi. Kelkaj ĵurnaloj traktis tiel la aferon, kvazaŭ mi havus specialan kapablon malkovri mineralojn kaŝitajn sub la tero. Mi ne malĝojis pro tio. Finfine mi efektive posedas neordinarajn kapablojn, mi ja malkovris tie oron, kie ĝi ne estis kaj neniam estos. La gazetoj en la soldo de la Kreuger-konzerno distrumpetis en ĉiuj partoj de la mondo, ke la or-ekspluatado de Svedio superos en kelkaj jaroj tiun de la Sud-Afrika Unio. La eminentan negocan flarsenton kaj entreprenemon de Kreuger atestas – skribis la gazetoj –, ke ĝustatempe li akiris la proprieton de ĉi tiuj teritorioj. Fine ili raportis pri tio, ke fondiĝis la Norrbotten Ormineja Ekspluata Akcia Kompanio, kiu baldaŭ fariĝos unu el la entreprenoj kun plej bona rentabilitato de la mondo.

Ivar desegnigis kelkajn bankajn akciojn, kaj konfidis al mi la elekton. Mi petis du tagojn, ja almenaŭ tiom mi bezonis, ke kun miaj kompanoj scipovu decidi, kiu estas la plej simpla, sed ornamita, plaĉaspekta, tamen facile falsebla.

En la sako de Aleksandro Klaár ĉiam troviĝis kelkaj facile imiteblaj, jam bone ellernitaj motivoj. Li formis sian koncepton, kaj ĉi tiun kvaran varianton mi reportis al Ivar.

– Nu vidu, ankaŭ mi imagis ion tian. Per sia grandformata aspekto ĝi radias forton kaj ankaŭ el estetika vidpunkto ĝi impresas.

Ivar tiam prezentis min la unuan fojon al la prokuristoj. Pri la nomoj de Inbvar Enander, Adahl Nils Martin, Andersson Welster, Johan Danbom, Jürgen Kreuger mi bone memoras. Ili respondecis pri la gazetaro, investoj, evoluigoj, ekonomiaj kaj financaj

aferoj, do ili estis la plej gravaj spiritaj direktantoj de Ivar. Ni estis ravitaj unu de la aliaj. Tiom da aprezaj vortoj mi neniam ricevis dum mia vivo.

La akcioj de la orminejo de Norrbotten estis enkondukitaj dum semajnoj en ĉiuj borsoj de la mondo, kaj ilia kurzo rapidege plialtiĝis.

Elke malkovris al mi kun pli granda plezuro la misterajn sekretojn de sia korpo. Mi aperis kun Ivar kaj liaj negocpartneroj en elitaj restoracioj, amuzlokaloj. La romantikon de la nokta vivo certigis mirindaj flirtulinoj.

Por doni impreson, mi revivigas detaleton de unu el niaj frenezetaj vesperoj (noktoj). En la amuzlokalo regis duonlumo. Foteloj, seĝoj, kanapoj kun malhele viola tego, nigraj tabletoj, vibrantaj lummakuloj sur la muroj, ŝajnantaj rozkoloraj en la mistera prilumo. Soleca viro aŭ sinjoro, alveninta sen informi sian s-inon edzinon, sentis en sia koro liberecon, sendependecon, aventuremon; ĉi tie ĉio kaj ĉiuj servis por tio, ke ĉeno de plezuroj glite glatu. Frakitaj sinjoroj, balrobaj damoj babilis ĉarme pri bagateloj, sed por ili tio tamen havis specialan signifon, ili ja nun klarigis inter si la kondiĉojn de siaj noktaj amludetoj en florlingvo.

Ivar restis ĉe sia de pli frue bone konata karnoriĉa, blonda Inge. Al mi li prezentis Rita, Margot kaj Brünhilda. Ĉi lasta ŝajnis al mi ankoraŭ knabineto, Margot tromatura, krome ŝia staturo multe superis la mian. La ĉarmo, figuro de la rufhara Rita gajnis mian plaĉon. Ŝi sidiĝis apud mi. Unu el la frakitaj kelneroj tuj aperis ĉe nia tablo kaj sciigis, ke konante la guston de Rita li alportos al ŝi neordinaran, specialan drinkaĵon. Mi mendis la samon.

Sur la surfaco de la fluaĵo, ŝajnanta verdeca, flosis du citronringoj. Pli frue Ivar rakontis, ke en amuzlokaloj la knabinoj konsumas trinkaĵojn, en kiuj malestas alkoholo, sed oni fakturas la

koktelojn aŭ ĉampanon al iliaj gastigantoj per alta prezo. Mi ne demandis Rita, ĉu vere tian „pseŭdodrinkaĵon” oni surtabligis al ŝi. La mia estis alkohola kaj bongusta.

Rita ne malavaris siajn ĉarmaĵojn. Longe ni ĝuis reciproke nian junan ardon.

Mi sciis, ke mi devas satĝui ĉi tiun oran junecon. Tute ĝis kiam eblas. Ĉar ĝian lastan horon mi ne povis koni, mi esperis laŭeble plej longe.

Ivar pretis akcepti ĉiun mian bonan ideon. Li neniam povis ekscii, ke Elke flustris al mi liajn zorgojn, ĝojojn, cerbumojn. Tiel do per nerekta vojo mi ĉiufoje venis al la solvo de liaj problemoj. Dum la aranĝado de siaj negocaj aferoj li kunprenis min al Belgio, Nederlando, Italio kaj Svislando. Dume precize alvenadis al miaj kontoj la enspezoj el la vendo de la brazilaj gazetoj. Mi ricevis ankaŭ la dek procentojn por la redaktado kaj superrigardo. Ivar kaj liaj kunlaborantoj neniam demandis, kiel mi scipovas organizi la laboron el tiel granda distanco. Ĉi tiu senekzempla senrespondeco, kiu ĉiupaŝe montriĝis en la konduto de Ivar, laboro de liaj dungitoj, kuraĝigis min. Mi kalkulis pli ol iam je Elke. Volonte ŝi transdonis al mi konfidencajn informojn, aktojn, ŝi estis ja duoble mia aliancano: en la lito kaj la komuna profito. En diversaj svedaj urboj mi prenis kontantan monon per falsaj rajtigoj, tratoj. La afero tre plaĉis al mi, ĉar danke al la gazetaro mi fariĝis konata en la tuta lando, tial je la unua peto mi povis sendi al miaj svisaj kontoj sumojn, ne kvalifikeblajn modestaj. Manke de precizaj informoj Elke kontentiĝis ankaŭ je relative malaltaj sumoj.

La fato longe favoris min. La lastan tagon de 1929 mi ankoraŭ kune festis kun la granduloj de la Kreuger-imperio. En agrabla, bonhumora societo ekvidis nin la 1930a jaro. La ekonomia krizo furiozis en la mondo, sed Ivar kaj liaj firmaoj ne volis preni konon

pri ĝi. Ni deziris al ni multe pli bonan jaron, ol la pasinta estis.

– Mi ne komprenas, kial ni ankoraŭ ne sukcesis trovi oron en Norrbotten – li rimarkis kun rezigno. – Vi faris la vian, sed de tiam nenio nova. Kiam ni ekspluatos pli multe da oro ol la Sud-Afrika Unio?

– Ŝajnas al mi, ke mi mem devus fari ĉion... – mi intermetis.

– Mia pacienco jam tuŝas la limon de senpacienco!

Ni intertintigis la glasojn.

– Mi deziras, ke spite al la kruela monda ekonomia krizo vi sukcesu realigi ĉiujn viajn planojn. Nuntempe, meze de stagnado estas malfacile trovi la ŝlosilon al tiu pordo, post kies malfermo ni povos veni en la lumon de la espero. Sed Ivar jam tiel ofte trovis tiajn magiajn pordojn. Li enpaŝis kaj transformis la mondon. Sinjoroj, ni havas nenian kaŭzon por malĝoji. Nia espero ankaŭ plu estas nerompebla. Mi fidas, ke la jaro 1930 signifos por ni la orminejon. Ni trinku nun por tio!

Ĉi tiun mallongan toston mi skribis svede kune kun Elke, poste parkerigis ĝin. Ĝi plaĉis al la eminentaj sinjoroj kaj damoj de la societo, ĉar ili jubile aplaŭdis min. Jam ankaŭ Ivar ridetis, forvaporiĝis lia pli frua nekontento.

Komence de januaro mi renkontiĝis kun li en lia kabineto. Kiom ajn bona spiono pruviĝis Elke, nun ŝi ne povis informi min pri la temo de nia interparolo. Li regalis min per cigaro, konjako kaj kuketoj. Ni revokis en nian memoron la adiaŭon de la jaro.

– Vidu, Meĉjo! Mi sentas tiel, ke mi ne kondutis ĝuste, kiam tuŝe mi respondecigis vin pro tio, ke niaj ministoj ankoraŭ ne trovis oron en Norrbotten.

– Ne gravas! La ekspedicio, gvidita de mi, faris ĉion eblan por la sukceso. Estas unu afero malkovri kaj alia ekspluati.

– Ankaŭ mi tiel pensas, sed ankoraŭfoje ni devus malkovri kaj

trovi, kie estas la kuŝejoj. Vi kolektis la orgrajnojn en dek kvin diversaj lokoj. Irante laŭ viaj mapoj, miaj inĝenieroj kaj ilia teamo eĉ spurojn de kuŝejoj ne trovis. Ili analizas la rokaĵojn, akvojn, prenas specimenojn el la grundo. Kaj nenio! Viaj gvidantoj surloke ankaŭ plu konfirmas la kredon, sed la rezulto estas nulo.

– Estas neeble, ke nia ekspedicio trovis orgrajnojn pro blinda hazardo. Mi ne kuraĝas supozi, ke vi elsendis nelertajn homojn. Ili ĉiuj estas fakuloj, mi ne kredas do, ke ili boras en neĝusta loko, ĉar ni kolektis la rokaĵojn sur areo de ĉirkaŭ du kvadrataj kilometroj. La miso devas kuŝi en tio, ke ne tie ili boras, kie necesus.

– Mi jam pensis pri tio, ke mi devus denove peti la du gotenburgajn profesorojn veturi surloken.

– Tio estas vere bona ideo.

– Pardonu, ke mi pensis ne pri vi...

– Tio estas natura, ja ne mi sed ili prezentas la ŝlosilon de la solvo. Cetere mi planas baldaŭ veturi al Berlino. Por pli longa tempo, eventuale definitive. Mi informos vin pri la disvolviĝo de miaj aferoj. Eble unu el miaj negocoj ekplaĉos ankaŭ al vi.

– Kaj Brazilo? – li demandis neatendite.

– Ĝuste tio! Mi ricevis mesaĝon, kaj mi devas aranĝi gravan aferon, poste ek, rekte al Sud-Ameriko!

Jam pli frue mi aludis al Kreuger kaj Elke, ke por la malkovro de la fabeleca trezoro mi meritus premion. Elke tuj komprenis, kion mi fakte volas kaj plurfoje menciis tion al Ivar.

Mi kalkulis je signifa kontanta mono, kiun mi dividus inter la kompanoj.

Poste alvenis la tago de adiaŭo. Tiam la akcioj de la orminejo de Norrbotten havis en ĉiuj borsoj bonan prezon.

– Kara amiko! Estis eksterordinara ĝojo labori kun vi. Mi scias, ke via opinio estas la sama, kaj nun doloras min, ke vi devas for-

iri. Ĝuste nun, kiam oni veturigis la du profesorojn al Norrbotten, kaj kreiĝis ĉiuj esperoj por efektive malfermi orminejon. Tiam la emisiitaj akcioj valoros eble dekoble pli. Tial vi vidas sur mia skribotablo ĉi du kofretojn. Ili plenas... de viaj propraj akcioj. Nun eble vi ne scipovas pesi, kiom ili valoras. Sed kio estos post unu jaro?! Laŭ mi tiel mi povas esprimi plej bone mian dankemon al vi.

Mi ne aŭdacis diri, ke min pli ĝojigus kelkmil dolaroj. Ĉi tiuj multaj senvaloraj paperoj taŭgas ja nur por fari pluajn fraŭdojn. Por gvidi min sur la vojon de honesto ja certe ne.

Krom sia scio kaj volo Ivar kreis situacion, el kiu ne eblis eliri honeste.

Ne gravas! Mi ricevis du kofretojn kaj mian trezorminejon.

## 10. La flamo de espero flirtas

Mi konsideris Berlinon kultura ĉefurbo de Eŭropo. Ĝiaj loĝantoj havis specifan etoson, vivosenton. Ĝi estis loko de bohemiaj baloj, amuziĝoj, kie aperis reprezentantoj de ĉiuj landoj, tial ĝi fandis en sin naciojn kaj lingvojn. Kaj la reĝa-imperiestra Berlino liveris serion da tiaj nepreterireblaj monumentoj, kiuj fariĝis nesupereblaj simboloj de Berlino. Al la nomo de reĝo Frederiko la 1a ligiĝas unu efektive malfacile preterirebla konstruaĵo, la Brandenburga Pordego. En la arbaro, ĉirkaŭanta tiam Berlinon, la reĝo hakigis vojon por sia edzino direkte al la kastelo en Charlottenburg. Tia pordego decis al ŝi!

La imperia ĉefurbo montris tiutempe svarmoplenan bildon. Manifestacioj, defiladoj de amasoj sekvis unu la aliajn. Germanio staris antaŭ historiaj ŝanĝoj. La potenco de la nazioj de tago al tago plifortiĝis, sed fortikiĝis ankaŭ la kontraŭstaro de la laborista klaso.

En la elektoj de la jaro 1929 oni sendis 106 hitleranojn en la imperian asembleon, sed samtempe ankaŭ la nombro de la voĉdonantoj por la komunistoj plialtiĝis al ses milionoj. La Germana Nacia Partio kaj la partio de la pezindustria kapitalo – pinte kun Hugenberg – konkludis protektan aliancon kun Hitler kaj ebenigis lian vojon. La aliaj burĝaj partioj kaj la socialdemokratoj senfare rigardis la plifortiĝon de la naziismo. Manke de certa parlamenta plimulto la centropartia kanceliero Brüning regis per ekstremkazaj dekretoj. Sub la influo de la kraŝo de la Novjorka Borso kaj la disvolviĝanta tutmonda krizo la ekonomio kaj la politika ekvilibro kolapsis, tial la diversaj politikaj partioj aperte turnis sin unu kontraŭ la aliaj.

La nombro de senlaboruloj altiĝis ĝis sep milionoj, triono da ili troviĝis en Berlino.

Fine de februaro de 1930 la vetero estis pli milda ol kutime. Miaj amikoj Ladislao Fürst, Sigfrido Tolnai-Turteltaub kaj Vilhelmo Sugár organizis mian akcepton en la flughaveno.

Kiel lasta mi elvenis el la stokholma aviadilo. Almenaŭ dudekope oni atendis min. Per manpremoj, brakumoj ni salutis unu la aliajn. De elegantaj damoj mi ricevis kelkajn bukedojn. La fotofulmiloj de la eldona firmao Ullstein ade-ree eklumis. Al la demandoj pri la Norrbotten Ormineja Ekspluata Akcia Societo mi skizis ties brilan futuron. Mi pruvis, ke danke al la malkovritaj orkuŝejoj la orminado de Svedio atingos, eĉ superos post unu-du jaroj tiun de la Sud-Afrika Unio. Miaj konatoj, amikoj prijesis kaj asertis, ke ili, eminentaj negocistoj estas jam ĉiuj akciuloj de ĉi tiu ekskluziva entrepreno.

En la posttagmeza numero de la ĵurnalo Tempo aperis sekvatage tuta kolumno pri mi kun puraj fotoj. Post tio dum unu semajno sperteblis la plialtiĝo de la kurzo de la orminejaj akcioj.

Mi sciis, ke la kontraŭa procezo iam certe okazos, sed ĉiufoje mi forgestis de mi la penson. Eble ankaŭ Ivar pensis simile, kiu konkludis dubindajn negocojn. Li fariĝis hazardludisto. Li kondutis kiel bona pokerludanto. Havante nur unu paron en la mano, li tamen altigis la meton. Ivar etendis sin ĉiurimede en ĉiuj partoj de la mondo (li aĉetis ankaŭ grandajn firmaojn de Usono).

Laŭ tio estas strange, tamen el lia vidpunkto kompreneble, ke anstataŭ kontanta mono li pagis min per akcioj de la ne ekzistanta orminejo en Norrbotten.

Laŭeble plej frue mi devis pluvendi ĉi tiujn paperojn. Estus nepardoneble, se unu-du kofretojn da valorpaperoj mi vendus kune aŭ en pli grandaj kvantoj. La borsa merkato ŝanceliĝus! Pro la

ekonomia krizo la borsaj kurzoj estis sufiĉe hektikaj. Se la malkovrinto de la orkampo liberiĝus de ĉi tiuj paperoj, fariĝus ja vere granda perturbo! Estus okulfrape ankaŭ, se miaj amikoj vendus ilin en la borso. Tial ni serĉis kvin fideblajn homojn, kiuj scias, kiel eblas puŝi pli supren la valoron de la akcioj. Superkriante unu la aliajn en la berlina borso, ili trumpetis la plialtiĝantajn nombrojn, kaj kiam ankaŭ fremdulo aliĝis, ili lasis forpreni ilin.

La partioj aranĝis ĉiun duonjaron elektojn, tiel ili provis akiri plimulton. Dum NSDAP, la Naci-socialista Germana Laborista Partio havis en 1928 12 parlamentajn deputitojn, en la jaro 1930 jam 107 kaj post du jaroj eĉ 230. La partianoj de Hitler aliancîĝis kun la grandkapitalistoj kontraŭ la maldekstro.

Mi rekonis, ke la ofte ripetiĝantaj elektoj kostas multe, sed por propagando ĉiufoje troviĝas mono, tia, pri kiu oni ne devas doni konton. Mi provis, sed ne sukcesis veni proksime al la fontoj. Mi pensis, ke anstataŭ mono konvenos ankaŭ eminentaj kontaktoj: Ernst Röhm, Rudolf Hess, Heinrich Himmler.

Röhm prezentis sin kiel gvidanto de la en 1922 formita SA[37]. La armitaj organizoj de la nazia partio – kiel aŭdiĝis – faras murdojn en la periferiaj kvartaloj, loĝataj de laboristoj, por timigi ribelemulojn, manifestantojn, partoprenantojn de noktaj interpuŝiĝoj. Kompreneble ne estus dece demandi pri tio.

– Mi konas nian *Führer*[38] de la fino de la milito. Li ne elarmeiĝis, sed agadis en la sepa distrikto de Munkeno en la gazetarpolitika sekcio de la milita komandejo – rakontis kapitano Ernst Röhm. – Mi jam tiutempe rekonis en li tiun potencan forton, kiu puŝos lin supren en lia kariero. Regule ni renkontiĝadis kaj inter-

37 Sturmabteilung: sturmotaĉmento (germane)
38 gvidanto, do Hitler

parolis pri multaj aferoj: okultismo, supereco de la germana raso, mistikismo, politikaj ŝanĝoj. Dum la teksado de planoj mi prezentis lin al mia erudicia amiko Gottfried Feder, kiu konfirmis, ke Hitler ne estas ĉiutaga kaporalo sed gvidanto kun eksterordinara kapablo, eĉ unika forto. Ni ĉiuj vizitadis la Societon Thule. Printempe de 1919 niaj membroj, liberbrigadoj helpis batvenki la bavaran sovetan respublikon. De tiam ni kredas vere, ke ni kapablas formi la historion. Kaj tio ne estis hazardo, ĉar troviĝas inter ni princoj, baronoj, policaj kaj armeaj oficiroj, bankieroj, grandindustriistoj, politikistoj.

Röhm, vicgvidanto de Hitler estis senskrupula aventuristo, kiu vivis longan tempon en Bolivio. Post kiam en 1925 li demisiis de sia pozicio en SA, ankaŭ plu li helpis la sturmotaĉmenton de la nazia partio. En la jaro 1929 li ricevis komision de oficiro instruktoro de la bolivia registaro por du jaroj. Pli malfrue li rakontis, kion li aŭdis pri mi. Mi ne scias, ĉu ĝentileco movis lian langon, aŭ vere li kredis min tiel talenta, bonvola homo, kiel konkludeblis el miaj vortoj. Li parolis pri nenia trompo, fraŭdo, friponado.

La konstru-industrian entrepreniston Josef Maximilian konigis al mi Röhm. La nomo de lia firmao estis Hoch- und Tiefbau Ges.m.b.H. De trans la oceano li atendis grandajn sumojn por sia tiea investo. Ĉar la mono ne alvenis ĝustatempe, Maximilian estis minacata de kraŝo. Kiel SA-membro li estis vaste respektata, staris proksime al la rondoj de Röhm. Kiam mi renkontiĝis kun li en lia kabineto, evidentiĝis, ke li bezonas kapitalon, sed ne volas engigi min kiel kunulon. Se temus nur pri li, mi ne akceptus tion, sed li konstruis domojn por SA-oficiroj, eĉ entreprenis konstrui ankaŭ kazernojn. Parto de la konstruaĵoj jam pretiĝis kaj la loĝantoj okupis ilin. La planoj de almenaŭ kvindek konstruaĵoj ankoraŭ atendis surtable sian realigon. Lia oficejo havis kvin dungitojn.

Kvindek liaj dungitoj laboris enlande kaj eksterlande ĉefokupe, almenaŭ dudek kiel okazuloj.

Ĉe konkludo de negocoj mi ĝenerale ne faras erarojn, ĉar la kondiĉojn diktas kutime mi. Sed nun – laŭ ekstera ordono – mi devis adaptiĝi al ekzistanta firmao kaj ties postuloj. Pro la altprestiĝa Röhm mi ne volis rifuzi.

Mi monigis kelkajn miajn juvelojn, prenis ankaŭ signifan krediton por la firmao de Maximilian. Mi devis atendi pacience, ĝis post ok monatoj li repagos ĝin.

Sed post kiam mi legis en ĵurnaloj pri liaj dubindaj aferoj, mi konsterniĝis. Kio estas la vero? Ĉu vere li investis mian kapitalon en alian entreprenon? La planado kaj la konstruado haltis.

Ĉu Maximilian prenis kreditojn ankaŭ de aliuloj, sed ne povus repagi ilin? Ĉu mia mono estis la kovro? Se ĝi estas ŝtelita de li – kiel li asertas –, kial oni ne enketas prie?

Kiam la influhavaj estroj de NSDAP sukcesis haltigi la traktadon de ĉi tiu bulvarda historio – la ĵurnaloj ne povis plu skribi pri ĝi –, jam ankaŭ min oni enmiksis.

Evidentiĝis, ke la entreprenisto de Maximilian, Friedrich-Frölicher Stehti aĉetis samtempe ĉiujn pordojn kaj fenestrojn, necesajn por la konstruado de la kvindek domoj. Li ricevis grandan rabaton, sed la firmao ekhavis pagoproblemojn. Krom pardonpeto mi ricevis nenion alian. Eĉ postdorse oni komencis flustri: ankaŭ mi estas partoprenanto de ĉi tiu dubinda negoco. Kvankam min gvidis nura malegoismo!

Ĉi tiu amikeco kostis al mi tro multe!

Heinrich Himmler estis tridek-jara. La 6an de januaro 1929 Hitler nomumis lin imperia gvidanto de SS[39]. Post unu jaro li far-

39 Schutzstaffel: ŝirmtaĉmento (germane)

iĝis membro de la Imperia Asembleo.

Lin altiris okultismo kaj mistikismo. Li okupiĝis pri astrologio; kredis je la tutĝermana raso, alveno de la germana Mesio kaj potenco de la ĝermana mitologio.

Kun Jan Hanussen mi konatiĝis en la amuzlokalo Eldorado post spektakleca prezentado, post kiam Röhm konigis min al li.

Sekvatage ni renkontiĝis kaj iom babilis.

De Jan mi eksciis, ke de Prago li venis unue en Vienon, poste en Berlinon. Li redaktis ĝeneralajn horoskopojn, kiuj konvenis al ĉiuj. Tiel li povis antaŭdiri ĉies proksiman kaj malproksiman futuron. La nazioj baldaŭ rekonis, ke ili povos starigi lin en la servon de la persvado de amasoj. Kiam Hanussen aŭguris al Hitler la baldaŭan akiron de la potenco, li avancis al la astrologo de la nazia partio.

– Vi, kompreneble, ne scias pri tio, ke en aĝo de dek ses jaroj mi eskapis el la domo de mia despota patro kaj fariĝis helpaktoro. En mia junaĝo mi iris de trupo al trupo, prezentis min en cirkoj, dume travagis la tutan Balkanon, eĉ Proksim-Orienton. Kaj jen, nun ĉi tie estas Jan Erich Hanussen, la telepatia fenomeno, kiu scias, kiel legi en la pensoj de la homoj.

– Ankaŭ tio kaŝas en si genian trukon – mi deklaris, sed origine mi celis per tio demandon. Por momento mi ektimis, sed li senĝene daŭrigis:

– Oni disdonas slipojn kaj kovertojn, poste petas la publikon skribi nomon kaj kelklinian tekston, poste fermi la koverton. Sur la scenejo mi premas la koverton sur la frunton, tenas antaŭ mi, fikse rigardas ĝin. Fine laŭvorte mi recitas la vortojn. Mi ŝajnigas, ke ĉi tiu prezento kostas al mi eksterordinaran penon. Sur miaj frunto kaj vangoj perlas tamen ne ŝvito sed ordinara sunflora oleo, kiu povas dum kelkaj minutoj humidigi kaj travidebligi la

koverton. Mian prezentadon sekvis eŭropa, poste amerika turneo. Reveninte mi konatiĝis kun la akrobato Breibart, konsiderata kiel la plej forta homo de la mondo. La Ferreĝo rompis katenojn, fleksis ferstangojn, disŝiris ŝtalĉenojn per nuraj manoj. Tiam eknestis en mia kapo la penso: kiel impresus, se gracia, malforta virino plenumus la montrojn de Breibart sub mia telepatia direktado. Marta Farra aĝis tiam dudek jarojn, same ido de Izraelo; blondhara, proporcie beleta, eĉ gracia; al tio kuniĝis ĉarmo kaj saĝo.

– Estas vere tiel. Marta estas nekutime bela kaj inteligenta. Sur la scenejo kaj ankaŭ en la vivo vi elektis unu la alian.

– Ne kredu, amiko, ke ŝi faris tion pro mia luksa vivmaniero, riĉeco! Marta estas unika! Sen ŝi mi ne estus feliĉa, ne povus esti sukcesa!

– Nu, ni trinku por tio! – mi instigis lin. Ni ambaŭ gustumis la malvarmigitan francan ĉampanon Mumm Cordon Rouge.

– Ĉiuj viaj prezentoj estas spirhaltigaj! Marta unu post aliaj disrompas la surligitajn ŝtalrubandojn, ferbendojn, katenojn! Malkaŝu al mi, amiko, ĉu vi laboras per preparitaj rimedoj anstataŭ la al la publiko transdonitaj?

Jan Hanussen protestis per mimata kolereto: kiel mi aŭdacas pensi ion tian? Poste ni eksplodis en ridon.

– Kaj kiam Marta mallevas sin sur la plankon, faras spagaton, poste kuŝiĝas sur la dorso... Sur ŝian sveltan korpon la helpantoj metas larĝan tabulon, tra kiu trakuras aŭtomobilo, pezigita per kvar pasaĝeroj. Nekredeble, ekstreme, imponege, timige, neimiteble! – Mi vidis sur lia vizaĝo, ke mia raviĝo plaĉas al li. Poste modeste tamen aludis, kion foje li jam rakontis al mi:

– Nu jes... Pri la cilindroj el nerompebla vitro, kiuj super la scenejo aliĝas al la tabulo, kaj sub ĝi la mekanismo el risortoj, pres-

kaŭ neniu scias.

Poste li „solvis” ankaŭ miajn sekretojn.

– Apenaŭ kvar-kvin homoj povas konjekti, kiel vi trovis orgrajnojn en Norrbotten. Devizo: el malplena telero vane ĉerpas kulero! Tiel simple! Kaj la brazilaj naftokampoj! Naftogutoj en akvon – kaj pretas la recepto, bonvolu konsumi. Kontraŭ kapdoloro ĝi aparte konsilindas, ĉar kiu fariĝas riĉa, ties kapo ne doloras!

– Ĉu vi nun ironias pri mi, amiko?

– Nek pense, nek mense! Vi estas almenaŭ tiel granda mago kiel mi! Ni rekonu reciproke niajn talentojn. Sed mi vere vidas la futuron. Ni havos la saman sorton. Ĉiu iam mortos, sed ne egalas, kiam kaj kiel. Pri tio pli multe mi ne povas diri. Nun ni skribas la monaton aprilo de la jaro 1932. En 1933 ankaŭ vi ekscios.

– Vi estas tre mistera! – mi respondis tiam.

Kaj nun, kiam alvenis la somero de 1933, dum mi ne scias, kia estos mia sorto, tiu de Jan estas jam sigelita.

Jan diskonigis, ke ankaŭ mi povas multe fari por la naci-socialista partio, mi ja havas unikajn konjektojn, potencon, fabelecan, propraforte akiritan havaĵon. Li proponis al mi peti mian membrigon en la Societo Thule. Mi faris.

Heinrich Himmler rekomendis min interalie jene:

– Mi rekomendas al vi la amikon de la de ni ĉiuj pro liaj talento kaj magiaĵoj konata Jan Hanussen: magnaton kapitaliston, bankdirektoron, posedanton de naftominejoj kaj orminejoj, Melĥioron-Tasilon de Beöháza-Festetich. Li disponas kapablojn, kiuj unusence pruvas, ke li scipovas aliri energiojn, kiuj venas el trans la fizika realo. Per sia spirita forto, eksterordinara perceptemo havigis enorman riĉecon al Rumanio kaj Brazilo, kie li malkovris naftokampojn.

Jan Hanussen transprenis la vorton.

– Mi rekomendas mian amikon Tasilo Festetich de Beöháza en la Societo Thule kun la sekvaj kialoj. La grafa moŝto venis el Svedio, estas amiko kaj negocpartnero de la alumetfabrikisto Ivar Kreuger. Kiel eksterordinara homo li eksentis, ke en la nordo de Svedio, en Norrbotten la riveretoj kundrivigas orgrajnojn. Kun geologoj li alveturis, kaj malkovris unu el la plej signifaj orkuŝejoj de la mondo. La preparo de la ekspluatado komenciĝis. Estas fondita la Norrbotten Ormineja Ekspluata Akcia Kompanio. Pli frue helpe de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Brazilo li fondis en Rio-de-Ĵanerjo la bankon Banca Rio de la Plata, post kiam li trovis vastegan naftokampon. Kaj nun atentu, estimataj sinjoroj! Mia amiko Tasilo de Beöháza proponis fruktigi siajn specialajn kapablojn ankaŭ por ni.

Vivuado aŭdiĝis de ĉiuj flankoj, kaj denove Himmler alparolis:

– En amika rondo Jan Hanussen plurfoje konfirmis, ke Herr von Beöhaza[40] staras en magia alianco kun la supraj reĝregionoj. La prauloj de la Thule-insulo benis ankaŭ lin. Evidente pro tio, ke en liaj vejnoj fluas arja sango.

Denove oni alplaŭdis min.

– Sinjoroj! – mi diris. – Mi devas negi mian modestecon. Dankon. Fiere mi alprenas vian rekonon. Mia interna forto diktas, ke mi akceptu vian honorigan decidon. La konigo de la denombritaj faktoj plenigas min per nova sindediĉo, ĉar mi estas celkonscia kaj ambicia viro. Mi proponas miajn kapablojn al la Societo Thule kaj NSDAP.

Poste sekvis prelegoj.

Hitler oratoris pri tio, ke de 1909 ĝis 1913 li vivis en Vieno. Li

40 s-ro de Beöháza (germane)

verkis „Mein Kampf”[41], kiu estos sortoturna en la establo de la ĝermana ŝtato. Li komencis interesiĝi pri mistikaj instruoj, rita magio. (En Vieno li loĝis cetere en Meldemann Strasse, tie estas ankaŭ la Popola Hotelo.) Li kredas, ke la t.n. Thule-legendoj estas veraj, do ke ekzistis praa insulo, simila al Atlantido, en la Norda Maro, kiu estis centro de altnivela nordia civilizo. Ĝin loĝis fizike kaj ankaŭ spirite eksterordinara raso, disponanta elstaran inteligenton; ties konoj, akumulitaj en la kampo de teĥnologio kaj magio, superis la sciaron de la nuntempaj okcidentaj socioj. La loĝantoj ekstermiĝis sekve de ia fato. Nur kelkaj restis vivaj, kiuj konservis la praajn sekretojn, la sanktan sciencon. Ili kreis per sia multobliĝo la tutĝermanan rason. Ankaŭ inter la ĝermanoj (la klarvidantoj) troviĝas bedaŭrinde multaj mikssanguloj, malamikoj. La budhismaj instruoj, la teozofio instruas nur la kontaktigon de la bonaj, saĝaj kreitaĵoj. Sed pere de mediumoj oni devas estigi kontaktojn kun la transteraj spiritoj, ĉar tiam la *devaoj*, praktikantaj nigran magion, donas konsilojn al la elektitoj. Hitler konsideriĝas perfekta mediumo. Tra li ili ricevis konfirmon de la reĝo de la supra imperio, staranta super la materia realo, ke Hitler fariĝos la gvidanto de la ĝermana popolo. Ĉar li kapablas kiam ajn estigi kontakton kun la bonaj kaj malicaj kreitaĵoj kaj disponigi ties fortojn serve al sia popolo. La aliaj membroj de la Societo Thule same kapablas kontakti per magia-mistika vojo ĉi tiujn supernaturajn fortojn. Kune ili efektivigos la superan arjan homon, la *Übermensch,* kiu submetos la teron sub sian potencon kaj subjugas la malsuperajn popolgrupojn. Fine Hitler laŭdis Rudolf Hess, kiu post la munkena puĉo en 1923 tre multe helpis al li en la prizono de Landsberg. Li revenis el sia memvola ekzilo, anon-

41 Mia batalo (germane)

cis sin ĉe la aŭtoritatoj; oni arestis lin, kaj tiel ili povis esti kune en la ĉelo.

La arde, kun vigla gestado prezentitan (laŭ mi iom konfuzan) ideumadon de Hitler akceptis longa tondra aplaŭdado, vivuado.

Poste parolis Heinrich Himmler, imperia gvidanto de SS, kiu estis membro ankaŭ de la Societo Vril kaj la Brila Loĝio. Li eksplikis, ke la sangolinio de la pura ĝermana raso malpuriĝis en la 15-16a jarcentoj, ĉar en la procesoj kontraŭ sorĉistinoj estis ekzekutitaj tiuj, kiuj disponis supernaturan forton, mistikan scion. En spirita, samkiel en biologia sencoj.

La kapo de SS nomis sian memorganizitan ŝirmtaĉmenton kavalira ordeno, taĉmento protektata de diaj fortoj. Mi eksciis, ke la membrigaj postuloj al la nigra-uniformuloj baziĝas sur la ĝermana rasteorio. Himmler traktis sian taĉmenton kiel vivantan genetikan bazon. Tial li selektis inter la kandidatoj laŭ eksterordinare rigoraj preskriboj. Unusola plombita dento sufiĉis por rifuzo. Oni postulis la atestadon de la sangolinio; fremdulo ne povis malpurigi la genealogian arbon de la kandidatoj – retro ĝis la sepa generacio. La kerno de la eŭgenika programo estis, formi la militan organizon bredejo. Himmler faris genetikajn studojn en la munkena universitato. Antaŭe li faris eksperimentojn en kokinbredejoj. Li ligis la geedziĝon de la SS-anoj al permeso. Kune kun Alfred Rosenberg li volis uzi la etaton de SS por la selekta bredado de la perfekta ĝermana raso. Oni elektis la plej bravajn, belajn germaninojn kaj kuraĝigis ilin eniri seksan rilaton kun SS-anoj. La ĉi-maniere koncipitajn infanojn oni loĝigis en apartaj institucioj, kie ili ricevis severan edukadon. Ĉi tiu programo estis kontrolata, dokumentata de RuSHA, la oficejon estris antropologia profesoro Bruno K. Schultz.

En alia okazis temis pri tio, ke la mondekonomia krizo plagas

plej grave Germanion. Estis eraro akcepti la pactraktaton de Versajlo en 1923 kaj enlasi tiel grandnombran, ĉefe usonan kapitalon en la landon kadre de la Dawes-plano inter 1924 kaj 1929. Nun la lando jam glitis en ekonomian dependecon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko.

La oratoroj analizis la konfuzan politikan situacion de Germanio. Ni devas helpi Hitleron – ili diris –, por ke li povu scii post si la apogon de la tuta socio. Atestas pri aŭgura kapablo, ke la hitleranoj eldonis jam en 1921 sian programon el 25 punktoj, en kiu ili celis la gajnon de ĉiuj tavoloj. Al la grandkapitalistoj ili akiros novajn merkatojn. Ili promesis likvidi la komunistan movadon, doni ŝtatan subtenon, reprezentadon de interesoj kaj firman ekzistadon al la mezaj tavoloj. Fiksi la prezojn kaj salajrojn. Likvidi la senlaborecon, atingi la malaltiĝon de la ŝuldinterezoj, ebligi kreditojn kun pli bonaj kondiĉoj. Same en ĉi tiu programo estis klarigita la rasteorio pri *Herrenvolk,* la reganta popolo).

Kun Rosemarie mi konatiĝis en SA-akcepto. Simile al sia nomo, ŝi aspektis kiel rozo. En la plenfloro de sia vivo ŝi montris ĉiujn siajn belaĵojn, ravon kaj altirforton. Ŝi uzis individuan parfumon. Post kiam Röhm prezentis min al ŝi, ni restis duope; pri ĉiaj temoj ni povis konversacii senĝene. Plaĉis al mi, ke el la ĵurnaloj ŝi jam sciis ĉion pri mi, kio povis esti publika. En la centro de Berlino ŝi luis kosmetikan salonon, en kiu ŝi laboris kun kvar dungitoj. Preskaŭ ekskluzive edzinoj, filinoj, patrinoj de SA- kaj SS-oficiroj vizitis ŝian salonon. Rosemarie ricevis amason da informoj de la damoj, dum plibeligado, malstreĉiĝo ja ilia lango malligiĝis. Ekzemple foje tri amikinoj jene babilis pri politiko:

– Mia edzo kutime tre entuziasmas kaj klarigas al mi ĉion precize. Ni, germanoj havas mision. Unue ni fortikigos nian patr-

ujon, poste ni akiros novajn teritoriojn en Eŭropo, eĉ en aliaj partoj de la mondo. Ĉu vi povas imagi, Inge, ke post kelkaj jaroj ni havos eble palacon eĉ en Grekio kaj somerumados tie? Tio ŝuldiĝas al ni, ĉar nia popolo estas elektita, reganta raso.

– Mi preferus havi mirindan domon en Rusio kun servistoj, ĝardeno, hundoj. Kaj arbaron, ĉar mi kun Wolfgang ŝategas la naturon.

– Se Hitler akiros la totalan potencon, la judoj, ciganoj kaj aliaj servistaj popoloj likvidendos. Se la munkena puĉo estus sukcesinta la 8an de novembro 1923, nun ni estus pli avancintaj.

Rosemarie konfesis al mi. Jen en fanfarona, jen en laŭfakta prezento mi informiĝis pri la luprezo, ceteraj kostoj, klientaro de ŝia salono, pri la procezo de plibeligado, kiun viro apenaŭ eltenus, pri vizaĝflegado, kutimoj, ŝatataj pladoj de unuopaj oficiroj. Mi povus daŭrigi longe la liston. Gravas nur, ke post unu semajno iu jam povus trovi nin en intima kunesto, se Rosemarie ne zorgus pri kompleta diskreteco.

En iu SA-gastejo rande de la urbo oni akceptis min kiel konaton. Ŝi uzis kutime la saman elitan apartamenton. Unue mi pensis pri tio, kioma mi devas esti en la vico, poste dum la tempesto de la sensoj la vento ĉion forblovis. La belega, floranta virino briligis siajn belaĵojn.

Mi ne asertas, ke mi enamiĝis al ŝi, sed ŝiaj modera, erotika radiado, reteniĝemaj tamen allogaj manieroj, eleganteco, reĝina staturo, sorĉo ravis min plurfoje tage por horoj, eĉ tenis min subigita al ŝiaj sentoj. Mi ne estas romantika, sentimentala, tamen kun ĝuo mi transdonis min al ĉiuj ĝojfontoj, ŝprucantaj el Rosemarie.

Mi trovis la posedanton de la kosmetika salono kaj persvadis lin vendi ĝin al Rosemarie. Kiam la adorata damo ricevis de mi la

pretan kontrakton por subskribo, en sia ĝojo ŝi nomis min sia kavaliro, poste sia kara virĉevalo (!). Preze de iom da kvoto Franz Müller konsentis skribi multe pli altan aĉetoprezon en la kontrakto ol ĝia fakta negoca valoro.

Mi fariĝis asidua en la mondo de Rosemarie. Mi bezonis ŝiajn proksimecon kaj alligiĝon al mi, por povi avanci en la nazia partio. Io tamen mankis en mia vivo. Post mia brazila aventuro mia malnova deziro estis havi rolon en la mondo de la filmo aŭ teatro. Prave, tiutempe mi proksimiĝis al ĉi tiuj artoj, nur por ĝojigi Milicon.

En la ombro de Rosemarie ofte mi pensis pri Milico. Kaj kune kun ŝi mi ne povis forgesi ankaŭ mian filmentreprenon en Rio. Reĝisori, direkti, intertrakti kun aktoroj, verkistoj, kameraistoj, organizi publikon, lui kinejon donis al mi ĉiutage la ekscitojn de speciala laboro.

Mi sukcesis veni al interkonsento kun la intendanto de la bankrotinta Theater am Kurfürstendamm, *Herr* Robert Schoshniuk. Mi sciis, ke la teatro povos ree funkcii, nur se li pagos sian altegan ŝuldon. Mi luis la konstruaĵon tiel, ke ĝi efektive kostis al mi neniom. Monatojn pli frue mi sciigis al la berlina publiko, ke komenciĝos serio de prezentadoj kun famaj pecoj, mondfamaj aktoroj. Mi luigis la bufedejon, vestejon, necesejojn, purigadon kaj la bilettraktadon – kompreneble kontraŭ signifa kaŭcio. Per la tiel enspezita mono mi repagis la ŝuldon de Theater am Kurfürstendamm.

Inter la invititaj aktoroj estis Greta Garbo, Franz Porten, Emmy Destin, Enrico Caruso, Dolores Costello, Warner Oland, Mary Astor, John Barrymore kaj aliaj, do ĉefe tiuj, kun kies ĉefrolado oni prezentis la 7an de aŭgusto 1926 en Novjorko la unuan son-

filmon, „Don Juan”. Tiutempe tute ne ĝenis min, ke Greta Garbo vivis kaj laboris jam de ses-sep jaroj kun la reĝisoro Mauritz Stiller.

Neniam mi forgesos la unuan roladon de Greta Garbo. En 1926 pretiĝis „La virino kaj la diablo”. Nur pli malfrue mi povis rigardi ĝin, mi ja ankoraŭ punsidis. Ŝia erotika elradiado ekscitis min. Oni diras, ke Garbo ankaŭ efektive travivis la agadon, ĉar ŝi estis enamiĝinta al sia partnero John Gilbert. Mi sukcesis interkonsenti kun neniu el la aktoroj, ĉar en Usono oni ne konis mian nomon, ili ne kuraĝis riski la gastroladon. Mi deviĝis anstataŭigi ilin per aliaj. Ekzemple per Henny Porter, kiu laŭ miaj konfidencaj informoj devis aĝi 40-41 jarojn. Vera mutfilma stelo, kiu rikoltis sian unuan sukceson en 1907 en la rolo de Desdemona.

Sed la publiko volis el la anoncitaj filmsteloj almenaŭ Greta Garbo. Eble ĝi rezignus la ceterajn famulojn. Henny jam multaj vidis. Nur kvar prezentadoj okazis, poste la spektantoj repostulis la prezon de la antaŭaĉetitaj biletoj. Mi ne estis sufiĉe antaŭvidema, tial mi implikiĝis en skandalon. La gazetoj nomis min trompisto kaj stariĝis al la partio de la publiko. La teatro ankaŭ ĉi-foje falis. La luantoj de la vestejo, bufedejo, necesejoj repostulis siajn kaŭciojn. Mi proponis al ili miajn orminejajn akciojn anstataŭ mono. Sed bedaŭrinde jam ĉiuj sciis, ke Ivar Kreuger estas mortinta kaj lia konzerno kolapsinta. La damaĝitoj denuncis min, sed danke al miaj kontaktoj kun la nazia partio mi sukcesis stopi la aferon.

Oni venigis min en suspekton kun la 22-jara filino de la pola magnato Stephan von Droste-Hülshoff, kvankam nenion komunan mi havis kun ŝi.

Prave, Krystyna estis rave bela, radianta, erotika, alloga grafid-

ino. Mi vizitis prefere la societon de ŝia patrino grafino Maria Justina kaj ŝiaj eminentaj gastoj, sed mi ne kulpas, ke ankaŭ Krystyna ĉeestis! La kartludema, ŝercema kompanio renkontiĝadis en elegantaj restoracioj, amuzlokaloj. Stephan estis okupata pri la aferoj de NSDAP.

Nian interkonatiĝon mi dankas al Jan Hanussen, kiu ofte aŭguris al la du damoj kaj la edzo. Kompreneble, ankaŭ min li ne preterlasis.

– La vivon de f-ino Krystyna grave ŝanĝos baldaŭ okazonta miskompreno. La vian eĉ pli! Nenion en la mondo mi povas fari kontraŭ tio, la fato aranĝos tiel. Sociaj konvencioj kaj antaŭjuĝoj influos ĉi tiun eventon.

– Tio estas sufiĉe obskura, eĉ mistika por mi. Ĉu temas pri mia persono? – mi interesiĝis.

– Ba! – forgestis Hanussen. – Ĉu amo?! Ĉu entute difineblas ĉi tiu nocio? Nuntempe, kiam eĉ paroli ne decas pri io tia! En bona societo. Amo estas io tia, kio estas aŭ ne estas. Oni sentas aŭ ne sentas ĝin. Por konservativaj pri sociaj konvencioj oni ne povas kaj ne devas vortigi ĝin. Amo solviĝas, disfalas en siajn atomojn, en ĝi ja estas ĉio intereso, trudo, devo kaj ties kombiniĝoj.

Ĉi tiun aŭguron mi tiam interpretis tiel, ke al Krystyna amindumos subranga junulo, de kiu ŝiaj gepatroj formalpermesos ŝin. Ŝi estos devigita obei, kvankam tio kuntrenos por ŝi multajn suferojn. En mia kapo trafulmis eĉ la penso, ke mi savos ŝin.

Foje, kiam en la lifto de nia hotelo mia subbrako hazarde tuŝis ŝian blankan ŝultron, tia vibro trafulmis mian korpon, kvazaŭ mi estus en amtuŝo kun Milico! Konfuzite ni rigardis unu la alian kaj klopodis forgesi la incidenton.

Se la laboro de Stephan en la NSDAP retenis lin, kutime mi tagmanĝis kun la du societaj damoj. Inter s-ino Maria Justina kaj

ŝia filino la simileco estis granda. Ŝia patrino devis esti tia en sia aĝo de 22 jaroj kiel Krystyna. La kruela tempo postlasis siajn spurojn sur ŝia beleco kaj ŝia tuta staturo, sed malgraŭ tio ŝi konservis sian virinan ĉarmon. Ŝi radiis elinterne por tiu, kiu havis konvenan senson por tio.

La senmanka figuro de Krystyna, ŝia ekstera beleco, aristokrata sinteno kaj ŝia adoro al mi ĉiutage pli kaj pli impresis min. Ŝi povus esti mia filino. Sed ŝia ĉeesto aŭ foresto efikis sur min tamen ne tiel, kvazaŭ mi estus ŝia onklo.

Stephan von Droste-Hülshoff, kies ĉiutagan laborhoraron ankaŭ s-ino Maria Justina kaj f-ino Krystyna ne konis, kelkfoje aperis. Sian malsimpation al mi li plurfoje esprimis per tio, ke li parolis pri la hungaroj kiel pri malsupera raso. Ni devenas laŭ li de formortinta, barbara popolo, de la hunoj, ankaŭ la skurĝon de Dio, Atilon li ne ŝatis. Post lia morto nia popolo ne restis ras-pura, fariĝis grego, disiĝis manke de taŭga gvidanto.

– Atilo estis kontraŭkultura kaj kontraŭkristana – li insistis. Mi volis repliki al li, ke se li estis tiom kontraŭkristana, li ne returniĝus el Italio pro la peto de papo Leono la 1a, kaj ne tolerus la kristanojn en sia imperio. Lia respondo estus evidente, ke la kristana religio devenas el la juda, kaj la judoj estas hun-devenaj, do en tiu senco estas tute indiferente, kiel mi opinias pri tio.

Eble de li mi aŭdis unuafoje la vorton „arja”. Unue mi identigis ĝin kun la nocio porgermana, poste kontraŭĝermana. Post kiam mi legis „Mein Kampf” de Hitler, ĉio fariĝis unusenca por mi. Se mi ne estas germandevena ĝis retro la sepa generacio, pli aŭ malpli frue mi fariĝos morta malamiko.

La patrino de Krystyna, grafino Maria Justina portis ĉiutage alian ĉapelon. Komuna en ili estis, ke ĉiujn ŝi ornamis per vigla-

koloraj floroj kaj rubando. Sian longan, blondan hararon ŝi portis plektitan, kvankam aranĝita en tubero ĝi pli bone konvenus al ŝia vigla-ŝminkita vizaĝo. La du longaj harplektoj, ornamitaj per bluaj rubandoj, falis sur ŝia dorso; ili aspektigis ŝin tro juna, jame knabineca.

Krystyna ŝatis duon-longan hararon. Ĝi atingis ĝis ŝiaj ŝultroj, kaj dum parolado ŝi  reĝustigadis ĝin. Jen per la dekstra, jen per la maldekstra mano ŝi ŝovis ĝin malantaŭ la orelon, alifoje medit-eme tordadis ĝin. Sed se ŝi arde rakontis ion, kaj scivoleme, ŝerc-eme demandadis, por tempo ŝi forgesis ĉi sian kutimon.

El miaj ĝisnunaj rilatoj kun damoj mi tiris la konkludon, ke vir-ino instinkte umadas per siaj haroj, se ŝi volas plaĉi.

Se mi estus almenaŭ dek kvin jarojn pli juna! Mi ne devus ŝajn-igi indiferenton.

Tamen mi ne povis esti indiferenta. Kiel viro mi povus resti neŭtrala, se ĉiu velurhaŭta persiko havas specialan guston? Kiam ĝi proponas sin en manetenda distanco!... Sed mi sciis, kiajn dan-ĝerojn kaŝas en si pluko de tia velurhaŭta frukto. (Ekzemple el-pelo el la Edeno!) Miaj koro, animo kaj korpo egale deziris ĉi tiun ridetantan frukton, sed feliĉe, mia intelekto kontraŭstaris. Forte. Kaj bone ĝi faris. Mia amo restis platona. Ŝia patro kelkfoje ripro-ĉis por mi orelatinge, ke liaj edzino kaj filino serĉas mian soci-eton.

Maria Justina foje deklaris:

– Per belaj vortoj mi volus esprimi, kiel opinias pri vi mia edzo, sed mi ne povas, ĉar en ĝi ne estas tiaj vortoj. Tio ne estus deca. – Dume ŝi tordadis sian oran kolieron.

– Kara sinjorino, ĉiuj ne povas havi saman opinion pri afero sama en la tuta mondo – mi rimarkis kun deca ĝentilo. – Ekzistas tiaj, kiuj devas prijuĝi ĉion el partiaj vidpunktoj.

Maria Justina ridetis sarkasme, ŝovis sin pli proksimen kaj multe pli mallaŭte ŝi aldonis:

– Pardonu min, tion vi ne devus diri! Tio estas liaj vortoj! Preskaŭ laŭvorte vi citis lin!

Poste ŝi residiĝis, reprenis sian originan sintenon. Per rafinita spirado ŝi levis sian bruston; ŝiaj mamoj vidiĝis tiom, el kiom oni povis konkludi al sana akvomelono.

– Mi ne volus enmiksiĝi en la aferojn de lando. Mi eĉ familion ne havas, kies gvidanto mi povus esti. Ekzistas nur unu Hitler, kaj li gvidas ĉiujn – mi diris.

– Laŭ mia edzo vi malmulte kompetentas pri politiko.

– Pardonu, sinjorino! Ĉu vi trovas tion malŝatinda?

– Dio gardu min! – ŝi ekridis. – Ĉar vi ne kompetentas pri ĝi, evidente tial vi ne konversacias pri ĝi. Kaj cetere: por damoj, sinjorinoj, fraŭlinoj ne konvenas tia temo. Prefere societa vivo, amuzoj, vizitadoj, kartludaj bataloj, teumado, kelkaj iŝleroj[42] en la sukeraĵejo Berlin...

– Kompreneble, vi bone vidas tion.

– Jes..., sed se konsideri la pozicion de mia edzo, ne decas kaj ne sufiĉas por mi konduti kiel etburĝa edzino. Cetere pardonu min pro miaj sinceraj vortoj, sed laŭ mia edzo vi siamaniere tamen politikas. Ni povas diri, ke vi tenas amikan rilaton al Hanussen, la mago, sekreta konsilanto de Hitler. Kaj ofte vi vidiĝas ankaŭ en la Societo Thule. Kaj ja ĉiuj scias, ke ĝin vizitas senescepte gvidantaj personecoj de NSDAP.

Maria Justina ĝis nun neniam esploris miajn opiniojn. Min trafulmis la suspekto, ke ŝia edzo komisiis ŝin spuri pri mi. Mi provis rilati ŝerce al la situacio:

42 ronda plata kuko, farĉita per marmelado kaj tegita per ĉokolado

– Vi estas tre bone informita, sinjorino. Ne tiom evidente, kiel vian edzon, tamen ankaŭ min okupas la politiko de Hitler.

– Do bone – ŝi aprobis. Poste ŝi fariĝis ĉiam pli scivola, kaj mi deviĝis paroli pri la Societo Thule.

– Vi scias, grafino, ĝi estas sekreta grupiĝo, kie oni faras prelegojn, aranĝas seancojn. Adolf Hitler konfesas, ke sen spirita bazo la forto estas destinita al fiasko, tial ili forviŝos la ŝajnomondon de la kristanaro, kaj kreos novan kredon, konvenan al la germana raso. Inter si ĉiuj profetas pri la estonta germana mondregado. Ili asertas, ke en la antaŭhistoriaj tempoj ekzistis tia brilepoko, en kiu pastroj, posedantaj dian scion, praktikis la potencon. Ĉi tiuj superhomoj vivis en Atlantido. Sed antaŭ ol la insulego estis neniigita de cunamo, ĉi tiuj pastroj forfuĝis, por tiel certigi la konserviĝon de la elita raso. Tra Hindio ili migris en Tibeton, kie inter la muroj de fermitaj monaĥejoj ili konservis tra jarmiloj la sekretojn kaj sangolinion de la arjaj-ĝermanaj superhomoj.

Maria Justina suĉis en sin la vortojn kiel spongo. Mi havis respekton en ŝiaj okuloj. Kvankam apenaŭ ŝi povis min kristalklare kompreni. Tiam mi ankoraŭ ne pensis, ke mi malkaŝas „ŝtatsekretojn”. Eĉ, mi ĝuis la situacion.

Maria Justina kartludis plej ofte kun kvar-kvin siaj amikinoj, babilis pri societaj klaĉoj. Ŝi ŝatis, se mi konversacias kun Krystyna, okupas ŝin, serĉas ŝiajn dezirojn.

– Ŝi povas multe lerni de vi, klera, matura viro. – Plej ofte kun tiu frazo ŝi lasis nin solaj en publikaj lokoj.

Krystyna alparolis min inter kvar okuloj kelkfoje per „oĉjo”, kaj kelkfoje nomis min moke paĉjeto.

Ni sidis sur la teraso de restoracio. Ŝi konsumis limonadon kun glacikubetoj, mi bieron Brünhilda. Mi ŝatis mediti pri bagateloj;

ĉu mi scipovus bildigi al mi, la manoj de kiom da virinoj tuŝis la rustece senkolorigitan veluron de la tablotuko, damoj kaj sinjoroj de kia aspekto sidis sur la seĝoj?

– Paĉjeto, ĉu vi jam aŭdis pri tiuj laboristaj tumultoj? – ŝi demandis sen ajna rilato. Poste ŝi aldonis: – Mi estas indignigita. Miaj gepatroj malpermesas al mi legi tiajn artikolojn aŭ paroli pri tio, ĉar ne decas al mi okupiĝi pri ne ekzistantaj problemoj de malriĉuloj. Eĉ scii mi ne licas pri ili! Kvankam la laboristoj eliras sur la stratojn, kuniĝas en gregojn, krias kaj bruligas flagojn. La leĝoj unusence malpermesas tion. Paĉjo ĉiufoje diras: oni devus doni al ili pli da subvencioj, por ke ili restu silentaj! Se tio ne sufiĉus, oni devus enprizonigi la organizantojn de la ribeloj. Kian opinion vi havas pri tio?

– Prave, ja prave! Da tumultoj estas multaj! – mi diris enpensiĝe kaj faktece.

La situacio ŝanĝiĝis tiel abrupte, ke mi ne bezonis daŭrigi. Miaj vortoj trovis ilustraĵon.

El la direkto de Strasse Goethe manifestantoj kun ruĝaj brakrubandoj kuregis kun tabuloj kaj ceteraj surskriboj al la placo. Dume ili skandis sloganojn: „For la registaron!” „Egalajn rajtojn por ĉiuj!” „Novajn elektojn!”

Kelkaj rajdpolicanoj pelis ilin, ili kuregis kiel teruritaj ŝafoj.

Krystyna subite kaptis al sia kapo.

– Pardonu min, se mi vidas teruraĵojn, mia migreno ofte reviviĝas! Ankaŭ nun mi vertiĝas.

– Devas peti pardonon mi pro tio, ke malgraŭ mia volo mi elmetis vin al tia insulto. Permesu al mi akompani vin en vian ĉambron! Ĉu mi informu la grafinon?

– Ne necesas, ĉar ŝi nur ekscitiĝus...

Ni stariĝis. Ŝi kroĉis al mi la brakon. Ŝi estis senforta kaj pala.

Per lifto ni veturis en la trian etaĝon. Krystyna kondutis kiel iu, kiu drinkis multe. Post la elliftiĝo senforte ŝi falis en miajn brakojn. Bonŝance mi devis kuntiri ŝin nur tra kelkaj paŝoj ĝis ŝia ĉambro n-ro 3501.

Tenere mi kuŝigis ŝin sur la liton, deprenis ŝiajn juvelojn kaj metis ilin sur la tablon. Detiris ambaŭ ŝiajn ŝuojn, lozigis la vestostreĉajn rubandojn sur ŝiaj pojnoj kaj kolo. Mi alportis akvon. La maldekstran manon mi ŝovis sub ŝian nukon – ŝia longa blonda hararo estis kiel matena gazono! –, iom levis ŝin; premis la glason al la lipoj de la ankoraŭ senpova knabino. Mi sukcesis trinkigi al ŝi kelkajn gutojn.

– Kiel vi fartas, kara Krystyna?

– Ankoraŭ plu mi estas malforta...

Mi klinis min super ŝin. Komencis rearanĝi la misglitintajn krispojn ĉirkaŭ ŝiaj mamoj. Mia bonvolemo kaj patro-anstataŭiga rolo nun atingis la zeniton. Ekde tiam pelis sin fatalaj eventoj. Ne volonte mi surpaperigas, ke sen frapi, enrompis Stephan. Li kvalifikis min per vortoj, kiajn ĝentlemanoj evitas. Li vortigis pretajn faktojn pri tute ne miskomprenebla situacio, eĉ korpopozicioj. Mi per io narkotis liaaserte lian filinon, kaj misuzante tion, mi proksimiĝis al ŝi kun fia intenco. La „stomakalgia maljuna virkato" kaj „kaptita ĉe la faro" estis liaj plej mildaj esprimoj.

Mi indigne rifuzis la suspekton dirante, ke temas pri bedaŭrinda miskompreno. La dume rekonsciiĝinta Krystyna sidleviĝis sur la lito. Ŝia senorda vesto, pala vizaĝo, pro ekscito vibranta voĉo akre kontraŭdiris tion, per kio ŝi celis defendi min:

– Paĉjo, mi svenis en la restoracio, s-ro Tasilo akompanis min en la ĉambron, donis akvon, sed nun mi jam rekonsciiĝis. La mígreno kruele turmentas min.

– Bonvolu tuj foriri! – Stephan montris rezolute al la pordo.

Vane mi provus klarigi la situacion... Mi klinis min kaj senvorte tirfermis post mi la pordon.

Post du tagoj du soldatoj de SA aperis en mia vilao. Unu el ili laŭtlegis, poste transdonis la decidon, kiu „ĝis la esploro de certa kaŭzo" metas min en domareston. Mian gardon certigas du armitoj tra 24 horoj. Ankaŭ miajn aĉetojn mi devos aranĝi tra ili. Oni subaŭskultas mian telefonon, mi povas kontakti neniun, la personaron mi devas tuj maldungi.

Jan Erik Hanussen donis la 24an de februaro 1933 pompan akcepton. Pinte de la vespero li invitis siajn gastojn meznokte al seanco. Kun tordita vizaĝo, skuiĝantaj membroj li deklaris: li vidas fine de la avenuo Unter den Linden grandegan konstruaĵon kun alta kupolo. Ĝi brulas kun altaj flamoj, la fajro atingas ankaŭ la kupolon. Poste li aldonis: ĉi tiu flammaro estas simbolo... Simbolo de la tuta Germanio.

Pri tio naskiĝis diversaj opinioj. Estis tiaj, kiuj kredis, Hanussen ĉi-foje parolis vere en tranco pri venontaj eventoj. Laŭ aliaj pere de iu nazia gravulo li ricevis informon pri tio, kio precize tiel okazis, kiel li antaŭvidis. Post tri tagoj nome ĉio realiĝis. Dek miloj da homoj fluegis al la konstruaĵo de la regna asembleo, antaŭ la flamiĝintan *Reichstag*. Eble pli rapide ol la flamlangoj disvastiĝis la novaĵo: la kortega mago de Hitler precize aŭguris la incendion. La eksterlanda gazetaro ĉiam pli evidente aludadis, ke la bruligo estas faro de la nazioj, dum la germanaj gazetoj skribis: la komunistoj estas respondecaj por la krimo. Alvenis la tempo, definitive elimini la ruĝulojn.

La aŭguro de Jan ne plaĉis. Du tagojn post la forbrulo de *Reichstag* li ankoraŭ rolis en la varietea teatro Scala. Lian kadavron oni trovis du semajnojn poste en la pinarbaro apud Neuhof.

Röhm ankaŭ hieraŭ vizitis min.

– Kiel vi fartas, kara amiko?

– Kompare kun tio, ke mi estas kaj libera, kaj ne, tolereble – mi respondis.

– Nur ripozu trankvile, la tempo ĉion rearanĝos.

Poste li transiris al la kerno.

Grafo Stephan von Droste-Hülshoff ankaŭ plu tenas sin al sia aserto, ke li trafis vin ĉe la faro kun sia kara filino.

– Espereble vi ne supozas ion tian pri mi, ĉu?

– Estas indiferente, kiel mi opinias. Mi kredas al vi! Sed malkaŝe mi ne povas pledi por vi kiel defenda advokato. Aŭ amiko. Mi disfamigas, kiel bona mediumo vi estas. Cetere mi ne rajtus viziti vin.

– Hanussen devis morti, ĉar li aŭguris la bruligon de *Reichstag*! – elglitis kontraŭvole el mia buŝo.

– *Was hat er angestellt? Er hat etwas angestellt*[43] – respondis Ernst. – Poste jene li daŭrigis. – Jan estis evidente osto en la gorĝo de Hitler. Mi ne miras, ĉar unue li antaŭdiris, ke nia gvidanto konkeros la mondon, kaj poste li neniiĝos. Mi do demandas: se iu regas super ĉiuj landoj kaj disvastigas la ĝermanan kulturon, kiel li mem povus perei? Tio estas ne nur kontraŭlogika sed ankaŭ sangoboliga. Vera ĝermana patrioto, la plej granda homo, heroo de Germanio ne povas fali, se ĉiuj klinos sin subigitaj antaŭ li. Kompreneble, ĝis la mondregado oni ankoraŭ devas atendi kelkajn jarojn. Nu..., laŭ la ordono de la *Führer* aŭ iu alia via iama amiko, Jan Hanussen forpasis. Vi, kiel elstara mediumo, ne kontaktu lin! Okupiĝu prefere pri la teŭtonaj kavaliroj, pri niaj ideoj! Eble mi povos enirigi vin denove en la Societon Thule, sed por tio

43 Kion li misfaris? Li kuiris ian kaĉon. (germane)

necesus ia tre bona aŭguro.

– Kiu kredus al mi post ĉio ĉi?

– Jes, jen la tubero! Negu Hanussen! Diru, ke vi interparolis, kiam li estis ankoraŭ normala, t.e. favorato de Hitler. *Stell dich nicht so an!*[44]

– Vi nun alvenis pro io tute alia – mi prenis al mi la direktadon de la konversacio.

– Laŭ Stephan per amindumo kaj belaj vortoj vi alflatis la favoron de la grafino. Maria Justina, kompreneble, neis, ke vi parolis al ŝi pri la kunvenoj. Tamen pli frue ŝi eble lasis elgliti ion prie, aŭ la grafo konkludis tion. Vi dividis kun ŝi la sekretojn de nia organizo, vi rompis vian ĵuron.

– Per kio li scipovas pruvi tion?

– Bedaŭrinde ne necesas pruvoj. Nur aserto! Sian edzinon la grafo ne enmiksos en la aferon. *Das ist keine Kunst!*[45] La grafino konfesos, se venos la afero ĝis tie, ke vi parolis al ŝi ion nebule, sed nenion ŝi komprenis el tio. La grafo volas veni en la proksimecon de Hitler, kaj en konvena momenti akuzi vin per la perfido de Germanio!

Mi konsterniĝis.

– Neniam mi farus ion malbonan kontraŭ Germanio!

– Mi scias – respondis Röhm lakone.

Li komencis iradi tien-reen tra mia ĉambro. Li ekfumis.

– Estas nenegeble, ke vi estis amiko de Hanussen. Krome al la vortoj de grafo Droste-Hülshoff oni donas pli da kredito ol al vi. Eĉ se li asertos, ke vi rakontis malican ŝercon pri Hitler...

– Kial mi farus ion tian? – mi demandis kolere.

44 Ne estu tiel dupa! (germane)
45 Afero ne malfacila! (germane)

– Vi ne bezonas trovi ĉi tie rilaton inter kaŭzo kaj sekvo! Tiel funkcias ĉi tiu sistemo.

Mi ĵetus ion volonte kontraŭ lian kapon. Kiel li povas esti tiom frostsanga kaj cinika?! Poste mi venis al kuraĝa decido.

– Ankaŭ mi estas tia mediumo kiel Jan. Mi ricevis la informojn per transcenda vojo. Jan venis en kontakton kun malica loĝanto de la sinkinta insulego, kiu koruptis lin. Kun la morto de Hanussen ĉesis la kontakto, la envulto. Jan devis fali! Lia morto alportos puriĝon al la germana raso. La *Führer* konkeros la tutan mondon, la Nacisocialista Germana Laborista Partio venkos en ĉiuj landoj. La tempo jam proksimas!

– Tio sonas bone. Sekve vi volas fariĝi la kortega aŭguristo de la *Füher?* – demandis Röhm ironie.

Mi enpensiĝis por kelkaj sekundoj pri la ideo.

– Ne. Kun tia „pasinteco” mi ne povus.

– La *Führer* ne akceptus hungaron! Eĉ se li estas nobelo! La hungaroj ne estas ĝermana raso! Vi estas barbaro! Vi ne povos renaskiĝi! Vin generis ne germana patro, vin naskis ne ĝermana patrino. Prefere ni ankoraŭ atendu. Invitu min al ŝakpartio!

Röhm ne estis vere bona ludanto, mi male jes. Mi scipovis antaŭkalkuli ĉiujn liajn movojn, sed intence mi ludis malbone. Kelkfoje li proponis remion, kiun mi feliĉe akceptis.

– Vi estas nervoza, kara Tasilo! Vi pretervidis la reĝinon.

– Kie Hitler estas, tie mi bezonas nek reĝon, nek reĝinon.

– Tio estis saĝa respondo. Sed ankaŭ ĉi tiun partion mi gajnis. Kvankam mi tre volus, se foje vi ricevus la laŭrojn.

– Se la armeo de la Tria Regno vizitos la mediteranean regionon, mi plukos al mi kelkajn laŭrobranĉojn.

Röhm trovis ŝerca mian rimarkon.

Malfacile mi atendis, ke la longa vizito finiĝu. Al mi fariĝis pli

facile nur, kiam li sidiĝis en sia BMW, atendanta antaŭ mia domo, kaj li gestis al sia blank-gantita ŝoforo, ke li ekveturu.

La motoro ekbruis, kaj la aŭtomobilo malaperis post kelkaj sekundoj el mia vido.

Poste mi volis forgesi ĉion... Mi rigardis, kiel inundas la blueca lumo de la luno la ĝardenon de la najbaro....

– Oni diras, ke en Brazilo vivas sovaĝuloj – demandis foje Krystyna dum iu sia vizito.

– Multajn similajn malsaĝaĵojn oni jam elpensis supraĵe juĝantaj homoj. Ekzemple: la angloj kaj svedoj estas malvarmaj – nur neniaj emocioj, se mi rajtas peti; la francoj estas bohemiaj, la germanoj precizaj, avaraj, sed plej bone scipovas labori en la mondo; Usono estas lando de neelĉerpeblaj ebloj, kiu ajn povas fari bonan karieron, se li havas talenton; la serboj scipovas nur militi, ĉiuj rusoj estas ruĝaj revolucioj; Svislando estas tre riĉa – estas pli da bankoj ol domoj; ĉe la rumanoj nafto fluas eĉ el la putoj; kaj ni hungaroj – pardonu min! – estas sovaĝaj, niaj prauloj estas ja migrantaj ciganoj, banditoj, bovopaŝtistoj. Tiel oni pensas pri ni! Kvankam Hungario estas la lando de bonaj vinoj kaj vera patrioteco. La vivo estas belega tie! Tiu de la nobeloj, kompreneble, eĉ pli bela!

Krystyna ekridis. Ŝia rido ruliĝis tra la blanka tablotuko kaj finiĝis rekte en la fundo de mia konjaka glaso. Mi devis trinki el ĝi. Almenaŭ unu gluton, por senti, fermi en mi la serenan resonancon de ĉi tie animpura virino.

– Sed tio ja estas sensencaĵo! Diri ion malbonan pri la hungaroj! – Poste neatendite ŝi demandis:

– Kaj kiaj homoj estas la poloj?

– F-ino Krystyna! Mi petas vin, ne prenu kiel ofendon, se mi eldiros: la poloj estas tipo sentimentala, revema, entuziasmema,

fiera pri siaj tradicioj kaj lando, amas la liberecon. La damoj estas plaĉaj, allogaj, sed estas tiel malfacile veni proksime al ilia koro, kiel en Louvre al Mona Lisa. Ili rigardeblas nur el tri-paŝa distanco. Kiu elcerbumis ĉi tion lastan, estis evidente platone enamiĝinta.

Poste ŝi petis min daŭrigi miajn impresojn pri Brazilo.

– Kiam en Berlino tempas tagmezo, la horloĝoj en Rio-de-Ĵanerjo batas la sepan matene. Kompreneble, la praloĝantojn, la indianojn ne zorgigas la paso de la tempo. Pli frue ili ne konis la terkulturadon, atakadis aliajn tribojn, sternis al si liton el arbo-folioj kaj ŝeloj. Sian korpon ili farbis per la suko de arbaraj plantoj. Ili ornamis siajn kapon, harojn, traboris sian nazon kaj enmetis ringojn. La tribestroj povis havi plurajn edzinojn. La portugaloj, nederlandaj, francaj, germanaj soldatoj persekutis kaj ekstermadis ilin. Ankaŭ la koloniantaj portugaloj kaj la malhumanaj laborkondiĉoj, plus la malsanoj, enportitaj el Eŭropo (ftizo, variolo), pereigis ilin.

– Simple mi ne trovas vortojn, aŭdante tiom da barbaraĵoj!

– Parto de la brazilaj geografiaj nomoj estas de indiana origino – mi daŭrigis. – Anstataŭ la indianoj, ne kutimiĝintaj al laboro, oni enportis nigrajn sklavojn el Afriko, Niĝerio, Dahomejo, Gvineo, Sudano, Angolo kaj Kongo. Ili intermiksiĝis, ilia komuna lingvo fariĝis la *nagô.* Multaj iliaj vortoj transiris en la brazilan portugalan lingvon. De 1818 la registaro permesas ankaŭ al eksterlandanoj aĉeti bienojn. La enmigrintoj setlis unuavice sude, kaj alvenis ĝenerale sen edzinoj. La miksitoj el blankaj viroj kaj indianinoj estas mestizoj, sed ofte oni nomas ilin mamelukoj. El la geedziĝo de nigraj sklavinoj kaj blankaj mastroj naskiĝis la mulatoj. La viroj agnoskis tiajn infanojn, tial liberigis la patrinojn. La mulatinoj heredis de siaj blankaj kaj nigraj geprauloj la belecon de

ambaŭ rasoj. Ekzistas ankaŭ aliaj miksitoj, sed mi ne tedas vin per tio, f-inon Krystyna.

– Mi konfesas al vi sincere, ke malfacile mi rekonsciiĝas, aŭdante tiom da krudaĵoj, malmoralaĵoj. Kaj ĉu vi ankoraŭ asertas, ke la brazilanoj ne estas sovaĝaj?!

– Ni, en Eŭropo, pensas alimaniere ol la homoj tie. Se ni rigardas ilin per ĉi-lokaj okuloj, eble ne ekzistas veraj brazilanoj, ja ĉiuj estas ĉies parencoj – se ili devenas de pluraj praŭloj. Tie ne ekzistas diferencigo laŭ rasoj, jam delonge ne estas sklavoj. Se vi, kun via blanka haŭto aperus sur la bordo de Pacifiko, vi almenaŭ tiom frapus la okulojn, kiel negro, sidanta en elita salono.

– Tamen la du aferoj ne estas tute samaj! – Kaj post iom da medito ŝi aldonis: – Finsume, ĉi tiu lando estas tiel malproksime, ke tio ne ĝenas min...

– Tre ĝuste – mi konstatis ŝian toleremon. – Sed blankulojn oni devas kompreni ne tiel, kiel ĉe ni, ĉar pro la forta sunradiado ankaŭ blankuloj estas fakte hele brunaj – sed ne nigraj! Kiam mi esplorserĉis nafton kun mia ekspedicio, mi havis almenaŭ cent servistojn, krom ili 20-25 blankuloj (kuracistoj, esplorboristoj, inĝenieroj, maŝinistoj, universitataj profesoroj) helpis mian laboron.

– Ĉu do s-ro Tasilo estas ne nur veteresploristo sed ankaŭ naftoministo?

En la voĉo de Krystyna mi malkovris infanecan ironion. Foje al ŝia demando, kia vetero estos morgaŭ, mi eliris sur la balkonon, diris kelkajn hokuspokus, kaj rapide reveninte, mi anoncis: „Mi ne scias.” Mi rikoltis grandan sukceson per mia prezentaĵo. Al ŝia aludo mi nun ne reagis.

– Vivi dum monatoj en la praarbaro kaj esperi ĉiutage, ke post borado tiutage erupcios nafto – nu, por tio bezonatas granda sindediĉo, obsedo, eĉ scio. Kompreneble, mi havis homojn, de kiu

mi povis lerni, ĉar tiutempe laŭ la propono de mia onklo, princo Matila Costiescu Ghyka, posedanto de la rumaniaj naftokampoj ĉe la Nigra Maro mi akiris en Parizo mininĝenieran diplomon.

– Vi devus montri vin nek en la universitato, nek aliloke kun et- kaj grandburĝaj individuoj! Mi opinias superflua ankaŭ la studadon, ĉar vi ja povas vivi el la enspezoj de via havaĵo. Ĝuste tiel, kiel ni.

– Vi pravas, f-ino Krystyna! Sed la scienco, malkovro de la brazilaj praarbaroj faris min libera. La belecon de la ekzota mondo mi ekkonis ne el libroj, priskriboj de aliuloj sed surloke.

– Kaj nun vi reiros pli aŭ malpli frue?

– Ne, ne verŝajne! Mi nome vendis miajn entreprenojn, investis mian tiean havaĵon en akciojn. De tiam mi okupiĝas pri tute alispecaj negocoj. Sed tio restu mia sekreto!

– Paĉjo instruis min tiel, la sekretoj estas sanktaĵo. Ne decas esplordemandi pri ili.

– Ja prave! Sekreto estas sankta kaj nerompebla, ĉar ĝia posedanto decidis ne malkovri ĝin. Vere ne decas scivoli pri ĝi..., escepte se la posedanto de la sekreto mem ankaŭ sen demandoj malkovras ĝin.

Krystyna rigardis min atende.

– Do mi demandos nenion, mi nur aŭskultos vin.

– Ho! Vi kondutas kiel infano, kiu ĝojas, se li povas kapti sian patron ĉe la vorto, sed ne kuraĝas anonci tion al li.

– Jes, ankaŭ hieraŭ vespere iu frapis ĉe mia pordo... „Kiu estas?" „Mi estas, la Plenaĝo!" Mi ne enlasis lin. Do ankoraŭ nun mi estas „granda infano".

– Do atentu min, „granda infano mia"! – mi replikis al ŝi kaj rigardis profunde en ŝiajn okulojn. – En Svedio mi malfermis orminejon. Mi malkovris ĝin kun mia esplorteamo. La pliparto de la

akcioj kuŝas en svedaj kaj germanaj bankoj, sed mi deponis multe ankaŭ en Svislando kaj Novjorko.

– Mi gratulas vin! – ŝi diris indiferente, poste aldonis: – Dankon, mi ne petas pli, ĉar tio estas ja vere via privata sfero.

Se vi scius tiam, kara Krystyna, ke nur vi sola estis en mia privata sfero! Bedaŭrinde dudek jaroj apartigis min de vi, kaj tial mi devis aktori, ludi la rolon de patrumanta onklo. Mi devis teni vin for de mi, ĉar eĉ per unusola aludo, gesteto mi ne volis, ke iu eksciu mian platonan amon al vi. Vi vivis, iradis-venadis en mia privata sfero tiel, ke mi forfermis min de vi... Nur tiel vi povis resti pura. Mi ne volis ombri vian lumplenan vivon kaj bonan famon.

Kun granda doloro mi devis ekskludi ŝin el miaj revoj. Se mi sentis necese, image mi provis konsoli min per Milico. Sed ŝi estis space kaj tempe en neeltenebla malproksimo...

Mi endormetiĝis. Min vekis, ke miaj brakoj, kubutantaj sur la tablo kaj tenantaj mian vizaĝon, deglitas, kaj antaŭ ol lasi frapiĝi mian nazon, mi alarmiĝis kaj reklinis min. La seĝon retenis la proksima muro. Tio estas jam indiko de absoluta elĉerpiĝo. Estus bone purskui min ĉe la fenestro kiel polvotukon, por ke la superfluaj pensoj elŝutiĝu el mi.

Mi eliris en la kuirejon, infuzis fortan teon, faris kvardek brakofleksojn.

Nun mi denove estas en stato, ke mi povas plu skribi miajn rememorojn.

Antaŭ la transa vitropordo enireja kaj sub la fenestro staras po unu SA-soldato. Unu ĝuste ekfumas. Li estas Hans. Sufiĉe bone ni interamikiĝis. Kontraŭ iom da ŝmirmono li pretas plenumi miajn ĉiutagajn aĉetojn kaj peras ankaŭ mesaĝojn kaj leterojn.

Surbaze de miaj rakontoj li estas konvinkita, ke oni tenas min tute senkulpan en domaresto. Kiel internacie fama investisto mi certe baldaŭ senkulpigos min de la falsaj akuzoj.

– Miseto okazis, plej gravas esti atenta kaj prudenta. Pri unu homo el cent evidentiĝas, ke li estas senkulpa. Tio estas bona erarprocento. Mi ĝojas, ke ĝuste vi reprezentas ĉi tiun erarprocenton.

– Se pruviĝos mia senkulpeco, mi dankos vin pro tio, ke vi estas tiel objektiva – mi diris.

– Kredu al mi, s-ro Tasilo, se mi povus, mi dirus kelkajn vortojn por via senkulpigo...

– Vi puŝus vin en danĝeron.

Pri tio li enpensiĝis.

– Jes, tio zorgigas min. Sed bonvolu ne koleri min, ja la vero baldaŭ evidentiĝos!

Lia kolego Jürgen ne estis tiom afabla. Li donis al mi la oficialan respekton, ĝentile atentigis min pri ĉio, kio estas kontraŭa al tia domaresto.

Pri la komplezoj de Hans, faritaj al mi, li aŭ ne sciis, aŭ ne atentis ilin. Jürgen ligiĝis pli forte al la naci-solcialista partio ol al siaj gepatroj, kiuj praktike rifuzis koni lin. Tial Jürgen vidis la unusole eblan karieron ene de SA. La ordonojn li senmanke plenumis, kaj tio faris lin vera soldato. Sub liaj ĝermantaj Hitler-lipharoj kaj en la buŝkomisuroj aperadis kontenta rikano.

Hodiaŭ matene, dum razado mi ekvidis la bildon de Milico en la spegulo. Ĝi ekfulmis por momento. La imago primokis min. Ŝi enkapiĝis al mi eble pro tio, ke antaŭ niaj amoraj kunestoj mi devis ĉiufoje razi min. Sed miajn lipharojn ŝi tre ŝatis. Ŝi karesis, tiretis, taŭzis, kisadis ilin. Kiel senbrida infano.

Kie nun vi estas, Milico? Kiun vi feliĉigas? En kies lito vi ĉifas

la kusenon kaj la littukon? En kies dorson vi profundigas viajn ungojn? Kiun vi karesas kun tia amo, kiel bestoŝatanto sian hundon? La tempo certe postlasis siajn spurojn ankaŭ sur vi. Kvardek jaroj estas duoble tiom, kiom dudek. Ĉu vi amas aŭ tutkore malamas tiun, kun kiu vi dividas vian liton?

Estas tutegale. Li nur estu riĉa, influhava, dorlotu vin, amindumu! Mi esperas, ke vi ne devos naski infanon, ĉar de tio via figuro povus fariĝi malpli plaĉa. Kaj kian idon vi povos havi, de kiu oni povas heredi nur egoismon? Se vi havas filinon, sen via beleco mi ne scipovas imagi ŝin. Kaj se ŝi ne havas fortan, riĉan, severan patron, ŝi povus fariĝi tia, kia vi... aŭ kia mi. Estus domaĝe...

Mi sciigis al Hans diskrete, ke mi bezonus ĉarman, fideblan damon por la nokto. Mi pagos ankaŭ al Jürgen por la komplezo, eĉ premie ili ricevos po unu enirbileton en la domon de la *Madame*[46]. Hans unue ne volis kompreni; li pensis, ke mi serĉas ĉambristinon, poste tamen entreprenis sendigi leteron per sia konato al Moulin Rouge. Mi petis de la *Madame* Lisa, la orharan. Mi aldonis: se ŝi ne povus veni, konvenos ankaŭ la nigra- kaj longhara Mary.

Kun la *Madame* pli frue mi havis bonan rilaton. Ŝin ekzemple ne interesis, kian skandalon mi kaŭzis per mia teatra fiasko. Eble ŝi ne sciis, ke mi troviĝas en domaresto, ĉar por ŝi estis ĉiam plej gravaj la negoco kaj diskreteco.

Se mi aperis en la ruĝlanterna domo[47], ĉiuj knabinoj ĉirkaŭsvarmis min. Kelkfoje kun vera, kelkfoje mimata ofendiĝo ili prenis kiel fakton, ke ne ilin mi elektis. „Sekvafoje!” – ili konsolis

46 posedantino de bordelo
47 bordelo

sin. Povas esti, ke ili bedaŭris ne la travivaĵon sed la por ĝi ricevotan honorarion. Mi estis ĉiam malavara, por kio mi ricevis la plej bonan priservon.

Alvenis Lisa, en stato ebrieta. Ŝi turnis, tordis sin antaŭ miaj gardistoj, ĝuis la popularecon. Ni eniris la ĉambron kiel amanta paro.

– Al mi plaĉas ĉi tiuj soldatoj! – ŝi diris ridante. – Tasilo, ĉu vi povas ĉion aranĝi? Devas esti tre agrabla sento, se iun gardas du tiaj SA-anoj. Sed ni scipovas gardi unu la alian, ĉu ne?

– Vi estas, kiel ĉiam.

– Ne ĉiam mi estas tia, sed nun mi devis trinki kun iu el miaj klientoj iom da ĉampano. La prezo inkluzivis ankaŭ ĝin. Ni kutimas trinki koloran akvon, sed li mendis tutan botelon, kaj mi ne povis eviti.

– Ankaŭ tiel vi estas bela kaj alloga. Eĉ!

– Do kun tio mi anoncas, ke ni povas komenci.

La komenco bezonis nur unu-du minutojn, sed la agado daŭris unu kaj horduonon. Malavare mi dankis ŝin por ŝiaj servoj. Kontente ŝi metis la bankbiletojn en sian nigran mansaketon. Poste neatendite ŝi anoncis, ke ŝi ankoraŭ volonte restos.

Mi surtabligis mian magran nutraĵsortimenton. Du specoj da fromaĝoj, salamo, mirtela marmelado, fiska pano[48], mineralakvo...

– Tasilo! De sufiĉe longe mi konas vin. Mi devas konfesi al vi ion. Vi estas cetere multe pli bona kaj tute grandanima knabo. Ne tia, kia Stephan von Droste...

– Ĉu ankaŭ li vizitadas vin?! – mi demandis surprizite.

48 do ŝtata, kian soldatoj ricevas, sekve ne bonkvalita

– *Natürlich*[49]. Malbonodora, senfantazia kaj envia, sed tio nun ne gravas. Mi ne scias, kiel ŝi divenis, ke pli aŭ malpli frue mi trafos en viajn brakojn. Cetere mi ne komprenas: li estas polo, do ne ĝermana arjo, tamen tiel alte oni taksas lin.

– Li ne kulpas pro tio, ke liaj praulој naskiĝis en Pollando, sed tiuj estas ĝermanoj ĝis la sepa generacio. La nomo de ankaŭ lia edzino estas germana: Maria Justina von Ditrich-Stein.

– Stephan rakontis, kion vi faris kun Krystyna.

– Li povis diri, kion li volus vidi! Pri la efektiva situacio li ne emis preni konon.

– Mi sciis, ke li mensogas. Kaj tial vi estas nun fermita en via propra domo... – Ŝi enpensiĝis. – Stephan konfidis al mi, elpreni el vi kelkajn aferojn. Li minacis min. Se mi ne faros tion, li plendos al la *Madame,* ke mi kondutis kun vi krude.

– Demandu do!...

– Ĉu vi estas fakte mediumo?

Mi atendis ne tian demandon.

– Kaj se jes, kiel vi volas konvinkiĝi?

– Mi ne scias...

– Nun mi transfiguriĝos. Ne ektimu! Li estas scivola, kion nun mi diros.

Mi fermis la okulojn, la manojn metis sur la genuojn.

Mia vizaĝo verŝajne tute transfiguriĝis. Por momento mi malfermis la okulojn kaj rimarkis ŝian teruritan rigardon.

– Mi vidas grandan homon... Kiu li estas?... La plej granda homo de la mondo. Adolf Hitler, gvidanto de Germanio... Jes, li estas. Li proksimiĝas al mi. Ne, ne... Li iras al la grandega globuso maldekstre. Li rigardas, rigardas ĝin... La landoj de la mondo

49 kompreneble (germane)

fariĝas ruĝaj... Ruĝa, ruĝa... Tiu estas ja la koloro de la sovetaj komunistoj!... Sed fakte tio ne estas koloro, ĝi gutadas. Tio estas sango! Sinjoroj! Kie li paŝas, ĉio inundiĝas per sango, kaj tamen lia estos la mondo... La granda homo kaj la armeo de Germanio venkos ĉiujn. Kaj ve al la venkitoj!... *Rana in fabula* – diris la romianoj. La rano el la fablo, por vidiĝi granda, ĝi pufigas sin, sed krevas de la fortostreĉo...

Neatendite mi malfermis la okulojn kaj per natura voĉo aldonis:

– Stephan kaj ankaŭ Hitler puniĝos iam.

Lisa rekonsciiĝis de la surprizo.

– Belulĉjo, vi ne estas normala! Pro tia parolaĉo oni tuj likvidos vin!

– Kiu estas pli bona? Ĉu la sekura kaj tuja morto aŭ la malrapida kaj turmenta, kia la mia estos.

– Vi parolas sensencaĵojn.

– Dum io ne okazas, tio povas ŝajni sensenca, sed poste ne plu.

– Venu! Mi denove konsolos min per via ĉarma sed melankolia vizaĝo... – ŝi diris kare.

Ekde tiam nur al ni du apartenis la mondo. La tuta terglobo. Kaj niaj emocioj transpasis landlimojn, disfluis, faris feliĉaj ĉiujn vivantojn kaj mortintojn.

La 29an de junio 1934, ĉirkaŭ la sepa vespere aperis du SS-leŭtenantoj. Al miaj gardantoj ili montris malferman ordonon kaj permesis al ili dek kvin minutojn ĝis foriro. Hans kaj Jürgen kolektis kun febra hasto siajn aĵojn.

Mi invitis la oficirojn en la salonon. Mi devis fari aludon pri mia estonta sorto. Unue ili ne komprenis ĝin, poste unu rimarkigis:

– *Mein Herr!* Vi estas evidente sindediĉa fidelulo kaj servanto

de la *Führer,* do tute libera homo. Rilate vin ni ricevis nenian ordonon.

Mi volis regali ilin per kafo, sed ĝentile ili rifuzis.

Post kiam ili ĉiuj kvar foriris, mi daŭrigis skribi mian taglibron. Dume mi senĉese serĉis la rilaton inter kaŭzo kaj sekvo. Kial oni transkomandis Hans kaj Jürgen? Kaj min kial oni lasis sola? Ĉu ĉesis mia domaresto? Se tiel, kial oni ne komunikis tion al mi?

Mi devus forfuĝi... Mia telefono delonge ne funkciis. Mi levis la aŭdilon. Ŝajnis nekredeble, ke estas linio. Tio estas nepre pozitiva ŝanĝo. Poste tamen mi decidis ne telefoni al Röhm. Certe oni subaŭskultas min. Mi puŝus lin en malagrablan situacion.

Mi vekiĝis rompita. Kvazaŭ mi estus trasuferinta la tutan nokton. La luno plenas. Onidire tiafoje okazas al ni mirakloj.

Ĉu ankaŭ la inkuboj tiafoje naskiĝas? Kiel hodiaŭ nokte? Sur la strato mi renkontis nekonatan viron, kiu petis de mi cigaredon. Mi enpoŝigis la manon. Ekmiris, ke mi havas ĉe mi malfermitan skatolon da cigaretoj kaj alumetojn. Kune ni ekfumis. Mi profunde ensuĉis la fumon, sed ĝi ne estis bongusta. Mi ekhavis viziojn, kaj tremigis min ankaŭ la bildoj, kiujn mi vidis projekciitaj sur la muro de la domo.

Mi staris sola sur la strato. La lumprezentado estas nur al mi destinita. Ies estontecon oni projekciis antaŭ min. Al la bildoj apartenis klarigoj. Objektiva virina voĉo parolis al mi; ĉiufoje aperis sur la muro po unu movbildo.

„Kara Amiko! Vi ne estas honesta. Kiujn vi povis, vi trompis.” (Patrino kaptas sian infanon kaj forkuras.) „Kial vi faris tion? Ĉe ni klarigoj ne gravas!” (Bluakva, milda golfo kun palmoj sur la bordo, poste samloke du viroj komencas interbatiĝi.)

„Nun vi vidas vin de ekstere. Vian animon vi aliris malfacile, ĝi

restis fremda por vi.” (Bildo de fora urbo.) „Serĉu la amikecon, favoron de la Granda Homo! Tiam vi ankoraŭ povos plu vivi!” (Sur la domflankon ĵetiĝas la ombro de la Granda Homo.)

„Kiuj estas de arja deveno, tiujn la leĝoj ne koncernas. Vi estas nur nobelo sed ne vera nobelo!” (Viro karesas sian hundon, kiu ŝanĝiĝas en nigran kolombon kaj forflugas.)

Ĉi tiu sonĝo turmentis min.

Jes. Mi ne estas, ne estis honesta! Ĉu tiuj, kiuj buĉas homojn, kiel la fanatikaj nazioj, ĉu ili eble estas honestaj? Ili rompas la leĝojn. Tiujn de la konscienco kaj religio. Ili kreas la normojn, regulojn de konduto kaj kunekzistado. Se ili volas, ili enkarcerigas, mortpafas milojn. Nur pro tio, ke pro siaj naskiĝo, religio ili ne apartenas al ili. Nazioj ne havas kaj ankaŭ ne povas havi konscienco n!

La plej superaj gvidantoj de la Societo Thule estas satanistoj! Ili klopodas servi al malicaj fortoj. Arbitre ili levas akuzojn, juĝas, verdiktas punojn. Altrangaj policoficiroj, universitataj profesoroj kaj ministroj troviĝas inter ili! La plenumitaj krimoj restas nevenĝitaj. *Zu meinem größten Leidwesen*, je mia plej granda bedaŭro. Kaj ili kredis, ke ankaŭ mi apartenas al ili.

Se mi defraŭdas parton de ies havaĵo, centoblo ja restas al li. Eĉ, mi ne forprenas ĝin, sed memvole ili proponas ĝin al mi. Mi miskondukis, trompis, erarigis ilin – mi agnoskas. Sed mi neniam mortigis, nek murdigis iun. Pri politiko mi ne okupiĝis. Mi ne sopiris al tiaj altoj kiel Kreuger aŭ Hitler. (Kial mi mencias ilin ambaŭ samtempe? Kreuger estas ekonomia geniulo kaj fripono, kaj Hitler!... Bedaŭrinde Kreuger apartenas jam al la pasinta tempo. Mi legis, ke printempe de 1932 en iu berlina hotelo li pafis kuglon en la kapon. Eble li estis ebria, ĉar mi konis lin ne tia. Ĉu eble li faris tion pro la Norrbotten Ormineja Ekspluata Akcia Kompa-

nio? Kiu pekis multe, ne kondutu tumulte. *Die Ersten werden die Letzen sein!* La unuaj estos lastaj!

Kion mi povus ankoraŭ skribi? „Kiu dormas, tiu ne kulpas...” – iu foje diris. Sendorme mi turniĝadas, mia korpo baniĝas en ŝvito. Dum mi ne dormis – mi vivis, satĝuis ĉiun minuton. Se kelkfoje trafis min „mallumo”, mi elturniĝis, adaptiĝis al la cirkonstancoj. Ĉion mi klopodis turni en bonon. Sed nun?!!!... Stephan persekutas min. Krystyna kaj Maria Justina evidente scias nenion pri tio. Kaj se tamen, Stephan kvalifikis min antaŭ ili milfoje perfidulo kaj defloristo.

Plurfoje mi starigis al mi la demandon: ĉu estas vivo post la morto? Tio povas ŝajni ŝerco, sed neniu scias, ĉu la animo en lia korpo estas reala, ĉu ĝi kreas kunecon, ekzistantan en la donita momento, aŭ la akordo, kelkfoje malakordo de korpo kaj animo estas nur ŝajno, ekzistanta sur la nivelo de la imago. En ĉi lasta okazo ni ne estas realaj, nur kvazaŭrealaj. La vivo antaŭ la morto estas agrabla iluzio.

Se vi estas libera kaj feliĉa, vi povas realigi vian volon. Kun kredo vi konfesas, ke vi ĉeestas en ĉiu donita minuto, la unueco de viaj korpo kaj animo direktas vian volon.

Sed tio estas nur pensoĉeno. Mia fizika realaĵo, estaĵo neniiĝos post la morto, sed ĉu mia anima realaĵo pluvivos? Al tiu demando mi scipovas respondi nek nun, nek poste. Se post mia morto ĉio evidentiĝos, al neniu mi povos raporti tion.

Fieco kaj malamo mortigas senkulpajn homojn. Tiel povas fariĝi la *homo sapiens* la plej sangavida animalo. Ĉu troviĝos forto, kiu haltigos la naziismon? Mi timas, ke neniam mi ekscios tion, ĉar ĉi tiu partisistemo praktike jam neniigis min. *Hitler hat es faustdick hinter den Ohren. Er ist ein Schwein!* Hitler estas frotita kaj

polurita. Li estas porko! Mi povus forveturi, sed vane! Se tamen: *eine Fahrt ins Blau!*, salto en mallumon!

Ĉu antaŭ la morto ekzistas vivo?

Mi havis vivon, sed bedaŭrinde ĝi daŭris nur 43 jarojn.

En nenies koro mi jam bruligos esperon...

Oni venas por mi...

## Romanoj de Attila Salga

**1. Mi lenne velem nélkülem?** (Kio okazus al mi sen mi?) (2009)

**2. A koronázatlan szélhámoskirály** (Senkrona trompista reĝo) (2005); *(más címmel:* A mátészalkai kalandor regényes története (*alititole:* Romana historio de trompisto el Mátészalka (2009)

**3. A reménygyújtogató** (Esperiganto) (2011); *(más címmel)* Hamis remények ébresztője *(alititole:* Vekanto de falsaj esperoj) (2011)

**4. Ideát van kóma** (Ĉi tie estas komato) (2011); *(más címmel)* Kómában kómátlanul *(alititole:* En komato senkomate)

**5. Nem minden Pipi buta tyúk** (Ne ĉiu kokido estas stulta kokino) (2013)

**6. Keserédes** (Amardolĉa) (2015)

**7. Lélekolvasó** (Animlegejo) (2018)

**8. Vonzások és taszítások** (Allogoj kaj malallogoj) (noveloj) (2019)

***A reménygyújtogató** (2011) (Esperbruliganto, tr. de Jozefo Horváth) (2020)*

***

**Csalóka nyalóka** Vígjáték két részben (Trompa lekaĵo. Duparta komedio) (2013)



**Attila Salga (1945)** d-ro, [elp. atila ŝalga] estas hungara esperantisto, ĵurnalisto, filologo, lingvisto, romanverkisto kaj E-instruisto. Instruis la rusan lingvon kaj Esperanton en la Pedagogia Altlernejo en Eger (1970-1981), poste en la Universitato Lajos Kossuth en Debrecen. Doktoriĝis en 1975 (*Sándor Bonkáló (1880–1959) kaj la orientaj slavoj).* Aperigis serialon de E-aj lernolibroj kun vortaroj, sciencajn laboraĵojn kaj artikolojn.
A. Salga verkis dek hungarlingvajn romanojn ekde 1998 ĝis nun. Inter ili estas aventuroj de ĉantaĝistoj, verkaĵoj pri familiaj aferoj, amo, sekretoj, pseŭdoŝtat-formoj parte en serioza, parte en sarkasma stilo kaj noveloj, rakontoj.

La agado de jena Esperbruliganto okazas en dek landoj, kie la ĉefheroo disvastigas esperon pri riĉigo, kapitalo, naftoproduktado kaj aliaj…

*– Do mia nomo – laŭ la vizitkarto – estas Tasilo Melĥioro Horváth de Beöháza. Mi estas brazila-hungara-rumana aristokrato, devenas el grafa familio. Mi studis en Parizo, Londono, Novjorko, Romo juron, ekonomikon, prospektoradon, financojn, komercon kaj diplomation. En Rumanio, Ploiești mi kun mia onklo, grandduko Ghyka posedas ĉiujn naftoputojn ĉe la Nigra Maro. En Brazilo mi posedas signifajn kafo- kaj tabakplantejojn, prilaborajn fabrikojn, eĉ lastatempe mi fariĝis posedanto de naftokampoj en Gran Chaco. En la ŝtato Rio-de-Ĵanejro mi fondis kune kun la registaro bankon. Niajn akciojn ni vendas en la tuta lando.*
*Ivar langoklakis kaj kontente komplimentis.*
*– Jen, jen! Bone vi faris! En tio estas estonteco! El mia teko mi elprenis tri ornamitajn akciojn, kies valoro estis po 1.000.000 milrejsoj.*
*– Kara amiko! Permesu al mi, ke signe de mia alta estimo mi donacu al vi ĉi tiujn akciojn. Konsideru ilin kiel signon de simbola respekto, ja la veran oni ne povas, nek eblas esprimi per mono. Ĝin oni devas senti. Ĉi tie, interne...*
*Mi montris al mia koro. Ĉi tiu grandpeca dikulo emociiĝis proporcie al sia pezo.*
*– Negoco kaj amikeco kune! Malofte ili kuniras. Dankon.*
*Ni intertintigis la glasojn. Poste li akceptis la aĉetprezon por la du gazetoj.*